Abel Montagut

POEMO DE UTNOA



Dua reviziita eldono

Abel Montagut POEMO DE UTNOA

Abel Montagut

Poemo de Utnoa

Reviziita eldono

Títolo de la unua originala eldono en esperanto: *Poemo de Utnoa*
© Abel Montagut, 1993
Eldonejo Pro Esperanto, Vieno, 1993

Dua eldono: ĉe CreateSpace Independent Publishing Platform, junio 2018
Kovrilo: Dazus Massip
© Dazus Massip, 2018: refarita, kompletigita kaj re-pentrita kovrilbildo.
Asiria arkpafisto, detalo el la friso pri la arkpafistoj de Suzo (ĉ. 510 a.K.).
Pergamonmuseum (Berlino)

Aŭtoro de la foto pri la bildo refarita per Dazus Masip: mshamma.
Licenco ĉe www.flickr.com/photos/mshamma/
w:ca:Creative Commons
La fotodosiero de la dorskovrilo disponeblas sub licenco
Creative Commons Rekono 2.0 Ĝenerala.

© Abel Montagut, Lleida, 1 junio 2023
retpoŝto: abel.montagut@gmail.com

ISBN-13: 978-1718814424
ISBN-10: 1718814429

Enkonduko[1]

La klasikaj epopeoj estis eblaj unuavice, ĉar ili konstruiĝis surbaze de mitologioj jam ĝenerale konataj kaj respektataj: la grekaj dioj kaj herooj (Homero); la fondado de Romo (Vergilio); la antaŭreformacia kristanismo (Danto); la postreformacia kristanismo (Miltono); nacigloriga esplorado de *nekonataj* mondpartoj (Camões); k.s.

Kie trovi, en nia epoko, mitologion sufiĉe fortan por ebligi nuntempan epopeon? Kie, se ne en la fantascienco, tiu artformo, kiu floris, evoluis kaj populariĝis dum tiu ĉi jarcento? —jarcento, en kiu adorado al la Scienco vigle konkurencas kun religiaj adoradoj, kaj dum kiu komenciĝis ankaŭ esplorado de nekonata regiono: la kosmo?

Tien sin turnis Abel Montagut por krei sian epopeon *Poemo de Utnoa*. Lia mitologio estas fantascienca; sed por fortikigi ĝin, por pli firme ankri ĝin en niaj mensoj, li apogis sin ankaŭ per aludado al pramito, kiu troviĝas en *Genezo*, sed ankaŭ en la pramitoj de multaj aliaj gentoj kaj popoloj, nome la Inundo, kiam la teron kovris la akvoj kaj homoj kaj bestoj postvivis nur dank' al la agado de unu «bona homo».

Tiuj du fadenoj formas la teksaĵon de *Poemo de Utnoa*. Sed epopeo postulas ankaŭ specialan versformon, kiu varias de unu al alia, tamen devas esti elasta kaj potenca, kapabla porti ĉian retorikon kaj ĉian konceptaron, ne bremsante la fluon de la rakonto. Tie ĉi Abel Montagut denove freŝigis tradicion: li akceptis la Esperantan aleksandron (kiun Kalocsay kaj aliaj juĝis netaŭga por senrima versado), sed li lerte modifis ĝin per aldono de unu mallonga silabo, kio liberigas ĝin de la

[1] Enkonduko por la unua originala eldono de 1993.

rimpostulo kaj samtempe memorigas pri la klasikaj versformoj de Homero kaj Vergilio —sed en moderna formo.

Tiel la poeto sukcesis krei artverkon unikan, kiun nia popolo certe akceptos kun entuziasmo kaj laŭdeme. En tutmonda kadro, la fantascienco inspiris ankaŭ iomete da poezio, sed ĝis nun (laŭ mia scio) kun nur modera sukceso. Ŝajnas al mi, ke *Poemo de Utnoa* estas la unua vere atentinda fantascienca epopeo en la mondo, kaj unu el tre malmultaj modernaj epopeoj. Mi nomis ĝin unika, kaj tia ĝi certe estas.

Estas do atuto por ni, ke tiu ĉi grava verko estas verkita en Esperanto. Kaj tamen mi starigas al mi ankaŭ la demandon: ĉu la lingvo ankaŭ ebligis la poemon? Esperanto estas finfine lingvo poezia kaj nepre moderna. Eble ĝi estas la lingvo plej taŭga por ĝuste tia ĉi arta kreado? Tian taksadon mi heredigas al la estonteco.

Intertempe mi ĝoje salutas tiun ĉi grandiozan verkon.

William Auld

Dollar, Clackmannanshire, la 26-an de junio 1992

Averto
de la aŭtoro

Jen verko apartenanta al la epika ĝenro. Ĝi akceptas ĉiujn ĝiajn klasikajn regulojn aŭ licencojn, interalie kaj precipe, ĝi transprenas fragmentojn el antaŭaj verkoj, ĉu popolaj ĉu erudiciaj, kelkfoje kun minimumaj ŝanĝoj.

Ĉi tio estas draste malpermesita kaj riproĉata kiel plagiato en la nuntempa literaturo. Sed mi nek deziris nek intencis apartiĝi de tiu antikva tradicio, kiun kulturis ĉiuj epopeverkistoj ekde la kompilintoj de la *Poemo de Gilgameŝ*. Kontraŭe: mi provis enkorpigi ĉiun taŭgan fragmenton por la rakonto, kondiĉe ke ĝi estu plurpopole disvastigita aŭ internacieca. Tamen, mi deziras mencii plej gravajn fontojn de miaj pruntepreno j, kiuj estas, krom la *Poemo de Gilgameŝ*: *Biblio, Ramajano, Eneado, Dia Komedio* kaj aliaj, kiujn dokta kritikisto scios senpene (kaj eble nenecese) malkovri.

Aliflanke mi baziĝis sur konfederaciaj arkivoj, ĉu aŭdvidaj ĉu grafikaj, transdonitaj de posteuloj de tiuj stelanoj, kiuj antaŭ jarmiloj ĉeestis la rakontotajn okazaĵojn dum kolonia kosmovojaĝo.

Mia sola merito estis, do, la ordigo de la materialo ĉirkaŭ strukture kohera rakontlinio. Mi ne celis pliajn laŭrojn, krom efektivigi internaciecan sintezon de epopeaj fragmentoj surbaze de tutmonda heroo.

La aŭtoro,
Daa-35

Unua kanto

Naŭton mi himnos kaj universe faman arkeon
kiuj elsavis vivon el tutplaneda diluvo.
Multon li trasuferis dum ĉarpentado de ŝipo,
hezitojn kaj ĉagrenojn daŭrajn fortbruste li venkis,
ĝis ondoj urbojn kovris kaj tutan teron inunde.
Homoj kaj bestoj en ŝlimfundo fordrone pereis.

Ĉiela Muzo, rakontu nun pri l' veraj eventoj
kiam elŝvelis maroj kaj la kaoso tumultis.
Ĉu ĝi fatalis nepra aŭ oni povis eviti?
Ĉu kataklismon mondan diaĵo pune provokus
pro flama venĝdeziro kontraŭ milkrima genero?
El altoj alparolu, ĉion klarigu volonte.

* * *

Kiam tendumis Uttu kun sia tribo nomada
en la Ŝinara lando, ĉe la Puratta rivero,
li suprengrimpis monton dum la matena krepusko.
Tie li tute solis rememorante la faktojn
praajn de sia gento, kiam subite li aŭdis,
ke jen el nordo blovas obtuza vento susura
kaj li ekvidis brilan stelon el tiu direkto,
pli brilan ol Iŝtaro, kiu ĉiele majestas.
Sed jen ĝi ekmoviĝas kaj fulmovoje rapidas
tra l' firmamento blua. Super Utnoa zenite
ĝi nun similis nubon kun mil nuancoj irizaj.
La nubo malleviĝis kaj ŝvebis super la arboj.
Per pluvo de fajreroj, ĝi kovris ronde la zonon.

Preter l' unua miro, li nun observi kapablis,
ke ĝi aspektas kvazaŭ kupola domo fluganta,
kun muroj el arĝento aŭ lazurŝtono polura.
Ĝi surteriĝis antaŭ li: laŭ hufaro de bovo
impresis ĝiaj plandoj, kiuj en grundon eniĝis.
Ĉe ties ambaŭ flankoj fenestroj rondaj abundis
similaj je okuloj alrigardantaj enigme.
Li tiam vidis buntan brilon ekstere kaj ene
kiel la ĉielarko post la pluvema vetero.
Jen pordo nun ekbuŝis sur ties mezo brilanta,
ŝajne fandiĝis muro kaj aperturo magie
formiĝis. Ŝtupareto luma elglite subiris
ĝishume, dum ĉe l' pordo sin montris iu figuro,
kies aspekto estis kiel la bildo de homo.
La lumo lin blindumis, mistera vento zefiris
blovate de l' rondulo; pro trankviligaj efluvoj
surgrunden Uttu svenis kvazaŭ li falus abismen
kaj perdis la konscion antaŭ la bildo venanta.
Samkiel blanka urso por letargio kuŝiĝas
profunde en kaverno aŭ en fendaĵo de roko,
post kiam dum aŭtuno ĝi grasnutriĝis abunde,
por povi pretervivi sub la frostego polusa;

aŭ kiel jakareo dum la Afrika kacimbo
sub koton enteriĝas, monatojn ŝirme tradormi
en viskoglua ŝlimo de sekiĝinta rivero
aŭ de multherba lago, por ne enrampi la silvojn,
simile Uttu svenis sur la herbaro de Bezer,
vidinte fajroĉaron alproksimiĝi tra nuboj.

Tiam li aŭdis voĉon, kiu en cerbo resonis:
—Ekstaru, ho Utnoa, ĉar mi parolos anonce.

Li estis Emme, ano de la popolo de Goba,
kiu tra spaco venis el sunsistemo Iboo.
Kiam eksplodis konstelacia supernovao
Nugu, ilia praa astro detrue glutiĝis
flame. Antaŭvidite de sciencistoj iliaj,
konscie, ke nenio kroma evite fareblas,
Gobanoj ekkonstruis gigantajn spackoloniojn
ĉirkaŭ la hejmplanedo kaj tiujn oni provizis
per ĉiaj materioj, rimedoj kaj per selektaj
faŭno kaj flaŭro propraj. La kolonioj egalaj
estis cilindroformaj, je kvardek tri kilometroj
longaj, kun radiuso je kvarmil metroj. Ilia
ŝelo konsistis nur el dura, travida metalo
izuo. Kaj ekstere, je ĉirkaŭ du kilometroj,
speguloj orienteblaj, larĝaj, konkave triopis,
kiuj reflektis enen la stelan lumon Iboan
prilumi la internan geografion unikan.

Ĝi reproduktis tiun Goban kaj eĉ rivereton
inĝenieroj faris, laŭlonge, kies imunaj
akvoj enfluis en basenon ĉe unu el ties
finoj kaj per subteraj duktoj ĝi ree fluadis
al ĝia origino. Oni konstruis aparte
loĝejojn ekipitajn laŭ la kutimo de Goba.
Ĉe ambaŭ ekstremaĵoj de l' kolonioj *izuaj*
situis hidrogenaj akumuliloj aneksaj,

kapablaj provizadi per energio la spacan
planedoidon longajn jarojn, se diste de fonto
stela. La cilindregoj laŭ plej preciza rapido
rotaciis, por kreo de gravitado konforma
al l' enloĝantoj, kiuj je sia flanko nenian
movon perceptis.
Kiam la decidita momento
venis kaj proksimiĝis la katastrofo fatala,
la kolonioj Gobaj forflugis migri duope
en la senliman kosmon, laŭ vojdirektoj aliaj,
serĉi planedon, kie ili pluvivi kapablu.

Unu el tiuj estis la kolonio nomata
Naje, kiu la teron antaŭ sep jaroj atingis.
Depost la fordetruo de l' origina planedo,
gobdoj longtempe migris laŭ vastaj vojoj eteraj
en sia kolonio. Sed la ekzila popolo
nenie trovis hejmon en ripozloko havena.
Kiam post naŭ generacioj planedo vidiĝis,
bilde pligrandigita sur la staciaj ekranoj,
verŝajne vivotaŭga laŭ Komputilo Ŝamoa,
ĉiuj admire gapis kun rave miraj okuloj:
al la resopirata Goba ĝi ege similis.
Unue ili sondis pri l' atmosfera medio
kaj prikonstatis baldaŭ, ke ĝi spireblas akorde
al l' organismo propra. Sed tiam sur la planedo
malkovris civilizojn kaj konsekvence ne rajtis
damaĝi l' aŭtoktonojn, ĉar laŭ steljuro ne licas
sisteme kolonii se civilizo surloĝas,
krom se samspeca, pro l' perturbo radike detrua.
Ili ĉirkaŭorbitis esplore studi la astron
kaj ties kulturformojn. Tiam vekiĝis absorbaj
diskutoj nefineblaj, ĉu la teranoj esence
estas raciaj aŭ nur subraciuloj *agaoj*.
Sed je la sepa jaro okazis fakto decida
kaj Asembleo de Najreprezentantoj ariĝis

sur centra monto, apud la ĝardenurbo Oara,
sub kupolego vitra de la Ajuba leĝejo,
dronanta en arbaroj de korfoliaj obuoj.
Ĉiuj leĝodonantoj ĉirkaŭ Ajuba rezidis,
kun sia familio en flava domo tubronda.
Kaj ili jam envenis. La halo sparke briladis
per vestoj multkoloraj de la Najanoj elektaj.

La estroj de l' popolo atentoplene silentis
tuj kiam prezentiĝis grizhara Oes Ogia
el flanka pordo ronda al longetabla tribuno.
Li estis superulo inter reganta kvaropo,
kun karaktero milda, fama pro siaj afablaj
gestoj. Matenon ĵusan, dum aŭdienca deĵoro
en sia *dojemuo* —ĝardeno ĉirkaŭloĝeja—,
dum li konversaciis kun teknikisto promene,
li sciis, ke filino je kelkaj metroj atendas
kun nepoj kaj bofilo, kiujn de pluraj monatoj
li jam ne vidis. Vicis antaŭe juna geparo.
Kuris murmuro, ke tiuj estas kare parencaj
kaj ambaŭ sin adresis al li per simpla propono,
ke tiuj antaŭiru, ĉar ilin urĝo ne premas.
Okulojn de Ogia larmoj videble vualis
kaj, fruntokline, li tuŝis ambaŭpolme genuojn
de l' allasintoj, en eksternorma signo de danko,
ĉar tiun faris iam nur servutuloj omaĝe.
Similajn ĝentilaĵojn Ogia ofte prizorgis
kaj estis plej amata de la Najana civito.
Nun lia voĉo sonis en l' Asembleo ĉiela:
—Gobanoj, kiom longe ni jam vojaĝis elmigre
tra vojoj ĉiamnoktaj de l' universo vakua,
de kiam nian astron la Granda Krabo devore
glutis for. Efiedi, nia kosmurbo ĝemela,
perdiĝis antaŭlonge en blinda ŝtormo de sablo
kaj restas nun malmulte da energio provize
en nia kolonio. Ne eblas rajte popoli

ĉi tiun astron bluan, ĉar interstela leĝaro
malhelpas kolonii se civilizo surestas,
krom se samranga. Venis, tial, la tempo decidi,
ĉu kosme ni daŭrigu nian vojaĝon amaran,
aŭ ni orbitu plue ĉirkaŭ la astro lazura.
Roa Numuo pretas informon doni ĉi-teme.

Tiam ekstaris Roa, nepo de l' fama Numuo,
kiu la lasta iam en Efiedi prefektis.
Li estis krispehara kun brunhardita vizaĝo,
mallarĝa, rekta nazo kaj gagatnigraj okuloj.
Kelkaj Efiedanoj sukcesis savi la vivon
je l' rompo de l' stacio kaj translokiĝi ĉe Najon.
La idoj de Numuo de tiam ĝuis enurbe
altajn postenojn, memore de la tristaj okazoj,
kaj de l' deveno grava. Li tiutempe komandis
la skoltajn ŝipeskadrojn de l' kolonio de Goba
kaj en la propra ŝipo plej avangardan ekipon
el mezurinstrumentoj havis. Kun brusto brulanta,
ekstaris asemblee kaj laŭtavoĉe li diris:
—Ĉefoj el Goba, nia popolo longe vojaĝis
kun la misio trovi por nia gento la novan
astron loĝeblan. Antaŭ la kataklismo veturis
multaj koloniparoj en ĉiuj kosmodirektoj
cele al tiuj steloj kun rimarkinda probablo
de astro vivkondiĉa, por ke ĉiamu tratempe
nia genera raso kaj civilizo supera,
kiu sendube rangas ĉe la plej altevoluaj
en l' universo. Ĝuste nun ĉe la celo ni sidas,
jen antaŭ ni tuŝeblas la priserĉata planedo,
kiu el drono savos nian popolon jam lacan.
Kial ni plue fuĝu en la vakuon eterne?
Ĉar jen nin klare helpas la pradestino fatala.
Mi devas komuniki al l' Asembleo novaĵon
gravan: ni ĵus detektis per niaj iloj avertaj,
ke direktiĝas teren asteroido giganta

kun maso kaj rapido, kiu influos esence
ĉe ties stabileco. Laŭ la inklino teraksa
kaj blokaj amasiĝoj de la glacio polusa,
precize kalkuleblas, ke la gravito renversos
la globon transbalance, dum ties paŝo apuda.
La kontinentoj turniĝos tuj laŭ nova direkto,
sed l' oceanaj akvoj, pro l' inercio, plu giros
laŭ la antaŭa: ondegoj superrule balaos
la tutan globon bluan dum pluraj terrotacioj
kaj pasos longaj tagoj ĝis ĉiu grundo resekos
kaj maroj kvietiĝos en sia propra kuŝujo.
Ni povas antaŭvidi, ke l' rendevuo citita
okazos post du teraj jaroj, je l' sepa monato.
Konklude: ĉiuj landoj suferos vastan inundon
neelteneblan, tiel ke l' vivantaro sur ili
nepre pereos drone, kio plenrajte permesos
la teron kolonii far la popolo de Goba.

Granda ekscito skuis la Asembleon Oaran.
Kelkajn surprizis tio, ke la informo sekretis,
aliaj skeptikumis, ĉu ĝi realas iele.
—Se Numu pravas —ekstare intervenis Udue,
la ĉefinĝeniero de l' kolonio Najana—,
ni plue orbitadu dum ĉi monatoj atende
kaj vidu, poste, kio iĝos pri l' tera planedo,
ĉar nia kolonio povas dumtempe rezisti
antaŭ ol celi sunon kaj el korono reŝarĝi
la energiprovizojn por vojaĝado venonta.
—Tamen, ĉu la teranoj iele estas *emioj*?
—dube demandis kelkaj, interpelacis aliaj.

Baldaŭ ekstaris Emme kaj en la halo li diris:
—Homoj el Goba, se la sciigo tute fidindas,
kaj Numu estas role la respondeca pri tio,
ni ne forgesu nian devon: laŭ juro ĉiela,
ni helpu la teranojn kaj ties morton evitu,

ĉar temas pri raciaj uloj. Ni trovu rimedon
deturni la trajekton de l' astro damne ruina.

Numuo agitiĝis en korpoforma sidilo,
kliniĝis sur la tablon kaj alresponde replikis:
—Gobanoj, la informoj certas. Ni jam reviziis
ĉiun detalon, ĉion ni prikalkulis atome.
Sed ni ne rajtas trudi ŝanĝon ĉe l' kurso de l' astro.
Se tiun ni deturnus, ĉu ĝi ne povus alie
provoki kataklismon en nekonata planedo?
Ne licas interveni en galaksiaj aferoj.

Jene respondis Emme kun brovodensa rigardo:
—Roa Numuo, ĉiuj scias en Naj evidente,
ke licas interveni por la defendo de raso
racia. Ĉu Gobanoj ne faris tute laŭ eblo
eviti la diskrevon de nia hejmo iama
kaj poste dum forbrulo de la stacio ĝemela?
Ni uzu l' energion de la kosmurbo deturne,
ĉar ĉiuj raciuloj estas samrasaj esence.

Tiam indignis Roa kaj respondante li diris:
—Emme, vi ja klopodas blinde, ke nia popolo
pereu. Ĉu ni estas iel samrasaj al uloj
sovaĝaj kaj etcerbaj? Kiu kuraĝus aserti
tion, Gobanoj, post la esploroj ĵuse faritaj
sur la planedo blua? Ĉu vi forgesis entute
pri l' krimoj registritaj sur Kontinento de Flamoj?

Ogia nun ekstaris dum asemblea silento:
—Gobanoj, la informon, pri kiu Numu raportis,
mi mem superkontrolis rekte, helpate de pluraj
ekspertaj sciencistoj: ĝi estas plene kredebla.
Ni rememoru tion, ke l' kolonio de Goba
nun statas difektita kaj malfacile ĝi tenos
longan veturon tra la spaco al suno hazarde

havanta loĝplanedon. Tial pluvivo de nia
gento dependas de la koloniado de tero.
Ni povus realigi ĝin se l' Bluulo suferus
tiun inundon vastan kaj la homaro fordronus.
Sed staras nun dilemo, ĉu senelturne ni devas
protekti la teranojn aŭ ni allasu detruon,
por kio nepras scii, ĉu ili estas *emioj*
envere. Kaj ĉar unu konsiliano defendis
ilian *emiecon* en l' Asembleo, laŭmore
devas konstituiĝi la Tribunalo Supera,
kies neapelebla verdikto fine decidos.
Ambaŭ kontraŭstarantoj prezentu tie la pruvojn.

Inter la Gobaj vicoj ŝvebis murmuroj aprobaj
kaj per laŭjuraj vortoj la asembleo fermiĝis.
Ili elvenis tuj el Leĝejo kun opinioj
kontrastaj kaj diversaj laŭ pluraj grupoj ariĝaj.
Kiel disflugas kampe dum la aŭroro matena
abeloj multesvarmaj super lekantoj odoraj
kaj tra l' aero zumas, dum bruna urso kaŝiĝas
embuske post abio, preta disrabi la ĉelojn,
tiel babilis ĉiuj pri la novaĵoj Ajubaj
kaj inter altaj arboj al sia hejmo veturis.

La koloniaj domoj, nomataj Gobe *ŝabioj*,
similis talofitojn, kiuj surtere nomiĝas
fungoj. El grundo ili laŭvole povis emerĝi
el ŝaktoforma kavo, puŝate preme de longa
piŝto, kiun injekte movis vaporo sodia,
havata perrimede de reakcio nuklea.
La vera hejmloĝejo en supra volbo situis,
kuŝanta jen terrande, jen leviĝanta plurmetre,
precipe dum sunsinko. Eblis ĝin turni surakse
por lanta kontemplado de l' horizonta linio,
per kio la Gobanoj antaŭ ekdormi plezuris.
Kiel al terloĝanto aspektus bordo rifeca,

abunda je lumturoj kun intermita rebrilo,
en stelgraveda nokto, tiel dumtempe similis
la ebenaĵoj Najaj post la vespera krepusko.
Ankaŭ Numuo venis al sia hejmo *ŝabia*,
staranta meze de *aŭks*-arbusta valo Natoŭse,
kaj li mallevis ĝin en la nigra nokto de Naje.

* * *

La sepan tagon, laŭ leĝoj de la mondo ĉiela,
kunvenis, en Oara, Kortumo Supra de Gobaj
reprezentantoj, kiuj flanke, tribune sidiĝis.
Post la formuloj juraj, kiujn Ogia prononcis,
li tuj invitis Roan por la sesia komenco,
kiu ekdiris antaŭ la Tribunalo ĉi-vorte:
—Juĝontoj, mi alportos pruvojn decide refuti
la veran emiecon de la teranoj, apoge
pri la nedevo ŝirmi ilin el plena detruo.
Unue mi prezentos holoinformon atestan
pri festo kiun Utloj nomas de Koat la Granda,
freŝdate okazinta sur Kontinento de Flamoj.
Niaj magnetoskopoj registris stude la faktojn
nur antaŭ du monatoj el la alteco kutima
de naŭcent tridek metroj.

Meze de l' halo Ajuba,
sur kondiĉita ejo, en travidebla kasono,
aperis buntaj bildoj kaj reliefe viviĝis.
Kiu neniam spektis tiajn, ekkredus alarme
ĉion reala kaj timus pro la fluo de sango
kaj orelŝiraj ŝrikoj. Sed la Najanoj atente,
senmove alrigardis.
Jen indiĝenoj aklamaj,
lukse vestitaj, laŭ stratoj de l' ĉefurbo Tahuo,
kunvenas en la placo de l' Granda Templo, soleni
la tagon plej elstaran, al sia dio honore.

La manoj kunligiĝas. Ekflirtas danco Vipura.
Sonoraj kantoj laŭtas kiel murmuro de ondoj.
Kaj tiam Bunoganoj decidas murdi la Utlojn.
Ili ensvarmas placen kun vundopretaj armiloj.
Kuras elirojn ŝtopi, pasejojn kaj koridorojn:
la pordon de la Aglo, ĉe la Malgranda Palaco,
tiun Kanpintan, tiun de l' Milspegula Serpento.
Post la sieĝo placa, ili perarme deĵoris
strikte kaj iu Utlo ne povis save foriri.
Soldatoj nun enkuras por murdekstermi la homojn,
portante lignajn ŝildojn, dum kelkaj bronze metalajn.
Glavojn aere svingas, piklancojn sange soifajn.
Ili alproksimiĝas, ĉirkaŭas jam la dancantojn,
vundas la tamburiston, forhakas ronde jen ambaŭ
brakojn. Kaj per glavbato lin senkapigas akrege;
la kapo disten falas, rule en flako de sango.
Senpaŭze ili lancas, boras ponarde la karnon,
ĉiujn dishakas, kelkajn truas perglave dedorse.
Baldaŭ iliaj tripoj disŝute falas arenen.
Plurajn je torso trunkas: sekcas pantranĉe la kolon,
ties cerbujo restas oste splitita. Al iuj
la ŝultrojn breĉas kaj membrojn dispecige frakasas.
Unujn ili pikvundas sur belmuskola femuro,
tiujn ĉe l' tibikarno, aliajn meze de ventro.
La sango ŝprucas grunden dum kelkaj vane plu kuras,
siajn intestojn trenas kaj implikiĝas en ili.
Sopire je saviĝo, ne scias plu kiucele
forgambi. Tiam Bunoganoj pertorĉe bruligas
sanktejon: ruĝaj langoj flagras en nigra nubego.
Kiam la Utloj vidas ardi la Templon adoran,
ili interparolas singulte, meze de ploroj.
Ĉie leviĝas plendoj kaj ŝiraj ĝemoj amaraj.

La holodramo haltis. La bildoj svene viŝiĝis.
Numuo turnis sin al l' elektitaro de Goba:
—Najanoj, ni ĵus vidis konduton vere kruelan

de la Bunoga gento kontraŭ festanta popolo.
Tamen, la Utloj estas neniel malpli sovaĝaj
ol propraj malamikoj: tiu amasa buĉado
ŝuldiĝis, kiel poste per esplorado ni povis
dokumenti, al fakto, ke la popolo Tahua
dispredis ĉe l' najbaraj triboj, perforte prirabis
knabinojn, ĉiujare, por oferbuĉi vivantajn
sur la altaroj templaj dum solenaĵo de Koat
la Granda. Bunoganoj kun tiuj triboj iritaj
sekrete akordiĝis kaj venkis ruze la urbon.
Similajn kruelaĵojn ni senescepte registris
pri l' teraj aŭtoktonoj, ĉie tra l' blua planedo:
ĉe l' Mirgoj, la Sakaroj, la Tuloj kaj la Baeoj,
Agartoj kaj Dogusoj, Tepeoj, Doja popolo...
Ĉu iel forgeseblas la postmilita privenĝo
fare de Dojoj kontraŭ la malamikoj agresaj?
La generalo Hnoum restis sur loko batala
ĝis la mateno sekva kaj je l' aŭrora krepusko
portigis tiujn homojn, kiuj vundiĝis el inter
ĵusaj militkaptitoj de la velŝipoj oponaj
kaj kondukigis sur la strandon. Li baldaŭ ordonis
kunligi ilin vice. Poste, per poŭpo galera,
antaŭ spektantaj trupoj, igis enmare trenadi
ĝis ĉiuj drone mortis. Tuj sekve al la ceteraj
senvundaj prizonuloj elpikis ambaŭ okulojn,
krom al l' unua, kiun blindigis nur je la dekstra,
ke li konduku ĉiujn ŝnure al sia reĝino
kiel donaco. Plie, kiu kapablus atesti
pri la impreso de mil ŝrumpaj surmure pendantaj
kapoj de l' buĉe oferitaj en templo de Tule,
kies pastrinoj havis harojn en sango banitajn,
en ĉambroj kun kaheloj gluaj kaj naŭze haladzaj,
plenplenaj de kadavraj membroj surgrunde kuŝantaj?
Aŭ kion mi raportu pri la invado de Sohel
far la popolo Guna: ĉu pri l' perforto de inoj
aŭ buĉo de infanoj en la vilaĝo Tepejlo?

Senfine la informo daŭrus: nenie ni trovis
escepton ĉi-rilate en iu tera popolo
kaj la memoro fuĝas de revivigoj amaraj.
Homoj el Goba, kiu trovus entute racion
ĉe tiaj kruelaĵoj? Ĉu iel oni kredemus,
se ni ne vidus ilin kaj titankube registrus?
Ja temas nur pri monstroj, mutaciintoj eraraj,
kruelaj jam denaske, estuloj murde refleksaj,
do raso eksterminda ĉar iĝas kosme minaca.
Laŭ freŝaj esplorserĉoj, kiujn Sooje pretigis,
montriĝas, ke ilia violenteco medola
havas biologian bazon: ĉar ili posedas
hormonon unikspecan, mankantan en la Gobanoj,
kies influoj korpaj ne kontroleblas efike
de l' cerbaj centroj, kio ilin verŝajne peladas
al tiaj fuŝkondutoj eksterracie ferocaj.
Ni vidu holograme ĝian internan aranĝon,
kiu rilatigeblas al misformiĝo genera.

Travidaj tuboformoj, pligrandigitaj, aperis
sur la podio centra kaj serpentece sinuis.
Numuo, porkompare, bildigis unu Gobanan,
lasere atentigis pri ĉiu formo diverĝa,
dum la spertulo Inna pri la signifo klarigis.
Post la demonstracio, Roa daŭrige parolis:
—Vi vidis klarajn pruvojn, ho ĉielana popolo,
pri la subhomaj ecoj de l' loĝantaro de tero
kaj ankaŭ pri la kaŭzo de la konduto demenca.
Ni rajtas juĝi ilin eraro de la naturo,
ĉar sindetrua raso fariĝas kosmodetrua.
Konklude, ili estas neniel veraj emioj
sed nur mutaciuloj fuŝaj. Pro tio ne licas
ŝanĝi la kurson de la asteroido minaca,
ĉar nur se temus vere pri iu raso racia,
ni povus interveni ĉe galaksiaj aferoj,
forturni ĝin. Sed temas nun pri l' kontraŭa kazuo:

neinterveno helpas ĝuste la rason emian.

Ĉiuj silentis hale. Roa Numuo sidiĝis.
Sekve Ogia, ĉefo de l' Tribunalo, parolis:
—Nun la alia flanko povas alporti la pruvojn.

Baldaŭ ekstaris Emme, la olivhaŭta Soraa,
en blua strikta vesto, manikoj flave koloraj,
respondaj al metio en la subgrundaj areoj.
Jene li ekparolis en l' asembleo juĝonta:
—Gobanoj, ja ne eblas scii pri l' veraj efikoj
de hormonspeco nova sen esplorado profunda
kaj oni ne imputu al tiu kaŭzo la ecojn
de la homara gento, ekster socia realo.
Nur de kondutonormoj la emieco dependas
kaj ne de genetikaj, kiuj miloble varias.
Do, tiujn mi esploris kaj por pritakso prezentos.
Juĝontoj, vi aŭskultis la konvinkeman aserton
de Roa, ke la tera raso kruelas esence,
ĉie sur la planedo, laŭ absoluta regulo.
Tamen, escepto grava sur la Bluulo troveblas,
kio radike povas aliecigi la juĝon.
Mi ĵus esploris gentojn de l' regiono Ŝinara,
kie ekzistas tribo, en kiu plene forestas
tiaj kondutoj. Ĉar jam multis entute similaj
diskutoj inter ni, mi decidis loĝi sekrete,
kelktempe, kun teranoj por koni funde la trajtojn
de tiu gento. Ili loĝis en Dilmun antaŭe,
insulo situanta meze de l' maro de Ŝinar,
insulo fruktodona, kie paŝtejoj abundis
por la brutaroj hejmaj, kun freŝe milda klimato.
Kiam la popolnombro kreskis, oftiĝis agresaj
kvereloj inter klanoj pri la posedoj aparte
pli riĉaj. Ili fosis kavojn, laŭlonge palisojn
levis ĉirkaŭ kamparoj propraj. Kaj fine bruliĝis
bataloj ĝeneralaj sur la herbejoj edenaj.

En Dilmun tiaj buĉoj certe neniam okazis
pli frue. Oni rabis, la homojn murde masakris
kun hejmaj bestoj. Iam sur la insulo troveblis
nur morto kaj detruo. Leviĝis pesto ruina
kaj la supervivintoj baldaŭ amase pereis
meze de doloregoj: ilia haŭto nigriĝis,
la lango ŝvelis tiom, ke ĝin la buŝo ne povis
teni kaj malsanuloj mortis en pala sufoko
ene de konvulsioj dramaj. Sed kiuj evitis
la peston kaj postvivis, kunvenis grupe ĉe maro
kaj ĵurligiĝis migri el la insulo patria,
promesis ekziliĝi per alta ĵuro solena
dum sep generacioj kaj dume vivi nomade
sur fremdaj landoj kaj ne plu iun homon iele
mortigi, ĉu sampopolanon aŭ ĉu malamikon,
ĝis estos forviŝitaj el la memoro komuna
ĉi tiuj teruraĵoj. Nur tiam ili revenos
rajte al la insulo hejma. La tribo de Dilmun,
antaŭ malmultaj jaroj, kampadis sudoriente
de la Ŝinara lando. Sed la popolo denove
devis formigri, tial ke startis grava milito
inter tribaroj montaj kaj la ĉefurbo Nineve.
Alianciĝis urboj kontraŭ popolo Kiduma
kaj la nomadaj triboj kontraŭ la urbaj armeoj.
La Dilmunidoj migris norden al tero pli paca,
ne falis en sangbanon. De longe ili la ĵuron
respektas plu senmanke. La historio konata
de tiu gento pruvas, ke violento ne estas
esenca al teranoj pro genetika kialo,
sed ĝi devenas nur de l' fakto, ke ili troviĝas
ankoraŭ en stadio de evoluo komenca,
samkiel ankaŭ nia pracivilizo trapasis
parencan origine, en fora tempo. Ĉu do vi
forgesis pri l' transkrioj telepatie sendataj
fare de *oaneoj*, kiuj neeviteble teroris
en mensoj de l' prapatroj? Necesis nepre detekti

ilin kaj tuj mortigi per mikrofaskoj atomaj,
kio ebligis poste la evoluon unikan
de nia civilizo. Procezon tute similan
la loĝantaro de ĉi astro nuntempe trairas,
ĉar tiu Dilmunida gento sendube superis
etapon de murdemo kaj de sensaĝa kruelo.
Inter popoloj teraj ĝi signas veran avanon,
montrante la direkton de la irvojo futura.
Preter komencaj fuŝoj, la surplaneda homaro
alprenos ĝustan vojon al packonkordo kaj alta
scienca evoluo, ĝis ili povos atingi
gradon de civilizo je nia sama nivelo.

Aŭdinte l' argumentojn de l' interveno de Emme,
sian femuron batis Roa kaj jene replikis:
—Kiel kuraĝas vi, ho Emme, kompari la Goban
superan civilizon kun tiu de la teranoj,
ties stadion nunan kun nia praevoluo?
Homoj el Goba, ili certe radike malsamas.
En nia kazo temis pri demenculoj izolaj
sen elektita celo: en ili penso rezona
ne intervenis. Male, ĉe la Bluanoj aperte
temas pri ĝenerala kaj plenkonscia murdemo.
Krome, se iu escepto raras, pri kio mi dubas,
ĝi ŝajnas sen futuro ĉar ĝuste alidirektas
al konsekvenca vojo de perfektiĝo pograda:
de ecoj en aliajn ili transiras abrupte.
Mi mem kapablus pruvi, ke fundamente kruelas
tiuj tribanoj strangaj, pri kiu Emme raportis,
ke ili enmiksiĝis aŭ enmiksiĝos en murdojn,
kverelojn kaj militojn, se nur sufiĉe da tempo
oni disponus, ĉar ni ilin ekkonis unue
antaŭ nur kelkaj jaroj. Krome, logikas aserti,
ke l' endokrinaj trajtoj nepre influas egale
ĉiujn loĝantojn terajn. Temas pri ege minaca
kaj eksterminda raso: sendube ili posedas

inteligenton, tamen sen ajna bremso ĝin uzas
por multobligi daŭre kaj por rafini la ilojn
de detruado frata. La alianco maligna
de penso kaj murdemo fariĝas pleje detrua,
ĉar se ĉe violento mankas elstara racio,
kiel ĉe rabobestoj en ĉiu mondo konata,
ĝi ne transiras ekster sia kondiĉo natura,
ne iĝas katastrofa. Sed ĉe kunesto de ambaŭ,
se racieca penso ne superregas efike
l' instinktojn brutajn, kiel laŭ pruvoj okazas
en la Bluanoj, tiam ĝi iĝas kosma danĝero.
Tiajn estulojn oni devas pritaksi eraro
de l' naturo. Se ili, iam, malkovrus evente
l' atoman energion, antaŭvideble ĝin uzus
por detruado propra. Kaj se hazarde ne kaŭzus
diskrevon de l' planedo, ili finfine deturnus
siajn terurajn povojn kontraŭ planedoj aliaj
aŭ kontraŭ sunsistemoj. Tial tutkosma minaco
ni devas ilin juĝi kaj ne danĝero por ili
nursole. En rezulto, ilia raso fariĝas
eliminenda. Tion mem la naturo projektas.
Niaj leĝoj devigas helpi, ĉe tiaj okazoj,
estaĵojn intelektajn, se ili estas emioj,
sed ja ne subrasanojn: pro tio indas atendi
ties pereon, por la bono de raso supera.
Kaj, post la kataklismo, ekkolonii ni rajtos,
senbare, la planedon por renaskiĝo de Goba.

Li diris. Baldaŭ Emme en l' asembleo respondis:
—Numu, vi jam delonge celas ekstermon amasan
de la Bluanoj, eĉ de antaŭ esploro profunda
pri ties civilizo. Vi mem forgesi ne povas
la morton de Loedu, ekde la paŝoj unuaj,
dum li esploris Edden. Kial kulpigi teranojn
pri nura akcidento, kiu povintus okazi

same en Goba?
Tiam Numu replikis amare:
—Ho Emme, ĉiuj scias, ke mian filon unikan
mortigis indiĝenoj, kiam li venis al ili
ambasadori pace. Ĉu estas ia hazardo,
ke lanco lin traboris kaj eblis fari nenion
kurace? Tamen, kial vi tiom arde defendas
subraciulojn, kontraŭ la elsaviĝo decida
de nia civilizo kaj de popolo ĉiela?
Ĉu do ne veras, ke vi iniciatis en kaŝo
eksperimenton genan, ĉar ĉiam rekte riproĉis,
ke nia civilizo estas danĝere tro multe
intelekta kaj planas kreon de raso radike
nova per la kruciĝo inter estuloj el ambaŭ
specioj, inter *gobdoj* kaj aŭtoktonoj *agaoj*?
Juĝontoj, se pruvite, ĝi estus kroma motivo
por ne eviti sed, male, por akceli volonte
l' estingon de la tera gento: ĉar nepre logika
sekvo ja estus iu raso simile detrua
sed pli inteligenta, kio kunportus apenaŭ
antaŭvideblajn misojn por la planedo terana
kaj por la tuta kosmo. Nepras ĝin zorge preventi.

Tiam ekstaris Emme kaj jenavorte rebatis:
—Reprezentantoj Gobaj: Numu eldiris akuzojn
senpruvajn. Kiel bapti eksperimento genera
nuran rilaton aman kun Bluanino? Ĝi ecas
tute privata faro, kiu ne statas iele
malpermesita de ia interstela regulo,
se post analizado montriĝis taŭge similaj
la organismoj. Kiu risko el ama rilato
plene konsenta venas, el amo inter emioj
de malproksimaj astroj, se nur riĉiĝo, progreso?

Vigle ekstaris Roa kaj respondante replikis:
—Juĝontoj kaj Gobanoj, Emme denove supozas,

ke l’ teraborigenoj estas entute raciaj.
Sed jen la diskutpunkto centra: se ili pruvite
estus emioj, tiam interrilatoj amoraj
laŭnorme akcepteblus. Sed ili certe ne estas;
tial nek amrilatoj nek la defendo de fuŝaj
estuloj subhomecaj, kontraŭ saviĝo de gobdoj,
pravas aŭ konsilindas. Jen miaj finaj asertoj.
La decidontoj juĝu pri la konforma realo.

Tiam parolis Emme kaj por konkludo li diris:
—Mi plu defendas firme la emiecan esencon
de l’ tera loĝantaro. Se inter ili troveblas
sovaĝo kaj militoj, ĉi tio signas etapon
transiran en ilia evoluado miljara,
kiel ni mem travivis similaspecan unue.
Ili estas samrasaj al ni kaj al la ceteraj
raciaj homoj universe: pro tio ni devas
defendi la Bluanojn el katastrofa ruino,
eĉ kontraŭ la danĝero de nia propra detruo.

Post kiam l’ oponantoj finis alporti la pruvojn
kaj argumentojn taŭgajn, la Tribunalo Supera
kunvenis konsiliĝe en najbardoma salono,
revidis la informojn, nove kontrolis atestojn
dum helpe prikonsultis la komputilon Ajuban.
Post horo bluis flago super vitreca kupolo.
Kiuj ekstere iris inter arbaroj *obuaj*
ensaloniĝis baldaŭ por ekaŭskulti la finan
juĝon de l’ Najkortumo. La halo bunte briladis
per surmanikaj strioj de l’ respektivaj okupoj.
Murmuroj kaj babiloj en la ĉambrego silentis.
Oes ekstaris sur alta prezidenta tribuno
kaj la verdiktan akton solenavoĉe li legis:
—Gobaj reprezentantoj kaj ĉielana civito,
aŭskultu la verdikton, la determinon elaŭdu:
la Naja Tribunalo juĝis, ke Emme Soraa

rajtos per funda hipnotizo averti nur unu
homon el tiu gento de la insulo de Dilmun,
kaj se sukcesos eĉ se nur familio saviĝi,
per propraj vojrimedoj, el tiu sama popolo,
tiam ni fine lasos senkolonie la teron,
aliacele daŭros nia vojaĝo trakosma.
Sed se neniu paro el la popolo dirita
sukcesos supervivi post la venonta detruo,
ni rajtos kolonii la teran astron inundan.
Dume, neniu gobdo interferadu iele
ĉe l' kurso de l' minaca astro aŭ helpe favoru
la surplanedan tribon, ekster l' averto de Emme.

Mirante, stacianoj la juĝproklamon aŭskultis,
sed ili prikonsentis kaj tuj ekstaris aprobe.

Finiĝis l' Asembleo Naja kaj ĉiu revenis
ŝabien. Ankaŭ Emme, kun svarmaj pensoj anime,
veturis siahejmen, al valdeklivo Noguel,
en arbareto Dujun, kaj en la ĉambro medita
sian edzinon trovis. La ejon milde pribanis
smeralde glaŭkaj tonoj kaj ŝvebis ondo parfuma.
Post kunsaluto, Emme el sub la planko venigis
anatomian seĝon, per siblo transmisiante
l' ordonojn ultrasone, kaj al l' edzino komentis
decidojn de l' Kortumo dum l' Asembleo pasinta
kaj pri la rajto lia averti nur unu homon.
Dunna demandis jene al sia edzo brovsulka:
—Kiel homido povos sin savi proprarimede?
Laŭ astronomoj, la tutan teron kovros inundoj
teruraj.
Emme diris al la edzino bedaŭra:
—Ho Dunna, post kunveno, mi jam konsultis Uduen,
stabestran fizikiston, kaj li pretigis, akorde,
kalkulojn ĉi-rilatajn: nepros konstruo de ŝipo
kun tiaj proporcioj, ke ĝi eltenu rulondojn

kaj staru ĝustaloke, apud vastflua rivero,
kiam kaskados maroj pro l' kataklisma returno.
Aliaj eblaj solvoj, kiel rifuĝo kavernen
kun la necesaj nutroj por longedaŭra bivako,
aŭ sur altpintan monton, post esplorado montriĝis
malpli konformaj, aŭ ne realigeblaj efike
en nuna tempo, kun minimuma ŝanco probabla.

Dunna lamentis: —Certe, estus pli multe sekure
kaj sendanĝere, se ni kunprenus grupon elektan
da aŭtoktonoj en nian kolonion, antaŭe
endormiginte ilin, kaj post la faro reportus
planeden, ke unika raso ne tute pereu!

Emme respondis jene al la edzino pledanta:
—Ne eblas ja, ho Dunna, ĉar la Kortumo Supera
decidis neŭtralece plifavorante neniun
parton. Tial, la ŝancoj de supervivo de homoj
ne estas certigitaj. Kvankam fortune sukcesus
postresti kelkaj grupoj tra l' tuta tera surfaco,
tamen, kondiĉo estas, ke inter ili troviĝu
pluraj de l' Kena tribo. Kaj aliflanke ne eblas
ilin sisteme helpi per avantaĝa tekniko
aŭ iel influadi en la tergloba kulturo.

—Kaj kiun Dilmunidon vi, do, intencas averti? —
Nun pridemandis Dunna.
Respondis jene Soraa:
—Mi pensis pri Utnoa, ĉar homo tute fidinda,
nobla, sincera, kiu kredas je pia veturo
al la insulo praa, post ekziliĝo dolora,
kaj kun aliaj celas hejmen vojaĝi tramare.
Li rangas alta ĉefo en la tribaro de Dilmun
kaj povus entrepreni kun sukceseblo ĉi taskon.
Mi rekte lin ekkonis kaj alrilatis amike,
dum mia esplorado sur Ŝinarlando, nomade

vestita en kostumo de la popolo de Henoh.

Tagfine la geedzoj, post *juvo*-trinko komuna,
fajfis ultrafrekvencajn sonojn, kaŝonte la seĝojn
kaj ekfunkciigonte la mekanismon eligan
de l' du ŝaŭmlitoj: el planko du sferdiskoj emerĝis
kaj ŝvebis super ĝi per magnetoforta levito.
Ĉirkaŭe kreske fluis ŝaŭmo organokemia,
grizeca, kiu iĝis sekve komplete solida
kaj ĝi akiris formon de spongotrua divano.
Ambaŭ nudiĝis, ĵetis al dissolvujo la vestojn,
la litojn kuntuŝigis kaj post plezuroj amoraj,
liveris sin al dormo, ripozigonte la lacojn.

Je la mateno sekva, per sia ŝipo li flugis
al tero kaj rimarkis Uttun sur pinto de monto,
irintan el tendaro, apud rivero Purattu.
Li tuj alproksimiĝis kaj subenŝvebis apike.
Lia flugdisko, kiu gobe nomiĝis *oavo*,
aspektis lentoforma kaj arĝentece briladis.
Ĝi povis flugi ajndirekte, ĉu orte, zigzage,
returne, spiralforme, sen iaspeca damaĝo
por ties kosmonaŭtoj, ĉar la kajutoj internaj
estis ĉirkaŭvolvitaj de altfrekvenca kamero
magnete energia, kiu kompensis abrupton
de l' dinamikaj fortoj kvazaŭ plej mola matraco.
Li nun radiis dense kvietigantan efluvon,
ĉar Noa ne kontemplis iam similan aperon,
tial, ke li ne timu kaj nepre lin ne rekonu,
laŭ ĵusaj instrukcioj de l' Tribunalo de Goba.

Post kiam Emme elŝipiĝis renkonte al Uttu,
ĉi tiu terenfalis pro l' trankviligaj elanoj.
Soraa, liaflanke, per jena diro komencis:
—Ekstaru, ho Utnoa, ĉar mi parolos anonce.

Post kelksekunda kuŝo en senkonscio profunda,
pupilojn li malfermis kaj kun surprizo rigardis.
Kiel pegido gvatas el la breĉita trunesto,
kiun ĉarpentis zorge gepatroj antaŭ ovumo
kaj frapis aperturon nur laŭ mezuro por ovoj
kaj por enmeto ĝusta de l' longa beko nutronta;
la ido restis ĉiam en sia ombra kavaĵo
sur altimpona trunko, ĉe ĝia supro protekta,
vidante nur rondeton de l' firmamento senlima
kaj nun unuafoje antaŭ ekflugo libera
esploras arbardensojn per ĉirkaŭgapaj okuloj,
tiel Utnoa spertis antaŭ surpriza ĉeesto
de nekonata bildo, al ĉielano simila,
kaj li kun nekredemo pri la veninto miradis:
jen staras homfiguro en vesto geme safira,
strikte algluiĝanta, ĉar ĝi konture teniĝas
al torso, brakoj, kruroj, kun zono ore brilanta.
Ĝi ŝajnas stranga fiŝo kiu ĵus venus el ondoj.
Sed li ne timis iel, pro la radiaj efluvoj,
kaj povis lin kompreni.
Pludiris Emme Soraa:
—Ho Uttu, vojmigranto el la popolo de Dilmun!
Mi devas vin averti pri kataklismo venonta,
kiu decidos ŝanĝon por via vivo nomada
en Ŝinar: post du jaroj, dum la monato de Kisleŭ,
je la dek-sepa tago de la sezono de pluvoj,
ĉiuj malsekaj teroj suferos vastan inundon.
Certe, nenio jam fareblas deturni la ŝancon,
sed estis elektita via popolo saviĝi,
ĉar vi ne planas morton nek ĵuras venĝon embuskan:
tial vi rajtas supervivi kaj mastri la teron.
Konstruu al vi ŝipon el nigra ligno gofera
laŭ jenaj dimensioj: de fin' al fino ĝi longu
naŭdek ulnojn kaj laŭ la larĝo la ŝipo mezuru
dek du ulnojn kaj laŭ la alto ĝi havu sep ulnojn.
Ekstere kaj interne la ŝipon ŝmire vi gudru.

Zorgu, ke ĉiuj traboj firme, kompakte gluiĝu
kaj ene disponigu unu superan etaĝon.
Ĝin levu sur la bordo de larĝeflua rivero.
Viajn posedojn ŝarĝu kaj distribuu ĉeŝipen
hejmbestojn akompanajn. Krome enmetu la manĝojn
necesajn por elteni dum la monatoj inundaj
ĝis resekiĝos grundoj. Kaj viajn familianojn
invitu kunvojaĝi. Je la aŭroro fatala
ene atendu, ĉar nuboj kolektiĝos arope
sur okcidentaj montoj kaj ŝtorma vento vekiĝos
de tie. Jen la signo, ke la inundoj apudas.

Baldaŭ revenis Emme al sia disko platena
kun kora disŝiriĝo, ĉar li ne povis al Uttu
deklari l' identecon kaj adiaŭi l' amikon.
La ŝipo blanke flagris kaj fulme svenis eteren.

Utnoan tuj ekkaptis dormemo peze profunda
kaj li sub densa ombro, terebintarbe kuŝiĝis.

* * *

Kiam la suno rondis meze de l' volbo ĉiela,
Laŝmu, adopta frato kaj kamarado de Uttu,
rimarkis la foreston longan kaj serĉe foriris
senvorte. Li renkontis lin sur montpinto Bezera,
kontraŭ terebintarbo kuŝantan dorme sub ombro.
Laŝmu tuŝvekis Uttun, kiu malfermis okulojn
kaj dense lin rigardis kvazaŭ el fora vojaĝo
li ĵus revenus. Tiam Uttu paroli komencis:
—Ho Laŝmu, mia frato, beninda ido de Beŝet.
Jen mi vekiĝis ĵus el stranga, mistera vizio.
Dum mi promenis tie, inter arbedoj akantaj,
jen venis al mi homo, kiu mirinde similis
al Henoh la blankbarba, nia popola praulo,
kaj li parolis al mi, per jena vorto li diris:

«—Konstruu al vi ŝipon el nigra ligno gofera,
ĉar baldaŭ trafos landon neelteneblaj inundoj
je la monato Kisleŭ. Parencoj, familianoj
suriru, kaj enmetu havaĵojn nepre bezonajn
kaj brutojn rondehufajn, kiuj per herbo nutriĝas.
Interne kaj ekstere la ŝipon ŝmire vi gudru
kaj tiun vi ĉarpentu apud fluakvo rivera.
Jen blovos ŝtorma vento sunsubireje de Ŝinar
por avertilo, kiu signos la tagon inundan.
Tiam engrimpu ŝipen, klapfermu zorge tabulojn
kaj goferaĵo glitos sur larĝa fluo de l' ondoj,
ĝis ili vin kondukos al la marbordo feliĉa.»
Sekve li ankaŭ precizigis al mi la mezurojn
de l' ŝipo konstruota por la saviĝo komuna.
Kion laŭ vi, ho Laŝmu, ĉi tiu sonĝo deklaras?
Ĉu tio estas vere averto de la pradioj,
ke ni revenu fine al la insulo de Dilmun?

Tiam respondis Laŝmu, post konsidera pripenso,
antaŭ mirigaj novoj de lia frato, ĉi-vorte:
—Ho Uttu, ĉiu homo en la tendaro memoras,
ke la generacio nuna la sepa jam estas
nombre post la forlaso de la insulo miela
kaj ni rivelon dian de antaŭ jaroj atendis
por firme decidiĝi al patrolando veturi.
Multaj konsentis celi al la marbordo de Ŝinar
ĝuste pro tiu diro kaj profetaĵo popola.
Sed antaŭ ol paroli al la tribaro necesas
certiĝi kaj por tio nepras konsulti la pastrojn.
Morgaŭ ni planas iri al la foiro Babela.
Do, ni konsultu urbe Luhebun, tiun maljunan
kaj sanktan pastron el Urida popolo nomada,
forvojaĝintan june al la Puratta ĉefurbo
por gvate priesplori la firmamenton eternan
kaj interpreti signojn de la diaĵoj en alto.

Tiel parolis Laŝmu kaj li persvadis Utnoan.
Poste revenis ambaŭ al la tendaro de Henoh.
Kiam la suno sinkis trans horizonto purpura
kaj steloj scintiladis ĉirkaŭ la kurba lunvelo,
Uttu kuŝiĝis dormi sur lana bunta tapiŝo,
multbilde prezentanta la prainsulon agrablan,
kiun elteksis Sara dum longaj noktoj ameme.
Ankaŭ ekkuŝis Laŝmu en nigra tendo ripoze.

Dua kanto

Kiam per rozaj fingroj aŭroro sunon anoncis
kaj brilis jam la ondoj de la Puratta rivero
—susuraj melodioj homojn el dormo vekantaj—,
en la popolo migra Uttu kaj Laŝmu leviĝis
kaj venis el la tendoj por trakolekti la brutojn.
Ili grupiĝis ronde kun la tendanoj irontaj
por distribui taskojn laŭ la farenda laboro
kaj tuj elektis bovojn, ŝafojn kaj same l' azenojn
portontajn marĉandaĵojn al la Ŝinara ĉefurbo.

Dume en la ĉielo, Roa Numuo meditis
pri la aferoj ĵusaj en sia ŝipo kupola
kaj en la centra ĉambro de la *oavo* promenis.
Lin ĉirkaŭringis mapaj bildoj sur lumaj ekranoj,
el la najbaraj steloj, el la planedo lazura.
Nun li sidiĝis meze de la kajuto rigardi
tra prisma lensotablo super la lando Rivera.

Vidis orditajn tendojn apud Purattu situajn
kaj formiksvarman grupon al bazarurbo migrontan.
Timante, ke nomadoj iel saviĝi kapablos,
altrangajn konsilistojn por intertrakto li vokis.
Kiam kunvenis ĉiuj, jenaparole li diris:
—Gobanoj Efiedaj, ni devas trovi rimedon
malhelpi la saviĝon de l' Dilmunida popolo.
Kion ni entreprenu, nur respektante laŭjure
la propran liberecon de l' aŭtoktonoj obee?
Ĉar malavaris strikte la juĝo de l' Tribunalo,
taksante kvazaŭ ili estus realaj emioj.
Ĉu nur pro raso suba ni forrezignu la planojn,
kiujn ni zorge teksis super la blua planedo?

Tiam ekstaris Deja, konsiliano de Numu,
kaj per maldikaj lipoj en la kunsido parolis:
—Ho Roa, ni eksciis pri kamarado de Emme,
Arunni, kiu ŝanĝis la opinion apogan
pri vera emieco de l' loĝantaro de tero,
kaj ankaŭ li nun kredas, ke ili estas *agaoj*.
Li sperte konas faktojn pri la popolo de Dilmun
kaj pretus plej volonte al kunlaboro ĉi-cele.
Mi jam permesis al mi inviti lin por atesto.

Numuo prikonsentis kaj la decidon aprobis.
Al interkonsiliĝo Deja venigis Arunnin,
kiu atende staris en la najbara kajuto.
Lin vestis uniformo verda kaj ruĝemanika.
Li estis altefrunta kun ronde brunaj okuloj.
Firmpaŝe nun envenis, brakojn salute krucigis
kaj al la ĉeestantoj li jenavorte parolis:

—Ho Roa, Numuido, Efiedanoj elektaj:
verŝajne vi nun miras kaj supozeble pridubas
pro mia juĝoŝanĝo ĉe la sinteno favora
al vera racieco de la teranoj. Enestas

multaj kialoj pezaj. Sed mi senmanke rakontos:
mi partoprenis ekspedicion studi Ŝinaron
kaj nomadecan vivon kun Emme jare travivis
en indiĝenaj vestoj. Mi regas bone la lingvojn
kaj la kutimojn konas de l' vasta lando Rivera.
Mi enamiĝis iam, ho rememoro terura,
al Jebe, junulino de la popolo de Dilmun,
en sento reciproka. Post plursezona rilato
jen ŝi koncipis kaj siatempe filon akuŝis.
Sed kiam mi revenis al la stacio pro devoj,
ŝi estis ekzilita de sia propra popolo,
ĉar la virinoj juĝis, ke ŝia filo ne rajtas
loĝi inter tendanoj ĉar de malpia patreco
kaj peke koncipita ekster geedza regulo.
Cirkulis onidiroj, ke iuj vidis aere
min ŝvebi kaj okuloj miaj mistere briladas,
mi estas magiisto aŭ malbonfara demono,
kaj ŝia filo havas sparkan pupilon egale.
Jebe en asembleo de la virinoj aflikte
provis persvadi ĉiujn, kun senkonsola plorado,
ke la infano rezultiĝis de amo sincera
kun vera homo, eĉ se de alirasa deveno,
sed l' asembleo juĝis nur forrifuzi la frukton
de ŝia ventro ĉar la patro fremdecas aspekte.
Jebe kaj la infano al ekzilmigro puniĝis.
Sed post malmultaj tagoj, pro la soleco tortura,
ŝi lin sufokis. Baldaŭ ŝi al tendaro revenis,
petante enakcepton per milda vorto, humile,
sed estroj ankaŭ tiam ŝin el tendaro forpuŝis
pro murdo de la filo, ĉar laŭ praleĝo popola,
ne estas enlasataj kiuj mortigis iele.
Kiam mi ŝin retrovis en karavano de Sippar,
ŝi perdis jam la saĝon kaj estis nura memombro.
Mi poste informiĝis, ke en la urbo Nineve
ŝi sklavis ĉe moŝtulo, post karavana prirabo,
kaj fine pro l' despero sin mem mortigis amare.

Multajn aliajn farojn, kiujn nenio klarigas,
krom eksterracieco kaj freneziĝo komuna,
mi povis prikonstati en la nomada popolo,
kiam senvualiĝis miaj vinditaj okuloj.
Eĉ Jebe, l' amatino, kiun emia mi juĝis,
ĝis murdo de solfilo, de l' propra ido ĝisiris
por limakece rampi al sia tribo petege.
Tial mi konvinkiĝis: ankaŭ la gento de Dilmun
medolas senracia. Malgraŭ, ke ili rifuzas
la violenton, ili ĝin siaflanke provokas.
Neniel saĝas, vere, ĉi tiu fuŝa konduto
ĉu de l' virinoj tribaj aŭ ĉu de Jebe, l' amata.

Klininte la okulojn, li dolorŝire reprenis:
—Ho ve, kiel bedaŭre, ke oni devas akuzi
kune kun ĉiuj homoj, kelkajn laŭŝajne pacemajn.
Tamen, solnura solvo estas forfalĉi la mison.
Se kelkaj postevivus ĉiam en ili plurestus
la ĝermo de l' frenezo, kiu en koro latentas.
Iliaj filoj, nepoj ekkaptus ree la armojn
denove violentus ĉar la miseco radikas
kunnaske en la vejnoj, el propra geno ĝi fontas.
Ili similas ronĝe nocan sulfuran acidon:
ĝi sidas sendanĝere ene de kurba retorto
sed montras siajn ecojn kiam verŝiĝas el ujo.
Mi restas konvinkita, ke la teranoj egale
el kiu mondoparto kaj kiu ajna popolo
ne estas raciuloj, ili kruelas anime.
La dokumentoj kaj pruvaĵoj de Inna Sooje
kaj viaj pravaj vortoj en l' asembleo Ajuba
min decidigis fine, mi viaflanke troviĝas:
ĉar nepras fordetrui ĉi tiun kosman eraron.
Mi venis komuniki, ke ĵuse Emme Soraa
avertis al Utnoa, unu elstara ĉefulo
de l' Dilmunida gento, pri l' renversiĝo venonta.
Emme konsilis, ke li ĉarpentu ŝipon el arboj

goferaj kaj detalis pri la longeco kaj alto
kaj pri la larĝo taŭgaj. Laŭ komputilaj atestoj,
ĝi havas grandajn ŝancojn dum superakvo rezisti,
tiel, ke Dilmunidoj povus transvivi l' inundon.
Mi opinias, kiel vi mem informis Ajube
hieraŭ: se ni havus tempon por studo necesa,
sukcesus klare pruvi la agresemon ilian,
transsavon de Bluanoj neniel oni favorus
kaj post la kataklismo ni rajtus regi la teron.

Numuo ĝojis aŭdi la konvinkitan apogon,
sed tamen, fruntosulke, al la veninto demandis:
—Sed kiel eblus agi, ene de l' juro ĉiela,
malhelpi la saviĝon de l' Dilmunida popolo?
Kion vi do sugestas, kio laŭcele farindas?

Arunni tuj respondis al la Najana gravulo:
—Ho Roa, vi ja scias, ke sunleveje milito
ĵus komenciĝis inter urboj de l' lando Supera
kaj tendeloĝaj triboj. Sed la Dilmuna popolo
baldaŭ elmigris, ĉar celas foreviti batalojn.
Eblus venigi, kvazaŭ el Ninevregno, heroldon
al la Babela reĝo, ke Babelanoj al urboj
alianciĝu kontraŭ la tendaranoj agresaj,
memore de pasintaj helpoj dum Suza milito.
Li diru jen, ke triboj de malamika popolo
tendumas apud Babel kaj estas grave minacaj,
ĉar celas enŝteliĝi por pereiga ribelo.
Tiam la Babelreĝo la kampadejon atakos
kaj draste forekstermos, al ili tute ne eblos
eskapi, kaj se kelkaj trafos postvivi hazarde,
malmultaj certe restos, kiuj konstrui ne povos
ŝipegon miltabulan laŭ desegnaĵo de Emme,
dum la mallonga tempo antaŭ la tago decida.

Ekmeditinte vortojn kiujn ĵus diris Arunni,

Numuo pridemandis en la kunsido ĉiela:
—Sed kiel ni mesaĝos al la regnestro de Babel,
sen iu ajn distordo de la kutimoj iliaj?

Arunni nun respondis per jenavorta klarigo:
—Ho Roa, mi scipovas la lingvon de la tribanoj
kaj ĉefajn regionajn, ĉar sur la lando mi loĝis
dum longa tempo, proprajn morojn de l' urbo mi konas.
Do, ni sintezu vestojn por tiu kazo necesajn,
gravuru tekston brike kaj reproduktu sigelon
plej ĝuste imititan, tiel ke l' reĝo de l' urbo
ĝin certe ne distingos disde l' aŭtenta desegno.
Mi pretas mem alporti la dokumenton anoncan.

Kapjesis Roa Numu kaj lian planon aprobis.
Silkecaj bukloj ŝvebis sur lia frunto balance,
en plej solena signo de prikonsento ĉe gobdoj,
kaj ĉiuj ĉeestantoj lian konfirmon atestis.

* * *

Baldaŭ Arunni venis al sia ŝipo triluka.
Per ĝia komputilo laŭ prototipoj aranĝis,
el fakarkivoj teraj, veston konforme tajlitan
kaj tiun ankaŭ trivis por vivrealaj efektoj.
Solvinte sian robon, sur protektanta tuniko
armaĵon vice metis: kirason bronze metalan
kun bildoj reliefaj, brilaj, orstele kronitan,
en kiu prezentiĝis, trikorpe, ĉaso blazona:
jen flugilhava viro per ĉiu pugno majeste
tenas leonojn blekajn je la maldekstra femuro,
dum ambaŭ skue, svinge, por liberiĝo klopodas;
li surkapigis kaskon plumtufe alte tremantan,
sandalojn cervoledajn al tibikarno li ligis
per espartŝnuroj kaj kroĉis ĉirkaŭŝultre purpuran
mantelon. Fine sian haŭton perlume koloris

bronza. Li sin rigardis sur respegulan ekranon
kaj vere li impresis kvazaŭ heroldo Nineva.
Liajn okulojn brunajn larmoj momente vualis
dum Jeben kaj la filon li rememoris image.

Je la matena mezo, Arunni ŝipe veturis
al la planedo blua, ĝis vasta lando Ŝinara.
Kiel zigzaga fulmo, tiel li space traarkis
kaj en la atmosferon de la terglobo li sinkis.
Li surgrundiĝis apud monto, ĉe granda vilao,
apartenanta al princo de la urbo Babela,
sed kiun regis Itur, komisiito ĉefurba.
Kaŝe, en la oavo, liaj kunuloj atendis,
dum li piede vojis ĝis antaŭ pordo pinarba
de la vilao moŝta kaj al pordisto veninta
pri l' mastro li demandis montrinte tuj la sigelon
kaj sian regbastonon kun la arĝenta rubando.
Kiam Ituro venis, li sin prezentis unue:
—Saluton, estro. Antum vin benu ĉiam abunde!
Mi estas mesaĝisto el Ninevurbo potenca
kaj celas al Babelo alporti reĝan anoncon.
Sed la ĉevalo stumblis kaj kruron mise ĝi rompis.
Ĉu kontraŭ ĉi moneroj vi disponigus alian?

Li trovis, ke l' propono estas altsume valora
dum studis kapĝisplande la alveninton orvestan.
La mastro de l' vilao lian pripeton atentis:
blankan ĉevalon fortan al la heroldo liveris,
kun brido kaj sidlano, kaj ĝin surrajdis Arunni,
kiel ekzerce lernis dum la surtera restado.
Li rekte al Babelo per la ĉevalo galopis
inter hordeaj kampoj, dum hufoj takte reeĥis.

Enurben enbloviĝis tra la pordego de Marduk,
oriente de l' rivero. Li rajdis laŭ l' avenuo
de l' Solenoj kaj venis ĝis la Palaco Majesta,

kiun ĉirkaŭis, ombre, buntaj ĝardenoj aromaj
inter kolonoj skulptaj, prilaborita trabaro.
Pro la mesaĝrubandoj li rajtis baldaŭ eniri
sen ia embaraso ĝis granda reĝa salono.
Li montris skribtabelon kaj oficistoj anoncis.
La reĝo lin akceptis kaj antaŭ trono li diris:
—Ho reĝo de Babelo, de l' granda urbo de Ŝinar,
la regnoj orientaj per ĵusaj paktoj aliĝis
kontraŭ Kidumaj hordoj kaj ĉia gento nomada,
ĉar ili diverspunkte la urbojn frontas instige,
celante venkkonkeri kaj superregi la landon.
Ne apartigu vin de alianciĝo komuna
—diras la Ninevestro, la reĝo lande potenca—
vin ne fortenu ekster ĉiukoncerna milito.
Al urboj vin alligu ĉar kolektiva triumfo,
aŭ forpereo, estas neevitebla destino.
Jen ni eksciis ĵuse, ke venis tribo nomada,
laŭnome, Dilmunidoj, aŭ la popolo de Henoh,
kiu starigis tendojn apud la urbo Puratta,
celante ĉe l' foiraj festoj eniri sekrete
kaj venkkonkeron urban spione, ruze prepari.
Vin gardu senrezerve kontraŭ Dilmuna popolo.
Ekstermu ilin tute, la kampadejon ataku.
Kaj kiam vi sukcesos tiun danĝeron eviti,
alianciĝu pakte kun ĉiuj urboj amikaj,
ĉar nur per tio eblos kontraŭ minaco sekuri.

Nimrod tabelon legis kaj en malsupro rimarkis
la sigelbildon propran de la grandurbo Nineve:
flamŝultra barba dio en leonprua boato.
Baldaŭ konsiliano reĝa, Ukŝatar avertis:
—Ho estro de Babelo, glora reganto de landoj,
allasu indulgeme kaj mian diron aŭskultu:
Ni jam eksciis tion, ke en arbaro ĉe Bezer
de antaŭ pluraj tagoj tendumas tribo nomada,
kiu nomiĝas Kena. Estiĝis sangaj agresoj

kontraŭ la kamparanoj pro ŝtela ĉerpo de akvo
el putoj komunumaj. Ili sendube minacas
kampulojn kaj urbanojn. Mi tuj ordonos ataki.

Tiam respondis Nimrod per jena vorto replike:
—Ukŝatar, ne rapidu, ni ne tro hastu faronte.
Antaŭe mi konsultos la orakolon Adadan
kaj kronan ĉefedzinon. Kaj vi, Nineva heroldo,
revenu jam en paco al via urbo muralta
kaj danku vian reĝon. Jen por vi donoj oferaj,
prenu el ili kion ajn kaj kunportu donace,
kiel merita danko pro viaj saĝaj avertoj,
kaj poste mi venigos al Rimuŝ ambasadoron.

Arunni klinsalutis kaj el la ĉambro foriris,
de l' moŝto ricevinte el trezorejo palaca
elektitaĵon: ringon puroran geme rubenan.
Rerajdis al la ŝipo, malantaŭ monto kaŝita,
forlasis la ĉevalon apud Itura bieno
kaj tuj forflugis fulme al kolonio de gobdoj.

Sekve envenis Nimrod en ĉambron, kie l' edzino
sidis ĉe servistinoj; pri la heroldo rakontis
kaj laŭte legis tekston de l' liverita tabelo.
La reĝo pridemandis al la brokate velura:
—Ho Najda, kion do vi pensas pri tiu mesaĝo
de la Nineva moŝto? Kiel responde mi agu?

Nun la reĝino diris konsilistine ĉi-vorte:
—Ho Nimrod, tio estas ruzoj, nur falsaj alarmoj.
Li ĉiam celis nian urbon subpremi perarme.
Se iel ni akceptus kunligan pakton obee,
ni submetiĝus honte. Tion vi nepre ne faru.
Ne aliancu vin al urboj sub rego Nineva
ĉar la nomadaj triboj estas nenia minaco
por ni, sed nur por regnoj ĉe sunlevejo situaj.

La tribojn ne ataku de l’ Dilmunida popolo,
ĉar puŝoj kun kampuloj estas banalaj aferoj.
Nia urbego staras nekonkereble murita
kaj civitanoj riĉas ĉar ĉiam rajtis eniri
el ajna mondoparto la komercistoj egale
tra l’ dek du pordoj. Ĉu vi pelu senpruve tribanojn
el najbareco? Tio estus ne agi prudente.
Ni enakceptas ĉiujn, tial la urbo famiĝis.
Ordonu gardostari, tamen, kun brovoj atentaj
pri hazardaĵo nura. Se la tribanoj atakus,
ĉu ni ne scius solaj nin perarmile defendi?
Ĉu falus altaj muroj aŭ la armeo forkurus?

Tiel parolis Najda kaj Nimrod ŝin elaŭskultis.

* * *

Dume la Dilmunidoj al la urbego vojaĝis
sub brulevanga suno al Akitua foiro.
La vojo serpentumis apud multfiŝa rivero
inter filikoj altaj. Sed nun ekdubis anime
Utnoa pri l’ vizio, pri l’ efektiva realo
de l’ vortoj plenmisteraj kaj pri l’ decido prenota.
Samkiel rinocero en altebena savano
ektimas je brizblovo kaj kontraŭ trunko koleras,
ĉar vidas ke folioj sin ekbalancas agite,
senscie ĉu ĝi temas pri arbo aŭ malamiko,
ĉar ĝia vidkapablo estas nur svage nebula;
ĝi snufas, hufe gratas kaj polvanube vualas
sunhelon; jen kapkline kaj kun la vosto rigida,
ĝi sturmas kontraŭ branĉoj, kiuj senkulpe provokis,
dum grizaj samrasanoj ĉirkaŭe streĉe rigardas,
ĉu leonego unga inter herbaroj aperos,
tiel dubigis Noan la vivosperto pasinta
kaj li enbruste sentis angoron daŭre premantan,
dum turnis sian vorton al la kunulo vojira:

—Ho Laŝmu, mia frato, ĉu vi sincere plu juĝas
konvene kaj bezone, ke ni konsultu la pastron
en Babel pri la sonĝo, pri la havita hieraŭ?
Ĉu ĝi ne estis revo tute sensenca? Ĉu eble
ne preferindus viŝi, el mia menso forigi
tiun aperon ombran kaj nur marĉandi Babele?
Ĉu estis trompvidaĵo kaj ne la vorto de dioj?

Jene respondis Laŝmu al sia frato palfrunta,
ankoraŭ sub l' impreso de l' ĉielana vizito:
—Ho Uttu, jam delonge ni la mesaĝon atendis,
ke fine ni revenu al la insulo patria,
al Dilmun, nia praa lando. Sendube la bildoj
kaj la anoncaj vortoj ne estis revoj imagaj
sed vera aperaĵo, ĉar estas ĝuste la tempo
reveni. Pasis jam sep generacioj adoltaj
post la teruraj buĉoj kaj interfrataj agresoj,
la puno plenumiĝis kaj nun la Kena popolo
rajtas jam revojaĝi al la insulo de Dilmun.
Pri tio vin certigos urbe Luhebu la pastro.
Mi konatiĝis kun li dum infanaĝo Babele.
Miaj gepatroj sklavis en la urbego, ĉar estis
militkaptitaj dum la unua Suza milito.
Ankaŭ Luhebu loĝis dum tiu tempo ĉefurbe,
komisiite de la estroj de nia popolo.
Sekrete li alvenis por gvate studi la astrojn,
envenis en la templon priesploronte l' enigmojn,
ĉu estos rivelaĵo por la reveno patrujen.
Li estas jam maljuna, sur lia bruna vizaĝo
tiriĝas densaj sulkoj kaj ondas grize la haroj,
sed la okuloj bluaj al steloj longe rigardas
por interpreti signojn de la diaĵoj eternaj,
ĉar kiam tago venos, stelaro brile favoros.

Sed Noa plue dubis en sia koro profunde.
Samkiel leopardo senzorge kuŝas en ombroj

ĉe lago kie trinkas ĝia idaro ludema,
kaj ili ne rimarkas, apud la bordo petolaj.
ke larĝenuka kobro tra herboj ruze glitadas;
je l' susurado sibla, ĝi streĉe levas orelojn
kaj ungojn eltirinte antaŭ serpenton aŭdace
saltas kaj komenciĝas lukto kun ŝanco varia,
same ŝancelaj pensoj en Uttu rampis animen
kaj tiam li replikis al kamarado ĉi-vorte:
—Ho Laŝmu, vi ja pravas: temas pri l' generacio
sepa post la militoj. Tamen ĉu ĝuste ni devas
la taskon entrepreni? Krome, ĉu vere realas
l' insulo praa? Ĉu ĝi ne estas revo de niaj
avoj, ia pensaĵo mita aŭ nura legendo
por konsoladi korojn, por trankviligi ĉe premoj,
ĉar multe tra la jaroj nia popolo suferis?

Nun Laŝmu, respondante, al la kunulo riproĉis:
—Ho Uttu, mia frato kaj alta ĉefo de Dilmun,
vi spite malfidemas, eĉ se vi spertis aperon
de dioj parolantaj. Kial tioma hezito?

Utnoa nun suspiris, la ĉiuvoja migrulo:
—Laŝmu, mian spiriton turmentoj daŭre muelas,
ĉar gravas farendaĵoj: mi ofte havis allogajn
sonĝojn neplenumeblajn, pri kiuj dubi mi rajtas.
Sed nun rakontu al mi pri l' infanaĝo Babele
ĉar la Purattan urbon mi ne pli frue vizitis.
Mi restis ĉiam apud la longestrata Nineve,
kaj nun memoras tagon sur tiu monto beninda
Helku, kie torentoj kaj sovaĝbestoj abundas,
kiam ni renkontiĝis ĉe la Idigna rivero.
Vi venis kun malsekaj vestoj kaj tute ŝiritaj
post kiam vi sukcesis de persekuto de roto
Sirippa foreskapi. Dum pluraj tagoj izole
vi devis kaŝe resti kaj ĉiun domon eviti,
kiel vi mem rakontis en la tendaro sublune.

Baldaŭ parolis Laŝmu kaj respondante li diris:
—Ho Uttu, vi demandas pri tagoj fore kuŝantaj,
kiam maljuna Lemeh min kiel filon adoptis
kaj ni fariĝis fratoj. Ho, kiom multe da ĝojoj
el nia kunfrateco venis. Ĉu vi rememoras
pri nia esplorado sur tondra monto Hubaba,
dum arbarego brulis kaj ni sukcesis atingi
la paŝtoriĉajn bordojn de l' nigra lago Ŝukuza?
Tamen vi scivolemas pri la antaŭaj okazoj
pli detalece kaj ĉion mi rakontos en ordo.
Miaj gepatroj mortis post la Sirippa milito,
kiel vi mem jam scias kaj kundivide bedaŭras,
sed mi pri ties fino kaj torturado silentu.
Mi estis forvendita sklave al moŝto Babela
kaj la infanaj jaroj pasis en servo domana,
ĉe favorkora mastro. Mi devis porti la kruĉojn,
ĉerpi el fonto placa, sed mi ellernis utile
kun lia filo Tuŝpa la skribon kaj la Ŝinaran
historion. Ni vakse kaj surtabule desegnis
kaj dum negocvojaĝoj la landon larĝe mi konis.
Tiam mi lernis ankaŭ pri la ĉarpenta metio.
Plurjare laborinte super vendeblaj uzaĵoj,
dank' al ĉarpenta arto mi povis min elaĉeti
kaj baldaŭ min engaĝis en karavano tralanda
ĉar al gepatra tribo mi jam reveni deziris.
Dum ni proksime vojis, la venkbatita Lagaŝo
nin juĝis perfiduloj kaj persekutis acerbe,
ĝis sur la monto Helku mi vin bonŝance retrovis.
Sed kion pri Babelo, kion pri l' urbo mi dirus,
ho mia frato? Babel estas grandurbo, la pleje
vasta sur tuta mondo. Nineve palas imite
antaŭ ĝi. Sub radioj sunaj brilegas emajle
la ĝisĉiela turo, la mirindaĵo de Ŝinar.
Antaŭ la vojaĝanto ĝi elaperas unue
jam fore malproksime, kun ĝiaj buntaj etaĝoj,

kiuj laŭŝtupe kreskas kaj al montego similas.
L’ unua estas nigra, la dua ruĝe kahela,
la tria verda, sekva blua, la kvina purpura,
la sesa estas blanka, la supra ore lamena,
ĉe kiu sankta ĉambro interne blumozaikas
kaj ĝiajn murojn kovras, per fajna ligno, paneloj
el cedro kaj cipreso kun inkrustaĵoj oniksaj,
marmoraj, alabastraj, krom multekostaj agatoj,
kaj en la mezo sidas purora brila divano,
sur kiun Ŝamaŝ venas, laŭdire, nokte ripozi.
Ĉe ĝiaj kvar anguloj ŝtuparoj rekte kliniĝas
supren, laŭ kiuj dum solenoj de l’ dioj eternaj
la pastra sekvantaro, kun nudaj korpoj, al alto
surgrimpas oferdoni, ĝis tiu ĉambro supera,
al Iŝtar kaj al Nergal, al Antum, dio de naskoj,
al Ŝamaŝ kaj ceteraj dioj. La pordo de Iŝtar,
staranta oriente, kondukas ĝis ebenaĵo
kie plej multaj temploj kaj la turego leviĝas,
la zigurato sankta, kiu elstaras egale
kiel Urartu-monto inter neĝpintoj apudaj.
Sed kion pri l’ muregoj nun mi konvene raportu,
pri l’ buntbazaraj placoj, la homosvarmaj aleoj,
aŭ la ĝardenoj ombraj de la supera palaco,
kiuj ekster la murojn multbranĉe pende ŝutiĝas?
Ili mirindus ankaŭ por mi se ili ne vekus,
nedisigeble, tiom da rememoroj amaraj.

Sed jam post vojkurbiĝo la Babelmuro kolosa
surhorizontis. Alta turo blindume rebrilis
sub helaj sunradioj. Ĉiuj admire gapadis
antaŭ repreni iron kaj post vojaĝo duhora
ili proksimen venis. La grupo en avenuon
paŝis, alkondukantan ĝis la pordego de Iŝtar,
dum ambaŭflanke sondis, streĉe, mil drakaj okuloj.
Pasinte sojlkontrolon, ili envenis aleon
dense ĉirkaŭarbitan, apud rivero Purattu

kaj longe promenadis al la sanktejo de dioj.
Uttun mirige ravis la nubatinga leviĝo
de l' ĉielarka turo, vastegaj placoj amase
plenplenaj per multrasaj homoj, babiloj abundaj
en nekonataj lingvoj el ĉiu tera popolo.

Emme Soraa, dume, el la oavo sekvadis
la movojn de l' tendanoj, ĉar zorgis pri la sukceso
de lia entrepreno. Informiĝinte, ke ili
venis konsulti pastron, li celis helpe favori
la decidiĝon de Utnoa pri l' tasko ŝipfara,
kaj en Luhebu-menson telepatie sugestis
konsilojn adekvatajn por orakolo konvinka.

Uttu kaj Laŝmu, placocentre, de l' grupo nomada
al stabloj apartiĝis, kaj sub arkadoj aĉetis
du statuetojn ŝtonajn por veni templen adori.
Starigis la preĝulojn, oferis mirhon incense
kaj per hordea sumo rajtis konsulti la pastron.
Veninte en salonon kie Luhebun atendis,
Uttu, ĉirkaŭrigarde, pentraĵojn mure rimarkis
en plurnivelaj strioj. Sub alte ligna plafono
englitis tra fenestro la hela lumo matena
kaj jen videblis arboj, floroj, leono blekanta
kiu kuŝejas ĉe ŝafidoj. Jen urso muzela,
inter serpentoj volvaj, kun knaboj ludas amike.
Onda rivero bluas kaj homoj pace baniĝas
meze de dentaj fiŝoj kaj krokodiloj emerĝaj.
Nun enverguras agloj en sunradia ĉielo,
ĉirkaŭflugantaj ŝvebe, kompane kun kolombidoj.
Buntaj sukplenaj fruktoj el arboj pendas arome.
Sed bruske inter homoj estiĝas ia batalo
kaj post teruraj puŝoj kadavroj sange kuŝadas.
Restantoj konsiliĝas ĉe la marbordo kolekte
kaj ĉarpentinte ŝipojn, el la insulo veturas
kun vangoj larmorulaj, ĝema plorado sopira.

Tion kontemplis Uttu kun suprizita mieno,
dum eĥaj paŝoj venis el koridoro kolona.
Luhebu, blankebarba, nun konturiĝis en ombro.
Li tuj rekonis Laŝmun kaj ambaŭ ĝoje brakumis.
La Nahumido diris per salutvorta parolo:
—Ho vi nomadoj tendaj sub ĉielbluo migrantaj,
bonvenon al la urbo, al sankta templo de Ŝamaŝ.

Nun Laŝmu siavice al grizehara rediris:
—Saluton ho Luhebu, vin daŭre benu la dioj.
Jen estas Uttu Noa, hereda filo de Lemeh.
Ni venis por konsulti pri l' antaŭsignoj aŭguraj,
ĉar jen hieraŭ sonĝe, en iu stranga vizio,
montriĝis al li brila, ĉieldevena figuro
mistere ordonanta konstrui ŝipon, ironte
surmare al Dilmuno. Ni informiĝi deziras,
ĉu ĝi kredeblas certa, ĉu estas vera mesaĝo
de l' dioj, ĉu krepuskis la tempo ĝoje reveni
al la insulo patra, aŭ ĉu ni devas atendi
plue.
Luhebu nun respondis per tono humila:
—Ho Uttu, mi memoras pri via patro Lemeho
dum niaj junaj jaroj, kiam ni kune nomadis.
Do kio li fariĝis, ĉu li bonŝance pluvivas
kaj pri l' Dilmuna tero fidplene revas ankoraŭ?

Okulojn levis Uttu dum alparolo serena:
—Maljuna Lemeh plue paŝas en sano feliĉe
kaj li dummigre revas pri l' praa lando. Sed iel
veras, ke plenumiĝis la tempo por reveturo?
Ĉu l' dioj montras volon per sonĝvizioj avertaj?
Sincere manifestu pri via penso profunda.

Utnoa sian sperton nun al Luhebu rakontis.
La pastro aŭskultadis ĉiun nuancon atente

kaj post cerbumo longa, li senperturbe parolis:
—Nun estas jam la sepa generacio nomada.
Laŭ pastraj tradicioj de nia sankta popolo,
sekrete transdonitaj, iam la Dio Plejalta
elvokos kondukanton, je l' tempo ree vojaĝi
al nia patra hejmo. Per la stelara situo
montriĝos senerare, ĉu vin la dioj elektis
por tiu granda tasko. Ni prikonsultu tabelojn
ekscii ĉu l' vizio estas entute kredebla
aŭ nur hazarda sonĝo. Ni la sanktejon eniru,
kie troviĝas bilde la ĉielstela desegno.
Mi priesploros vian *simtu*-spiriton asignan
kaj preĝos al diaĵoj, kiuj supere nubloĝas.

Sekve ili plandumis al sankta ĉambro tenebra.
Statuoj de la dioj ĉirkaŭis pale la halon,
starantaj en niĉegoj, kun luma lampo piede.
Ili prezentis astrojn kaj ĉiu propravizaĝe:
unu orkronis, tiu gemsceptron tenis, alia
fulmfaskon dekstramane kun fiŝoparo ĉeŝultre.
En mezo rondis tablo sur kiu bunte videblis
bareliefaj bildoj de steloj alte vojantaj.
De l' centro disradiis strekoj al ĉiu el ili
kaj meze staris najlo al kiu ŝnuro ligiĝis.
Luhebu nun demandis pri la naskiĝo de Noa
kaj sur la ŝtona tablo al ĉiu stelo difinis
simbolojn respektivajn. Laŝmu silentis atente,
ŝajnis ke eĉ diaĵoj sur la bildaron okulas.
Ĉiuj senmovis dum la pastro medite promenis
ĉirkaŭ hieroglifoj, interpretante figurojn.

Li poste izoliĝis en senfenestra salono
kun muroj gravuritaj per reliefoj enigmaj,
kaj skribtabelojn sanktajn sub torĉa fajro li legis.
Planke plenakvis pelvo kaj kruĉo staris apude.
Li kaptis la bronzujon, en akvon verŝis oleon

kaj surflosantajn formojn profundesplore rimarkis,
dum li murmure preĝis al Ŝamaŝ, dio divena.

Uttu kaj Laŝmu staris en la statua salono
kiam eklaŭtis paŝoj de l' maljunulo venanta
laŭ koridoro flave luma kaj jene li diris:
—Ni ĝoju ĉar finfine post longaj noktoj aŭroras
la tago kiun varme niaj prauloj atendis,
la tempo por reveno kiam forsvenos afliktoj,
niaj penadoj migraj sur vasta lando Ŝinara.
Ho Uttu, tiu sonĝo ne estis falsa miraĝo,
ĉiuj aŭguroj klaras kaj kuntiriĝas apoge.
Ne timu entrepreni la revojaĝan eliron
al Dilmun, ĉar vi estas la elektito ĉiela.
Mi rajtas vin informi pri la sekretoj arkanaj,
longtempe konservitaj per transdonado de pastroj.
Ne dubu pri l' ekzisto de la insulo fekunda.
Ĝi sidas sunsubire de la marbordo de Ŝinar
kaj tien alkondukas rivera fluo sur maro,
tiel ke oni povas facile rekte veturi
kaj ŝipo ĝin atingus eĉ sen ekblovo de ventoj,
ĉar tiu marrivero apud l' insulo fluadas.
Akorde kun l' anoncoj de la ĉiela mesaĝo,
eblus vojaĝi tien per granda ŝipo sekura,
kun pordoj ambaŭflanke el kiuj venu boatoj
remhavaj por transporti homojn kaj same la brutojn
kiam proksimos plaĝoj. Do, sen prokrasto ĉarpentu,
laŭplane, lignan ŝipon ĉe la rivero Purattu.
Kiam kreskantaj akvoj ŝveliĝos pro la inundoj
tiam la granda ŝipo sukcesos veni maronden.
Kuraĝu estre gvidi tiun vojaĝon eventan,
kiun post sep generoj al vi *ŝeduoj* asignis.
Ĝoju, ho Dilmun, lando de niaj patroj iamaj,
ĉar la infanoj viaj al hejmo fine revenos.
Feliĉu jam la idoj de la Henoha popolo,
ĉar venis la limtempo por ekzilpuna migrado.

Ho, dankon al la dioj, car mi ĝisvivis atinge
ĉi tiun tagon gloran, kiam mi vidas okule
l’ esperon de l’ popolo kaj mia revo realas.
Mi povas pace morti. Vin la Plejalta favoru!
Viajn dezirojn korajn Li sukcesige plenumu
por bono de la homoj kaj de l’ tribaro nomada.

Tiel Luhebu diris. Noa perplekse genuis
kaj ili venis preĝi antaŭ altaro de Ŝamaŝ,
sed ĵusajn okazaĵojn li nur konfuze konjektis.
Samkiel grotsimio en sekarbara dezerto
vidas vagulon bori tra termitejo kaduka
misteran truon rondan kaj poste tien enkaŝi
el nigra ŝultrosako aferojn ŝajne manĝindajn;
kiam li posttrunkiĝas, de scivoleco puŝate,
ĝi kuras ŝovi manon, sed ekkaptinte la semojn
ne povas ĝin retiri, la pugnon daŭre fermante,
kaj kriĉe ne komprenas pri l’ tute stranga faraĵo,
dum tiu ĝin ŝnurligas por ke ĝi gvidu ĉe fonton,
post kiam li alĵetos salbulojn ĝin soifigi,
tiel travivis Uttu antaŭ diraĵoj enigmaj
de l’ divenista pastro, ĉar ne komprenis elekton,
gvidonte revojaĝon al la insulo popola.

* * *

Dum Laŝmu kaj Utnoa troviĝis ene de Babel
por jara foirfesto kaj por konsulti ĉetemple,
en la tendaro migra, maljuna Lemeh eliris
kun sia nepo Arin, sepjara filo de Tubal,
al la apudaj kampoj. Jam Lemeh grize hararis,
sulke haŭtis kaj blindis. Li ne plu vidis entute
la brilon de la suno, sed lia nepo fidele
lin akompanis. Lemeh paŝis kun kurba pafarko
kaj sagoj. La knabeto kondukis lin kaj avertis
pri la ĉasotaj bestoj. Li celis helpe de tiu

kaj pafis laŭindike. Same el tendoj eliris
ambaŭ, kiam la suno, la nevidata de Lemeh,
ĉielascende rondis, kaj manenmane foriris.
En altileksa kampo ili embuske kaŝiĝis,
silente kaj senmove falontan predon atendi.
La knabo vidis jen, ke io moviĝas en ombro
kaj flustris al la avo, al blankpupila Lemeho:
—Vidu arbuste cervon kun longaj kornoj en alto.
Avo, ekcelu, jen mi tenas laŭ ĝusta direkto
la pafarkon. Jen tien! Suben! Jam pafi vi povas.

Ŝnuron malstreĉis Lemeh, kiel multfoje li faris,
laŭ la direkto, kiun la knabo montris unue.
La sago tuj ekflugis tra la aero siblante,
kiel serpento skvama antaŭ gazelo ĉasota.
Eklaŭtis homa ŝriko. Lemehon tio teruris:
—Arin, mi aŭdis voĉon, kiu laŭhoma similis.
Ĉu temas pri vundito? Aliru, kuru rapide!

Arin, la knabo, hastis al korpo ombre falinta,
li traborante serĉis inter la frondoj arbaraj
kaj baldaŭ ree kuris dum al Lemeho li gestis:
—Ho avo, avo, viron vi ĵus mortigis erare.
Tio ne estis cervo sed homo tere kuŝanta.

Je l' krioj de l' vundito, paŝtisto de la brutaroj
de l' Templo, jam alvenis la kamaradoj aŭdintaj
kaj ili tuj supozis, ke oni ilin atakas.
Pri l' Dilmunidoj sciis, kiuj proksime tendumas.
Nun ekparolis Tarbiŝ al la kompanoj irite:
—Jen la nomadoj krime kontraŭ Tunakon atencis.
Akvon el putoj provis lunlume ŝteli ĉi-nokte
ĉar daŭre furiozas, ke ni trinkigi ne lasas
iliajn bestojn. Nepras tion ne plue toleri.
Ili suferos skoldon, sur sia karno riproĉon.

Pro la tumulto venis homoj de l’ tribo de Dilmun
kaj oni kvereladis per insultvortoj akuzaj.
Unu el la paŝtistoj de l’ ĉefa templo Babela,
Intul, amiko juna de la mortinto, pafarkis
kontraŭ tendano, Tiraŝ, kiu loĝadis iame
en Kiŝ: lia patrino nur por afliktoj akuŝis.
Ĉi tiu terenfalis, la bruston sago trapikis
sub la maldekstra mamo, inter la ripoj unuaj,
kaj lia muta buŝo sangfluon verŝis abunde.
Lemeh la kverelantojn provis konfuze pacigi
kaj la fatalan kulpon al ĉiuj laŭte proklamis.
Sed lanco de paŝtisto en lian gorĝon eniĝis.
Li spasme ĝin ekkaptis, al suno turnis okulojn
por adiaŭo blinda kaj lastaspire pereis.
Ili batalis ĝis venis gardotrupo ĉevala
de l’ templo de Iŝtaro, kies ĉefpastro posedis
la rurojn super kiuj ili kverele disputis.
La soldataro baldaŭ disapartiĝi devigis.
Vunditojn ĉiuj prenis sub krioj laŭte minacaj,
kun ellevitaj pugnoj, sange venĝema kolero.
Sed ili jam disiris, al tendoj venis aŭ urbon.

Ŝindur, la intendanto, je la novaĵo vokigis
la soldattrupajn estrojn de la sanktejo de Iŝtar
kaj oni lin informis. Ŝindur raporte vizitis
hejme ĉefpastron Teŝub, kiu kunvokis en urĝo
la konsilion templan. Nun Teŝub jene parolis:
—Vi scias jam pri l’ faktoj: ĉe l’ monto Bezer okazis
plia kunpuŝo inter paŝtistoj kaj la nomadoj
Kenaj. Ĝi ja ne gravus iel, sed tiurilate
ĵus venis mesaĝisto de l’ granda urbo Nineve
averti nian reĝon pri la popolo de Dilmun.
Urboj Aŝuraj frontas kontraŭ nomada ligrondo
kaj Dilmunidoj venis nur avangarde de ili.
Tiuj tribanoj celas ruze faligi Babelon
per enŝteliĝo. Ili estas palpebla minaco.

Tamen la reĝo Nimrod informojn preteratentis.
Li jam multfoje fuŝe pri la aferoj eraris
de nia regno. Lastfeste li ignoris ofende
laŭritan divenadon. Krome, altrudi li planas
la heredanton kronan, kio koncernas unike
templan ĉefpastron. Tial la decidpovon averte
repreni mi konsilas ĉe la nomada komploto.
Eĉ se la reĝo blindas, ilin forpeli ni devas,
ĉar tio rekte tuŝas al komunuma civito.
Li scios elrimarki nepreterindan admonon.

Plene konsentis ĉiuj je lia vorto silente.
Disiris kunvenintoj kaj al najbara kamero
li paŝis, kie staras la kapitano pli ranga.
Nun Teŝub komisiis al Ugal jenakomande:
—Forpelu la tribanojn de l' najbaraĵo de Bezer,
iliajn nigrajn tendojn vi senindulge bruligu
flame kaj la ordonon pastran laŭtigu ĉi-tekste:
«La baru de Babelo ordonas vin evakui
la landon kaj formigri de ĉe la urbo Puratta.
Neniam vi revenu ĉar oni alte minacaj
deklaras vin por l' urbo kaj la kamparoj apudaj.
Se iam vi revenos, ni vin eksterme frakasos».
Kaj li aldonis: —Tamen, ilian morton evitu,
krom en okazo nepra, ĉar Nimrod reĝe protekti
ilin inklinas. Sekve, ĉion ŝajnigu nur ajna
kverelo pro la akvo inter la templo kaj ili.

La kapitano aŭdis kaj klinsalutis obee.
Tuj dek du gvardiestroj kun ties trupo subula
forrajdis el la templo laŭ la pordego de Adad,
trapasis la riveron sur alta ponto galope
kaj al tendaro venis. Dispelis skurĝe brutarojn,
flamigis tendojn, plurajn homojn, ĉar iuj oponis,
glave mortigis. Fumdensoj kumulusis al alto.

La kapitano Ugal pendigis arbe mesaĝon
pri l’ devo evakui la kampadejon el antaŭ
la Ŝinarurbo. Liaj trupoj galope rerajdis.
Sur la kamparo vasta tamburis hufe ĉevaloj
kaj en Babelajn murojn ili polvnube kaŝiĝis.

En kampadejo migra plendoj milvoĉe bedaŭris,
ĉar mortis multaj homoj provante ŝirmi posedojn,
amikojn, familion. Bovgregoj muĝe forkuris
dise kaj brulis fajroj en la arbaro ĉe Bezer.

* * *

Laŝmu kaj Uttu, tiam, en Ŝamaŝtemplo preĝinte,
paŝis trans esplanadon por supreniri la turon
laŭ flankŝtuparo kruta. De supre ili rigardis
al formiksvarmaj placoj dum sur la brila rivero
velŝipoj blanke glitis; jen stratoj vaste liniaj,
palacaj ĝardenfrondoj kaj la muraro krenela.

Sed nun Utnoa turnis sian rigardon atente
al horizonto ĉar li vidis, ke fumo leviĝas
griznube. Kaj li diris tuj al la frato ĉi-vorte:
—Laŝmu, okulu tien, ĉu tiu fumo ne venas
ĝuste el la direkto de niaj tendoj alarme?

Tiam respondis Laŝmu kun zorgoplena mieno:
—Ho Uttu, vi ja pravas kaj pri misaĵo mi timas.
Al tendoj ni revoju baldaŭ, sen plia prokrasto.

Ili desupris, kun premaj antaŭsentoj angoraj,
l’ emajlajn ŝtupojn. Strebis tra la multvoĉaj amasoj
kaj place renkontiĝis kun la tribanoj aliaj,
kiujn reveni urĝis al kampadejo nomada.
Kiel ĉefzebro stria en la aero flarinte,
ektrotas sunlevejen kaj lin postkuras arope

greganoj, sub instinkta sento je pluvo freŝiga,
sed baldaŭ li perceptas, ĵus alveninte ĉe fluo,
odoron elefantan kaj li ekhaltas abrupte;
dum la kunuloj trinkas, li maltrankvile priflaras,
sondante forajn montojn, kun elstreĉitaj oreloj,
rememorante tagon, kiam ĝangalo subite
ekbrulis kaj la zebroj sen orientiĝo galopis,
tiel Utnoa timis en sia koro damaĝon
dum marŝis rapidpaŝe sur la distanco dumejla.

Kiam al la tendaro ili alvenis, ululajn
plorojn ekaŭdis. Fumis tendoj. Surgrunde mortintoj
disis. Jubalo, plorlamente, Utnoan informis
pri l' murdo de Lemeho far la paŝtistoj idolaj
kaj pri l' razio posta de puntaĉmento, ĉe kiu
krom nevo Arin, Joliboa, edzino de Tubal,
kaj multaj samtribanoj, sub lancopiko pereis
senhelpe ankaŭ Ada, la bovokula patrino,
kiu akuŝis Uttun ĉe l' montaj lagoj Urartu.

Kiam li ekkonsciis pri l' katastrofo rigora
kaj vidis la kadavron de la patrino palfrunta,
kuŝantan en la tendo apud Lemeho manlige,
li sentis sin volvata de nebuleca funebro.
Kiel pantero nigra en arbardenso ĉasanta
sub molevaksa luno senbrue plandas inside,
neniel rimarkebla inter la frondoj aĵuraj,
kaj streĉe aŭskultadas ĝis en proksimo hazarde
rompiĝas seka branĉo, kien verdfela bradipo
surgrimpis por sin savi, kaj tuj ĝin krifas akute;
aŭ kiel krokodilo sur glatrivera surfaco
kvazaŭ flosanta trunko atentoplene gvatadas,
dum ondotanĝe glitas la nukserondaj okuloj,
ĝis la longvosta saltas al kanejbordo subite
kaj dentas gazelidon tie senzorge trinkantan

kaj trenas en la akvon per korpoturnoj agitaj,
fiksonte ĝin sur fundo, por ke la karno putradu
kaj povu ĝin, jam molan, post pluraj tagoj engluti,
tiel travivis Uttu en internaĵoj, arkane,
kiam en nigra tendo per milda mano karesis
la marmorfridajn vangojn de la gepatroj en kuno.

* * *

Kiam la suno sinkis kaj glimaj steloj aperis,
kunvenis asemblee la ĉefoj de la popolo
meze de ĵusaj cindroj kaj multaj tendoj elardaj,
per torĉoj prilumante la ĉirkaŭantan aflikton.

Tiam ekstaris Tubal, plej aĝa filo de Lemeh,
kvankam li estis filo de la edzino subranga
kaj inter li kaj Noa ekzistis daŭra kverelo,
ĉar, filo de l' unua, Uttu laŭrajte heredos
la posedaĵojn patrajn kaj la estrecon unikan
super la triboj Kenaj. De antaŭ longe tra jaroj,
inter la Dilmunidoj, persistis funda divido
pro la hereda rego kaj opinioj oponaj
rilate la militon kontraŭ la urboj Aŝuraj
kaj ankaŭ pri l' vojaĝo al la insulo patria.
Tiel nun ekparolis en l' asembleo Tubalo:
—Ĉefoj el Dilmun, mian voĉon doloro katenas
pro l' senindulga perdo de proksimuloj amataj.
Ho Dilmunidoj, nia gento jam troe suferis
perfortojn de urbanoj. Jam apud l' urbo Nineve
soldatoj sange sturmis, kiel ĉe triboj aliaj.
Kial ni ĉiam fuĝas, neniam brave protektas
nian tendaron? Ĉu ni daŭre forkuru virine,
neniam intervenu en sindefenda milito?
Jen katastrofaj sekvoj kaj senescepta rezulto:
bruligoj, mortoj, vundoj kaj poste ploro lamenta
eĉ se ni nur senkulpas. Ni kunligiĝu kuraĝe

kun tendeloĝaj triboj kaj kontraŭurbe batalu,
unue ĉe Nineve. Poste, kun ili Babelon
ni jam kapablos venki. Babelo, urbo detrua,
kion vi faris al ni, ni venos pagi merite:
forprenos la infanojn kaj kontraŭ muro nukrompos!

Baldaŭ ekstaris Nahor, kiun tendanoj elaŭdis.
Li estis konsilisto de nomadestroj en rondoj
kaj nun antaŭenpaŝis inter homvicoj atentaj:
—Tubal, vi diris fiajn vortojn, blasfeme parolis.
eĉ se vi spertis perdon de samsanganoj amataj.
Neniam ĉe l' popolo aŭdiĝis vortoj ofendaj
kiel la viaj, plenaj de venĝsoifa malamo.
Vi rompis sanktan ĵuron de nia gento: neniam
homon malŝati, murdi, ĉar nur ruino rezultas
kaj mortoj seneliraj. Revenĝon venĝo provokas.

Jene respondis Tubal al l' interveno de Nahor:
—Tribanoj, tio estas nur vortoj vente vakuaj.
Ĉu vi ne spertis proprahaŭte kaj blindas okuloj?
Ĉu antaŭ ni ne kuŝas familianoj, amikoj
kaj etaj knaboj, kiujn faligis bronzo kruela?
Ĉu plendoj estu daŭre nia fatala premio?

Tiam ekstaris Uttu kaj asemblee parolis:
—Idoj de Henoh, Tubal, vorton aŭskultu, mi petas.
Jam sep generacioj pasis kaj nia popolo
ne rompis praan ĵuron neniun homon agresi,
kaj la tribanojn krimajn nia praleĝo forigis
per ekzilpuno. Ĉu nun ni fine kapitulacu,
post kiam ni decidis al la marbordo vojaĝi
survoje al l' insulo, al nia hejma patrio?
Ni iru ĝis la maro, de tie ŝipe veturu
al Dilmun, la antikva, kaj ni forgesu pri venĝoj.

Jene respondis Tubal al la admono de Noa:

—Ho Uttu vi parolas nur pri rakontoj enigmaj,
pri praaj tradicioj, kiujn realo dementas.
Verŝajne ili estas revoj de tempo pasinta.
Kie situas vere tiu insulo fabela?
Ĉu iel ĝi ekzistas? Verŝajne pure legenda
ĝi estas. Ni vekiĝu el infaneca kredemo.
Kie troveblus lando senĉese mildeklimata?
Kaj eĉ se ĝi ekzistus, kiel ni povus aliri
tra ŝancelskuaj ondoj, per kia ŝipo sukcesus?

Nun intervenis Laŝmu per konsilanta parolo:
—Ho Tubal, mia frato kaj alta ĉefo de Dilmun:
Uttu kaj mi hodiaŭ iris konsulti la pastron
Luhebun Ŝamaŝ-temple dum Akitua foiro
kaj li informis, kiel eblas alcele vojaĝi.
Laŭ pastraj tradicioj, kiujn sekreto protektis,
ekzistas marrivero, kiu kondukas ebene
ĝis la insulo. Ŝipon ni elĉarpenti bezonas
—similan al sanktejoj en nia praa patrio—
el goferligno nigra ĉe profundakva Purattu.
Kiam pluvujoj ŝvelos, tiam ĝi flosos en ondoj
kaj laŭ rivero mara ĝis nia celo navigos
eĉ sen ekblovo venta, sen ia puŝo remila.
Proksime de l' insulo, ni ĝin atingi kapablos
per korbaj felboatoj, ĝis la marbordo sekure.

Baldaŭ respondis Tubal al l' interveno de Laŝmu:
—Homoj el Dilmun, kiu kredus pri tia naivo,
kiele povus flui rivera kurso tramare,
kiel kapablas ŝipo esti portata sur ondoj
sen helpo venta, sen impulso de ia remilo,
kaj pace albordiĝi apud insulo havene?
Tio aspektas kreo de fabelemaj animoj.
Pensu prudente: nur ŝafidoj buĉadon akceptas.
Ni ne plu malkuraĝu. Ni legitimis iame
hakilojn, lancojn, sagojn defendi nin de sovaĝaj

bestoj kaj allasis ke, se necese, ni rajtas
tiujn mortigi por memnutre konsumi viandon,
kvankam pramitoj diris, ke ni skrupule vivulojn
respektu ĉiam, ne nur homojn. Fatala realo
al sindefendo kaj murdo instigadas aperte,
detruo ĉie regas kiel bezono natura,
besto disŝiras beston, homo mortigu la homon,
se nepre. Kiu patro ne ekbatalus aŭdace
por propra familio, se oni filon ekvundis?
Niaj hejmanoj estas la tendeloĝa popolo,
kiu nun kontraŭ urboj por sindefendo militas.
Ĉu daŭre ni kaŝiĝu, ĉu ni forkuru lepore
kaj ne kunhelpu, en bezono, samsangan amikon?
Eble ni iam vivis en tero paca, libere,
sed ĝi ne plu ekzistas, la urboj trude prirabis
kaj nin ekzilis. Do nun al propra lando revenu,
konkeru niajn terojn, kiujn urbanoj uzurpe
ŝtelis. Jen nia hejmo kaj prainsulo feliĉa.
Kiu ne verŝos sangon en prave justa defendo?
Ĉu do ni malkuraĝos fuĝonte ĉiam el armoj?

Tiel Tubalo arde en l' asembleo parolis,
dum lancon fajrebrilan longombre svingis aere.
Tiam respondis Uttu kaj jenavorte li diris:
—Ho Tubal, mia frato kaj alta ĉefo de Dilmun.
Certe malbravo ĝi ne estas. Sendube se taŭgus
milito por defendi hejmon kaj same la pacon,
ni ĉiuj kunbatalus. Tamen, ĉu oni la vivon
ne fordetruas ankaŭ de samgentanoj en urboj?
Ĉu do la urbloĝantoj ne estas fratoj animaj,
ĉu ne rezidas tie homoj el ĉiu popolo,
diversdevenaj, fratoj kiuj antaŭe nomadis?
Ĉu ni certigus nian bonon kaj pacon atingus
per ruinigo de la paco kaj bono de homoj,
kiuj samkarnas al ni, prafamilie parencaj?

Baldaŭ rebatis Tubal kaj jenavorte li diris:
—Ĉu decas nomi fratoj kaj samgentanoj amikaj
la Babelanojn, kiuj nian tendaron atakis,
trarompis niajn stalojn kaj pelis dise la brutojn,
infanojn lance boris kaj fende hakis arbitre?
Ĉu vi forgesis, Uttu, la morton de nia patro
kaj de l' patrino kara? Ĉu mi forgesu l' edzinon,
la krudan pereigon de mia filo pli juna,
kaj ankaŭ vi, ho Laŝmu, nur vian patron adoptan?
Ĉu la murdintoj fratas? Ĉu ili estas amikoj?

Tiele li aldonis en l' asembleo sublune:
—Mi mem kaj mia tribo intencas iri Nineven,
batali kun la Gupoj kaj tendaranoj aliaj.
Kiu do venos kun ni kaj kiu restos ironte
al lando mistifika, al feinsulo revata?
Ni vidu l' efektivon. La senelturna realo
estas bruligoj, mortoj kaj malamikaj agresoj.
Ni do alianciĝu por kolektiva defendo
kun sunlevejaj triboj. Kiu intencas ekiri,
tiu ĉi-flanken venu, ceteraj restu kun Uttu.

Tiam ekstaris Jubal, pli juna frato de Noa,
Cila, Tubal-patrino, la kunedzino de Lemeh,
kaj tendaranaj estroj baldaŭ plejparte leviĝis,
kun ties familioj sin metis flanke de Tubal.
Ĉi tiu diris fine en l' asembleo nomada:
—Ĉu do neniu plia por kunvojaĝi Nineven?
Do vi, ho Uttu, Laŝmu, Joktan, serĉadu la mitan
insulon. Se vi trovos iam, alsendu heroldon
al ni. Tamen, ni restos plue sur tiu ĉi grundo,
nia hejmlando vera, sola insulo prapatra.

Jene respondis Uttu per vibra voĉo, solene:
—Eĉ se l' insulon ni ne trovos, ni spite pluserĉos,
kaj eĉ se ni malmultos, persiste strebos atingi,

ĉar ni pri ĝia vero kaj pri l' ekzisto sendubas.
Kaj vi, ho samtribanoj, neniam kore forgesu
l' antikvajn tradiciojn de la Dilmuna popolo:
kunhomon ne mortigu kaj ne rankoru malame.

Nur dek du ĉefoj tribaj ĉe Uttu flanke kubutis:
Laŝmu kaj Joktan, Puzur, lertfingra teksi kanabon,
Ofir, Uc kaj Havila, la saĝa Dikla kaj Obal,
Ŝelak, Ketura, Dedan, kaj Efer, filo de Midjan,
krom konsilisto Nahor, proparolinta pacige.
Ili entute kvantis cent dudek homoj adoltaj,
dum sumis sepcent kvindek tiuj kun Tubal irintaj.

Siajn havaĵojn tendajn vespere ĉiu pakumis.
Stele gravedis nokto dum ili viglis omaĝe
ĉe la mortintoj propraj.
Kiam krepuskis aŭroro
kaj ruĝevanga suno super la montoj ekrondis,
viroj kunportis branĉojn kaj ŝtipojn meze kolektis
bruligi la kadavrojn. Post la funebraj oferoj,
ili disiris ĉiuj, al sunsubiro ĉemaren
Uttu kun siaj homoj kaj al Nineve Tubalo,
post kiam ambaŭ ŝutis, de sur krutaĵo dekliva,
la cindrojn de Lemeho, kiu pro blindo pereis.

Tria kanto

Dum Laŝmu kaj Utnoa kun sia grupo nomada
sunsubirejen migris al Ur, blankmure majesta,
urbo staranta rande de la Puratta rivero,
ĉe kies ĉirkaŭaĵo, goferaj arboj abundis
por konstruado de la ŝipo, en l' alta ĉielo
Najanoj nun forgesis pri la popolo de Dilmun,
ĝis venos determino de l' kataklismo fatala.

Ili laboris pace en plezurdonaj okupoj,
vojaĝis kaj sin distris per sia ludo kutima,
la arto de *oksuo*. La kolektivo posedis
pensmanieron gregan kaj amon al la gefratoj,
ardan deziron kore, pliperfektigi la reton
socian, ĉar konsciis frenezo — spili la vandon
de komunuma ŝipo, sub mensperturba pelado
de egoism' absurda. Kompetentuloj iliaj,
la gobdemiologoj, prikonsideris esence
homon kvazaŭ nod-reton kies influorilatojn
inter la elementoj bazaj esprimi validas

per fiksaj parametroj matematike regulaj.
La kolonia ludo terapeŭtike valoris,
trejne progresigante la psikobiologian
strukturon de Gobano kaj por socia kohero
utilis plej efike. La Najkomplekso similis
teksaĵon aranean, kiun branĉpende fabrikas
flavnigra argiopo kombante ŝpine fadenojn,
kiuj milope fluas el abdomena tubaro,
tiel ke l' filamentoj, malgraŭ l' ekstrema magreco,
estas entute fasko da kungluitaj, elastaj
fibretoj mikroskopaj kun sinuanta kompliko;
ĝi glitas supren-suben per postaj kruroj agante,
jam sur kanvaso ronda ĝi tiras pinte radiojn,
kiujn surbrodas dense je stelfiguro vitrala,
dum antaŭ tiu haltas la promenanto ravite
kiam, kontraŭ sunlumo, ĝin en arbaro rimarkis,
tiel Najanoj zorgis pri solidara kunvivo
kaj strebis al perfekto.

Ilia ludo okazis
en elfositaj lokoj nomataj *oksu-gadioj*,
laŭforme rektangulaj kvazaŭ surtera baseno.
La grando tre variis, de instalaĵo giganta
dukilometre longa, apud la urbo Oara,
ĝis kelkaj fosludejoj de vilaĝetoj apudaj,
kiuj laŭlongis kvindek metrojn kaj dek du profundis.
Tien vojiris ankaŭ Emme, al *oksu-gadio*
najbara, kun l' edzino kaj familio cetera,
fininte jam la devon de la socia laboro.
Li aĝis kvardek jarojn, laŭ teraj cikloj akorde,
kaj Dunna, preskaŭ kvardekunu. Samdome loĝadis
liaj gepatroj ĝis ili emerite fariĝos
sesdekok-jaraj. Ambaŭ estis jam ekslaboruloj
kiam, kun la geedzoj, ĵus transloĝiĝi decidis.

L' edzino de Soraa, konsilistine deĵoris
pri la plantarto de ĝardenoj. La tago labora

estis mallonga, kiel por ĉiuj Naje loĝantaj,
oscila inter tri kaj kvar horoj. Ĉi periodo
estis eĉ pli restrikta por profesioj aparte
nervostreĉaj kaj por aktivaj permanaj okupoj.
Ilia organizo estis kompare simila
al abelujo, kie laborulino perdance
indikas la direkton de flora kampo proksima
per vigla ĉirkaŭturno kaj en interno pograde
ŝanĝas la centran paŝon laŭ translokiĝo de suno,
plurloke ripetante antaŭ spektantoj atentaj;
jam multaj forflugadas dum haveniĝas aliaj,
inter la sentineloj kaj la brigado ventuma,
portante nektargutojn kaj polenŝarĝon el oro
en larĝaj tarsokestoj aŭ ĉe la vila torako,
dum ene pluraj ŝmiras per propolisaj oleoj
fendaĵojn aŭ truetojn en la strukturo ĉelara
kaj kelkaj, akurate, produktas vaksan okopon:
prilaborante brose, la skvamojn velde kunigas
por munti pliajn ĉelojn laŭ sesangula praformo,
kien verŝiĝos baldaŭ mielo blonda pogute,
tiel en Najstacio ĉiu laboris utile
dum limigita tempo, kun distribuo laŭsaĝa.

Ili la taskon finis de la okupo metia
kaj estis promenintaj al ludofoso piede.
Hazarda observanto, kiu el tero devenus,
perpleksus antaŭ strangaj retoj implike metalaj,
baroj kaj pontoj, masoj el gelatene travida
substanco viskozeca, ŝajne ŝvebanta vakue,
mulde flekseblaj tuboj laŭ kiuj homo kapablis
komforte gliti, kirloj el fluidaĵo vapore
satura, alprenantaj formon de sfero girema
aŭ parabolan, ĉio en lanta movo. De supre,
tiu kompleksa maso aspektus ŝaŭme bolanta.
La regularo, formo kaj matĉotempo variis
por ĉiu konkuranto, ankaŭ por ĉiu seanco,

sed ili interplekte kaj kunfandiĝe rilatis
en unu sama ludo tra l' tuta mondo ĉiela.

Ĝi celis tiun tagon al kunfluigo de voloj,
ke nova geedziĝo povu laŭ planoj okazi,
ĉar inter ili nepris, ke l' tuta gobda socio
aprobu la kunligon per akceptado volonta.
Nun estis kandidatoj Evue, Emme-filino,
kaj Busla, Inna-filo; sed ĵuse patroj oponis
dum Naja asembleo pri la surtera savindo,
ĉar Inna argumentis por la miseco de homoj.
Necesis akordiĝo de l' konscienco komuna
tra l' tuta kolektivo en plej profunda nivelo,
kvankam pensmalakordo en la surfaca persistus.
Kaj tion ili strebis per la kunludo vivarta.
Ene de la fosaĵoj laŭlongis mure paneloj,
buntaj kaj diversformaj, kun ŝanĝiĝanta lumado,
montrantaj ĉiujn fleksojn de l' fluoj psikologiaj
en ĉies propra grupo kaj tra l' stacio de Goba,
kaj estis la signalo, ke l' centra blankon atingis.
Se ili ne sukcesos, nepros prokrasti la nupton.

Soraa jen trarampis spiralan tubon elastan:
samkiel lia korpo plurpozicie tiriĝis,
tiel lia animo malstreĉiĝante baraktis,
provante forbalai el la spirito rankoron
kontraŭ Sooje Inna pro la Bluglobaj aferoj.
Ankaŭ ceteraj membroj de l' familioj el ambaŭ
celis ekvilibrigi telepatie la mensojn.
Jen Noŭde kun kompanoj saltis sur reto risorta
kaj ŝvebis manenmane, plektante vice figurojn.
Dunna kun amikino, kaj najbardome loĝantaj,
glitis sur gelateno kaj kun senvidaj okuloj
—kovritaj per substanco pulvorigita korneen,
kvazaŭ kontaktolensoj de la teranoj uzataj—
provis rekoni tiujn, kiuj kun ili puŝiĝis.

Gepatroj de Soraa baniĝis saŭnosimile
kun pluraj samaĝuloj en strikta vesto gumeca
ene de kirla likvo, apenaŭ ĝis la genuoj
kovranta, aŭ sferforme volvanta ilin entute,
konformigante movojn al la spirito ĉiela.
Samtempe Naj-loĝantoj en stadionoj ekzercis,
celante taŭgan gradon de harmonia konkordo,
ke ĝusta disponigo de la kriptonaj atomoj
montriĝu surekrane kaj morgaŭ eblu soleni
la nupton akorditan laŭ plej konvena rezulto.
Sed dume sur paneloj la lumoj evoluadis
al ruĝo, flavo, verdo, en kontinua fluktuo.
Minuton eklumiĝis la centra mura panelo
per hele blua tono kaj sekve blanke brilanta,
kio signifis, ke plenumiĝis statoj animaj
necesaj, kaj ke eblas la geedziĝo senbare.
Kiel cikadoj ĉirpas tra longedaŭra vespero,
en migdalarba valo ĉirkaŭombrata pinie,
dum somerardo, ĥore, plukante vibre la kordojn
inter folioj pintaj aŭ sur trunketo rugŝela
kaj se hazarde homo ĉe la sidbranĉo de unu
paŝas, ĝi tuj ekmutas, dum daŭras fone krikrioj,
sed kiam li transiris denove ĝoje ĝi kantas,
miksante sian tonon en la kresĉendan orkestron,
kiu persiste stridas kaj vespermeze klimaksas,
simile nun intensis la harmonia konkordo
de ĉiuj Naj-loĝantoj, en solidaraj animoj,
dum dense brilis blanko sur stadiona panelo.
Sed ĉiuj plue sportis kvazaŭ nenio okazus,
koncentre, senperturbe, ĝis Naja suno subsinkis,
kaj tiam dispromenis al hejm-ŝabio ripozi.

Emme kaj Dunna vokis sian filinon Evue,
loĝantan en la urbo politeknika de Naje,
kie geknaboj studis ĝis sia jaro dekoka
ekde l’ dekdua. Pere de holograma vidilo,

en subkupola ĉambro, Evue bilde ĉeestis
kaj ili kungratulis pro l' ĝoja tago morgaŭa.

* * *

Je la mateno sekva enhejme ĉio silentis.
Sur horizonto brilis, kun aŭreolo lazura,
la kolonia suno, al la prastelo simila.
Ekster ŝabioj regis trigrada temperaturo,
interne dekokgrada, kiel laŭlonge de tago.
Ili vekiĝas glate sen mekanika vekilo.
Salutas reciproke, manojn surbruste metante
kaj kovras sian nudon per kvazaŭponĉo poreca.
Ĉiu familiano elsendas sonon akutan,
neaŭdeblan, kaptatan per ricevilo sonora,
por kaŝi ŝaŭmolitojn, en kiuj ili tranoktis.
Ĉiu aparta ejo de ambaŭ domaj etaĝoj
kapablis transformiĝi je vasta ĉambro kuira,
dormejo aŭ ludejo laŭ la bezonoj okazaj.
Oni rimarkis dise sur la pavimo kahelojn
kun formoj triangula, ronda, kvadrata, trapeza,
aŭ iu ajn alia geometria figuro,
farbitajn per koloroj viglaj —jen blue, karmine,
flave aŭ verde—, kiuj ŝajnus nur rara dekoro
al terano, sub kiuj kuŝis plenŝirme la mebloj
aŭ iloj, kiujn gobdoj per ultrasonoj elŝovis
aŭ subplankigis post uzado. Tiele nun ili
ŝvebantajn diskojn kaŝis sub hele bluan ovalon.

Baldaŭ alvenis Inna kun la gepatroj, invite,
sen edza akompano, ĉar ŝi senligi preferis,
kaj ŝi koncipis Buslan per artefara prisemo.
Kutime la parencoj dum solenaĵo bo-festa
kunvenis en ŝabio por kundividi la tagon
kaj ili porelektis tiun de Dunna kaj Emme.
Nun Inna respondecis en specialo prepari

aromajn esencaĵojn por ozonbano vapora.
Ĉiu elektis ilojn por tiu tago necesajn,
dum l' onta bopatrino en flanka ĉambro sidiĝis.
Serpentsimilan tubon ŝi plukis el la pavimo,
ĉe kies fino svarmis kontrolaj klapoj abundaj.
Ŝi manipulis sur ĉi lastaj elverŝi buŝinge
nebulajn aspergerojn parfume plej delikatajn.
Ŝi ŝtopis kaj malfermis dum plenatente ŝi flaris.
La manipulantino trovis miksaĵon agrablan
kaj enkomputiligis la dozon kode ĉifritan.
Sub voko de Sooje alvenis tuj la gepatroj,
l' infano kaj geedzoj. Ili komune nudiĝis.
La ĉambro jam saturis per vaporaĵoj aromaj
de la ozono densa. Ĉiuj humure babilis
kaj laŭdis plensukcesajn sekvojn de l' flaraj agordoj.
Tiam elvenis Emme el ozonbano plezura,
dum Inna, la gepatroj, Noŭde kaj Dunna fervore
deziris bonan ŝancon en la deĵoro kuira,
ĉar tiun ĉi, laŭmore, prizorgos Emme hodiaŭ,
kaj ili plue ĝuis en la parfumo dronante.

Li nun kondiĉis ĉambron kaj el subtera provizo
venigis plurajn varojn por la kunmanĝo matena.
Unue suprenlevis dolĉgustan frukton *inovi*.
Krondenta mekanismo plenaŭtomate selektis
per giro cilindraĵon ŝirmantan freŝa la frukton.
Ĝi estis kondukita longe de l' akso loĝeja
ĝiskuirejen. Antaŭ ol ĝi eksteren aperis,
la ujo gelatena jam submetiĝis al ago
de likva oksigeno solvanta nete la ŝirmon.
Rubaĵoj —silicia oksido, polikloruroj—
estis eliminitaj. La suka frukto topazis
en liaj manoj freŝa, acida, same sapora
kaj aromplena kiel tuj post rikolta deŝiro
el dornarbusto en ampleksaj subgrundaj areoj,
el kiuj venis ĉiuj varoj al hejmo regule

tra pneŭmatikaj duktoj, kiuj subtere kanalis.
Kiel termitoj boras en la profundo tunelojn,
hejmneston konstruinte kvazaŭ monteton apikan,
de kies etaĝmuroj mil koridoroj ekiras
al malproksimaj domoj, ĝis vilaĝetoj aŭ urboj,
subgrundon traminante, kiel laŭ diroj okazas
en Aŭstralia nordo, en regiono Nepala
kaj en Transvala lando, laŭ kiuj ili senĉese
diskuras dum la nokto por blinda rabo detrua,
simile multis duktoj sub kolonio Gobana
de la subteraj zonoj al ĉiu domo fungeca
por tien alvenigi, aerpremate, nutraĵojn
laŭ mendo de l' hejmanoj kaj por sistema provizo.
Emme venigis, poste, el la varejo cilindron
el lumbo *ogiksua*, rampulo ege ŝatata.
Post likva elimino de l' gelatena tavolo
kaj de l' toksinoj, ĝin saŭcis per toniko *vunua*
kaj per kremriĉa lakto de flugilhava mamulo
ojksi. La tuto iris poste tra ronda kamero,
kiun terano nomus forno. Ĉi lasta viandon
varmigis provokante la molekulan agiton
de ĝiaj histoj per transŝanĝo de l' kampo gravita
je sesdek hipercikloj, kiel frekvenco, sekunde.

La manĝo fine pretis. Soraa zorge preparis.
Post milda ekkrepusko, sunglobo hele radiis
inter vindantaj brumoj de matenhelo lazura.
Ronde kunvenis ĉiuj en kuireja salono
mem, kaj per ultrasiblo sian sidlokon apertis,
similan al fosaĵo, ĝuste sub planka nivelo.
Flavan nebulon fajnan nun Dunna verŝe pluvigis
sur la pavimon. Ĝi estis koloida tavolo,
kiu l' pargeton ŝirmis kaj tablotuke ĝi taŭgis.
Antaŭ ekmanĝo ili kelkasekunde silentis,
celante bloki viŝe el menskonscio la zorgojn
pri taskoj aŭ konfliktoj. Kun muskolaro kvieta,

ridetojn reciprokis ekster stentora ridego.
Tubfinojn de manĝujoj ili al buŝo venigis,
el la *jaojoj* —iel al nargileo similaj
inter orientanoj sur la planedo Blugloba,
kvankam varmokondiĉaj, kun memfluado regula—
por preni likvajn manĝojn, kiujn terano rigardus
ekzotaj supoj. Tiuj havis grasriĉe lipidojn,
ankaŭ karbonhidratojn en kvanto alte procenta;
aromaj kaj tonikaj, ili entenis akordan
mezuron, kalkulitan por ĉiu unuopule,
el la faktoroj nepraj al metabola procezo.
Alvenis la momento de la solida nutraĵo.
En hidrosola ujo la manojn ili purigis
por preni kelkajn tranĉojn da mildegusta *ainmo*,
baza nutraĵo gobda, kiel ĉe l' tera popolo
la pano aŭ la frukto de artokarpo tropika
en la Sri-Lanka lando kaj vasta Polinezio.
La sekva manĝo estis la *ogiksua* viando
kun krema *ojksi*-lakto, kiel la edzo pretigis.

Tiam parolis Inna al tablanaro ĉi-vorte:
—Gepatroj, ŝabianoj, ni renkontiĝas okaze
de l' geedziĝa festo nin kunligonta hejmece.
Sed estas mia devo rememorigi, ke ĵuse
Emme kaj mi kunpuŝis pro la teranaj aferoj.
Necesas intertrakti en ĉi momento diskordojn,
eviti la minacojn al harmonia kunvivo,
ke ili ne disronĝu kvazaŭ subfosaj *oruoj*.
Vi ĉiuj ja memoras, ke mi fakule defendis
la certan *agaecon* de la teranoj Ajube.
Sed kiu povus scii pri l' evoluo venonta?
Nur nunan efektivon mi senkonteste prezentis.
Tamen mi volas fari al vi, ho Emme, demandon
rilate la tervivon, por ke sveniĝu la zorgoj
kaj duboj min zonantaj pri la genero futura:
ĝis kiu grado certas interrilatoj amoraj

de vi kaj de Arunni kun indiĝenaj ulinoj?
Ĉu do ekzistas ido de ĉielano kaj ajna
femalo surplaneda? Ĉar senprokraste necesus
preventi la minacon de ebla misevoluo.

Tion demandis Inna, laŭ la akuzo de Roa,
pro faka scivolemo kaj pro sekreta ĵaluzo,
ĉar, adoleskantino, ŝi junan Emmen ekamis,
malgraŭ ke tion al si ŝi ne inklinis agnoski.
Kun fiksa alrigardo, la olivhaŭta parolis:
—Ho Inna, mi respondos al via peto sincere,
ĉar estas ĉi-rilate neniu aĵo kaŝenda.
Mi prirakontos ĉion, kio surtere fariĝis
de la momento ĝusta kiam ekestis esploro.
Jam taŭge vestiĝinte en la konduka vojŝipo,
Arunni kaj mi venis al la tendaro Kenida,
dum ili kampadejis apud la urbo Nineve,
antaŭ la komenciĝo de la militoj alarmaj,
dirante, ke ni estas el fora urbo Jeriĥo
(ĉi nomo ja signifas, en loka lingvo, lunurbo)
kaj tion, ke ni volas ilian vivon alpreni,
ĉar aŭdis pri l' pacamo kaj gastameco favora.
Ili kutimas, certe, iun ajn homon enlasi,
sen ia antaŭjuĝo pro raso, etna deveno,
se oni nur respektas iliajn vivoregulojn
kaj tradiciajn kredojn akceptas kune dividi.
Do, veras, ke Arunni al junulino de Dilmun
jam baldaŭ enamiĝis, brunhaŭta, mame turgora.
Li venis iun nokton al nia tendo malfrue
kaj li sin turnis al mi per ĉi subita demando:
«—Kiel vi juĝus, Emme, virinon teran amori?»
Al kio mi respondis, post eksurprizo, cerbume:
«—La studoj pri l' Bluanoj ne estas plene maturaj,
ĉu temas pri *agaoj* aŭ raciuloj aŭtentaj
kaj ege malsamŝtupas la evolua nivelo,
kvankam la organismoj sendube taŭge similas.

Tial la amorado laŭ mi entute laŭleĝus,
sed plej skrupule zorgu la gravedigon eviti.»
Tamen post du monatoj li kun konsterno konfesis,
ekster la tendarejo, sub olivarbo sidante:
«—Nu, Jebe gravediĝis.» Post paŭzo jene li pluis:
«—Mi ne komprenas kiel. Eble la droga preparo
kiun mi mem enmiksis en la trinkaĵo vespere
sur ŝin ne efikadis pro nekonata reago.»
Al kio, post pripenso, mi konsciante respondis:
«—Arunni, tio estas afero alte danĝera,
kiu neniel kadris en niaj teraj esploroj.
Eble la sola solvo estos transpreni l' infanon
en nian kolonion post periodo mamnutra,
kun taŭga rezonado al suferonta patrino,
por peni lin eduki laŭ nia propra kulturo
kaj sekvi kiel iros la disvolviĝo homeca.
Sed estus kontraŭjure lin lasi kreski sur tero.»
Li diris tuj, kun brilo de l' ronde brunaj okuloj:
«—Eble formiĝos homo kun novaj trajtoj alojaj
el gobdoj kaj teranoj, kun tiuj pleje superaj.
Ho jes, ni lin kunportu. Mi novan homon edukos.»
Ni devis Najen flugi jam post malmulte da tempo,
vokate de l' estraro, ĉar nia tasko finiĝis.
Li argumentis al ŝi, ke ni foriras urĝece,
ĉar aŭdis ke hejmlande ekbrulis kruda milito
kaj dubas pri l' bonfarto de la gepatroj angore.
Ŝi ja ne povas veni, ĉar estus troa danĝero
por ŝi kaj la infano. Post jarduono li rajtis
reŝipi sur la teron, sed je la nova vizito
tendanoj lin informis, ke la fileto sufoke
pereis akcidente pro tukimpliko lulile,
kaj ankaŭ ke l' patrino pro l' novaĵmanko decidis
foriri lin serĉonte en karavano Sirippa.
Malgraŭ klopodoj pluraj, li ne sukcesis iame
retrovi la knabinon, de kio restis Arunni
profunde afliktita, ĉar li ŝin amis envere.

Koncerne min, vi certu, mi faris file graveda
neniun tervirinon, sed mi kun Dunna volonte,
kiel ŝi mem ja scias, per bildigilo kontaktis.
Definitive, kara, vi restu tute trankvila,
ke nun ne plu ekzistas surglobe rasa hibrido.

Jene respondis al li la blondehara Sooje:
—Laŭ tio, miaj duboj verŝajne tute senkaŭzis.
Mi mem ja ne asertas, ke la Bluanoj esence
estas subraciuloj, ĉar ili eble kapablus
venonte evolui al efektiva homiĝo.
Tamen, pri l' supervivo decidu nur la naturo,
kiel la Tribunalo lastasemblee verdiktis
kaj ĉiun malakordon ni apartigu, celante
ke Busla kaj Evue en sia nupto ĝuadu
kompletan harmonion, ĉar niaj sentoj influas
ambaŭ telepatie, kaj ni starigu la ponton
de daŭra amikeco, ĉu post la nepra diluvo
ni rajtos fine loĝi sur Gob-ĝemela planedo
aŭ ni plumigros longe en la stacio Najana
al nekonata mondo tra la malpleno senlima.

Tiel parolis Inna en la ŝabio de Emme
kaj ĉiuj, per kapklino, ŝian deziron aprobis.

Super kamparoj Najaj la suno soris al alto.
Finiĝis jam la paŭzo de postemanĝa ripozo.
Ili dissolvis likve sian vestaĵon uzitan
kaj en apudaj ĉambroj sian dentaron arome
prišprucis, kaj gargaris per antisepsaj acidoj.
Eltiris novan veston, ĵus fasonitan akorde
je la solena tago kaj respektiva metio:
Emme unu kun flavaj rondoj sur fono purpura,
kiel reviziisto pri grafikstudo metala,
kaj Inna unu verdan kun trianguloj oranĝaj,
kiel biontologo pri novaspecaj estuloj.

Al la Instruo-centro ŝvebante ili veturis
per transportilo, kiun ili *goono* nomadis.
Tiu flugaparato, kun dinamika profilo,
funkciis per ksenona kvarfluorida motoro,
kiu neniel bruis aŭ poluadis aeron.
Je unumetra alto borderis l' orografian
reliefon, restante ĉiam je sama nivelo.
Sur Kolonio mankis porveturila ŝoseo,
ĉar komunikaj retoj surfacaj tute forestis
kaj nur subgrunde iris la transportado de varoj.
La kolonipejzaĝo estis respekte flegata
kaj oni sin dediĉis al plibeligo de kampoj:
novajn arbarojn plantis inter rokaroj abruptaj
por havi kelkterene aspekton plie sovaĝan;
lirlajn torentojn kreis ekster akvumaj utiloj
aŭ energiliveraj, por estetike favori
la trajtojn kaj sonoron de sia mondo ĉiela.
Dum laboratorioj fitoteknikaj elekte
kreis novajn speciojn plantajn, kun rave mirindaj
floroj, tiujn sovaĝajn oni racie prizorgis;
kaj same pri la bestoj: la kolektivo protektis
kaj daŭre kontroladis, laŭ plano strikte severa,
speciojn en danĝero de malapero subita.
La gobdoj liberiĝis el la radika tendenco
de alta civilizo: la distanciĝo pograda
el la naturo. Ili sciis alterne dividi
la vivprocezojn inter teknikaj iloj abundaj
en plenkomfortaj hejmoj kaj la antikva naturo,
precipe prezentata per rokoj alte fieraj,
kiujn karesis branĉoj de *naan*-arboj, *obuoj*,
oaŝ-arbedoj, kaj per vulkanoj vome ĵetantaj
kolonojn inkandeskajn el oksigeno-pentano,
sorĉantaj al Najnoktoj spektakle pompan efekton.

* * *

Nun ili, aerleve, al Unavurbo *goonis*
super milravaj kampoj de l' Kolonio ĉiela.
Simile al la ĝeroj, kiuj basene disglitas
tra junkotigoj, algoj, super la fundo travida,
dum fajne mincaj kruroj surfacon tuŝas imune
kaj iam-tiam paŭzas, sub ventobrizo lulate,
sed unu jen refoje sur la spegulo fulmecas;
aŭ kiel papilio buntveste flugas aprile
laŭ valoj moldeklivaj kun rosmarenoj aromaj
serĉante nektargutojn en ĉiu flora kaliko
kaj dum vespero celas sub timiano tranokti,
same leĝeris ili en flavkolora maŝino
ĉeesti solenaĵon de la gepara plenumo,
ĉar post aprobo Naja, interkonsente, hodiaŭ
Evue edziniĝos al Busla, filo de Inna.

Jam ĉeis parencaro. Ĉiuj kunvenis unue
laŭ rondo. Poste ambaŭ, kun dankesprimo, salutis
la ĉirkaŭantojn, siajn manojn surbruste metante.
Nun funkciulo venis, reprezentanto popola
ĉi-kaze, kunportante la terminalan ekipon
de l' Centra Komputilo. Li estis sperta fakulo
biokosmologia. Tiam laŭmore li faris
la lastan prikonsulton al Komputila Cefalo.
Sekve al la geparo solenavorte parolis:
—Filo de Inna, Busla, filin' de Emme, Evue,
la Naja kolektivo vian kunligon aprobas.
Tamen decido fina koncernas sole vin ambaŭ
kaj nur vi respondecus pri geedziĝa fiasko,
sed la informoj estas sendube plej pozitivaj
kun koeficiento de naŭdekoka procento.
Do, mi gratulas vin. Nun ni rajtas jure procedi.

La biokosmologo ŝaltis porteblan ekranon
sur kiu videbliĝis linioj bunte desegnaj,

legonte plurajn pensojn de filozofo renoma
kaj per solena voĉo en la kunveno li diris:
—Jen vortoj de Govuo, la majstro Suje vivinta:
«Vi ja ne trovos pacon en via stato geedza,
se antaŭ ol kurbigi vian tegmenton ovale,
antaŭ ol viŝi puraj la vazojn ŝtale kromitajn
kaj antaŭ la fortondo de l' umbilika fadeno
el milda uterfrukto, vi ne esploris abisme
l' animon de l' parulo. Se tion zorge vi faros,
kalejdoskopos, kiel mirinda flaŭro kaŝiĝas
en arbaregprofundoj de nekonataj ideoj.
Vi vidos, kiel en ĝi kreskas plantaĵoj ekzotaj,
el sekso ne ĝermantaj, kaj ekkoninte pli bone
la diferencojn, vi scios interpreti reagojn.
Kial, virino, viro, vi obstinadu, ke nepre
sur tre malsamaj grundoj burĝonu floroj egalaj?
Klopodu, siatempe, kompreni ame gefilojn
kaj ne insistu muldi nur reprodukton ekzaktan
de vi mem. Ĉu vi do ne vidas, ke ĝermevoluo
brulas en ties internaĵoj? Indulgu tenere
la filan senspertecon kaj ne supozu, ke ili
ol vi mem pli eraras, sed kun respekto riproĉu.
Ho gejunuloj, ne plendu kaj ploradu pasive,
ke viaj generintoj vin ne komprenas idee,
kaj pli inteligentaj vin mem ol ili ne taksu.
En kaŝajn alveolojn de ties psikoj adoltaj
klopodu enpenetri. Ĉu vi ne vidas entute,
ke l' krudaj travivaĵoj neeviteble durigis
ilian sentivecon kaj ke sklerozo lezanta
kadukajn arteriojn, spiritojn trafis egale,
ŝtopante al vivigaj fluoj de l' nova krepusko?
Sed ili ja ne kulpas je tiu truda procezo,
do, ilin ne hontigu, nur forgesante la naskon.
Nenion celu, longe de via vivo sinua,
krom ami kaj respekti kunfratojn monde vivantajn.
Se vi ĝin ne sukcesos, juĝu kompleta fiasko

vian fuĝeman pason tra l’ universo daŭronta,
kie vi mem partiklas, enabismante subonde.»

Tiel Jogoo diris en la kunveno silenta.
Sekve la gejunuloj rigardis unu l’ alian
fikse kaj polmojn metis sur bruston de la parulo.
Ĉi tiu simpla gesto, la kunsaluto kutima,
akiris ĉi-momente ian reeĥon apartan,
ĉar la geedzan ligon ĝi efektive sigelis.

Nun ambaŭ retiriĝis en nuptoĉambron izolan,
prikondiĉitan lume je minimuma nivelo.
La muroj nuanciĝis per milda tono purpura.
Ambaŭ demetis flanke sian tunikon en ombro,
forĵetis en solvujon kaj sekve lume fariĝis.
Nun ili ekkontemplis kun animravo la korpojn
reciproke, sen tuŝo al zonoj erotogenaj.
Neniu el la paro prononcis sonon ielan.
Kion pensadis ambaŭ nenia gesto rivelis,
dum ili, emocie, observis l’ anatomiajn
trajtojn de l’ ĉielano, kiu dumvive kunulos
ĝis fine konvertiĝos je heliumaj atomoj.
Nun Busla rememoris pri tiu tago feliĉa,
kiam li ŝin ekkonis en Unavurbo, ĉeflue
de rivereto Oŭa; kiel susure deklaris
la amon al ŝi kaj pri l’ ceremonio solena,
dum kiu oni festis l’ unuan ciklon ovolan
—ĝuste antaŭviditan per ricevilo loĝeja
super sojlo—, kaj poste pri l’ kunlernado dujara
jen pri kosmologio, la civilizo pratempa
aŭ la tergloba raso, post kio ili decidis
vivi kiel geedzoj kaj subtegmenti komune.

Plurestis en la ĉambro samaj kondiĉoj etosaj
pri lumo, izoliĝo je akustika resono,
vibroj kaj gaspremo, temperatura humido.

Tiam eksimfoniis melodiaro parfuma,
eksperte preparita laŭ ties korpaj odoroj,
por ke la tuto zorge kunharmoniu plezure.
Ambaŭ venigis tiam ŝaŭmlitojn el la pavimo
kaj kunkuŝiĝis tuŝe. Ondoj vibrantaj agorde
malstreĉis ilin ambaŭ, dum ili ĝuis elektajn
flaraĵojn milnuancajn. Tiam komencis amori
per reciprokaj palpoj de la sensoraj organoj
sidantaj sur la fingroj. La epidermo posedis
tre specialan ŝtofon sur fingropintoj iliaj,
similan iugrade al homokula retino.
Pasigi tiajn fingrojn je milimetra dekono
aŭ plie laŭ surfaco glata aŭ sulke rugeca,
humida aŭ senŝvita, nigra aŭ bunte kromata,
liveris akumulon de sensospertoj unikaj
verŝajne nekonataj de la surtera homaro.
Ĉi tiu ama ludo kelkaminute pludaŭris,
dum kiu ties manoj la haŭton tuŝis apenaŭ.
La sekson reciproke ili perbuŝe karesis
kaj fine la amantoj kunplekte arde kopulis.
Sensoro konektita al Komputila Cefalo
registris la momenton de la orgasmo ĉe ambaŭ,
pro l' endokrinaj ŝanĝoj de l' metabolo hormona,
kio laŭleĝe signis kunligon rajte validan.
Ĉiuj familianoj en la najbara salono
ekĝojis eksciinte kaj Naje kune jubilis
pro l' nova nupto.

* * *

Tamen, Roa ne povis forgesi
la morton de l' solfilo, la orebukla Loedu,
kiu edziĝis iam antaŭ sep jaroj egale
kaj mortis je l' komenco de l' esplorado Blugloba,
—ĉar fosto lin traboris kiam lupkave li falis,
irante al vilaĝo de indiĝenoj en Unko—.

Kajute li cerbumis kiel ekstermi la rason
surteran, la generon kiun li funde malamis.
Kiel en ĉielano nestis rankoro tioma?
Li plendis Efiedin, pri l' Kolonio memoris,
kiu perdiĝis dum ŝtormo de ventego korpuskla,
kaj nostalgiis ankaŭ pri l' Imperio pasinta
en Goba, kiun revis sur firma grundo rekrei.
Li dubis nun timante, ĉu ŝance ili kapablos
elsaviĝi. Ĉar kiam la Kena gento disiris
apud Babel —plej multaj supren al urbo Nineve,
ceteraj sunsubiren—, li miskalkule supozis,
ke la tribanoj restaj pri ŝipkonstruo rezignos.
Tamen, li ĵus eksciis, ke jen alvenis Ururbon
kun tiu ĉi intenco, la Dilmunidoj irintaj
kun Utnoa. Li turnis en propra menso ĉi vortojn:
—Ĉu mi eltenos tion, ke nin hontigu subraso
kaj fakte ne potencos ilin ekstermi forviŝe?
Ĉu niaj antaŭuloj ne eliminis estaĵojn
provtube elkovitajn, ĉar tiuj strange fimonstris?
Ankaŭ je l' dua tempo, planeda stabo decidis
sur satelito Bajgo kirurge faski krimulojn
plenkreskajn kaj infanojn denaske mense labilajn,
fuŝe evoluontajn, kiel demonstris Oruaŭ,
pro malintegriĝado de la kriptona sistemo.
Ĉu antaŭ li mi estas kompetentulo subranga?
Do kio min ŝancelas, kial la koro hezitas?
Ĉu mi ne pruvis klare la homan misan esencon,
ke ties malapero al tuta kosmo favorus?
Kial mi plue dubas? Mi senprokraste jam agu.

De l' Naja kolonio per la oavo li flugis
al Tero fulmavoje, tra l' atmosfero lazura.
Kiel bekkurba falko plonĝas el nuboj avide
sur ŝveban kolombidon, kiu zefire ripozas,
tiel Numuo sinkis al Ŝinarlando ĉemaren.
Li ĉirkaŭflugis ronde super la kampoj Ururbaj

kaj baldaŭ senmovigis la kosmoŝipon en alto,
kiun, ionizitan, en densa nubo li kaŝis
por sondi, nevidate, pri la Dilmuna popolo.

Tiuj alvenis ĵuse al Ur, blankmura ĉefurbo.
Serĉinte ebenaĵon ĉe la klaronda Purattu,
starigis kampadejon apud arbaro gofera
por ligna ĉarpentado. Ili el tendoj eliris
kiam alvenis Roa kaj grizanube kaŝiĝis.
Junuloj, maljunuloj, virinoj kun la infanoj,
paŝis al renkontiĝo. Sur vangoj roze purpuris
la suno frumatena. Glimbrilis ĉies okuloj
per la espero daŭra kaj sopirata reveno.
Samkiel elefantoj en luna nokto majeste
vadas el ŝlima lago, en silentego profunda
de l' ĉirkaŭanta silvo, dum ĉiuj bestoj aliaj
—kajmanoj, rinoceroj per pinta korno celantaj,
boaoj trunke glitaj, blondaj leonoj akrungaj—,
sin maskas en proksimo kaj inter frondoj atendas,
ke tiuj finu trinki; nur poste ili kuraĝos
aliri lagobordon ĝis kota akvo tumulta,
kiun la eburuloj laŭplaĉe kirle removis,
blovante sian rostron kaj kuntrenante lotusojn,
tiel, ĉe l' Dilmunidoj, aperis ĝojo serena
post daŭraj malfaciloj kaj nefinebla doloro,
dum ili kolektiĝis meze de l' nigra tendaro.
Nun Uttu ekparolis al la popolo ĉi-vorte:
—Homoj el Dilmun, jen ni staras proksime de l' urbo,
kien ni celis veni por ĉarpentado de ŝipo.
Kuraĝe ni laboru. Ni iru haki la arbojn
per mano senŝancela, rememorante pri niaj
antikvaj tradicioj, pri la insulo fekunda.
Tie feliĉo regis, fontoj milflue sonoris,
herbejoj verdis freŝe kaj sovaĝbestoj amikis,
leonoj ne atakis ŝafojn, serpento ne mordis.
Ĝia klimato mildas, vizaĝon brizo karesas.

Mielon tie donas plej malavare l' abeloj,
per gustumindaj fruktoj ĉiu sezono regalas,
ĉar multaj disburĝonas sur montoj pluve humidaj.
Tie regados paco, ne estos murdaj agresoj
de iuj malamikoj aŭ de soldatoj en armoj.
Semejoj, arboj, fruktoj, ŝafaroj, ĉio komunos.
Aferojn plej bezonajn ĉiu propraĵe posedos,
sed tiuj kolektivaj kundividiĝos egale.
Armiloj ne necesos kontraŭ alia defendi
apartenaĵojn, hejmon, ĉar kolektiĝo popola
prideterminos juste, mankon neniu travivos.
Remparoj superfluos. Jen alrigardu la muron
de Ur kaj rememoru pri la murego de Babel:
por kio ili taŭgas? Nur por divido de homoj.
Soldatoj sentinelas kaj malpermesas eniron,
dum eĉ la enloĝantoj ne rajtas pasi libere.
Kapablaj sciencistoj klerecon daŭre dediĉas
elpensi mortigilojn novajn plioble detruajn.
Multaj fordonas vivon en urbarmeo dungite,
dum plej malriĉaj devas subteni la koston
de la militkampanjoj. Postulas oni tirane,
granduloj subpremadas elhavi trude rimedojn
fabriki batalilojn kaj ĉirkaŭlevi rokmurojn
ree disdetruotajn en kolizio morgaŭa.
Kaj kio do sekviĝas el interhoma milito,
krom nur forbruloj, murdoj, multnombraj perdoj amaraj?
Do kian sencon havas sanga buĉado de homoj,
ĉu oni ion solvas? Ĉu venĝosento ne kreskas
en brusto de l' venkitoj kiuj terure suferis?
Kaj tiam jen denove rekomenciĝas atakoj
laŭ nefinebla ĉeno, kiun nenio haltigos.
Ĉu koro senrimorsas, ĉu povas iu feliĉi
pereiginte homon, kiu fratecan animon
havas: ĉu ĝi ne estas sindetruado freneza?
Kondukas nur al tio muroj, milito kaj armoj.
La vivon ni respektu de ĉiuj tere vivantaj,

ĉar ĉiuj kun ni havas unu komunan animon.
Kaj ankaŭ ĉe la bestoj decas respekti la vivon,
ĉar estas ĝi kreita de la diaĵoj eternaj.
Tial, la ĉaspraktiko al homa koro damaĝas:
se iu sin fordonas al mortigado pro ĝuo,
senbridan agresemon en la interno kovadas
kaj baldaŭ kutimiĝas indiferente mortigi.
Sed nepras, ke komplete senviolentu la koro,
aliel ni ne rajtos al la insulo perdita.
Eĉ se ni vojeraris jam permesinte la ĉason
por propra vivtenado, al tradicio revenu.
Ni spertis dian punon per la popola divido.
De nun en nia tribo regu respekto je ĉiuj
bestoj sur tuta mondo, neniu ĉasu plezure
aŭ por vivteno, kiel niaj praleĝoj avertis.
Viglu, ho Dilmunidoj, plenu en brusto kuraĝo.
Ni iru jam labori por altenlevi la ŝipon,
kiu nin portos glate al la insulo de bonoj.
Ni ĝin ĉarpentos, laŭinstrue, el ligno gofera
kun jenaj dimensioj: de fin' al fino ĝi longu
naŭdek ulnojn kaj laŭ la larĝo la ŝipo mezuru
dek du ulnojn kaj laŭ la alto ĝi havu sep ulnojn.
Ekstere kaj interne la trabojn ŝmire ni gudros,
gluante plej kompakte kaj distribuos etaĝojn
kaj aperturon supran. Sur dekstra flanko ni ĉizos
altan moveblan pordon por envenigi la bestojn,
niajn brutarojn, kiuj akompanante vojaĝos.
Per plej necesaj nutroj kaj per havaĵoj utilaj
provizos ĝian kelon. Ni devos poste felkorbojn
kunkudri: marrivero nin alkondukos apude
de la insulo, tiam ni perboate remilos
ĝis la marbordaj strandoj kaj ĝis la sablo havena.
Ĝoju, ho Dilmun, lando de niaj patroj iamaj,
ĉar la infanoj viaj al hejmo fine revenos.
Feliĉu jam la idoj de la Henoha popolo,
ĉar kvite plenumiĝis nia ekzila migrado.

Niajn dezirojn korajn la altaj dioj ebligu
por bono de l' tribanoj kaj de l' genero venonta.
Ni eklaboru firme laŭ niaj grupoj akordaj
sub la gvidanta estro kaj enpenetru la silvon.

Li diris. L' aŭskultantoj ĉi vortojn laŭdis aprobe
kaj ĉiuj sin jam urĝis al respektiva laboro.
Li mem kaj Laŝmu gvidis per elektado de arboj.
Kelkaj virinoj restis kun infanetoj ekrampaj
ĉirkaŭ ŝaffelaj tendoj, ironte kune kolekti
fruktojn por taga manĝo kaj argilvaze prepari.

* * *

En la palaco luksa de l' granda urbo luntempla,
ties reĝino Ŝabda subulojn propre komandis
por iri al ĉaspelo ĉe l' proksimaĵo rivera
kun sia sekvantaro, kiel ŝi ofte kutimis.
Ŝi amis ĉasi ursojn, aprojn sed pleje la tigrojn
kaj en mateno frua ekspedicion aranĝis.
Ŝin devis akompani multaj nobeloj elektaj
kaj inter ili Ulmi, ĉefarmeestro de l' urbo.
Ĉaroj polure brilis, snufe ĉevaloj ekardis,
hundbojoj kaj trumpetoj tra la palaco sonoris
dum vicoj jam ekmarŝis sub murmurado de kornoj.
Laŭlonge de l' rivero ili polvnube vojiris
al kruta sovaĝejo. Ĉirkaŭ la mezo matena,
la ĉasantaro venis proksimen de la nomadaj
tendoj, dum la tribanoj trunkojn per kojno faligis.

Dum ambaŭ, siaflanke, traserĉis arbregionon,
jen Laŝmu kaj Utnoa obtuzan bruon ekaŭdis,
kornoblovadon, henojn, hundojn kolere bojemajn.
Baldaŭ decidis iri laŭ la direkto de kie
tumulto laŭtas, kun celo informiĝi, ĉu estas
danĝero aŭ minaco por la tendara popolo.

Inter goferoj altaj al maldensejo piedis.
Tra l' frondoj nun rimarkis ĉevalojn ŝvite kurantajn,
ĉarojn de altranguloj, reĝinon ore kovritan
per skvamkiraso brila kaj kun pafarko ĉemane.
Nobeloj lancojn kaptis kaj svingis pugne ĵetonte
kontraŭ ĉasbestoj, kiujn helpantoj hunde kurigis.
Jam pluraj cervoj, apro, surtere kuŝis apude,
kaj tiam ĝuste tigron oni al rondo trapelis.
Sklavoj alportis tiun en ligna kaĝo pli frue
sen scio de l' reĝino, por plezurigi la ĉason.
Jam la reĝino tenis sian pafarkon avidan,
celante al la tigro, ke ĝi konvene situu.
La tigro roris brule, fiere ronde rigardis.
Tiam ekkaptis Laŝmu bovledan ŝtonoĵetilon,
kiun li portis zone, surmetis pecon ebenan,
kiel li knabe faris, ĝin svingis alte plurfoje
kaj pafis rekte kontraŭ la kapprotekto ĉevala
de l' ĉaro Urreĝina. La ŝtono siblis amare
kaj trafis sian celon post nur momento, sekunde.
Ekbaŭmis la ĉevalo, misflugis sago pafita,
ĉar ŝi ekprovis kapti la ĉarantaŭan apogon,
kaj ĝi hazarde vundis sur femurkarno la tigron,
kiu saltante fuĝis kaj malaperis en ombroj.
Samtempe teruriĝis la ĉevalparo de Ulmi,
tiel ke ambaŭ henis kaj eksterbride galopis.
La kortegano falis el sia ĉaro sunora,
treniĝis sur herbejo, tra rojo kote sin rulis.
Liaj servistoj hastis plenzorge helpi la moŝton.
Montriĝis ke la vundoj estas negrave suprajaj
kaj la kontuzoj pluraj, ŝajne, transire doloraj.
La reĝaj gvardianoj, jam kompreninte ke temis
pri baŭmo provokita, serĉis esplore la zonon
kaj trovis du starantojn en la arbaro ĉerande,
kiuj ne celis fuĝi kaj sin defendi ne provis.
Oni kondukis ilin al la reĝino de l' urbo
kaj nun demandis Ulmi kun akuzema parolo:

—Kiuj vi estas, sklavoj, el kiu lando vi venis?
Kiel dum ĉaso reĝa vi interrompi kuraĝis?
Kliniĝu antaŭ Ŝabda, la Urreĝino potenca.

Tiam respondis Uttu kun senperturba mieno:
—Ho Ŝabda, Urreĝino, la fameglora Ŝinare,
mi estas Uttu Noa, el la popolo de Dilmun
kaj jen mia kunfrato Laŝmu. Ni venis amike
kaj niaj tendoj staras apud Puratta rivero.
Ni iris laŭ arbaro serĉe de trunko hakebla
kaj vidis vin celanta kontraŭ la tigro pafarke.
Laŭ niaj tradicioj ni devas ŝirmi la bestojn
kaj helpi de mortigo, ĉar ili saman animon
havas kaj partoprenas kun ni. Laŭ devo ni faris.

Tiam la kortegano Ulmi kolere replikis:
—Sed kial vi troviĝas en la arbaroj apudaj
al Ur kaj en la regnoj de la reĝina majesto?
Kiele vi aŭdacis je la kortega ĉasado
interrompi laŭ viaj moroj kaj rajton arogas?
Vi ja fariĝis kulpaj je transgresio de leĝoj.
Soldatoj, ilin kaptu kaj en prizonon arestu.

Aŭdinte tiujn vortojn, nun la reĝino parolis:
—Retenu vin, ho Ulmi, kaj nur momenton atendu!
Demandon vi ĵus faris. Ili respondu precize.

Ŝi turnis sin al Noa kun plej atenta rigardo.
Ĉar ŝin impresis vigle tiu konduto kuraĝa
kaj la sentima voĉo, la belaj trajtoj afablaj
de l' mieno, fortikaj ŝultroj, hardita vizaĝo,
la bukle nigra barbo kaj la smeraldaj okuloj.
Jene parolis Ŝabda al la nomado ĉi-vorte:
—Kial vi levis tendojn en la arbaroj apudaj
al Ur kaj en la regnoj de nia urbo potenca?
Kion vi planas fari, el kiu lando vi venis?

Baldaŭ respondis Uttu al la orbrila ĉi-dire:
—Ho moŝta Urreĝino, nia popolo nomada
nomiĝas gento Kena, laŭ antaŭulo tre glora,
kaj ĝi konatas ankaŭ kiel la tribo de Dilmun,
la nomo de insulo de la gepatroj antikvaj.
Ni estis elpelitaj de nia dio Plejalta
pro sangaj kvereladoj, ĉar homoj murdis aliajn
kaj estis nur detruoj, bruligoj, raboj, ekstermoj.
Je l' fino niaj pastroj al ni rivele proklamis
ĉi punon: ekzilmigron el hejma lando. Sed ĵuse,
je la Nisana luno, ordonis dia mesaĝo,
ke ni starigu ŝipon por la popola reveno.
Kun tiu ĉi intenco ni en arbaro tendumas.
Kiam sezonos pluvoj kaj ŝvelos fluo rivera,
la ĉarpentaĵo flosos kaj sur ondaro vojaĝos,
ĉar estas marirejo, kiun la dioj indikis,
portanta al insulo Dilmun, la mildeklimata.
Konkeron ni ne planas aŭ ies rajton uzurpi.
La vivon ni respektas de ĉiuj homoj egale
kaj ankaŭ de la bestoj, kiuj arbare nutriĝas.
Ni fuĝis de militoj, kiuj je l' supro Puratta
brulis inter tribaro kaj la ĉefurbo Nineve,
ĉar leĝoj malpermesas al nia gento batali
aŭ partopreni luktojn kaj ni malamas opreson.
Ni estis elpelitaj el la insulo puniĝe
pro malrespekto ĝuste al tiu sankta dekreto.
Sed tamen je la sepa generacio popola,
kiu la nuna estas, al nia lando ni rajtas
reveni. Ni elmigris al sunsubiro, ĉe maron,
ĉar aŭdis ke Ururbo ŝatas gastami volonte.
Ni dankas pro l' bonvolo, kiun vi montris allase.

La moŝto tiujn vortojn per komplimento salutis.
Inter la kortegano Ulmi kaj Ŝabda reĝino
persistis rivaleco ekde l' ascendo ĉetronen,

ĉar Gupa, Ŝabda-edzo, imperiinta pli frue,
nur vorte, sur mortlito, pri l' posta rego deklaris,
kaj tiun li transdonis al la edzino fidela.
Sed Ulmi argumentis, ke ino strikte ne rajtas,
laŭ aŭtoritatuloj kaj laŭ kutimo de l' urbo,
la regnon suvereni kaj ke abdiki ŝi devas
je sia filo Ŝumuk. Sekve, li range fariĝus
regento potenchava antaŭ plenkresko reĝida.

Tial ŝi ekplezuris pro l' humiligo de Ulmi,
ke l' brava palacano sur grundo kote treniĝis,
vide de la soldatoj kaj de l' kortego cetera.
Lia gladita barbo estis herbece makula
kaj la brokaĵoj luksaj nun disŝirite ĉifonis.
Li estis, laŭ la pozo, envere bildo ridiga.
Al la reĝino plaĉis la ĝentilplena parolo
de Uttu kaj ŝi diris kun simpatio, favore:
—Nomado, kiu ajn vi estas, la vortoj edifaj,
kiujn vi ĵus respondis, forviŝas plene la mankon
kaj mi pardonas tute pro l' interrompo fiera.
Mi garantias al vi pri la ĉarpento planata.
Vi rajtas plu tendumi sur niaj teroj amike
ĝis venos vintropluvoj. Dume, ĉe via laboro
neniu homo ĝenos, ĉar via celo meritas
reĝan protekton. Mi mem la entreprenon aprobas.
Restu sekuraj, vian taskon sincere mi laŭdas.
La nomon vi memoru de la reĝino Ururba,
kiel protektantino de la popolo de Dilmun.
Memoru ankaŭ tiun de l' generalo falinta,
kiu nomiĝas Ulmi, ĉar mi lin mem komisias
sekvigi la ordonon kaj ĝin laŭcele plenumi.
Vi senobstrukce rajtos en l' urbon veni libere,
al temploj aŭ bazaroj, ĝis la sezono de pluvoj.
Sed ne plu enmiksiĝu en la kortega ĉasado,
ĉar se vi foje faros, vin trafos puno merita.

La generalo Ulmi eksentis hontan aflikton
ĉar la reĝina moŝto decidis preteratenti
lian komandon ĵusan kaj ilin kvite pardonis,
kaj plie eĉ pro tio, ke ŝi instruis aparte
protekti la tribanojn kaj al li mem komisiis.

Je la reĝinordono la ĉasantaro rerajdis.
Surgrimpis ankaŭ Ulmi sur sian ĉaron orecan,
helpate de l' servistoj, dum lia menso plu volvis
angore nigrajn pensojn, returne kirlis amarajn,
kaj kun konfuza koro li ĵuris morte provenĝi.

Kvara kanto

Unu rondiron plenan la luno vele navigis
kaj iompostiome la ĉarpentado progresis.
La ŝipo profiliĝis kaj ripoj kornis aeren
dum ili laboradis senĉese, fide, tenace.
Kiel formikoj nigraj sub varma suno somera
pezajn hordeajn grajnojn al sia nesto trenadas,
neniom ripozante ĝis sunsubira krepusko
kaj je l' aŭroro nova al longa tasko reiras,
ĝis fine human hejmon plugilo sulke detruas,
de viro, kiu ŝvitas super kamparoj ebenaj,
tiel klopodis silve la tribanaro de Dilmun
kun daŭra persistemo kaj kun obstina kuraĝo.

Roa malsuprenŝvebis per sia disko bluringa
kaj haltis nun zenite de l' kampadejo de Noa
kaj de l' goferaj traboj. Sur lensotablo li vidis,

ke l’ Dilmunida ŝipo elkreskas vere minace:
ĝi pretus por la tago de l’ kataklismo diluva.
Grandan ĉagrenon ŝiran en sia koro li sentis
kaj li al si mem diris en la interno ĵaluze:
—Ĉu nia gento devos en plendanĝera vakuo
plumigri al stelmondo, kie planedo hazardus,
per velka kolonio jam nekapabla rezisti?
Sendube ĝi splitiĝos en universo diskreve,
samkiel Efiedi sub ŝtorma vento korpuskla.
Ĉu hieraŭaj spertoj ne lecionos utile
kaj ni ne elprofitos per la instruo de plagoj?
Jen antaŭ ni tuŝeblas la priserĉata planedo,
kiu el drono savus nian popolon elmigran
kaj kie ni sukcesus nian potencon iaman
senlime disvastigi kaj al alteco reporti.

Tuj sekve li decidis, ke li vizitos Arunnin,
spertulon pri l’ teraĵoj kaj kamaradan amikon.
Li flugis fulmrapide per la oavo platena
kaj sur ĉielo restis postsigne blanka linio,
kiun la homoj pensus de ia stelo migranta.

Borinte interspacon, li laŭ la flanko baborda
en la stacion venis, kie hangaro situis.
Lasinte sian ŝipon, li al surfaco sin levis
en premkontrola lifto. Tiam per flava goono
al hejmo de Arunni tertanĝe rekte veturis.
Li trovis lin spektanta ĉe l’ subtegmenta kupolo
antikvajn memorbildojn de sia vivo Ŝinare.
Post kunsalutaj vortoj, la buklenigra raportis:
—Arunni, kamarado, jen la nomada popolo
sukcesis, malgraŭ baroj, komenci levi la ŝipon,
malgraŭ disdividiĝo kaj suprenmigro de Tubal,
foresto de forĝistoj kaj ĉarpentistoj elektaj.
Ni certe jam supozis, ke ili tute rezignos,
ĉar ili tro malmultas kaj mankas helpo de l’ urboj,

kaj ne kapablos lerti por prihakado de arboj.
Sed inter ili vicas unu nomado renoma,
Laŝmu, kiu Babele eklernis ligne metii
kaj gvidas ĉiujn taskojn kun efektiva rezulto.
Ni kredis, ke Soraa per sia plano fiaskis,
sed nun la entrepreno estas danĝera denove.
Ĉu la popolo Goba en vasta kosmo vanuu
senspure kaj neniu eĉ pri l' ekzisto memoru?
Ĉu nur mutaciuloj, pseŭda homaro subrasa,
postvivu detruonte kaj anstataŭu l' emian?
Ni agu jam rapide por ruinigi la celojn
de Emme, perfidmensa, kaj de la tribo nomada.

—Do, kion vi konsilas? —demandis tiam Arunni.
Kaj nun respondis Roa post mallongdaŭra medito:
—Mi mem superrigardis dum tiu lasta sezono
iliajn movojn: Kenidoj kampadejas apude
de Ur, blankmura urbo, ĉe profundakva rivero.
Proponon mi sugestas: ĉar ĵus Utnoa pro ĉaso
de tigro ekkonfliktis kun la reĝino ĉi-regna.

Sekve Numuo Roa plene informis Arunnin
pri la situacio per holovida raporto,
ĉar ĉion skrupuleme en kristalkubo registris.
Li ja kapablis vidi el sia ŝipo tralense
per spionantaj sferoj, je kelkcent metroj agantaj
super individuoj en proksimeca radio.

Numuo plue diris al la kunulo ĉi-vorte:
—Vi konas ties lingvojn kaj pri l' kutimoj apartaj
de l' Dilmunida gento, ankaŭ de l' urbo ĉemara.
Instigu la reĝinon kontraŭ Kenida popolo:
tiele ni disbatos la planojn spite minacajn.

Arunni nun respondis al la Najana gravulo:
—Sed kiel ni konvinkus la Ur-reĝinon al ago?

Tamen mi rememoras, ke en la temploj Ururbaj
troviĝas profetino kiun amasoj elaŭdas
ĉar ŝiaj orakoloj estas taksataj aŭtentaj.
Ni povus mensinflui, ke ŝi malbonon aŭguru,
se oni ne punbatos la Kenan tribon eksterme.
Baldaŭ la tuta urbo kaj gravularo palaca
kredos je l' profetaĵoj, pro aŭspicio timiĝos.
Ŝabda ekhavos kaŭzon por senindulga forpelo
kaj ili ne sukcesos konstrui fine la ŝipon.

Tiam ekspiris Numu kaj sincerkore bedaŭris:
—Ve, kia domaĝo, se fulmradie nur eblus
forfandi la nomadojn kaj ilin tute nuligi!
Sed plenumendas strikte l' Ajuba leĝo rigora,
kontraŭe ni prikulpus ekzilkondamnon eternan
aŭ humiligon rangan en komunuma civito.
Ne licas interveni rekte, sed sole fortune.
Tamen ni tiel agos, ĉar la popolo ĉiela
laŭrajte determinis per elektitoj Oaraj.

Li diris. Tuj Arunni per la goono veturis
al vasta Najhaveno kaj sian ŝipon aranĝis.
Li flugis de l' stacio al tera globo plenumi
komandojn de Numuo. Kiel la fulmo borilas
nubegojn plumbe mornajn, tiel Arunni traarkis
distancon inter Naje kaj la planedo bluluma.
Li sekve direktiĝis al blondhordea Ŝinaro,
super altmuran urbon, ĉe mildeflua rivero.

Kiam la suno sinkis kaj ĉiuj vojoj enombris,
li subenŝvebis ŝipe sur neloĝatan ebenon,
fariĝis nevidebla kaj en la domon eniris
de l' profetino Filge. Li ŝin ekkonis antaŭe
dum l' esplorado tera sub ĉefkomando de Emme.
Li nun tramuris, dank' al transmutacio de ĉeloj,
en ombran dormohalon apud Sanktejo de Ninna.

Senbrue proksimiĝis al tabullito de Filge,
kiu sulkfrunte dormis, kun dissemita hararo.
Arunni tuje flustris al subaŭdantaj oreloj:
—Ho unkta profetino de l' sankta Templo de Ninna,
aŭskultu mian vorton kaj antaŭdiron aŭguran:
damnaj malbonoj falos sur la grandurbon elektan
se vi ne elpuriĝos de kulpa sakrilegio.
Proksime de l' rivero tendumas tribo nomada,
kiu jam plurajn lunojn en la arbaro rezidas.
Iliaj tradicioj kontraŭ la kredo de Ninna
stariĝas. Nepras ilin forpeli tuj senindulge.
Kelkaj blasfemis dum lastaj solenaĵoj aroge
kaj pacajn popolanojn ribele provis instigi,
konvinki kredemulojn pri supozataj eraroj,
pri malpieco buĉi al la gedioj oferojn.
Diru al la reĝino de Ur kaj jenon anoncu:
«—Ĉu iel vi forgesis pri la militaj agresoj
de l' triboj Elamidaj kontraŭ la urbo heroa?
Gravaj perturboj novos pro tiu gento profana,
se vi ne forbalaos la kondamnindan atencon.
Ĉu vi allasos ilin kaj antaŭmure toleros?
Ili embuske kaŭras, kiel leono kaŝiĝas,
la templon kaj la urbon per dia puno minacas.»

Arunni subinfluis per povoj telepatiaj
en Filge, mensprofunde, al sugestio similaj,
celante tiujn vortojn senviŝe stampe gravuri.
Fingrojn per onda movo li sur tempio pasigis,
kaj tanĝis blondajn harojn de l' dormantino piema.
Li poste, nevidate, ĝis sia ŝipo piedis,
en kiun supreniris tra lumofasko cilindra.
Samkiel briza vento post la vespera krepusko
blovanta senpercepte, al kolonio reflugis
kaj li kaŝiĝis nokte en la ĉielon opakan.

* * *

Kiam aŭroro milda rozfingre hele salutis,
la profetino Filge el inkubsonĝo vekiĝis.
Ŝi sentis ŝvitan frunton, sur mola nuko doloron.
Vortojn de iu dio ŝi kun konfuzo memoris
kaj baldaŭ iris preĝi al la Sanktejo de Ninna.
Laŭlonge de l' mateno ŝin skuis febroj agitaj.
Poste, senpacience, kun brusto flame brulanta,
ŝi kuris al palaco. Antaŭ reĝina kortego,
dum festenado luksa kun invititoj el Uŝer
—ĉar Ŝabda intertraktis kun ili nuptaliancon
de sia filo Ŝumuk al la princino najbara—,
ŝi senprezente venis. La tablanaro fariĝis
silenta. Ŝi nun diris per defiema parolo:
—Reĝino de la urbo kaj korteganoj elitaj,
aŭskultu mian vorton kaj profetaĵon atentu:
dumnokte ĉielano al mi parolis averte.
Grandaj malbonoj falos sur Ur, fatale, kaj ankaŭ
sur vin, ho Ŝabda, se vi ne pelos, arme forigos
hordon de tendaranoj, kiujn vi kulpe protektas.
Ili por la grandurbo fariĝis haka minaco.
Ĉu vi forgesis iel pri l' katastrofaj agresoj
de l' gento Elamida kontraŭ la urbo ĉemara?
Ĉu vi allasos ilin por ruinigo komuna?
Ili predeme kaŭras, embuske gvatas avide.
Kontraŭ la Ur-diino surplace ili blasfemas,
malhelpas ritan ĉason kaj al si rajton arogas,
ŝutkovras faligejojn, ĉasretojn senutiligas
kaj niaj sanktaj pastroj ne povas plue toleri,
ĉar la diino Ninna furioziĝis irite.
Ili predikas pacon kaj pri respekto je bestoj
kaj same kontraŭstrebas je l' oferbuĉo monata
de sklavo dum propeka ceremonio novluna,
sed ili per ĉi ruzoj celas subfosi la fidon
de homoj kor-naivaj kaj disdividi popolon.
Se spite vi ignoros, montriĝos puno diina,

sekvos malsatoj, pestoj kaj la invado de triboj,
grenoj magriĝos kampe antaŭ somera rikolto
kaj Ur ne staros plue urbo radie floranta,
sekura kaj potenca sur vasta lando de Ŝinar.

Tiam respondis Ŝabda kun furioza vizaĝo:
—Ho profetino Filge, aŭguristino venena.
Vi ĉiam katastrofojn, pestojn, detruon aŭguras.
Tamen sub viaj vortoj oni kapablas ellegi
proprajn sekretajn celojn, pri konspirado de pastroj,
ĉar ili ne akceptis, ke regnon estru virino.
Ĉu do mi submetiĝu? Ĉu mi ne tenu la ĵurojn?
Vi havas larĝan kampon por viaj ĉasoj oferaj
kaj tiuj Dilmunidoj nur celas pace reveni
al sia hejminsulo post ĉarpentado de ŝipo.
Al ili mi certigis, ĝis la sezono de pluvoj,
senĝenan laboradon apud rivero Purattu
kaj rajton veni urben por la bazaraj aĉetoj.
Se ili diskonigas aŭ sian penson anoncas
pri bestoj aŭ pri sklavoj, kondutas ili libere
en urbo plenlibera kaj eksterleĝe ne iras.
Se la pastraro plendas, celante povon uzurpi,
mi scios jam subpremi ties ribelan oponon,
ĉar sanktoleos novajn kaj mem ĉefpastre dekretos,
kun rango de viculo de l' dioj nube sidantaj.
Vi havas la respondon. Iru el mia rigardo!

Filge indignis gale kaj flamokule parolis:
—La dioj vin kondamnos. La granda Ninna repunos.

La profetino kuris al sia ĉambro ĉetempla,
dum la bankedo daŭris per spritaj diroj amuzaj.
Sed ŝiaj vortoj brulstampiĝis en menso de Ulmi.
Li gardis en memoro, ĉar li intencis akuze
kulpigi la tendanojn por venĝofaro venonta.

* * *

Dum tiuj okazaĵoj, ĉe l' kampadejo de Dilmun
progresis la laboroj, ŝipripoj korne leviĝis.
Subaj tabuloj staris jam kunfiksitaj akorde.
Altan serpentan buston ĉizadis Laŝmu ĉeprue,
kiel simbolon pian de la insulo de bonoj,
ĉar tiam rombekapaj kunvivis pace kun ili
kaj ŝirmis samdomanojn de englitanta ronĝulo.

Forpasis nova luno kaj la konstruo pludaŭris.
Sed je la naŭa tago de la monato de Tiŝri,
matene antaŭ iro por ĉiutaga laboro,
dum ili kolektiĝis laŭ rondo meze de tendoj,
jen homfiguro kuris el la arbaro rapide.
Li baldaŭ prezentiĝis kaj en kunveno parolis:
—Tribanoj, Dilmunidoj, mi venas porti novaĵon
urĝan. Mi ĵus eskapis el la grandurbo muralta
kaj mia nomo estas Tudar, soldato reĝina.
Mi estas forkurinto kaj petas vian azilon.

Ĉiuj stuporis pri l' stranga alveninto de l' urbo,
kiu anhele spiras pro senbloviga kurado.
Li portis ŝafofelon sur multestria tuniko,
sandalojn tibiŝnurajn kaj sur la brusto rimenon,
de kiu pendas glavo kun juvelŝtona tenilo.
Tiam Utnoa jene al la fremdulo parolis:
—Protekton ni certigas. Vi ne plu timu, kvietu,
ho Urloĝanto Tudar, kaj pri l' okazo rakontu.

Li miris pri la tendoj, brutaroj stange baritaj,
plej multe pri l' ŝipego kaj la serpento ĉeprua.
La nigrehaŭta spiras kaj vorton jene reprenas:
—Vi estas en danĝero kaj persekuto minacas.
Plu restas nur tri tagoj, ĉar generalo de l' urbo
promesis sangan venĝon kaj tiun certe plenumos

kiam limdato venos post funebrado deviga,
ĉar mankas nur tri tagoj de la solena prokrasto,
dum kiu ja ne licas iun ataki perarme.

Ĉiuj interokulis kaj surprizite dubemis.
Tiam la Ur-soldato ĉe la rimarko daŭrigas:
—Sed mi rakontos ĉion kaj ĝin laŭorde prezentos.
Vi estas pacaj homoj kaj je protekto vi ĵuris.
Mi kulpas je perfido ĉar mi forkuris eviti
la punon plenumendan pro malobeo je dogmoj.
Se oni min ekkaptus, baldaŭ dispece dividus,
disŝirus mian korpon kaj mi ne rajtus atendi
la transan vivon. Gardu, mi petas, mian animon.
De vi mi almozulas, ke se mi mortos okaze,
kuŝigu mian korpon sub grundon dense kovrantan,
por ke vulturoj aŭ rabbestoj diskarne ne ŝiru
la membrojn kie loĝis mia spirito sufera.
Laŭ niaj sanktaj kredoj, mi ne sukcesus en ombroj
eternan ripozadon, al transa vivo ŝipiri,
sed en turmentoj ŝtormaj mi sur ĉi tero vagadus,
kie tromultas ĝemoj kaj superrandas afliktoj.

Tiam respondis Laŝmu al rifuĝinto ĉi-vorte:
—Sendube ni ja farus, ho Urloĝanto, honeste.
Sed kiun malobeon en la grandurbo vi kulpis?
Kaj vi pri persekuto aŭ pri danĝero parolis.
Ni certe vin protektos, nun vi raportu sentime.

Jene sin turnas Tudar al aŭdantaro popola,
kiu atente staras kaj ĉirkaŭrondas amase:
—Ho vi, la ekzilitoj, sur ĉiu vojo migrantaj,
mi dankas la gastamon. Vin benu daŭre la dioj.
Mi prirakontos ĉion el koncernantaj aferoj,
por ke vi povu vidi, ke mia vorto fidindas.
Jen do antaŭ sep tagoj la Ur-reĝino vojaĝis
al najbarurbo Uŝer pretigi regnan akordon

pri venontjara nupto de nia urba reĝido
kun la princino Zabib kaj sur ĉevalo ŝi rajdis,
en luksa brokmantelo, kun akompano gravula,
kaj ankaŭ mi eskortis kiel soldato gvardia.
Ĉirkaŭ je du vojhoroj, dum vice ni trairadis
ulmaron densan, apud Roko nomata de Korvoj,
ĉasejo fama, jen ŝi al la gvardio komandis
antaŭeniĝi spacon por povi sola paroli
kun sia filo Ŝumuk. Dum ni plurajdis aparte
kiel ŝi mem ordonis, teruraj kriĉoj aŭdiĝis
post ni. Ni rerigardis: el inter arboj aperis
tigro, neatendite, kiu sur Ŝabdan eksaltis.
Ni turnis la ĉevalojn kaj al la loko rekuris,
sed regis la fatalo kaj jam nenio fareblis.
Reĝinon sange ŝiris la nigrestria felulo,
ĝuste la sama tigro, kiun ŝi vundis iame
kaj kiun vi mem savis: tiu por venĝo revenis.
Soldatoj ĉirkaŭrajdis dum defendiĝi ĝi provis,
sed ni pafadis sagojn kaj ĝian koron atingis.
Ni kuris al reĝino, jam duonmorte kuŝanta,
kun brakoj sangbanitaj kaj disŝirita vizaĝo,
kvankam la princon trafis neniu grato fortune.
Rapide ni revenis al la murblanka ĉefurbo,
dum ŝi agoniadis, sed jam ne povis eviti
la morton kuracistoj. Ŝi lastaspire pereis.
Tra la palaco vasta, kria lamento leviĝis
de la eŭnukoj ĥoraj, de l' servistinoj ululaj
kaj, laŭ homplenaj stratoj, ĝemoj kaj ploro milobla,
sciinte la forpason de la reĝino dieca.
Fajroj en ĉiuj temploj poestingiĝis omaĝe
kaj prepariĝis ritoj por funebrado kutima
je l' morto de regnestroj kaj la septagaj aranĝoj.
Muregojn oni kovris per ruĝkolora drapiro
kaj en la tuta urbo ĉesis laboraj okupoj.
Ceremoniajn ludojn laŭmore oni komencis
je l' tria plendotago, al la reĝino honore,

sed ankaŭ pli solenajn ol en aliaj okazoj,
ĉar Ŝabda estis pleje de la urbanoj amata.
Tiun matenon, sub muroj de l' sanktejo de Ninna
vidiĝis vetbataloj sur ĉaroj flore festonaj,
tirataj de onagroj. Estis konkuro nobela
kaj la venkinto gajnis altan premion en oro,
kies duonon li oferis por tombo reĝina.
Vespere lancĵetado, piedaj kuroj okazis
inter herooj famaj de l' suverena fortreso.
Trezorojn disponigis la familioj elstaraj,
sed la duonon poste ĉiu gajninto liveris.
La sekvan tagon, pugnaj luktoj, vetkuro de ŝipoj,
arkpafoj, globoĵetoj kaj ĉevalida parado.
La kvinan plendotagon laŭleĝaj mortoj okazis
por akompani l' moŝton en la transmondon eternan:
de ambaŭ riverbordoj sep remilŝipoj eliris,
sur kiuj vastlinie jam plenarmite situis
militaj prizonuloj devantaj morte batali.
(Kaj inter ili Kudur, kompaniulo plorata).
Armiloj ekfajreris sub arda suno matena,
kirasoj, pintaj kaskoj kaj bronzaj glavoj el ingoj.
Entute ili sumis pli ol du miloj en ambaŭ
flankoj. Tiam laŭflue de la rivero bluonda
alvenis karpo ligna, prilaborita cizele,
farbita ruĝkolore, kun malfermita buŝego,
en kies ventro sidis du trumpetistoj anoncaj:
kiam ĝi pasis inter la sturmopreta ŝiparo,
eklaŭtis tambursonoj kaj muzikiloj avertis,
ke la duelo startas. Ambaŭ eskadroj avancis
kun ekscititaj vicoj, celantaj kroĉi la pontojn
por salti al remŝipoj jam kontraŭ ili venantaj.
Kiuj kuraĝe mortos, feliĉan vivon atingos
kaj en reĝinarmeo ili transmonde soldatos.
Nur unu postrestonto rajtos konservi la vivon,
el ĉiu batalŝipo sur la ruĝonda rivero,
kiam bloviĝos kornoj post submergiĝo de suno.

Dume, aparta trupo komencis pafi baliste,
el kunfiksitaj flosoj, sagegojn bule kotonajn,
flamajn, kontraŭ la ŝipoj, el kiuj pluraj ekardis.
Homoj enplonĝis onden, sed ili plue ne rajtis
rifuĝi sur la bordon, ĉar viglis tie ŝalupoj
barantaj la eskapon. Ili alnaĝi klopodis
aliajn ŝipojn, dronis aŭ baraktante pereis.
Vibre aŭdiĝis tintoj dum ŝipoj krife sin hokis.
Ĉies okuloj brilis de la spektantaj amasoj,
kiuj de ŝtupaj benkoj je l' kolizio plezuris.
Mi mem atente staris inter homgrupoj avidaj.
Laŭlonge de l' mateno la interbuĉo tiriĝis
kaj ankaŭ dumvespere du ŝipoj frontis izole.
La travideblajn akvojn densruĝe sango koloris
kaj poste misvunditojn oni mortigis ofere,
escepte de nur unu el ĉiu ŝipo laŭsorte.
Sur la rivero flosis multaj kadavroj eraraj,
kies animo transe sub la reĝino subulos,
sed ili malaperis preter la fluo de l' ondoj.
Dum la sekvanta tago regadis ĉie silento
por adiaŭi l' moŝton kaj ĉion taŭge prepari.
Eklumis la aŭroro de l' entombigo solena
kaj granda procesio el la ĉeftemplo deiris.
Laŭ longaj avenuoj la sekvantaro promenis
sub ruĝaj flagrubandoj, sub kornmuziko funebra
kaj marŝis el Ururbo tra l' granda pordo de Gibil.
Portantoj lokis ĉerkon en trab-ligita koraklo.
Sur silentantaj ondoj la katafalko paradis
dum eskortanoj rajdis laŭ riverbordoj apude,
ĝis vasta foskonstruo en ebenaĵo proksima,
kie reĝino restos por alimonda regado.
En ĝi troviĝis ĉambro kun ĉielblua kupolo
kaj muroj blankfarbitaj, pavime brikoj emajlaj,
antaŭe granda halo, al kiu tera deklivo
portas kaj murpentraĵoj pri ĉasplezuroj aludas.
Ĉi tien procesiis la sekvantaro reĝina,

en subtumulon tomban: la muzikistoj unue,
dancistoj, hundportantoj, sklavinoj hejme servantaj
kaj ankaŭ armeanoj de la persona gvardio.
Ĉi tiuj akompanis la palankenon aflikte,
kiun surŝultre portis ses gravaj urbonobeloj.
Laŭmore, ĉiuj devis enveni grupe la tombon.
Enrampis nun la ĉaro, kiun la du hemionoj
de la reĝino tiris, plenplena per trezoraĵoj
propraj: armiloj, oraj vazoj, brokatoj unikaj,
ankaŭ aliaj ĉaroj kun ludodonoj oferaj:
kaldronoj bronzaj, luksaj vestoj, juveloj el oro.
Ĉiuj enpaŝis mute laŭ sablegruza deklivo
kaj orde ĉirkaŭsidis en la subtera salono.
Pastroj lokigis ĉerkon en kupolĉambron apudan
kun valoraĵoj riĉaj kaj sur la korpo reĝina
disŝutis lazurŝtonojn. Sekve glavistoj oficaj
pikvundis la nobelojn, kiujn kuŝigis omaĝe
je la piedoj de l' moŝtula mumio silenta
kaj l' enirejon ŝtopis per kungluita brikaro.
La ceremoniestro kun l' akompano foriris,
lasante la mortontojn. Tiam li bloki komandis
ankaŭ l' eksteran pordon per pretigita rokrulo
kaj poste supergrundi la enirejon ebene.
Entute sesdek homoj en nigra tero plurestis.
Nun ĉiuj klinsalutis en fantomeca profundo,
sub fiŝolea lampo, pendanta ŝnure plafone,
kaj dum harpnotoj sonis trinksorbis ili venenon
ĉiu per taso eta, el unu centra pokalo,
kiun ĉerpile servis knabino bele talia,
kaj same al la bestoj trinkigis sklavoj el ujo.
Baldaŭ ekkaptis ĉiujn dormemo milde plezura
kaj sensufere svenis la servantaro palaca,
kiu en transa vivo por ŝi fidele deĵoros.
Ankaŭ mi devis marŝi, kiel gvardia soldato
en maŭzolean tombon. Sed la promeson unuan
kiun publike faris, mi malobservis aperte.

Min tial oni serĉas, ĉar mi kulpule profanis
plej sanktan tradicion kaj min ŝirpuno minacas.
Kun mia fianĉino, kiu palace rezidis
servistine kaj devis ankaŭ en tombon eniri
post la reĝina paso, ni kunĵuriĝis akorde,
spitante danĝerecon, ke ni je l' morto rifuĝos:
tia pereo vanas kaj ni pluvivi deziras.
Miaj gepatroj havis praoriginon Elaman
kaj mia religio aliaspece pritaksas
forpason de regnestroj: mi ŝin konvinkis egale.
Disiĝi ni decidis ĝis tiu tago finsolva,
ĉar tiam estos eblo por la eskapo planita,
kaj same ni roladis por ke neniu rimarku.
Frue je l' sepa tago al patrodomo mi venis,
kiel intertraktite, sed ŝin en hejmo ne trovis.
Mi ŝin atendis longe, senpacience, febrece,
min ĉiuj stratsusuroj kaj ventoblovoj alarmis.
Je la tagmezo venis nur ŝia frato dekjara,
kiu kun ni ligiĝis kaj devis helpi je fuĝo.
Li ekrakontis plende, ke lastmomente ŝi marŝis
kun ĉiuj servistinoj de l' sekvantaro reĝina
kaj venis sepultejon. Inter popolaj amasoj
surstrate li ŝin serĉis —ĉar vekiĝinte li vidis
malplena ŝian liton— kaj la fratinon amatan
rimarkis postkuranta je l' procesio funebra
kaj jen ŝi eĉ forgesis surmeti frunte la ringon
arĝentan, fianĉinan, kiun skatole ŝi gardis,
ĉar ĉiuj envenantoj devas surhavi la pleje
bonajn ornamojn por lasta pretermonda vojaĝo.
Ŝi procesiis larme, sed ankaŭ tombon eniris.

Tiam ekpaŭzis Tudar, singulton tenis apenaŭ:
—Kial, ho Iŝme, kial en la tumulon uzurpan
vi enkuris kaj sola min sur ĉi mondo vi lasis?
Kiu komprenus ĝuste la pensojn svarme bolantajn
de malespera homo ĉe sia lasta decido?

Ho Iŝme, kial vi ne diris pri l' volo sekreta?
Kial ne rendevuis kaj min forlasis aflikte?
Ho, se mi paŝus ankaŭ en tiun tombon abisman,
mi sorbus la venenon kaj inter dolĉa muziko
forsvenus sen doloro, sur via sino kuŝante,
ĝis trilo milalaŭda por transa vivo revekus.
Ni spertus saman sorton, la morto nin ne dividus.

Jene parolis Laŝmu al senkonsola ploranto:
—Ho Urloĝanto Tudar, pacigu vian animon,
per plendoj ne ŝanĝeblas preterpasintaj okazoj.
Fervore alrigardu al esperplena futuro,
ĉar ŝin vi povos iam en transa mondo retrovi.
Sed vi danĝeron citis: ĉu estas ia minaco?

Tudar vespiris funde dum aŭdantaro silentis:
—Mi dankas, ho tendanoj, pro la paroloj afablaj
kaj mi rakontos ĉion, eĉ se la koro doloras.
Preskaŭ freneze, je la scio, despere mi volis
reveni al ŝi kaj kun la sekvantaro perei,
sed mi konsciis klare, ke je malpio mi kulpas,
certa kondamno estus la dispecigo de membroj
kaj mi ne rajtus iam ŝin akompani pretere.
Tiam mi pensis pri vi, ĉar post la morto reĝina
mi aŭdis konsiliĝon de la vicreĝo palaca
kun ĉefpastrino Filge, kaj Ulmi jene decidis,
ke post dek tagoj leĝaj de preskribita prokrasto,
dum kiuj ja ne licas la armojn preni milite,
krom nur por sindefendo, li la tendaron atakos
por venĝi la reĝinan morton, ĉar ambaŭ akuzas
vin mem pri tiu faro kaj la popolo bezonas
trovi kulpulon. Laŭ tradicia kredo ĉi-landa,
se la regnestro mortas per akcidento subite,
ŝuldiĝas al punfaro, ĉar la diino koleras
kontraŭ la urbo. Necesas senmaskigi pekulon
kaj la pastrino Filge kulpigis vin je la krimo,

ĉar vi plenigis fosojn, vi malkonsilis oferojn
al la diino Ninna; antaŭ la templo riproĉis
pri la eraro ĉasi bestojn kaj buĉi prarite
kaj same kontraŭstrebis je l' oferbuĉo monata
de sklavo dum plej sankta ceremonio novluna.
Tamen decide gravas, ke tiu tigro ŝirinta
la korpon de l' reĝino, ĝi estis ĝuste la sama,
kiun vi forkurigis dum ĉi-somera batuo
(kiam mi mem servadis en la persona gvardio),
ĉar oni ĝin rekonis per surfemura cikatro.
Ulmi ne plu forgesis kaj venĝi sange li ĵuris,
kiam aŭroro lumos post la prokrasto deviga.
Tiam mi decidiĝis al via tribo raporti
por akompane fuĝi kaj foreviti la punon.
Kompense pro l' averto pri la minaco venonta,
nur tion mi petegas, se trafos min la fatalo:
ke vi min enterigu, por ke rabbestoj akrungaj
ne disŝiradu membrojn kaj iam veni mi povu
al la transmondo fora, ĉe l' fianĉinon amatan.

Dum li ankoraŭ diris, aŭdiĝis sibloj obtuzaj
de disflugantaj sagoj super tendaro de Dilmun.
El la proksimaj arboj oni pafadis al ili
kaj multaj falis vunde. Meze de frondoj, alarme,
nun videbliĝis kapoj de urso, aproj, ibeksoj
kaj inter ili, monstre, oscedis buŝo de tigro.
Ĝi temis pri soldatoj, kiuj per felo kovriĝis,
frunton kaŝante en prisekcita kapo de besto,
ĉar ili venis pune sub la egido de Ninna,
kies ofero estis ajnspeca besto surkampa.
La felmaskita trupo el inter arboj eliris
kun bronzaj glavoj nudaj por ĉirkaŭfermi la tendojn.
Ili komencis haki kaj lance piki la homojn,
ĉu inojn aŭ infanojn aŭ kiuj aĝis en oldo.
Ĝi estis roto templa kaj ilin Ulmi komandis,
ĉar li ne volis zorgi pri la prokrasto milita

post la reĝina morto. La profetino Diserve
kulpigis la tendanojn pri ruinigo de l' urbo,
kriante, ke necesas komplete ilin ekstermi,
kaj la vicreĝo Ulmi, dum l' interrego momenta,
decidis ekkampanji antaŭ la dato difina,
ĉar li prikonsideris, ke funebrado ne samas
ĉe reĝo kaj reĝino. Krome heroldo denuncis,
ke unu gvardiano el entombiĝo forestis
kaj li supozis, ke l' eskapinto povus averti
la tribon de l' nomadoj kaj ŝirkondamnon eviti.

Nun armeanoj templaj kaj la gvardio de Ulmi
atakis sendistinge. Sango multroje fluadis
sur kampadeja grundo. Tribanojn ili dekumis
kaj ankaŭ Sara mortis sub fenda puŝo de glavo.
Ŝia infano Ŝeluh el flegaj manoj eliĝis
kaj falis sub la korpon de l' brustvundita patrino
kaj same li forpasis, l' akuŝintino sufokis.

Al tendoj multaj hastis celante serĉi protekton,
sed tiujn ekbruligis la soldataro flamsage.
Tiam aŭdiĝis voĉoj kaj Laŝmu jene proponis:
—Ni kuru al la ŝipo, ĝin ni defendu de flamoj!
Ĉar ili eksupozis, ke celas oni detrui
la ĉarpentaĵon. Sed felmaskitoj plue masakris
dum pri la framo ligna preteratente neglektis,
senĉese trapikante homojn proksime situajn.
Ĉirkaŭ goferaj traboj, apud la bordo Puratta,
la Dilmunidoj staris, leviĝis fronte fiere,
kun angorplena brusto sed kun vizaĝo serena,
kun kora turmentiĝo, vidante verŝi la sangon
de samtribanoj karaj, de ĝemplorantaj etuloj
kaj knabinetoj mildaj, sed ĉiuj firme rezistis
kaj staris plu senmove en manenmana kateno
ĉirkaŭ l' altprua ŝipo, ĉar plenkonvinke fidemis,
ke el ĝi flue fontas mistera forto savanta.

Baldaŭ soldatoj miris pri la sinteno neofta,
ke ili ne forkuras, sed ĉirkaŭ ŝipo sin ringas,
neniel defendante per la hakiloj akregaj.
Ili mortigi ĉesis, ĉar trapikadi laciĝis,
kubutoj jam senfortis kaj glavoj pezis enue.

La kapitano, Ŝengu, sin turnis tiam al Ulmi:
—La devon ni plenumis, jam la buĉado sufiĉas.
Ne eblas tiaforme la malamikon ataki,
kiu allasas batojn kaj ne repuŝas agrese.
Tio ne estas gloro sed senhonora masakro.
Neniam ni renkontis tiel solidan oponon,
soldatojn plej fortikajn, kun tiel brava rigardo.
Ne decas ilin vundi per senkompataj armiloj.

Sed Ulmi ĉagreniĝis kaj ordonante li urĝis:
—Mortigu ilin ĉiujn. Neniun viva vi lasu.
Jen estas la kondamno pro la sintrudo malpia
laŭ juĝo kaj promulgo de l' profetino Supera,
ĉar ili kun perfido sakrilegie krimulis.
Ekstermu ilin ĉiujn la sanktan punon obei.

Dume, li ĵus rimarkis la bluan fruntorubandon,
kiun surhavis Uttu dum la Tamuza mateno
de la kortega ĉaso, kiam la tigro saviĝis.
Tiam ekkriis Ulmi kaj kun ekzalto proklamis:
—Nun laŭmerite falos, kiu je l' morto reĝina
kulpas kaj je blasfemoj al nia alta diino.
Nun ĉesos ĉiuj plagoj por nia nobla muraro.

Ĵetlancon li jam svingis, impete celis al Uttu.
Ĝi siblis fendi bruston de l' Dilmunida tribestro.
Sed Laŝmu, apudstare, pri la intenco rimarkis
kaj per rapida movo, antaŭ la frato protekte
stariĝis senhezite: la bronza pinto riprompe

penetris ĝis en pulmon kaj baldaŭ sange tepidis.

Li svenis mortvundita antaŭ Utnoaj okuloj.
Pluraj ekkriis: «Laŝmu falis!» kaj plendo ĝin eĥis.
Tribanoj konsterniĝis dum universo bedaŭris:
ekhaltis sovaĝbestoj, aŭskulte strecis orelojn,
skuiĝis goferarboj, dum pli rapide la nuboj
novaĵon kurieris al dioj alte tronantaj.

Arono, rimarkinte pri tiu perdo fatala,
ne povis plue teni: li kontraŭ Ulmi ĵetiĝis
kaj krocis je genuo por elseligi pafinton.
Sed Ulmi turnis bridon, tiris el zono ponardon,
kiun enpuŝis gorĝen de la Kenido mizera.
Sekve, plenfurioze, al tendomezo rekuris
kaj serĉis ŝildportanton, lancon ekkapti denove,
murdonte la tribestron, kiun pri l' misoj akuzis.

Uttu ĉe l' frato kaŭris provante lin revivigi:
—Ho Laŝmu, kio estas, eltenu, daŭre rezistu!
Ĉi senkompata bronzo al via brusto ne celis,
sed nur al mia. Certe mia pereo pli bonus
ol via manko, ol ke nia tendaro vin orfu.
Kial vi do vin ĵetis antaŭ ĉi lanco nigrombra?
Kiu admonos homojn dum ĉarpentado kaj estros?

La Ur-soldato Tudar ĝis tiam zorge kaŝiĝis,
inter goferoj randaj, meze de branĉoj ileksaj.
En lia kapo bolis konfuzaj pensoj amaraj
kaj malespero nestis en korinterno sufoke,
ĉar li forlasis Iŝmen per mallojala dizerto.
Tiam li diris jene en sia menso returne:
—Ĉu do ekzistas Elam, ĉu estas dioj en alto
kiuj senkulpan helpas kaj perfortaĵon evitas?
La dia mano vakas, ĝi senutile potencas.
Tiranoj vivas mole, piuloj morton akiras.

Kie troveblas senco ĉe la destino rigora?
Ĉar jen mi, maljustulo, kiu ĵurligon atencis,
forlasis amikinon ĉe ŝia lasta vojaĝo,
mi vivas plu senĝene dum spertas ili la punon,
kiun mi mem elgajnis kaj justkondamne meritas.

Li rememoris ankaŭ pri l' humiligaj ofendoj
far Ulmi dum bankedo: lin la gravulo primokis
dum ĉirkaŭflatis Iŝmen, kiun li celis ebrie.
La altrangulon Tudar rekonis, spite la maskon
tigran, pro l' raŭka voĉo kaj blankekrina ĉevalo.
Li el folioj rampis, el sia kaŝo gofera,
detiris sian glavon, juvelaŝtone garnitan,
kaj kaptis je la klingo: tiun li ĵetis al Ulmi
kaj ĝi penetris fende sub dekstran nudan akselon.
Sur humon li defalis el rondehufa ĉevalo
kaj ankaŭ lia masko de sur la ŝultro deglitis.
Kelkaj soldatoj tujaj pri l' misfortuno rimarkis:
dum pluraj helpis Ulmin, al Tudar rajdis aliaj
kaj baldaŭ lin rekonis. Ili Tudaron akrege
hakis kaj dispecigis laŭ punkondamno ditempla.
Jen surherbejis stumpe la brakoj, kapo, femuroj
kaj multajn lancajn breĉojn li sur la torso ricevis.
Ne rekoneblis plu la trajtoj de tiu reĝina
soldato. Ĝi aspektis nursole sanga ĉifono
kaj disaj membroj naŭzis.
Dume la vundo de Ulmi
ŝajnis malbonprognoza. La kapitano degrimpis
kaj kiel vica estro al sia trupo komandis:
—La morton de l' reĝino per sanga verŝo ni punis
kaj la sakrilegion kontraŭ dikultaj oferoj.
Pereis la kulpulo je l' forsaviĝo missorta
de l' tigro. Ankaŭ mortis, kun l' ekzekuto merita,
tiu soldato Tudar, la eskapinto de tombo.
Ni do revenu urĝe al nia urbo potenca,
reporti la vicreĝon, ĉu estos helpo kuraca

kaj lasu la ceterajn. La devon taŭge ni finis.

Demeti li ordonis la tigrofelon el Ulmi
kaj sur herbejo lasi, ĉar pro antikva tabuo,
ne decis, ke mortanto tuŝadu beston idolan:
li enkorpiĝus en ĝin kaj pretermonde ne povus
ekzisti homfigure. Ŝengu farigis akcele
branĉliton, kiun trenos lia rajdulo groplige.
Sed tamen li ne sciis, ke jam la moŝto kadavras.
Sur la ĉevalojn snufajn ĉiuj rapide resaltis
kaj venis al blankmura urbo, portante la korpon
de l' generalo Ulmi, kiu sukcesis atinge
mortbati tendaranojn kaj honton venĝi honore.

Sur kampadejo migra, el la popolo de Dilmun,
jen la plejmulto falis, dekduo restis apenaŭ.
Vunde pereis Puzur, lertfingra teksi kanabon,
Ŝelak, Uc kaj Ketura, la saĝa Dikla kaj Efer,
Moŝej, Akenar, Tiras kaj Javan filo de Medaj,
mortvunde Sara falis, kun la solfilo Ŝeluho,
kaj Laŝmu, Beŝetido, la kunvojanto fidela.
Postvivis, krom Utnoa, nur la fratino de Laŝmu,
Oba laŭnome, Jebuŝ, Girgas, la filo de Lehab,
Ŝabteha, Togar, Dedan, kaj Uzal, sperta ĉe rajdo,
kaj infanetoj orfaj, entute sole sesopo.
Kiam Utnoa vidis pri l' hekatombo ĉeŝipa,
kaj diskuŝantajn korpojn sur la humida herbejo,
inter fluanta sango, li ĝemis veon afliktan.
Samkiel gazelidon ekkaptas ringe pitono,
kaj stringas ĝin duoble por paraliza brakumo,
sufokas ĉirkaŭventre ĝis elsaltigi la ripojn
kaj vertebraron de l' juna dukornulo plorinda;
eĉ se l' gazelo ne plu spiras, ĝi daŭre premadas,
obstine muelante, persistas knedi je mola
maso l' inertan korpon de l' antilopo gracia,
tiel doloron vringan Utnoa spertis intime,

sentante frakasiĝon de ĉiuj revoj abrupte.
Al li impresis kvazaŭ en misa sonĝo troviĝus,
l' okazintaĵojn ĵusajn ne sciis kredi realaj
kaj promenadis tien-reen kun vido nebula.
Sed li vekiĝis baldaŭ el la koŝmaro subite:
ĉar jen ĉe trunko kuŝas lia edzino belvanga,
kun brecĥo tra la brusto kaj lia filo piede,
mortintaj je l' komenco de la soldata razio.
Li falis sur genuojn kaj korŝirite lamentis:
—Ĉu nur nubnigra morto, ĉu nur detruo kruela
nin akompanos ĉiam kaj post vojkurboj atendos?
Ho Sara, plej aminda al mia koro sufera,
kie mi trovos pacon kaj el ĉagreno ripozon?
Ho filo, la espero de mia aĝo grizula,
kien forkuri eblas por elsaviĝi de plagoj?
Ni serĉis propran hejmon, kvieton, landon azilan,
sed ni nur sangon trovas, vundojn kaj morton uzurpan.
Kial ordonis vi, ho dioj, al nia popolo
klopodi levi ŝipon kaj al insulo reveni?
Do, kian sencon havas sen fratoj vivi solece,
sen filoj, sen edzino en fora lando miela?
Por kio mildaj brizoj, por kio fruktoj aromaj,
se ilin kun l' amatoj ne eblos kune dividi?
Ĉu ne plibonus morti dispecigita, prefere,
kuraĝe kiel Tudar, kaj ne plu pensi pri ajna
insulo malproksima aŭ pri hejmlando futura?
Ĉu do troveblas fakte nia insul' idilia?
Ĉu tradicioj veras, iu rakonto fidindas?
Kial montriĝis dioj al alitempaj avuloj
kaj ili nun silentas, sin kaŝas mute, tenebre?

Uttu l' okulojn levis al firmamento voksurda.
Kiel hipopotamo surdorse portas ideton
tra ondoj de rivero por ke la dentoj akutaj
de krokodilo ruza ne povu iel atingi;
ŝi apudborde zorgas, ke l' filo milde deglitu

kaj plenatente staras ĉe ĝia flanko viglante,
sed jen dum ŝi paŝtiĝas, la plurmonata fileto
per ĝojkapricaj saltoj malproksimiĝas el akvo
pli multe ol prudentus; ĝi sola ludas amuze
per branĉoj, per sableroj, per la petola memombro,
sed kiam la patrino ĵus ekrimarkis alarme,
svinge gepardo saltas kaj dentojn puŝas aorten;
ĝi baldaŭ forkaŝiĝas por sian ŝancon atendi,
dum la patrino kuras kaj furioze koleras
kontraŭ senkulpaj arboj ĉirkaŭ l' etulo falinta
kaj veas plorsingulte kun plej kortuŝa lamento,
kiun nenia helpo plimoderigi kapablas,
tiel sopiris Uttu en la interno sufera
kaj ne sukcesis trovi rekuraĝigan apogon,
post ĵusa malapero de samtribanoj, amikoj,
de l' frato kunvojanta kaj de l' edzino beblula.

Vespere postrestantoj mortintojn kune kolektis
kaj amasigis ŝtipojn por adiaŭa bruligo.
Simile vindis stumpojn de l' malfeliĉa Tudaro
kaj enterigis apud roko, kun pia petego,
preĝante Elamdion, kiu transnube palacas.

Je la mateno sekva, dum horizonto purpuris,
ili surmetis korpojn kaj rite faris oferojn.
Sed Laŝmun, la amikon, ne volis ĵeti je flamoj
Utnoa, ĉar li diris, ke li ĉefrange ricevos
postmortan honoradon laŭ tradicio pratempa,
kvazaŭ li mem forpasus, mem la tribestro pereus
kaj lin nur post tri tagoj konsumos vore la fajro.

Utnoa lin portigis al sia tendo dumasta
kaj mem preparis ĉion por la kutima funebro.
La felon, kiun Ŝengu de sia moŝto deprenis
post vundopiko glava, restintan grunde forlase,
sur tendoplanko sternis, apud la bunta tapiŝo

kiun elteksis Sara, kaj sur ĝin lite kuŝigis
Laŝmun. Li nun ekplendis kun larmoplenaj okuloj:
—Ho Laŝmu, kara frato, kiu kompanos amike
ĉe streboj kaj klopodoj dum la ekzila migrado?
Kiu plu fajlos ĉize la serpentkapon aeran
kaj gvidos nin kuraĝe por la konstrua laboro
de nia alta ŝipo? Ho protektinto de bestoj,
nur viaj protektitoj, vin ĝuste tiuj atakis.
Vi brunan tigron helpis el senkompata pafarko
kaj ĝuste tiu sama vin vundis ŝire repage.
Tamen sur ĝia felo vi jam finfine ripozu,
kunkuŝu paciĝinte la kverelintoj iamaj
kaj sen rankoro venĝa, en harmonio kunulu.
Kio plej multe povas ol morto viŝi malamon
kaj forgesigi kore la abomenon unuan,
se oni litkompanas en sama tombo brakume?

Tiel Utnoa ĝemis. Super la korpo li ploris
de la amiko pala kaj rememoris anime
la tagojn plej feliĉajn kiam l' edzino kunestis.
Samkiel inter herboj malsata bando hiena
postkuras bubalaron, sen ia timo serĉante
maljunan aŭ senfortan, ĝis kurbekornan elektas,
ĉar tiu jam tro lacas pro sia aĝo kaduka;
post longa persekuto, dum kiu bovo baraktis,
hirtorelulo dentas tra l' karnodika gluteo
kaj riĉe fluas sango, kio ekscite bravigas
la kunrabantojn; ĉiuj sturmas ripete dedorse,
dum la longhara haltas pro spiromanko, sen viglo
defendi sin returne; ĝin ŝiras vice mandibloj
de l' bestoj fiodoraj, trempantaj sange muzelon
en internaĵoj pulsaj, ĝis tiu kaŭre subiĝas,
sternante sin sur grundo kaj kaplevinte muĝegas,
tiel suferoj ĉasis lian esperon embuske
dum li en tendo sidis apud la korpo de Laŝmu.
Li poste, senkonsole, la kampadejon ekvagis

kaj fine supreniris, dum kovris nokto profunda
ĉiujn arbodensejojn kaj la rivero murmuris,
al monto apudstara, sub longaj eĥoj otusaj.
Sur abruptaĵo roka en la lunlumo lamentis
kaj tie li plu restis la tutan nokton en ombroj.

Kvina kanto

Inna Sooje vidis la buĉojn sange kruelajn
el la fluganta disko, per supreŝveba girbulo.
Ŝi ĉion kubregistris por kontrolado koncerna,
ĉar de post l' asembleo pri tiu zono ŝi zorgis
anstataŭ Emme, kiu pri l' Kontinento Nubronda
respondeciĝis. Kaj ŝin vigle impresis anime
la morto de l' nomadoj, ties sinteno kuraĝa,
ke ili ne forkuras time kaj sin ne defendas
arme, sed ĉirkaŭ ŝipo restas, al morto vizaĝas
sen levo de armiloj kontraŭ armiloj atakaj,
sen violentaj manoj, sen malammontraj okuloj.

Ŝi nun ekdubis pri l' hastaj juĝkonkludoj iamaj
kaj, sola, primeditis en la interno ĉi pensojn:
—Ĉu vere la teranoj estas emioj esence?
Ĉu post komencaj paŝoj ili la saĝon atingos?

Ĉar certe ĉi konduto estas de homo supera
kaj sin reganta. Tamen, kial samgente troveblas
plej kruda furiozo kaj racieca kuraĝo?
Se ilin estrus sole la genetikaj efikoj,
teranoj nebrideble celus al venĝo perforta
ĉar tion determinas la ecoj biologiaj
en la hormonoj propraj. Ŝajne logiko forestas
en ĉi respondo stranga kaj ankaŭ tie ni trovas
la bazan argumenton por la konsisto nehoma.
Sed ĉu post evoluo ili sukcesos akiri
superan harmonion kaj sensovaĝe rezonos?
Se ilin ni detruus, ĉu estus faro prudenta?
Ĉu eble pro malmultaj la tuta tero meritus
saviĝi el pereo, pro tribanaro heroa?
Ĉar iam mi ne vidis tian alstaron unikan.

Ŝi sekve forvojaĝis al la stacio ĉiela
kaj sian filon Busla venis viziti goone.
Kun li ŝi konsiliĝis kaj ambaŭ iris al Dujun
paroli kun Soraa; pri la surteraj aferoj
sciigis lin kaj ankaŭ pri l' intervenaj aranĝoj
de Roa kaj Arunni, ĉar tiujn certe ŝi konis
kaj nur preteratentis en akordiĝo sekreta
ĝis tiuj finaj faroj, ĝis la buĉado terura.

Jene parolis Inna al l' olivhaŭta Soraa,
post kiam ŝi resumis pri la pasintaj eventoj:
—Ho Emme, mi agnoskas mian prijuĝon eraran
pri l' vera emieco de l' loĝantaro surgloba.
Ni analizis specimenojn el nura sesopo
da indiĝenoj teraj kaj mankas studo pli vasta.
Krome, post tempopaso, la trajtoj bioĥemiaj
povas alieciĝi, kiel ĉe gobdoj okazis.
Probable ili sidas en iu fazo komenca
de evoluo, kiu portos al vera homiĝo.
Antaŭ ŝancelaj duboj, pli bonus helpi teranojn.

Kaj aliflanke, mi supozis sincere, ke Roa
neriproĉeble agas, sed ĵus malkovris uzadon
de artifikrimedo por superrego futura,
ĉar li proponis al mi kunlaboradi private
por selektadi genojn de la idaro loĝonta
sur ruba terplanedo, celante krei socion
kun drasta organizo, ĉar nur fortike kohera
kapablus restarigi, en periodo nelonga,
potencon galaksian laŭ Ibostela praformo.

Ambaŭ prikonsideris, ĉu l' interveno de Numu
laŭleĝas legitime aŭ eksterjure li paŝis.
Laŭ ili tute nepris ree kunvoki l' Ajuban
Kortumon en urĝeco. Emme vizitis Ogian
kaj plene lin informis. Li taksis justa la pledon
kaj baldaŭ diskonigis la konferencon anonce.
Sub la kupolo funga de la Gobanoj elektaj
bildiĝis por mesaĝo tridimensia heroldo
kiu invitis ilin al la escepta kunveno.
Vokitoj sekvatage en la Oara salono
kolektiĝis, veninte el sia hejmo tubronda
el ĉiuj punktoj disaj de l' kolonio de Naje,
samkiel muŝoj svarmas al bovinlakta sitelo
dum juna melkistino ne trafas peli forhuŝe,
sed ŝi pro l' embaraso la ujon frape renversas
kaj ili ĉiuflanke alzumas suĉe festeni.

Ogia sidis meze de l' Juĝantaro Pliranga
kaj liaj blankaj haroj en la aero sinuis.
Levinte dekstran brakon li asemblee parolis:
—Gobanoj, ni kunsidas ree pri l' tera popolo,
ĉar estas nova fakto, kiun prijuĝi ni devas.
Nun mankas unu jaro por la venonta detruo,
kiam l' asteroido renversos turne la teron.
La Goba tribunalo tiurilate decidis,
ke se saviĝos eĉ se nur familio de unu

surmonda gento, kiu nomiĝas tribo de Dilmun,
ni kosme pluvojaĝos tervivon rajte respekti,
kvankam la kolonio jam difektita ruliĝas
kaj tie ni, verŝajne, havenon povus atingi.
Sed por ke la akordo estu valida regule,
tiu Dilmuna tribo devas memstare saviĝi
per propraj vojrimedoj, sen subtenado teknika,
sed ankaŭ sen obstaklo de iu ano de Goba.
Laŭ komunikoj ĵusaj de Inna, kiu deĵoras
pri l' Durivera Lando kaj pri l' tendaro nomada,
okazis pereigo de la plejparto de ili.
Emme kaj ŝi supozas, ke intervenis influe
unu konsiliano kaj eksterjure li agis,
Roa Numuo, helpate de Arunni ĉe faroj.
Necesas do klarigi, ĉu l' interveno pruveblas
kaj, ĉi-okaze, ĉu tiu ekster leĝo situas.
La koncernatoj rajtas defendi sin pri l' akuzoj.

Post kiam Emme faris raporton pruve detalan,
ekstaris Roa Numu montrante firman aplombon:
—Gobanoj, mi ne neas, ke mi zorgadis okupe
pri l' bluplanedaj temoj dum tiu lasta sezono,
dum multaj, plentrankvile, en Naje preteratentis.
Mi ĝisdatigos konojn pri l' efektiva realo
de l' Dilmunida gento. Antaŭ ducento diurna,
post nia asembleo lasta, dum ili ĉe Babel
tendumis riverborde, ili divide disiĝis
en du malsamajn grupojn pro kontraŭstaraj ideoj,
ĉar la plejparto pensis, ke violento necesas.
Ĉi tiuj suprenvojis al tendaranoj aliĝi,
frontantaj oriente de l' regiono Ŝinara
kontraŭ opresajn urbojn kaj plurmonate militas.
Ĉi fakto certe pruvas, ke ankaŭ tiu nomada
gento nur agresemas kaj ĝi neniel emias,
kiel mi jam defendis dum l' Asembleo Ajuba.
Sed por ke ĉi-koncerne neniu dubo persistu,

mi celis pruvi ankaŭ, ke la tribanoj aliaj,
migrintaj sunsubiren al Ur, la urbo ĉemara,
por elĉarpenti ŝipon laŭ desegnaĵo de Emme,
ankaŭ ĉi tiuj estas nur perfortemaj anime.
Mi intervenis tial, ke la fatalo nin urĝas
kaj mankas la necesa tempo por koni tutlume
la ecojn de l' teranoj. Mi agis ĉiam akorde,
tamen, kun interstelaj leĝoj kaj juro de Goba:
ne interveni rekte sed respektante la trajtojn
de l' propra civilizo. Per tio oni kapablas
vidigi karakterojn kaj montri funde kaŝitajn,
sed ja ne eblas ŝanĝo de l' historiaj eventoj.
Sen tiaj esploradoj ili samfakte maturus,
ĉar tutsociajn movojn ne celas oni modifi.
Kaj rezultiĝis tio, ke kelkaj el la tribanoj
ne agis agreseme, tamen manpleno da ili
kaj nur esceptokaze, pro mensobloka perturbo
antaŭ tro krudaj faktoj neelteneble doloraj.
Ĉi tia pasiveco estas simile trovebla
en bestaj etcerbuloj, nome, en *vunuj* aŭ *ojksi*
portataj al buĉejo, kaj ĝi ne nepre rilatas
al alta evoluo. Ĝi signas nuran alternon
de animstatoj, kiel la eŭforio, deprimo
malsanecaj, sen iu ajn memkontrolo de saĝo,
kio evidentiĝas per la sekvinta despero.
Naturas, do, konkludi, ke eĉ en tiu popolo
troviĝas senracio kaj la ŝajnhoma subraso
de la planedo blua estas komune *jegoa*.

Tiam ekstaris Emme kaj respondante li diris:
—Roa, la diskutpunkto nuna ne estas okaze,
ĉu l' teraj aŭtoktonoj entute vere racias
aŭ subhomecas, sed ĉu la intervenaj aranĝoj
de vi entreprenitaj la leĝon Goban obeas.
La Alta Tribunalo de l' Asembleo de Naje
verdiktis eksplicite, kun klaravorta proklamo,

ke l’ gento el Dilmuno devos konduti libere
post la sciigoj nepraj. Vi ŝajne ruze manovris,
laŭ kaŝa strategio, kaj trafis klini balance
la sorton de l’ teranoj, ilian savon eviti,
ĉar supervivas sole malgranda grupo de Henoh
post hekatombaj murdoj apud fortreso ĉemara,
kiam la ŝipo estis preskaŭ jam tute finita.
Ĉu kelkaj plu kuraĝos kaj kun obstino laboros
sur loko de mortfaloj, memoriganta suferojn?
Ĉu ili strebos plue por ĉarpentado brakrompa
se jam forpasis Laŝmu, majstra spertulo metia,
kaj la ceteraj nune en sunlevejo batalas
post ties dividiĝo antaŭ turalta ĉefurbo?
Kaj vi per subtilaĵoj, laŭ la konfeso de Inna,
intrigis artifike, malgraŭ promulgo supera.
La dubo nun stariĝas, ĉu ili plene liberis
fakte, kaj ĉu ni helpu iel por savo de homoj.

Baldaŭ stariĝis Numu kaj al Soraa replikis:
—Ho Emme, kiel vi arogas la rajton akuzi,
se vi mem sugestiis, ekster preskriboj Ajubaj,
sur pastron Ŝamaŝtemplan, por ke ĉi tiu profetu
favore al Utnoa kaj senrezerve benadu
la ŝipkonstruon, tute laŭ via plano savonta?
Dum la kolegoj de Arunni troviĝis arbare
apud Babelo, per kontroliloj oni detektis
ĉeeston de alia ŝipo de l’ floto Gobana
kaj per sensoro kaptis telepatian efluvon
celantan lin persvadi pri elektiĝo de Noa.

Tiam ekstaris Emme kun plenindigna rigardo:
—Ho Numu, mi influis konforme al la decido
de l’ Asembleo lasta: mi celis strikte plenumi,
ke pluraj aŭtoktonoj provu konstrui rimedon
por elsaviĝi. Sukceso aŭ fiasko dependus
de ili mem senplie. Mi ja ne helpis aparte

ĉe l’ harda entrepreno, faciligante laborojn
aŭ liverante ilojn, nek mildanĝere provokis
instinktojn primitivajn laŭ mia propra celado.

Ogia interrompis en l’ asembleo ĉiela:
—Ho Emme kaj Numuo, la argumentoj abundas
kaj malfacile eblas nun objektive pritaksi.
Necesas dokumenti pri l’ respektivaj akuzoj
kaj nia Tribunalo steljure solve decidos.

Li vokis implikitojn al la prezida tribuno,
laŭvice invitante kronologie referi.
Soraa nun detalis sian averton al Uttu,
per funda subhipnoto, ĉe l’ Bezermonto krepuske,
kaj postan sugestion super la pastro Luhebu.
Arunni, altefrunta, de la komenco raportis
pri l’ komunplanaj ruzoj apud Babelo faritaj,
kiam, kvazaŭ heroldo de l’ multeplaca Nineve,
vizitis reĝon Nimrod. Pri la transmensaj ordonoj
al la pastrino Filge por venĝe movi l’ animon
de l’ Ur-reĝino Ŝabda dum la bankedo ĉe gastoj.
Poste rakontis Inna pri l’ okazaĵo ĉi-ĵusa,
kiam la Dilmunidoj suferis sangan agreson
kaj restis nur malmultaj por plukonstrui la ŝipon.

Fine de la atestoj, la Tribunalo de Goba
kunvenis en salono de l’ Komputila Cefalo.
Post revizia studo, ili enpaŝis Ajuben
kaj baldaŭ kolektiĝis l’ asembleanoj elektaj
kiam sur turo flagris rubando blue signala.

Nun alparolis ilin la olda Oes Ogia
kaj jenavorte diris en la kunsido saĝula:
—Aŭdu, reprezentantoj de la ĉiela genero:
la Alta Tribunalo sen ia ŝanĝo ratifas
l’ antaŭan determinon pri la popolo de Dilmun:

se iel elsaviĝos eĉ se nur unu geparo
el la nomada tribo, kiun Soraa patronis,
ni migre forvojaĝos sen kolonii la teron,
serĉonte iustele la astron rajte loĝeblan.
Sed ni ne helpos ilin, eĉ se postvivas apenaŭ
dekkelko por daŭrigo de ĉarpentado taglonga.
Roa kaj Emme paŝis preter akordoj Ajubaj,
sed ambaŭ, laŭ stelleĝoj, agadis ĉiam en ordo,
la limojn respektante pri l' interveno nerekta,
ene de l' propraj trajtoj de l' civilizo blugloba.
Soraa, kulpokvite, nur tro skrupule prizorgis
plenumi komision de nia jara kunveno.
Konduton de Numuo ni forkondamni rezignas,
ĉar ĝeneralajn faktojn li eksterdube ne ŝanĝis,
sed nur la kontingencajn. Sed eble ĝuste ĉi tiuj
sukcesis misinflui en la konscio de Noa
kaj, sekve, ĉe l' konstruo de l' sava ŝipo gofera.
Tial necesas certi, ke l' intervenoj antaŭaj
ĉu de Soraa aŭ Numuo ne havos efikon
trudan en la volonto de l' avertita nomado,
Utnoa, kaj li scios memstare agi libere.
La Alta Tribunalo decidas agi ĉi tiel:
montriĝas nepre uzi l' *anoŭdon* de la profunda
memkono kaj pro tio ambaŭ, Numuo kaj Emme,
rajtos ekhavi dozon kaj uzi ĝin unufoje,
laŭ kriterio propra, en adekvata momento,
por ke plencertu ĉiuj pri l' aŭtonoma decido
de l' tendarano kaj pri l' justa konduto ĉiela.
Ĉiujn necesajn konojn pri sia memo li havu,
kiujn ja de ekstere neniu povus akiri,
kaj poste li elektu, ĉu la tergloba genero
damnindas aŭ savindas antaŭ la astro fatrumba.
Jen lasta enmiksiĝo de l' ĉielana popolo.
Post tio la tergento senakompane pluiros.

Stuporis la Najanoj pro l' determino prenita,

sed ĉiuj nun ekstaris kaj prikonsentis aprobe.

Finiĝis l' Asembleo Goba kaj ĉiu revenis
ŝabien. Ankaŭ Emme, kun svarmaj pensoj anime,
veturis siahejmen, apud la valo Noguel,
en arbareto Dujun. Lin tiunokte vizitis
Sooje rendevue. Baldaŭ kunvenis aparte
en kondiĉita ĉambro, sub la vitreca kupolo,
Emme kaj Inna, kiu nun pri Ŝinaro deĵoris
kaj konis kiel statas la Dilmunidaj aferoj.
Li ŝovis sur klaptablon la brile blankan *anoŭdon*,
pulvore kristalkuban, en travidebla cilindro.
Tiam parolis Emme al blondehara Sooje:
—Ho Inna, kiel ĉe la kazo de Uttu ni agos?
Kiu, laŭ vi, montriĝas la ŝanco plej oportuna
liveri la anoŭdon por plej konforma rezulto?

Jene respondis Inna al l' olivhaŭta Soraa:
—Ho Emme, vi ja scias pri l' metabolaj efikoj
de la anoŭdo, ĉar ĝi stimulas ĝuste la cerbajn
funkciojn, kiuj svenas dum l' asimila momento,
neŭronojn ekscitante je l' sepagrada nivelo.
Ĝi agas ekvilibre kaj kontraŭpeze balancas
per subkonscia montro de l' kompleteca realo
en si mem, kiu same al tuta mondo rilatas,
tiel ke homo povas retrovi pacon animan
kaj ne decidas solvon ĉe la pasioj abrupte.
Ju pli li malesperas, ĝi des pli multe vidigas
plej pozitivajn flankojn de la interna naturo.
Sed ni ne certas, ĉu ĝi en la teranoj efikos
same kiel en gobdoj, pro tio riskoj enestas.
Ĉe l' manko de plejparto de la tribanoj amikaj,
de Laŝmu, de l' edzino kaj de Puzuro braklerta,
Utnoa lamentadas kaj ŝanceliĝe pridubas.
Nun estas la momento por uzi ĝuste l' anoŭdon.
Mi mem ĝin malkomponos kaj senrimarke liveros,

ĉar mi tutkore pentas pri la paroloj akuzaj,
malprave eldiritaj dum la kunsido ĉiela
kontraŭ la terloĝantoj kaj la popolo de Dilmun.

Nun Emme prikonsentis. Ŝi tuj pretigis en ujo
la blankajn kristalkubojn por ekvarmigo nuklea
kaj metis en blovilon. Per ŝvebmaŝino veturis
ĝis la stacihaveno kaj baldaŭ flugis oave
al nubvindita globo, rekte al lando Ŝinara.
Ŝi venis, nevideble, ĝis nigra tendo de Uttu
kiam la nokto ombris. Interne Noa vigilis
apud la muta korpo de la amiko lojala.
Kanaj incensoj brulis kaj olibanoj aere
ŝvebadis, plenigante la duonluman etoson,
dum li senvorte veis en sia koro delira.
Kiel ĝirafo svelta sur Tanganjikaj ebenoj
kuradas frenezule ĉiudirekte tra frondoj,
serĉante sian idon, kiun leono faligis:
ĝi emus hurli, heni, kriĉi aŭ ronki reeĥe,
elbleki suferegon per krio laŭte sonora,
kiel ceteraj bestoj, sed tamen ĝi ne kapablas,
ĉar mankas al ĝi tute la voĉaj kordoj ebligaj;
ĝiaj angoroj koraj montriĝas nur tra l' okuloj
kaj ili ellegeblas en kaposkuoj agitaj
kaj en la hezitado longa per kiu ĝi kuras
tien kaj reen, ĝis sin al murda dento liveras
de la leono sama, kiu mortigis ideton,
tiel Utnoan voris la dolorego ĉebruste,
kaj li en gorĝo sentis nodligon preme sufokan.

Inna enblovis tenden, tra l' aperturo ĉehuma,
l' anoŭdon de l' memkono, vaporigitan odore
per la frekvenca ŝanĝo de l' molekula gravito,
kaj Uttu ĝin enspiris kun la parfumoj aliaj.
Lacego lin tuj venkis, ekkaptis dormo nebula
ĉar li enflaris drogon kaj l' aromaĵoj efikis,

dum ŝtele ŝi revenis al sia disko platena.

Ho Muzo, kiu scius pri la periplo de Noa,
krom nur li mem, sekrete, en subkonscio profunda?
El sia ŝipo Inna kaptadis, per riceviloj
sensoraj, ondojn mensajn kaj titankube registris
la spertojn kiam Uttu preter la tempo vojaĝis.

Li peze endormiĝas, katalepsie ripozas
kaj baldaŭ sin mem vidas ekster la korpo fizika,
kvazaŭ ŝvebanta nubo, dum scias larme lamenta
la korpon kun klinita frunto, en tendo viglantan
ĉe la amiko Laŝmu. Tamen surprize li sensas,
ke li ne plu suferas, ekster angoro troviĝas
plenĝoje kaj trankvile. Nun astrakorpe libere
en la aero flugas preter surmondaj afliktoj.

Li faris transvojaĝon laŭ dimensioj eonaj,
laŭ kiuj iu homo neniam iris evente,
por koni kio estos se la tervivo pludaŭros.
Utnoa ĉe si spertas: arĝenta lumo brilanta,
kiu lin ligas ponte al lia korpo de fibroj,
pograde pliminciĝas dum li flugadas aglece
al foraj regionoj.

Transiras tunelnigron kaj aliflanke videblas
jen galaksioj novaj kaj stelsistemoj aliaj.
Li venas vorticsuĉe al eta lumo planeda
kaj al li ĝuste ŝajnas, ke li perdiĝis erare
ene de ombra groto, laŭ vasta maro senlima,
dum lia cerbo strebas pri l' nova mondo diveni:
panpecon li supozas ŝvelantan meze de supo
sed poste arbareton, kiun lagbluo sieĝas,
fine insulon rondan kun riĉa flaŭro volupta.
Li jam alproksimiĝas, ŝvebas en luma nubaro
kaj aŭdas birdokantojn. Utnoa mire rimarkas,

ke ĉiuj sensoj korpaj en li persistas enigme,
ĉar li perceptas friskon kaj ŝajne vidas aferojn
kiel surtere, buntaj, kaj povas sperti flaraĵojn.
Sed memkonscio psikas ekster la korpo karneca
dum plumleĝere, mole, li enaere rapidas.

Alian astran korpon li nun ekvidas aperi
samtempe inter nuboj, je homfiguro similan,
brilantan silueton, en longa blanka tuniko.
Sed li rimarkas baldaŭ pri la kontura koloro,
ĉar dum la propra bluas, l' alia flave helecas.
Ĝi estas Valmikio, la mondefama poeto
kantonta pri la gloroj de l' princo Rama, heroo
de l' hindoj, kiu luktos kontraŭ demonoj uzurpaj
kaj ankaŭ kontraŭ si mem, por elmeriti la amon
de la edzino kara kaj de la propra popolo.
Inspire li rakontos pri l' universa naturo,
pri bestoj kaj simioj helpontaj homon amike
dum batalado kontraŭ ribelaj fortoj oponaj.

Tiu al li parolas permense, telepatie,
kaj ĉion sen malhelpo komprenas Uttu tre klare:
—Bonvenon, ho Utnoa, la multsufere draŝita.
Vi venis ĵus en mondon de entoj senmateriaj,
en kosmon pretertempan, kien vojaĝi kapablas
nur plej subtilaj korpoj, la ektoplasme faritaj.
Nenia transportilo ĉi tie vere necesas
kaj per metalaj ŝipoj neniel oni ĝisirus.
Ĉiuj futuraj ebloj en nia kosmo prezencas
sur disaj stelsistemoj kaj ĉielastroj arkanaj,
tamen aliaŝtofe, kvazaŭ en sonĝo febunta.
Ni ecas nuraj *nejdoj*, kiuj espere deziras
efektiviĝi iam en la venonto reala
kaj tio ja dependas de via daŭra klopodo
ĉarpenti savan ŝipon per goferligno flosonta.
Vi vidos ĉi la glorojn, kiuj future fariĝos

sur la konkreta grundo, el kiu vi originas,
se homoj pluekzistos sur la planedo lazura.
Kontraŭe ili restos ĉiam malplenaj eblaĵoj.
Mi nun vin akompanos laŭ nia mondo gvidiste.
Jen ni alproksimiĝas al kontinento nomota
Azio viamonde: jen estas ties imago.

Tuj sube sin etendis la vastaj landoj Aziaj
blumare ĉirkaŭataj, kun verdebruna koloro.
Nun Valmikio diras, montrante fingre je tero:
—Jen estas longa muro, la sola homa kreaĵo
kiu videblas ekster la atmosfero planeda,
murego de Ĉinujo, ĝin oni nomos iame
viamonde, simbolo de kunstrebado homara.
Ĉi tie staros skulpte skribaĵo ŝtona ĉi-tekste:
«Se volas vi kontroli, kion la homo miraklas
per kunlaboro krei, venu al Ĉina Murego».

Li akompanis Noan tra l' kontinento Nubronda
kaj sekve ili flugas al la grandurbo Pekino,
dum ĉion al li montras la blankebarba poeto:
—Jen vidu la pordegon de l' Imperia Palaco,
la Taj Miaon kaj ĉefturon de l' Ĥano Kublaja,
l' Altaron de l' Ĉielo, tie la Ponto majestas
de Marko Polo kun dek du marmorblokaj arkaĵoj
kaj pordoj de l' Sanktejo de la Budao Klinita.

Ili gruece ŝvebas al multeponta ĉefurbo
Suĝoŭ, inter abruptaj montoj, pentriste famega,
inspiro de poetoj kaj de sennombraj artistoj.
Poste vojaĝas suden al la insulo Javana,
Borobuduron vidas, kun sepnivela teraso,
dense skulptitajn ŝtupojn al la stupao precipa
majeste leviĝantajn ĝis obelisko severa.

Ambaŭ vojaĝas sekve al la insulo Sri-Lanka:

—Jen vidu kloŝpagodojn, ankaŭ Anura-Dapuren
kaj la Palacon Brazen, mil-kaj-sescente pilastran,
urbegon Sinhalesan, jen tie Polonaruvon
kun akrepingla Rankat kaj la Skribrula Pagodo.

Poste sin norden svingas al la Dunhŭanga grotaro,
ĉe l' neĝaj montoj Mogaŭ, laŭ la Irvojo de Silko,
kie kuniĝas artoj Ĉina, Bharata kaj ankaŭ
influoj Grekaj en pentroj, skulptoj hieratikaj
de l' tricent ŝtonaj grotoj por ermitvivo piula.

Al Hju-Ĉjan ili venas, ĉe la dezerto de Gobi,
kie leviĝas tombo de l' Imperia Majesto.
Jen centoj da skulptistoj plurloke tajlas argilajn
figurojn de soldatoj kaj de ĉevaloj en ordo
laŭ ĝustaj dimensioj, kiuj fosaĵe parados.

Sed tiam rendevuas alia brila ĥimero
malantaŭ nubo densa super la landoj Aziaj,
ŝvebanta en la spaco, kun alrigardo brovsulka.
Tiam ekdiras al li l' akompananto ĉi-vorte:
—Jen estas Hokusajo, grandega majstro de pentro,
kiu per gravuraĵoj floraj kaj bele pejzaĝaj
stelbrilos en junaĝo kaj pri l' naturo rivelos
per trajtoj plej subtilaj kaj per Mang-ŭao li kulmos.
De nun li akompanos kaj priinformos afable.
Adiaŭ, ho Utnoa, la espereblo de ĉiuj,
konstruu vian ŝipon kaj plu persistu labore.
Certe de vi dependas la supervivo de homoj,
ke ĉiuj ĉi belecoj iam fariĝu realaj.
Kontraŭe ili restos nur senkonsistaj aperoj
en nia fora mondo kiu miraĝe medolas.

Poeton adiaŭi Utnoa varme deziris,
sed manoj enŝoviĝis trans lian korpon eteran,
ĉar estis li nur bildo kaj futuraĵo nulombra.

Li malaperis baldaŭ kaj en la spaco vanuis.

—Ho vi, poeto rava —Utnoa kore lamentis—,
kial vi vaporiĝas antaŭ bonvola brakumo?
Tiom mallonge daŭras la amikeco ĉi-monde!

Nun Hokusajo diras al konfuzita nomado:
—Bonvenon, ho Utnoa, al nia mondo fragila.
Ne plendu pro la sveno de l' Valmikia figuro,
ĉar li revenos vere se l' ŝipon fine vi faros.
Ni estas iluzioj, nur entoj ene vakuaj,
tial vi ne sukcesos iun ektuŝi perpalpe
ĉar, kvankam astrakorpa, vi havas veran esencon.
Venu kun mi por vidi pri l' esperebloj en onto.

En lia akompano Utnoa superlibelas
la landon de Honŝuo, meze de maro safira.
Ili alflugas Kjoton, kaj poste Sanhusagendon,
la lignan konstruaĵon sur tuta mondo plej vastan,
sanktejojn ĝardenitajn kun harmonia primeto.
Kaj la pentristo fama al Uttu diras indike:
—Leviĝas jen Rjoanji kaj la palaco Kacura,
la Ora Pavilono kaj la Reĝhalo Feniksa.
Vidu sur stratoj longaj la girlanditan amason
dum la Printempaj festoj de la Floranta Ĉerizo.

Ili vojaĝas suden al Krung-Tep, kie kanaloj
serpentaj disas. —Jen rimarku la Pinglon Aŭroran
de la Pagodo Arun, multekolore fajenca,
la Grandpalacajn Templojn kun mozaika vitraro,
tegitajn per orpanoj. Jen sekve Benĉamabophit
kun gabloj nubocelaj, tegmentoj fajne pinaklaj.

La Katmanduan Valon superflugadas ebene
la vojaĝantoj: Noa miras pri l' Reĝa Sidejo
kun luksaj pavilonoj kaj pri l' Stupao de Ŝimbu.

Nun li rimarkas ombrojn en silvo, strange misterajn,
sed antaŭ ekdemando jam la pentristo respondas,
ĉar nur pensatajn vortojn li ĝuste povas ekkapti:
—Jen inter frondoj staras la Badgaona Reĝurbo
de l' Kvindek kvin Fenestroj kaj la Stupao Budaa,
el kies supro sondas la ĉionvida rigardo.
Ĉu vi, Utnoa, miras, pri la impona figuro
kun nigrokulaj rondoj, al pragiganto simila?
Ĝi signas eternulon, kiu trans tempoj esploras
en via korinterno, kie troviĝas unuo
de ĉiuj homaferoj, ĉar ĉio, kion vi vidas,
ĉu monumentoj, dancoj, pentraĵoj, festo, muziko
kaj ankaŭ la hombildoj alparolantaj intime
sub kiu ajn alvoko, ĉu Valmikio, Hokusaj
aŭ kiuj poste venos por akompani ĉi-monde
dum via transvojaĝo, tio troviĝas interne
de via propra koro, en praanimo kunhoma.
Do, kiam vi rigardos kreaĵojn arte fascinajn,
konsciu ilin verko de l' kolektiva memeco
kaj miru pri la grando de la homara naturo.
Sed ni daŭrigu l' vojon ĉar multo mankas ankoraŭ.

Ambaŭ facile ŝvebas al temploj sune rebrilaj
de Hindujo. Videblas skulptaĵoj volve serpentaj,
surrokaj reliefoj, kupoloj buklaj el oro,
voluptaj surpentraĵoj en frondoj milde karesaj.
Figurojn Uttu spektas de dancistinoj elastaj
sur fono de muziko ravanta sorĉe la sensojn.

Ili al Taĝ-Mahalo venas, la Larmo de Amo,
kiun majeste kronas orpingla svelta kupolo,
kun flankaj minaretoj, al la ekstero klinitaj
por ne endanĝerigi la monumenton omaĝan
al kara amatino, la preferata tenere.

Jen sub okuloj staras la multeplaca Lahoro,

kun la Moskeo Perla kaj la Palaco Kristala,
Ŝiŝ Mahal, kaj supere la mozaika Fuorto.
La tuta urbo glimas per la moskeoj orumaj
kaj vitrecaj sub suno alte brilanta radie.

Al Isfahano venas la vojaĝantoj eonaj.
—Jen antaŭ ni leviĝas la luksa volbo Madrasa,
garnita arabeske kaj per surskribaj aranĝoj
blanke farbitaj, ankaŭ la Luftullaha Kupolo,
kun pecoj ceramikaj kaj ornamado floreca.
Jen tie la kvin pontoj, el kiuj Ĥŭaju superbas.

Sed kion mi rakontu pri la belaĵoj aliaj
kiujn okulis Noa dum la vojaĝo sidera?
Ili tromultas certe por nur momenta raporto,
kvankam li, pretertempe, ĉion kontempli kapablis.

Tiam parolas Uttu sub la impreso ĉi-vorte:
—Ho vi, vizioj belaj, en ĝoja tempo havataj!
Eĉ se mi nur intuas vian utilon aŭ econ,
konscias pri la grando kaj animforto de kiuj
vin faros. Se vin levos posteularo venonta,
mi pacas kaj kvietas, ĉar kreoj alte mirindaj
valoras la klopodojn de nia vivo muela.

Kiel delfenoj migraj ekster la maro bluonda
saltas kaj glite naĝas apud kupreca kareno
velŝipa: ĝojoplenaj pro l' akompano de homoj,
sentime ĝin eskortas, kun ĝia ŝaŭmo ludante,
dum sur korala fundo bukcenon polpo tentaklas,
tiel plezuris Uttu dum la vojaĝo tratempa,
jam plene forgesinte pri la suferoj animaj,
kaj ĉion ekzamenis per admirantaj okuloj.

Sed nun alproksimiĝas alia homa vidaĵo,
kies konturo brilas kvazaŭ per suna korono.

Nun diras la gvidanto al la nomado denove:
—Jen estas Fidiaso, verva skulptisto Grekuja,
kiu la perfektecon al la homaro prezentos
kun plibeligaj trajtoj kaj grandigita mezuro,
en siaj verkoj ŝtonaj aŭ en arĝente metalaj,
plenaj je harmonio kaj kun vizaĝo serena,
por ke la homoj teraj al idealo klopodu,
vidante reprodukton de diaj ecoj en ili.

Nun Fidiaso diras per flugilhava parolo:
—Bonvenon, ho Utnoa, la ĉiuvoja nomado,
al la senesta mondo, nur respegulo de via.

Utnoa sin demandas, kiel li tuj rendevuis
sen ies priinformo, kaj sen antaŭaj anoncoj
pri lia nomo scias, ĉar lin pli frue ne konis.

Kaj nun la alveninto jene respondas al Uttu:
—Ekde l' antikvaj tempoj ni sciis jam pri l' vizito,
kiun vi faros al ni, ĉar inter ni ne troviĝas
divido de l' konscioj, sed ĉies penso komunas
kaj sen neceso aŭdi al demandanto respondas.
Nur tiel vi kapablos vere kompreni ĉi kosmon:
prefere ne vortumu sed nur akceptu travivojn,
ĉar la plejmulto estas ne klarigebla perbuŝe.
Eĉ se ni longe dirus pri ĉiu verko, faraĵo
de la venontaj homoj, vi ne atingus esencon.
Vi celu nur admiron, forĵetu dokton erudan.
Mi nun vin akompanos, ke vidu vi la eblaĵojn
de la futura mondo sur Kontinento Ĉizoja.

Jam Hokusajo svenis dum ili kune parolis.
Ambaŭ vojaĝas fluge al la insulo Rodisa
kaj vidas la Koloson, kiu diskrure traarkas
super la enirejo de blankesabla haveno.
Jen sub ĝi velas ŝipoj sen ia ĝeno, protekte

de l’ alta ŝtona skulpto, kun nuda brako giganta.

Ili spirfluge venas super multhoman Atenon,
kie la Partenono en Akropolo sublimas
kun di-statuoj flankaj kaj la frontonoj aludaj.
Jen Atenea Templo, jen Dioniza Teatro,
sur roko elĉizita, l’ Erektejono voluta
kun nobla kolonaro de l’ Kariatida Portiko.
Muregoj, monumentaj pordoj, triumfaj arkaĵoj
kaj temploj ĉirkaŭstaras la Telesterjon unikan.

Ambaŭ vojaĝas plue al Roma urbo riĉlaŭra:
—Jen l’ alta Koloseo kun marmorŝtono polura,
la Konstantena arko kaj statuego de Febo,
nobela Panteono kaj civitana Forumo.
Tie la Katedralo de Sankta Petro videblas
kun la skulptaĵo fajna de l’ Pietato Sidanta
kaj freskoj surplafonaj en la Finjuĝa Kapelo.

Laŭ Mediteranea bordo nun ili vojaĝas.
Li miras pri preĝejoj rondarke mure solidaj
kaj vidas majstron pentri en la interno, Taujle,
inter skafaldaj traboj kaj bildoj fume lulataj,
kiu al li permense jenaparole sin turnas:
«Ho vi, migranto monda, kial ĉi bildoj impresas,
se ili estas sole plenmistifike miraĝaj?
Decide rezolutu efektivigi l’ realon.
Jen nia daŭra voko, nia mesaĝo silenta:
ne kontentiĝu vane per admirado senplua,
ĉar la laboro vera sur konkretejo fariĝas.»

Sed nun jam Fidiaso al Dilmunido parolas,
gvidante lin denove en la rondira vojaĝo,
dum aŭskulteblas ankaŭ trobadorkanta muziko:
—Ni nun ŝvebadas super la Barcelona grafurbo,
kie alfingras nuben Sanktfamilia Preĝejo,

kun orgenblovaj turoj kaj Gŭejla parko fabela,
pri kiu vere ŝajnas, ke faris ĝin la feinoj.

Ambaŭ fringelas suden al la Alhambro Granada,
konstruo arabeska, la fama Ruĝa Fuorto,
kanaloj roje lirlas sub arkoj blanke hufumaj,
ebria labirinto, kie sangruĝaj oranĝoj
en akordiĝo franjas kun ĉielvoja cipreso.
Poetoj aminspiraj sur la muraro grafismis:
«Ho vi, ĝardeno bela, milsorĉa, kie la floroj
teraj kun steloj ĉielvolbaj vetlude konkuras!»

Nun al Lisbono flugas la vojaĝantoj Ibere.
Ĝiaj bulvardoj, placoj kun skulptoj lukse patosaj
mirigas Uttu Noan. —Jen la Palaco Somera
de Keluz, ekstermure, kun ruĝeblanka fasado,
kaj ĉe l' haveno vasta, la Monumento Naviga.

Norden tra l' Atlantiko nun al urbego vojaĝas
Uttu kaj Fidiaso: —Jen la Londona Fortreso,
la Ponto de l' Ĉefturo super rivero Tamiza.
Jen Vestminstere brilas subvide nun l' Abatejo,
kiu de l' tuta lando reĝhistorion ilustras.

Preter multfjorda maro kaj loga kanto Sirena,
jam super Varsovio alia korpo nebulas
kaj tiam la skulptisto al la nomado parolas:
—Jen bildo de virino kaj ŝia nomo Maria
Sklodovska, malkovronto de l' radiumo kaj ankaŭ
de l' polonio, edzohelpe, post streĉa laboro,
kio pri l' persistemo de l' grandaj homoj atestas,
sondontaj la naturon por utiligo komuna.
De nun ŝi akompanos en spegulkosma vojaĝo.
Adiaŭ, ho Utnoa, vi ne forgesu venontojn.

Tuj Fidiaso svenis kaj en la spaco vanuis.

Tiam Sklodovska jene al la nomado parolas:
—Saluton, Lemehido, la ĉiuvoje migranta.
Vi vidas nur la *nejdon* de iu homo futura.
Ni estas enkorpiĝo de la animo homara,
de ĝiaj esperebloj, kaj restos daŭre latentaj
se la goferan ŝipon vi ne sukcesos eklanĉi.
Mi nun vin akompanos tra l' regionoj Eŭropaj,
post tiuj jam viditaj en Fidiasa kuneco,
por ke vi povu taksi kiaj gloraĵoj eventos,
se homoj sur terglobo postvivos ŝance l' inundojn.

Al Moskvo nun alvenas la pretertempa geparo.
Rekte Sklodovska montras al la nomado l' aferojn
ĉar mense komunikas, sen eĉ ekmovo de lipoj,
sed ĉion kvazaŭ vortojn komprenas Noa, traduke:
—Jen Katedraloj bulbaj sur ora holmo ĉe Kremlo,
tiu de l' Ĉielporto kun kupolaro majesta.
Ene de la muregoj, la Facetita Palaco
kun inkrustaĵoj gemaj kaj diamante rebrilaj,
kaj en la Placo Ruĝa, la Katedralo de Sankta
Bazilo, buntkupola, kun fantazia dekoro.

Ronde tra Samarkando kaj la ĉielo Kieva,
la vojaĝantoj brizas al Norda Maro refluge
kaj vidas la polderojn de l' Zujdersia digaro,
kie la homtekniko, per la komuna klopodo,
sukcesos ŝanĝi marĉojn en produktivan ebenon.

Superŝvebante preter l' Atomiumo Brusela,
simbolo de l' esploroj en mikrokosmo kaŝita,
ili alvenas baldaŭ al la Pariza ĉefurbo
kaj nun la sciencisto al la nomado parolas:
—Jen staras Ejfelturo, matematike perfekta
konstruo, manifesto de la supera logiko
de homo; ĉio en ĝi plenekvilibre fariĝis.
Jen tie, antaŭ Luvro, la Piramido Kristala.

Versajlo, sunimpona, kie paradas alee
kreaĵoj de artistoj, kaj jen la Arko Triumfa,
centro de flama stelo, la dekdupinte radia,
ĉar dek du avenuojn en stela formo ĝi plektas.

Ambaŭ alvenas fluge al Venecio milonda,
kie senĉesa miro povas defali neniam.
—Jen tie Baziliko de Sankta Marko frisora,
la Horloĝturo, Ĉefa Placo ĉe l' Granda Kanalo,
kiu surborde plenas per domoj arke vidlogaj
kaj jen kun galerioj marmora Ponto Rialto.

Super Munkeno vidas la Stadionon Olimpan,
strukturon pleksiglacan, kiun ŝtaleca tubaro
subtenas, anticipon trafan al ekologia
konstruarto, ĉar tiu inter pejzaĝoj akordas
harmonie, kaj ankaŭ emblemon de l' nomadeco
monda de l' Olimpikoj per la tendego travida.

Ŝvebe super Vieno kaj urboj parke ĝardenaj
Uttu raviĝas kore pri l' simfonia muziko,
laŭ longfadena valo de l' riverego Danuba.

Al Istambulo venas la vojaĝantoj alaŭde,
miksejo de popoloj kaj verkoj bunte surprizaj,
el kiuj, luksorname, elstaras Sankta Sofia.

Samkiel, je l' venonto, tendosciuro fluglerta
per rugoŝelaj nuksoj surarbe ludos amuze
kaj ŝvebos inter branĉoj, helpe de haŭta tuniko,
en la tropikaj montoj de mildklimataj areoj,
dum ĝi neniel zorgos pri dikbekulo gapanta,
sturnego ergotpinta, preta ĝin ĉasi hokunge,
tiel plezuris Uttu dum la vojaĝo memkona
kaj ĉiuj korsuferoj en malproksimo nebulis.

Inter tulblankaj nuboj alia korpo videblas
kaj ŝi nun ekparolas al la nomado miranta:
—Jen Hipatia venas, novplatonisma pensisto
Aleksandria, kiu kultivos korpon kaj menson.
Elstare ŝi instruos algebron, geometrion,
astronomiajn konojn. Ŝi pionire sukcesos
dezajni astrolabon kaj densometron inventi.
De nun ŝi akompanos en la transmonda vojiro.
Ĉarpentu vian ŝipon kaj pro sufero ne lacu,
ĉar la futura mondo de via strebo dependas.

Baldaŭ Sklodovska svenas en atmosfero subtila.
La ĵusa alveninto salutas Uttun afable,
kaj poste komprenigas al la nomado responde,
ĉar li denove dubis pri tiumonda realo,
vidinte malaperi figurojn hele rebrilajn:
—Ni estas nur esprimo de spiritforto supera
kaj ĉiuj konsistigas nur unu solan unuon.
Tra mi vin alparolos la kolektiva prakono
de l' tagoj forpasintaj kaj de l' iame futuraj.
Mi nun vin akompanos por montri gvide la verkojn,
pentraĵojn kaj konstruojn tra l' Kontinento de Silvoj.

Jam ili pluvojaĝas kaj fluge venas Afrikon,
super Egipta grundo, la piramide roklarma.
—Jen kun lumturo luksa l' Aleksandria haveno,
impona konstruaĵo sur la insulo Faroso,
ĉe urbo kun skribrula biblioteko fiera,
kien pilgrime venos la scienculoj el ajna
mondregiono por ĉiubranĉaj studoj erudaj.

Baldaŭ ili alŝvebas al la sabloza Gizeo.
Inter kolonaj temploj, jen piramido Keopsa,
tiuj de Mikerinos kaj diokulta Kefreno,
brilantaj sub sunhelo per kalkoŝtona kovraĵo,
kaj la arkana Sfinkso, alrigardanta nenien,

saĝulo leonkorpa, nura kreanto de morgaŭ.

Ili vojaĝas suden al centpordega Teb-urbo.
—Jen la Amona Templo de l' Suvereno nubloĝa,
kien la homoj paŝas laŭ longa sfinksavenuo
el tiu de Luksoro; piemaj artokreaĵoj
kun hieratikaj skulptoj, surmuraj pentroj okrecaj.

Ambaŭ plu ŝvebas cele al alta-Nila Meroe,
ĉefurbo de l' Kuŝregno, kun multlegenda palaco.
—Jen la granitaj temploj, sunhomoj korpe lanhavaj,
laŭvicaj piramidoj, kiuj sagmontre leviĝas,
eternaj atestantoj pri postmorteco vivloga.

Nun ili flugas preter la Zeŭsa templo Cirena
kaj venas antaŭ Leptis Magna, de l' norda triopo
plej vasta centro. —Jen placo kun slabita Forumo,
tie l' Amfiteatro, la Baziliko Severa,
publikaj banodomoj, kun plankoj belmozaikaj.

Mevecaj vojaĝantoj venas al Kabo Tuniza,
kie Utnoa miras pri la kunfasko da urboj
kun splendoraĵoj artaj. Kaj el diversaj epokoj
li povas kontempladi, ĉar li ekstere troviĝas
de la reala tempo. Jen la grandurbo Kartago
dum masonaĵojn levas Siĥe-amanta Didona,
kun kiu li ekhaltas dumtempe teni babilon:
en templo jen pentraĵoj pri la heroaj eventoj
de l' ŝtorma Trojmilito, apud murego rokrufa.

Sed Hipatia rabas lin al Timbuktu ĉe sabloj,
kie argile belas la Djinger-Bera Moskeo,
kaj en la mezo altas tiu de Sidi-Jahia.

Tiam malantaŭ nubo vidiĝas bildo brilanta
kun aŭreolo flava, en robo bunte kolora.

La filozofo lin prezentas: —Jen nova figuro
al ni nun proksimiĝas, alia nejdo nomota
Sunĝata Kejta, glora imperiestro de Manding,
amanto de la artoj, de l' poezia beleco,
pri kies historio kantos mondfame *griotoj*
helpe de la *koraoj* kaj mildesona *balafo*.

Nun tiu ekparolas al la nomado ĉi-vorte:
—Bonvenon, ho Utnoa, al kontinento nigrula.
Vi venis nian kosmon por ke vi havu kuraĝon
la ŝipon finkonstrui, klare vidinte la kreajn
eblojn de samgentanoj en la venontaj aĝ-iroj.
Laboru do senĉese super la ligno gofera
por tio, ke l' homaro povu transvivi l' inundon
kaj sur la vera mondo ĉiuj fariĝu realaj,
tiel ke la naturo sian plenumon atingu.
Jam Hipatia svenis en atmosfero radia:
de nun mi akompanos dum la esploro ĉi-faza.

Ambaŭ al sudo venas, super la urbon Ifean,
kie Utnoa gapas entuziasme vibrante:
—Jen bronzmetalaj skulptoj, jen ceramike faritaj,
plenforme harmoniaj per ties belo natura.

Tuj sekve ili ŝvebas super la Golfo Benina,
kie l' Ifeajn kreojn artistoj majstre heredis:
—Jen la palacfasadoj bareliefe retablas
kaj plenas de figuroj reĝaj plej fajne ĉizitaj.
Tie skulptiĝis bestoj de la ĉirkaŭa medio:
jen arĝentitaj kokoj, jen la saltema gepardo,
tamburoj, braceletoj kaj orelringoj eburaj
kiuj prezentas homojn kun okulbrovoj enigmaj.

Ili nun flugas super la Dahomeja grandurbo,
Abomej, kie staras la ĉefpalaco, loĝejo
de reĝo Gezo: lin impresas bildara kroniko,

homaj kaj bestfiguroj, en dimensio laŭesta,
ĉizitaj sur la ligno, kupraj aŭ bronze muaraj,
purformaj reliefoj pri l' historio popola.
Utnoa plu raviĝas per maskvizaĝoj ebonaj,
tamburoj, ringoj, dancoj; kaj nun rakontan eposon
li aŭdas, kiun tra jarcentoj nur buŝe la bardoj
recitos, dum foiroj, por placanaro korlule.

Ambaŭ ibise ŝvebas super pejzaĝoj arbaraj
kaj Noa povas vidi per siaj mensaj okuloj,
plie sondantaj, funde, ol tiuj mondmateriaj.
Inter la densaj silvoj li plenatente rimarkas
jen bambukanajn domojn de l' regiono Baĝuna
kun homfiguraj tajloj kiel tegmentokolonoj,
modluraj garn-insignoj de praularo protekta.
Jen la skulptaĵoj Kisi, jen tiuj ĉi Senufoaj
kun stilizita belo, jen tiuj Mpomgŭe pordancaj.

Nun ekparolas Kejta al la nomado flugvorte:
—Multaj figuroj lignaj kiuj skulptarte sublimas
en la futuro svenos diseriĝante farune
pro la materialo, kiun vermido truronĝas.
Sed tio ĉi stimulos la inventemon Afrikan,
ĉar artistaro devos senĉese verve kreadi,
kiam antaŭaj faroj pro tempopaso kadukis.
Tial ĉi tiuj verkoj estos elstare novigaj.
Se ili ĉiuj restus, oni posedus enormajn
kvantojn en rareformaj stiloj, tratempe variaj,
antaŭ ol oni venos al la abstrakta poluro.
Ligneco ne signifas, ke ili malpli valoras
ol tiuj el marmoro aŭ el rezista metalo.
Arto sur materio knedas la homan animon,
kiu sin mem esprimi en la venonto kapablos.
Superan intelekton atendis longe naturo
l' esencon perceptigi kaj konkretforme riveli.
Arkitekturo, pentro kaj en Afriko precipe

skulptado sur la ligno elmontros, kun la ceteraj
belartoj kaj sciencoj, la hommedolon eternan.
Tiuj statuoj lignaj ne estas ja primitiva
manifestiĝo homa, sed ĝi elstaras elite
kaj grandan evoluon antaŭ apero bezonos.

Nun al Zimbabvo Granda la vojaĝantoj elane
venas, ĉefurbo brila de altnivela kulturo
inter Limpopaj akvoj kaj la rivero Kafue.
—Jen Rezidejo Reĝa el monumenta granito,
gardanta fajnajn meblojn, jen ceramikaj artaĵoj
kun porcelan-inkrustoj el Song-Ĉinujo devenaj.
Afriko en si fandas influojn dise venintajn
kaj ĝi future iĝos fonto de grandaj eventoj.

Etiopien ŝvebas nun la fluganta duopo
dum Kejta fingre montras al la nomado mirindojn:
—Jen temploj unurokaj de l' Lalibela Neguso,
norde de l' lago Tana, kasteloj rande de Gondar,
kaj sur insuloj frondaj, jen monaĥejoj opoble,
kie hombildoj buntas kun penetrantaj okuloj.

Al la marbordo, transe, alŝvebas jam la flugantoj,
ĝis la Meknesa urbo, kiu belture majestas:
—Jen la Sultanpalaco de Ismailo Mulajo,
buntekahelaj pordoj ĉe la murego triobla,
inter kiuj elstaras la Bab Mansur' Aleuja.

Kiel neĝblankaj cignoj milonde ĝoje zigzagas
tra l' ĉielrondo luma, inter nubaroj irizaj,
post kiam ĉesis pluvo sur Nakuruaj ebenoj,
kaj gaje ili pepas, sian ekzalton anoncas,
dum nigra leopardo disŝiras sube cervidon
sed ili plu, senzorge, ekster danĝero sinuas,
tiel Utnoa ĝojis kaj plenlibere troviĝis
dum sia transvojaĝo en universo reflekta

kaj li ravite miris pri la imponaj artaĵoj
de l' majstroj de Afriko sub firmamento lazura.

Ili el alto vidas la fortikŝultran Atlason
kaj super Atlantiko mild-alizee vojaĝas.
Montaro rimarkeblas en l' oceana profundo,
kvazaŭ cikatro muta, kvazaŭ vertebra kolono,
kiu la kontinentojn interrilate kunigas.
La akvoj ecas klaraj, la ondoj hele travidaj.

La vojaĝantoj svinge al Ameriko kondoras.
Ĉirkaŭrigardas Uttu kun plenadmira pupilo:
kanalojn, urbojn vidas meze de silvo liana.

Tra l' nuboj konturiĝas alia nejdo, longjupe
vestita en *okuŝmo* kaj blanka ŝalo *jakoja*,
kun paradiza birdo sur la hararo, flavruĝe,
gagataj orelringoj kaj tresoj blue rubandaj.
Sur dekstra brako sidas araneeca simio
kiu infan-tenere ŝin ĉirkaŭ kolo brakumas.
Sunĝata alparolas al la nomado prezente:
—Inter folioj venas jen Frida Kahlo, vizia
meksika pentristino, kiu spegulos akuŝan
kaj plensuferan mondon. Ŝi malfeliĉon ekzorcos
surtoligante rompon inter realo kaj revo.

Nun Kejta adiaŭas kaj neniiĝe vaporas
super ĝangaloj ombraj de l' Kontinento Duflama.
Utnoa jam rimarkis pri la palflava koloro
de l' nimba silueto kaj pri la svaga konturo.

Li tuj rekonsciiĝas pri l' senkonsista realo
de tiuj bildoj buntaj kaj de l' imagoj aperaj,
rememorante, ke ekster sia korpo li nunas.

Tiam ekdiras al li la pentristino serene:

—Saluton, Henohido, celanta riske nubrandojn.
Vi venis kontinenton, kie popoloj abunde
kreos en ĉiuj branĉoj artaj. Mi nun akompanos
por montri la kapablojn de la homaro futura,
tiel ke l' koro ĝoju antaŭ promesaj eventoj
kaj vi daŭrigu plue ĉe l' ŝipkonstruo kuraĝe.

La bildo nun aldonas al la nomado persigne:
—Jen tiuj reliefoj, kiuj la ordon eternan
de l' kosmo surŝtonigas sur kalendaro radforma.
Aztekoj kreos sunan kaj konos funde la ciklojn
de l' universaj astroj. Ili la sunon adoros
kiel ĉiesan dion kaj bonfaranton afablan.

Al Teotiŭakano nun la duopo hirundas,
ĉe la Teckoka lago: —Jen internube dupintas
la Piramido Luna apud Palaco Direĝa,
Kecalkoatla Templo, kun la Serpento Plumhava
kaj la pluvdio Tlalok, jen bazaristaj aleoj,
kaj dekstre, plej superbe, la Piramido de l' Astro,
ŝtupara kaj trunkeca, kie Suntemplo kulminas,
kun buntaj homfiguroj sur la muraro dekore.

Super Ĉiĉen-Icaon nun Frida Kahlo kaj Uttu
ŝvebas, ĉefurbon riĉan de la Tolteka-Majaa
kulturo: —Jen la Hejmo de l' Virgulinoj kaj alte
la Korto de l' Pilkludo, Konstruo de l' Militistoj
kun mil kolonoj skulptaj ĉirkaŭ la centra masono,
la Kukulkan-fortreso kaj la Sanktejo Helika.

Uŝmalo inter silvoj al vojaĝantoj aperas,
La artistino montras al la kunulo ĉi-vorte:
—Tie la Turo staras de l' Divenisto Magia,
kiun plenigas ĉie maskoj de l' Dio de Pluvo,
densaj bareliefoj, hieroglifaj enigmoj,
kaj meze piramidas la Gubernia Palaco.

Ambaŭ trans Nazkaj strekoj, la bestfigure liniaj,
celas Tiaŭanakon, sur altebeno situan:
—Jen Akapana Turo, kaj la platformo kolona
de la Kalasasaja, kie Pordego de Suno
elstaras ĉe la Puma-Punku kaj Reĝa Sidejo,
kun bustoj monolitaj, migdalokule rigardaj.

Al Maĉu-Pikĉu ŝvebas la pretertempa duopo,
kie sur kruta monto, ĉe Urubamba rivero,
elpendas roka urbo: —Jen blokoj fajne ĉizitaj
de Intihuatana, la Trifenestra Palaco
kaj nobelaraj domoj; jen l' enirpordo masiva
el kverka ligno, ŝtonaj ŝtupoj kunligas enurbe
la stratojn kaj la akvo kuras laŭ reto kanala
traroke konstruita. Vidu la bedoterasojn
de l' ĉirkaŭaĵo urba, kiuj abisme deklivas,
mirindan prilaboron de la homara racio.

Ĉu mi pri vi forgesos, ho indiana popolo,
pri la belformaj tendoj, kunplekte teksaj aranĝoj,
la dancoj, la rakontoj aŭ pri la kantoj aeraj?
Al nordo svinge flugas la vojaĝanta duopo
kie artaĵoj disas sur montoj, larĝaj ebenoj
far la Siuoj, Mandan, Paŭni kaj triboj apaĉaj:
jen ĉi surfelaj brodoj por tendoj stange konusaj,
por sakoj kaj manteloj; ĉe la marbordo kanuoj
kun pentraj dekoraĵoj el simbolbestoj, imagaj
marmonstroj kaj, surcedre, jen mastoj strige totemaj.

Nun ili venas norden al la markolo Beringa.
Tuj Frida Kahlo diras al la nomado klarige:
—Laŭ tiu mallarĝejo iam popolo trapasos
kaj ĝi fariĝos ponto por elmigrontoj Aziaj,
tiel ke la loĝantoj de l' kontinento Duflama
devenos de l' Nubronda, kun ili prae parencos

kaj fondos civilizojn, kiuj profunde similos.

Dum ili superflugas la kabon Kanaveralan,
malantaŭ hela nubo proksimen venas amike
novtempa korpo kosma. Baldaŭ sin turnas al Uttu
tiel la pentristino: —Jen la figuro de Nejlo
Armstrong, kiu senmovan sablon de l' Luno surpaŝos,
l' unuan astron ekster tero de iu homido
paŝotan, kio efektivos komenco de multaj
esploroj universaj. Nun li informe kunulos.

Noa brakumi celis sed liaj manoj eklevaj
trairis svagan korpon, jam vaporece nebulan.

Nun Armstrong ekparolas al la nomado klarvoĉe:
—Saluton, ho Utnoa, sur kies ŝultro troviĝas
la ŝarĝo de l' futuro kaj de l' idaro venonta!
Vi venis civilizon de la teknikaj atingoj,
kie la homo lernos mastrumi taŭge naturon.
La industrio kaj la informadika retaro
evoluigos ĉiujn landojn de l' tera planedo,
en paca harmonio kaj kunlaboro senjuga.
Mi nun vin akompanos tra nia mondo reflekta,
ke vi mem konvinkiĝu pri mia vera raporto.

Fulmbrile li eksagas, antaŭ Utnoa gvidante.
Li montras konstruaĵojn de longestrataj urbegoj,
kaj en la pretertempo la vojaĝanta duopo
alvenas al Novjorko, kie statuo radia
svingas multflaman torĉon de la libero revata.
—Jen svarmaj nubskrapuloj, sur mondo pleje majestaj
faraĵoj homaj. Tie staras pintego cementa,
Ŝtatdomo Imperia, kiu dumnokte neonas
kvazaŭ lumturo ŝveba kaj ĝia pinglo lazuron
atingas, tiel, ke ĉe l' nubaj superaj etaĝoj
inverse pluvas. Jen ĉi la Gugenhajm-a Muzeo,

helicoide forma, elkonstruita betone,
kaj jen la Sigram-domo, nigre scintila vitraro.

Al nordo ili milvas, al Montrealo havena,
kie kolosas alta, geodezia kupolo,
la teron prezentanta laŭ fundaj kernorilatoj,
en formo unueca kaj sendivide totala.

Nun ambaŭ ŝvebas super la Huver-Dama digego,
artlagon kuntenanta ĉe Kolorada Kanjono,
kaj vojaĝante venas al San-Francisko mirluma,
kuŝanta sur holmaro kaj trairata de pontoj:
—Jen l' Urbodomo kaj la Federacia Sidejo,
la Hejmo de l' Opero, la Katedralo gracia,
jen Ponto Oreporda, kiun gigantoj abisme
super rodakvoj tenas per la brakegoj elastaj.
Ĉu tiaj homaj faroj ne estas rave mirindaj
kaj ne demonstras plene pri la racio de homoj,
ĉar trafe al medio ili sukcesis adapti?

Preter Los-Anĝeleso, la kinoarta ĉefurbo,
kie videblas bildoj nur efemeraj ekrane,
la ekstertempa paro alvenas super Meksikon:
—Jen ĉi la Trikultura Placo, sintezo fiera
de la plej gravaj fazoj de l' historio popola:
jen Templo Tenoĉtitla, apude, Sankta Jakoba
Kirko kaj Tlatelolka ĉielskrapulo titana;
jen l' Universitata Biblioteko de l' urbo
kun bunta mozaiko laŭ artostilo frutempa.

Al Brazilio venas la astronaŭto kaj Uttu
preter arbaroj muĝaj de l' Amazona rivero.
—Jen Itimaratio kaj Alvorada Palaco,
la sobra Kongresejo kun skulptoj rare diversaj,
plej futurismaj domoj de urbo sorĉe kreita,
kie nur estis silvoj kaj la ĝangalo milarba.

La homo scios ŝanĝi ĉi tiun ejon efike,
en plena harmonio kun la ĉirkaŭa naturo,
kaj levi metropolon super vastaĵo regontan.
Tie skulptistoj, arĥitektoj, pentristaj ensembloj
plurlandaj kunlaboros en longa tasko revula.

Nun la duopo drivas suden al Bŭenos-Ajreso,
kosmopolita centro kaj multerasa krisolo.
Tie Utnoa miras pri la Kongresa Sidejo,
bulvarde ĉirkaŭata, kiu verdvolbas emajle.
Jen la Majplaco larĝa, tie la Domo Rozeca
kaj rande la kvartalo bunta, nomata la Boka.

Tiam al Noa diras l' akompananto pretera:
—Kun paso de la tempo, la Kontinent' Amerika
fariĝos kunfandejo de kontinentoj aliaj,
Afriko kaj Eŭropo kaj de Azio Nubronda,
sed same tra la mondo iam simile okazos:
sur ĉiu kontinento troviĝos alidevenaj,
tiel ke l' tuta globo fariĝos sola komuno,
la hejmo de la homoj kaj ĉies vera patrio.

Nun Armstrong adiaŭas kaj sunradie vanuas.

Utnoa plu vojaĝas laŭ Aŭstralio, garole,
tra l' verda Paskinsulo, Oceanio milera,
kie li surpriziĝas pri la pentrarto Sepika,
la Hŭaka-reŭareŭaj domoj en Nova Zelando
la bustaj statuegoj kaj l' Operdomo de Sidnej.

Samkiel trivostulo, la birdbaleno futura,
tiu evoluonta el la pingveno pelaga,
kribros planktonon grasan per osta reto ĉebuŝa,
ondojn de Pacifiko facile glite borante,
ĝis poste al surfaco ĝi venos spiri libere
kaj akvon, el naztruoj, gaje ŝprucigos al alto,

tiel raviĝis Uttu dum vojaĝado subsorĉa,
plenŝveligante pulmojn per milde puraj aeroj.

Noa vojfine ŝvebas super Antarkto glaĉera,
purnuda regiono, kiu l' unua fariĝos
proprajo de neniu ŝtato, tergloba posedo,
emblemo referenca de transnacia fratiĝo,
de la tutplanedeco de la homaro venonta.

Tiam aperas al li radia lasta figuro,
virina silueto, en olivverda tuniko
kaj tiu al li diras per alparolo miela:
—Ho Uttu, la nomado, kiun la fatoj elektis:
vi vidis niamonde aferojn nur virtualajn,
mirigajn espereblojn de l' universa naturo.
Vi spektis speciale kreaĵojn arkitekturajn,
ĉar tiuj ĉi elstaras antaŭ la homaj okuloj
kaj ilin kunproduktis la tuta terkolektivo,
tamen en ĝi troviĝas multnombraj alimediaj,
kiujn malkovrus sole esploro plie penetra.
Se tiajn la homaro venonte krei kapablas
tio signifas certe, ke ĝi grandecas anime
kaj indas je saviĝo el minacanta detruo.
Sed, krome, kion diri pri l' geniuloj apartaj
de l' estonteca mondo, spiritkulmino resuma
de l' tuta hompopolo? Ĉi tiuj povus ekesti
neniel se ĝi misus, sed ili sprosos abunde,
ĉar kolektiva kerno kapablas verve vivigi
ĉi tiajn esceptulojn, kiuj sendube ne gajnis
sian meriton, kvazaŭ el neniaĵo fariĝus,
sed estas pintrivelo kaj konkretiĝo reala
de la internaj fortoj el tuthomara talento.
Do se naskiĝos homoj en ĉiuj mondregionoj
kiaj Gotamo, Laŭzi, aŭ Mohamedo, Joŝua,
aŭ Hildegarda, Dikson, Aŭsten, Florenca, Broŭnela,
Lulio kaj Da Vinĉi aŭ Ahumada, Ŝikibu,

Lovlejsa, Tagor, Gandhi, Keller, Ĝibrano, Makoli,
Huajna, Ĥertek, Lumba aŭ la Sepika Mareko,
sennombraj famkonataj aŭ anonimaj eterne,
ĉu la homaro tera ne estas rajte savinda,
supera ekzistaĵo, evoluonta ĝis altaj
sferoj de la spirito, en nur konstanta progreso?
Se homoj malaperus io esenca ja mankus
al la naturo monda, la universo bedaŭrus,
kaj plu neniam eblus la perditaĵon akiri.
Ho, Uttu, savu homojn de l' finofara detruo,
tio de vi dependas, de l' entrepreno kuraĝa.
Persistu malgraŭ penoj kaj suferado lupunga.

La brila silueto iĝas pli svaga subite,
kaj jene ŝi aldonas al la nomado peturĝe:
—Adiaŭ, ho Utnoa, la espereblo de ĉiuj,
ĉarpentu goferaĵon por ke ĝi pretu flosonte,
kiam sur sekajn grundojn ruliĝos maro droniga.
Pri via celo kosma, homido, fide memoru.

Tiam la lasta nejdo, neniiĝante, vanuas.

Utnoan tuj resuĉas el la transmondo de revoj
kalejdoskopa flugo tra regionoj abismaj.
La ŝnuro lin liganta al lia korpo karneca
senrompe umbilikis dum la planeda vojaĝo
eĉ se tiome minca, ke ĝi videblis apenaŭ.
Sed dum alproksimiĝo ĝi nun pograde dikiĝas,
konturas pli konsista. Laŭ nigra truo funela
Uttu trapasas kirle kaj baldaŭ nove revidas
la hejmajn galaksiojn kaj la stelaron angulan,
kie troviĝas suno kaj la planedo blugloba.
Utnoa direktiĝas al durivera Ŝinaro,
ĉe Ur, la blanka urbo, kaj al tendaro silenta.
Nimbece enŝoviĝas en sian karnon unuan,
kiu dum tranco restis senmova, spire kvieta

apud l’ amiko kara, ĉe l’ fridefrunta kadavro.
Dum migro astrakorpa li spertis ĝojon anime,
nur pacon kaj trankvilon kaj en ekstazo plezuris,
sed liaj teraj membroj en korafliktoj amaris
laŭlonge de la nokto, dum regis ĉie nur ombroj.
Nun li forgesis ĉion, jam pri nenio memoris
el sia transvojaĝo al universo de nejdoj.
Nur restis svaga spuro en subkonscio profunda.

La nokto nigris, kiam homoj ĝuadas agrablan
dormon, sed Uttu Noa el sia sonĝo vekiĝis.
Li rememoris tiam pri l’ ĵus pasintaj okazoj,
pri l’ senindulgaj murdoj, la sango grunde fluanta,
kaj reflamiĝis kore lia angoro muela.
Kiel pitono skvama englutas vore gazelon,
kiun ĝi mortsufokis per ĉirkaŭpreno riprompa:
ĝi plektas postajn krurojn en sian buŝon oscedan
ĝis, glite, la antaŭajn en ezofagon enigas
sakforme; la pitono dum tuta nokto digestas
kaj je l’ mateno mankas nur enkorpigi la kapon,
sed kiam en stomako, kornoj viscere moviĝas,
la vertebrulon rampan suferigante terure,
ĝis tiuj, erinace, krevigas pinte la haŭton,
tiel Utnoan longe la dolorego konsumis
dum nebulnigra nokto, ĉe l’ mortkuŝejo de Laŝmu.
Kaj, rekonsciiĝante, al silentanto li diris:
—Ho Laŝmu, mia frato, kompaniulo de migroj,
kial mi endormiĝis ĉe via flanko trolace?
Dum vivo vi klopodis kaj ĉiam zorgis obstine,
celante nur la bonon de la popolo nomada.
Vi rajtas ripozadi, ĉar ĉiutage plenumis
vian surteran taskon per laborado senpeka.
Sed mi, la postvivinto, mi devus daŭre deĵori.
Do kial ne sukcesis dum nura nokto rezisti?

Kiam montriĝis suno sur horizonto purpura,

en tendon paŝis Oba, fratino juna de Laŝmu,
dum nokto ne povinta ĉe sia frato funebri,
ĉar ĉefajn honoradojn al Laŝmu oni tributis.
Ŝi preĝis sur la sojlo dum larmoj vange ruliĝis
kaj poste ŝi ekkaŭris ĉe l' tigrofela tapiŝo.

Utnoa supreniris al roka monto kaj pinte
li turnis jenajn pensojn en sia menso konfuza:
—Ĉu do ni pludaŭrigu ĉe l' konstruado savonta,
ĉu ni persiste celu al la insulo patria?
Por kio al ni bonus mildeklimata felando,
kie mielo fontas kaj fruktaj arboj abundas,
se tie ni solecus sen kamaradoj orfece,
sen vi, ho Laŝmu, frato, sen vi, ho Sara, ho Ŝeluh?
Por kio taŭgas penoj kaj ĉiutaga klopodo,
se korŝirantaj ĝemoj fariĝas sola rezulto?
Kaj krome ĉu ni rajtas al la insulo reveni,
se ankaŭ niabruste ekflamis funda malamo,
kiam trasiblis lanco kaj kore Laŝmun atingis,
kiam la tendaranojn ni vidis sange kuŝantaj
kaj kiam Aron provis faligi Ulmin el selo?
Ceteraj Dilmunidoj nun al militoj iradas
jam plene forgesinte l' instruojn pace konduti.
Eĉ ankaŭ nialande, en la insulo pratempa,
estiĝis krudaj luktoj kaj fratmortigoj amasaj.
Ĉu prave ne pli bonus ĉiesa morto prefere
ol tiom da malnobloj kaj koruptaĵoj insidaj?
Ĉies animo estas abomeninda kreaĵo,
kiu al mortigado kaj al krueloj inklinas.
Ĉu iel ĝin kompensas la ĉirkaŭfajra plezuro,
muziko, kundancado kaj rakontado fabela
aŭ la imponaj verkoj de la loĝantoj en urboj,
ĝisnuba Babelturo, buntbildaj temploj emajlaj,
bronzaj statuoj diaj aŭ milkrenela murego?
Ĉu ne prefere ĉion forspongu viŝe la ondoj,
la maraj faŭkoj glutu, ĉio subŝlimu kotlepre?

La bonoj de la homo estas mensogaj imagoj,
ĉar lia koro misas kaj ĝisradike perversas.
Ĉu oni savus frukton ĉar ĝia ŝelo kolore
ravas dum ĝi, profunde, en putra kerno malignas?
Ho dioj, kial do vi kreis la homan animon,
se en ĝi nestas venĝo kaj abomeno ĉiama?
Tamen, vi jam ekpentis kaj kun rimorso bedaŭras,
ĉar planas finekstermon de la homara popolo.
Neniu elsaviĝu el katastrofa fatalo.
Ni ĉiuj kune mortu, la homa raso viŝiĝu!

Je la matena mezo, dum suno alte radiis,
revenis Uttu Noa al la tendaro de Dilmun
kaj gvidis la alporton de l' frida korpo de Laŝmu.
Li kunaranĝis ŝtipojn kaj brancojn ĉiu kolektis
por suprenloki Laŝmun, meze de l' ŝipo funebra.
Li plenumigis ritojn ŝuldatajn nur al tribestro,
ĉar Laŝmu, laŭ Utnoa, dum la laboro pli rangis
ĉar li iniciatis, ke l' goferaĵo fariĝu.
Mirante, tendaranoj je la ordonoj obeis,
kaj ili ne protestis pro l' nekutimaj omaĝoj.
Ĉiuj konsentis kore pri la decido de Uttu,
kiu nun fosis sulkon ĉirkaŭ ŝtiparo brulonta
kaj verŝis miellakton el ceramika miksujo.

Utnoa, je la fino, sufokavoĉe parolis:
—Adiaŭ, Laŝmu, frato, via spirito liberu,
vi povu preternubi ĝis la insulo feliĉa;
ĉar vi ne rajtis vive, nun post la morto veturu.
Se vi renkontos Saran kaj mian karan ideton,
gepatrojn forpasintajn apud Babela muraro,
falintajn Dilmunidojn: samronde iru kolege
kaj via ŝipo estu la transportilo tra l' ondoj
aeraj por navigi al la hejmlando senbare.

Sekve li kaptis torĉon kaj al ŝtiparo li venis,

kie la frato kuŝas en la vestaĵo nomada,
sur felo de la tigro, iam de Laŝmu savita.
Li ekbruligis branĉojn de pintedorna rubuso:
millanga fajro kreskis el la kunfasko krepite,
kiu al la trabaro kaptiĝis suĉe-hirude,
ĝis fine l' tuta ŝipo kun ruĝa flagro brulegis.

Vekrion inter flamoj nun tendaranoj ekaŭdis:
la ĝemon de l' serpento, kiu surprue leviĝas,
kaj ĝi, en fuma nubo, baldaŭ forflugis aeren,
trenante kun si Laŝmun al regionoj abismaj.
La ŝipo disfaladis ĝis reduktiĝi je braĝoj,
kaj fulgaj traboj restis sur herbo sange makula.

Sesa kanto

Kiam forbrulis cindre la alta ŝipo gofera
kaj la esperoj vanaj de la popolo de Dilmun,
ili formigris silven kaj en ĝangalo rifuĝis.
Uttu kaj Oba, Jebuŝ, Girgas, la filo de Lehab,
Ŝabteha, Togar, Dedan, kaj Uzal, lerta ĉe rajdo,
kaj la nomadoj restaj, kiuj el buĉo saviĝis.
Laŭ arbaregoj densaj ili korŝire migradis
retrovi animpacon kaj esperante, ĉu iel
la dioj alparolos aŭ inter frondoj aperos,
se ili jam kapablis el la malamo seniĝi.

Post pluraj lunoj, piede de la montoj Urartu
ili elektis zonon apud torento susura.
Konstruis du kabanojn por elripozi l' afliktojn.
Sin nutris simplaforme per fruktoj riĉe variaj,
per dolĉaj mielĉeloj kaj per kremlakto kaprina,
ĉar iom el la brutoj sukcesis ili kolekte

savi, kaj atribuis al ĉiu taskodeĵoron.

Dume en la ĉielo Roa vizitis Arunnin,
kiu observe studis el sia ŝipo bluringa
la pliproksimiĝantan astron, terglobe minacan.
Kaj tiu al li diris per ĝojridanta mieno:
—Arunni, kamarado, jam ne necesos ekuzi,
verŝajne, la anoŭdon, ĉar Uttu Noa despere
bruligis sian ŝipon kaj pri l' intenco reveni
al Dilmun li rezignis, tiel ke l' savo popola
neniel eblos. Ŝajne Emme ne trafis elekti
momenton adekvatan por la livero de drogo
kaj ĝi efikis male al atendita rezulto.
Sendube, do, triumfos nia delonga projekto
popoli la planedon kaj finekstermi subrason.

Ambaŭ ekĝojis kore kaj reciproke gratulis,
la tagon atendante, kiam la astro ruine
renversos la terglobon kaj la homaro pereos.

Tiun vesperon saman la konciptago datsojlis
de Emme. Li en ĉambro de la ŝabio konektis
aŭdigilon: lumfasko en spiraltubo katode
radia sekvis sulkon por reprodukti la sonon
optike registritan laŭ akustika frekvenco.
Post kiam la gepatroj jam heliume gasiĝis,
li aŭdis la esprimojn dum la orgasmo fekunda:
gobdoj laŭ prakutimo per lumostrio registris
esprimojn de plezuro dum tiu nokto solena
signanta la komencon de la ŝaŭmeca vojiro
de nova homo, dum la nokto ĉe kiu geparo
celis libere uzi tiun aparte mirindan
kapablon krei vivon, kiun naturo herede
donis por evoluo de l' kosmanaro tratempe.
Li povis revivigi en intimeco de hejmo,
resperti la momenton de la genero somata

sine de l’ universo, kun kiu fande kuniĝis
jam la gepatroj, kiuj antaŭ sesdeko diurna
preskaŭ samtempe pasis, ĉar inter ili la morton
oni konscie povis ĝis alta grado reguli
kaj ambaŭ konvertiĝis je heliumaj atomoj,
fluontaj universe, meze de steloceano.

Je la mateno sekva, la familio grupiĝis
en kondiĉita ĉambro. Ili komune solenis
la datrevenon gravan per manĝo same modera
kiel je ĉiu tago, sed kun parfumaj agordoj
laŭcele preparitaj por specialaj okazoj.

Tiam parolis Emme en la kunsido ŝabia:
—Vi scias, samhejmanoj, ke la popolo nomada
bruligis sian ŝipon. Eble pri l’ ĝusta momento
ni jam eraris. Ŝajne ĉe la teranoj efikas
nur alimaniere la drogo de la profunda
memkono. Tamen ni ne rajtas ĝin uzi denove
kaj ni obeos strikte al determinoj Ajubaj
ne plue interveni, sed pri la faktoj atendos,
kiam l’ asteroido apud la tero ĉetanĝos.
Eble neniu homo el Dilmunida popolo
saviĝos, kio estas sendube alte probabla:
el ili ĉi-momente dekduo restas apenaŭ,
ĉar laŭ valida juĝo de l’ Tribunalo de Goba
oni prikonsideras el la popolo de Dilmun
nur tiujn Ur-irintajn, kiam ceteraj aliĝis
al la nomadaj vicoj, ĉe Ninevurbo batalaj.
Se miaj misaŭguroj efektiviĝos estonte,
jen estas la decido kiun propone mi diras:
ekkoloniu l’ teron, kiuj libere deziros,
sed mi preferas daŭre en la stacio veturi
serĉonte iun astron tra l’ vasta mondo ĉiela
kaj en ĝi mi pereos se ne troveblos akorda.
Ĉar laŭ mia konvinko, ni fornuligi ne rajtas

raciajn aŭtoktonojn, ties planedon okupi,
eĉ se nur supervivus homoj de gentoj aliaj
krom la Dilmuna. Mi mem jam senreturne decidis
dumvive pilgrimadi laŭ universaj irejoj
kaj tie disfandiĝi kiel gepatroj en oldo.
Ho vi, gepatroj karaj, jam heliume brulintaj,
vi daŭre konsiladis plue vojaĝi vakuon
malgraŭ sendubaj riskoj, por ne detrui la homan
rason kaj ĉiujn gentojn same respekti honore.
Se ni ekloĝus teron, l' aŭtoktonaro radike
alieciĝus. Oni la terkulturon atence
nuligus, krom se l' gobdoj je la tekniko rezignus,
ĉar tute malsimilas la evolua nivelo
de ambaŭ. Tamen kelkaj juĝas, ke nepre superas
la civilizo nia kaj eĉ ke tiu ilia
estas fordetruenda. Tiel respekti ne eblos
kulturon de l' terglobo. Ĉu racieco realas
kerna valoro homa, la dimensio precipa?
Kiu kun klaraj pruvoj ĉi tion povus aserti?
Ĉu nia civilizo estas entute pli ranga
ĉar konas atomfendon, konstruis pli da maŝinoj
kaj uzas la metalojn, platenon, ŝtalon, izuon?
Sed jen iliaj artoj: kion kompare valoras
tiu Gobana? Jen ritmaj dancoj, sorĉa muziko,
jen pentraj bildoj, skulptoj, arkitekturo majesta
kaj literaturaĵoj en ĉiuj ĝenroj apartaj.
Jen plej diversaj lingvoj, verto de l' kreo komuna.
Unu solnura lingvo en nia mondo ĉiamis,
ekstreme riĉa, rare bela, duoble mesaĝa,
kaj ni evoluigis altgrade telepation,
sed ĉe ni mankas tiu ege varia riĉeco
de l' teraj lingvoj. Ĉiu el ili propre prezentas
unikan konkretigon de l' esprimpovo homara,
kvazaŭ petaloj buntaj aŭ panoramoj irizaj.
Ĉu ni forviŝu ĉiujn, al unu sola reduktu?
Nia diverso sidas en la kunludo vivrola,

en parfummiksoj spertaj, en la pejzaĝa beligo,
sed ni respektu same belaĵojn de aliuloj.
Inter surteraj homoj ekzistas ja violento
ĉar ŝajne la pasioj en ili multe pli fortas,
sed ĝuste ĉi elano ilian arton ebligas.
Necesus praimpulsojn al krea vervo direkti
anstataŭ al detruo, venĝo, murdemo, malamo.
Ties inklinoj koraj esence plej pozitivas,
ĉar estas fundamento por transformanta progreso.
La homon terplanedan naturo certe bezonas
por realigi parton de sia esto profunda,
kiu ne estas sole metodikeca, logika,
sed ank' intuicia kaj kaskadanta libere.
Siajn internajn fortojn ili subdresi kapablos
por inventivaj verkoj en kunlaboro planeda.
Do ni ne partoprenu en fordetruo de ebloj
neniam plu estontaj tra l' universo hazarde.
Ho, ĉielanoj, kial popolo plie potenca
nuligu la genion de unu same valora?
Kial, en viva korpo, piedon mano rifuzus
aŭ ĝi, kun malestimo, fingrojn forhakus, okulojn
ŝirus? Eĉ kiam membro morbas, saĝulo kuraci
celas antaŭ amputi. Kaj nia devo, ĉi-kaze,
estus defendi homojn, ĉar ties miso ne kernas:
homaj potencialoj estas senfine kreivaj.
Oni eraras ofte per nur ekstera pritakso.
Sendube mi obeos je l' determinoj Ajubaj
ĉi-koncerne. Sed tamen neniu leĝo de Goba
altrudos kolonii kontraŭ memvolo planedon
kaj ĉiu ajn akceptos, ke mi daŭrigu vojaĝi
en nia kolonio, serĉe de astro loĝebla,
ĉu l' celon mi atingos aŭ senrezulte pereos
fandiĝi universe kun la gepatroj ardintaj.

Ĉiuj ĉirkaŭsidantoj post la parolo silentis
kaj ili, prikonsente, sin reciproke rigardis.

Jen estis Dunna, Busla, Evue, Noŭdu, la filo:
ĵure ligiĝis ĉiuj en Naj-stacio pluresti
kaj en etero drivi post renversiĝo detrua,
eĉ se la gobdoj rajtos surkolonii la teron.

* * *

La luno navigadis tra noktoj stele gravedaj
kaj vizaĝplenon montris al la homgrupo dufoje.
Aŭtuno preterpasis, la neĝa vintro sezonis
dum ĉe la du kabanoj la vivo daŭris ageme,
sed Noa ne sukcesis la spertojn mense forviŝi.
Samkiel elefantoj apud vastflua rivero
trovas sternitajn ostojn de pereinta kunulo,
kiun leono ĉasis dum antaŭjara tramigro;
nun nostalgie plendas per trumpetbleko sonora,
ĉar ili ĝin rekonas kaj rebildigas image
la korpon postrestintan, dum voris ĝin la hienoj
kaj nudekolaj grifoj, kiam rufulo trosatis;
kelkaj alproksimiĝas kaj rostre milde karesas
kranion blankedentan ĝin disrulante surhume,
kvazaŭ ĝin provus levi, ĉu eble forto reviglos,
samkiam ventro kovris per haŭtplafono la silvon,
kaj ili tie restas dum tuta tago lamente,
sed nun, celante voji, tiu perdinta la paron
jam ne rezignacias el afliktejo foriĝi,
tiel Utnoa spertis en sia koro ĉagrenon,
daŭre resopirante je l' forpasinta feliĉo,
kiam ĉeestis Laŝmu kaj la edzino beblula.

Matenon, kiam suno inter nebuloj ekruĝis,
Oba kaj Uttu paŝis al la torento helonda,
Ŝabteha kun Dedano kestojn salike fabrikis
dum pluraj migris paŝti al valdeklivo profunda.

Sur bordo Uttu diris al la fratino de Laŝmu,

trunke kunsidiĝinte, dum li rigardis al montoj:
—Jen la Urartusupro, jam surkovrita de neĝo.
Herbaroj prujne dornas kaj blankfestone la branĉoj.
La akvoj ne plu plaĉas al la palato soifa.
La suno mornas kvazaŭ patro perdinta la filon.
Arbaroj senfolias, senbirdas, rosoj abundas,
venas malvarmaj longaj noktoj dum kiuj aere
ne eblas plue dormi. Ĉielo pale mienas,
plumbas obskure kaj la luno, malgaje brilanta,
frostas kaj sombras kvazaŭ spegulo spire blovata.
Ĝia vizaĝo sulka, eĉ kiam alte zenitas,
trembrilas, ne plu helas, kiel la frunto de Oba
post la forpaso frata, post la pereo de Laŝmu.
Ĉiuj kreskaĵoj mute ploras, vapore kovritaj,
dum orfa sunleviĝo, inter ŝirkrioj akutaj
de *naŭkroj* kaj *razuoj*: pro la kontakto glacia,
la fiŝmanĝantaj birdoj mergiĝi plu ne kuraĝas.
Antaŭan ĉarmon perdis dense kreskantaj *oluoj*
kun faltaj foliaro, stamenoj, velka kaliko,
kun nur tigeto nuda kaj subpremate de frosto.
Senberas dornarbustoj, *adzuoj* migre vojaĝis.
Venis sezono venta, kruda sezono de fridoj.
Nur morto superregas kaj la neĝaroj eternaj.

Utnoa sondis distojn preter la monton Urartu
sed Oba lin rigardis kun perle larmaj okuloj.

Dum ambaŭ kune sidis ĉe l' rivereto murmura,
tiuj irintaj valen ekvidis fumon alarme,
kiu ŝvebadas strie kaj inter arboj aperas.
Silente ili venis nur pri danĝero timante,
alproksimiĝis ŝtele kaj interfronde pupilis.
Okuloj eklumiĝis, ili rekonis amikojn:
jen Jubal, Letuŝ, Efron, kompaniuloj iamaj.
El arboj elkurinte, ĉiuj kun ĝojo salutis.
Sin turnis ankaŭ Jubal, kaj kun surprizo leviĝis

la restaj Dilmunidoj al Ninevurbo migrintaj,
kiuj ĉe fajro sidis por herbtrinkaĵo matena.
Brakumis geamikoj kaj emocie gefratoj.
Jam multis la demandoj. Jebuŝ hastvorte rakontis
pri l' ĵusaj okazaĵoj kaj siavice demandis:
—Kiel vi venis tien ĉi? Jen Utnoa kaj Uzal
troviĝas valosupre, kabanojn brancĉe ni levis.
Venu, ekmanĝu iom kaj poste ĉiu detalos
pri l' respektivaj sortoj, okazoj mise fortunaj
nin forpelintaj silven, ĉar survizaĝe videblas,
ke vi klopodis multon kaj suferadis angore.

Kiam eksciis Uttu, ke lia frato revenis,
lia kunfrato propra, ĉar Ada ambaŭ akuŝis,
sed li nur duonfratis al Tubal kaj al Naama,
li ĝojis en la koro kaj kun ekzalto jubilis.
Saltleve kurrapidis al sia frato kaj ambaŭ
ekstaris vidalvide. Nun larmorule brakumis.
Samkiel leopardo ĉasinta ruze simion
nun estas malkovrata de l' tuta grego minace
kaj lasas sian predon, provante ŝirme rifuĝi;
ĉar arboj ne utilas, kien simioj egale
grimpus, ĝi serĉas kaŝon en plej proksima trunesto
de nigra fakoĉero; la hundokapaj atendas
en profundega muto, ĝis leopardo trompiĝas:
kiam ĝi ŝovas korpon, sen iaspeca saveblo
estas kaptata svinge, dispecigata de manoj
kaj dentoj ŝirpotencaj de tiu trupo timinda,
tiel la ĝojo venkis, momente, kore de Noa
kaj svene forviŝiĝis liaj premsonĝoj amaraj.
Utnoa rememoris pri la junaĝo de Jubal,
kiam li enamiĝis al la filino de mastro
najbara, ĉe Zabazo, kaj edziĝinte laboris
super kamparoj riĉaj de la bopatra bieno;
kiele li plezuris ĉe l' taskoj agrokulturaj
kaj bredis abelkorbojn. Ĉar multaj el la popolo

plu migris, alveninte al herbograsaj ebenoj,
sed kelkaj sidloĝiĝis por kultivado de ruroj,
kiel pratempe estis sur la insulo patria.
Kvankam de sep generoj la familio de Uttu
daŭre nomadis, tamen ili regule revenis
ĉe la ceteraj triboj sidantaj ĉirkaŭ Zabazo,
apud-Nineva fluo, ĝis la popola kolekto
decidis forvojaĝi pro la konstantaj agresoj,
murdoj kaj trudpostuloj antaŭ proklamo milita.
Fruajn pactempojn li memoris, sciante Jubalon
kompano de suferoj, ĉar ankaŭ lia edzino,
Lafku, estis rabita dum rajdosturmo senhelpe,
post kio li kunmigris al sunsubira marbordo.

Kiam fordronis suno kaj brilis steloj en alto,
ĉiuj nomadoj ronde, ĉirkaŭ ŝtipfajro sidiĝis
kaj post vespera manĝo, laŭvice Uttu rakontis
l' okazintaĵojn lastajn: la forvojaĝon Ururben,
la ŝipan ekĉarpenton, neatenditan atakon,
la morton de l' plejmulto, de Laŝmu, Sara kaj Ŝeluh,
kaj fine la cindrigon de l' pereintoj, escepte
de Laŝmu, kiu brulis nur post tri tagoj omaĝe,
en la gofera ŝipo, meze de fajro ripronĝa,
kaj pri l' decido veni al nigra silvo, proksime
de l' sankta Urartmonto, ĉu estos dia mesaĝo.

Poste Utnoa diris al sia frato demande:
—Kaj vi, ho Jubal, kio al vi ĉi tempon okazis,
kiel nun fartas Tubal, kiel Naama la milda?
Ĉu Jareb plue sanas, kion pri Cila vi diros?
Ĉu ili tende loĝas apud Nineve la fora?
Informu nin pri l' fratoj kaj samgentanoj amikaj,
kiel l' aferoj iris antaŭ grandurbo Nineve?

Tiam komencis Jubal kun ĝema brusto paroli:
—Ho Uttu, vi demandas pri doloregaj okazoj,

ne malpli korŝirantaj ol kiujn ĵus vi raportis.
Ĉu do vi volas droni en nefinebla sufero
kaj ĉiam rememori nur pri senĉesaj afliktoj?
Tamen, se vi deziras kaj kun insisto petegas
traaŭdi ĉiujn plagojn de la nomada popolo,
mi ekrakontos.
»Kiam al la tendaro ni venis
de la nomadoj, kiuj ĉirkaŭ Nineve sieĝis,
jam brulis ĉiuj triboj per furiozo milita,
tiuj antaŭe pacaj kaj plenkviete ripozaj:
kiel piedirantoj sin kelkaj arme preparis,
aliaj rajdotrejne, sur kurĉevaloj eglumbaj,
polvnubojn tien-reen dum bruska sturmo levadas.
Ĉiuj armilojn serĉas. Kelkaj frotante poluras
leĝerajn ŝildojn rondajn, purigas brile ponardojn
sur ŝtonoj; ĉiuj ĝojas je la svingado de flagoj
kaj ekzaltiĝe aŭdas la militkornon ekmuĝi.
Marteloj sur ambosoj multloke ritme resonas,
batante kapŝirmilojn aŭ ĝustaforme kirasojn,
kurbajn suringojn forĝas la oston gardi tibian.
Spertuloj ŝildojn teksas per manfleksebla saliko,
kiuj protektos brustojn ardantajn venĝodezire;
ĉiuj forgesas amon al la paŝtejoj agrablaj
kaj al kamparo: lanco la pluga fero sin turnas.
Grupiĝas gejunuloj, sojle patrinoj eliras,
ravite, el ŝaffelaj tendoj por vidi pasantajn
armeanojn kaj miras pri l' senutila kuraĝo,
pro kiu poste ploros kaj korŝirite bedaŭros.

»Vale kunfluis trupoj de la nomada popolo
kaj jam distribuiĝis, tendojn ĉirkaŭe metante.
Kun siaj rotoj venis Magog, de l' lago Dumea,
pro kiu komenciĝis tiu milita ribelo,
kaj lia filo Tarŝiŝ, plej lerta plekti ruzaĵojn.
Li kapitanis vane tribojn de l' gento Kiduma.

»Helpe alvenis Naftuh sur sia ĉaro fiera,
per palmoj ornamita, kun batalsperta ĉevalo.
Liaj tribanoj portis ĵetlancojn kaŝe feritajn
per dense svarmaj dornoj, kun ronda supro ĉepinte.
Ili himnadis laŭdojn al fruantikva heroo
en kolektiĝo nokta ĉirkaŭ la fajro solene.

»Piede staras Cohar, ĉirkaŭvestita per felo
de leonego rufa, kun kortimiga buklaro,
kovrante sian kapon per la makzelo, ĉe kiu
plubrilas blankaj dentoj, dum li terure paradas.

»Troviĝis tie ankaŭ Hadurim, kiun akuŝis
Limna inter lupoj kaj apud fajro ŝi lasis.
Lin akompanis multenombraj paŝtistaj amasoj,
tiuj loĝantaj alte, ĉe l' monto Sajru truroka
kaj Dodananoj. Ankaŭ dista popolo nutrata
far rivereto Cemar. Ne ĉiuj ili kun armoj
venas nek sonorigas kaskojn aŭ ĉare veturas,
ĉar ili ne kutimis je la kruela milito.
Ilian kapon kovras lupfela ruĝa kapuĉo,
plej ofte piednudas aŭ felsandale promenas.

»Jen ankaŭ kompanio de l' buklebarba Ruuma
el olivarbaj kampoj ĉirkaŭ ĉefurbo de Jobab
kaj la popoloj Maved, kiujn laŭ mezo dividas
Ronaj, fluanta ombre, la malfeliĉa rivero,
kiu postploras ilin kaj pro l' foriro bedaŭras.

»Tendumis aliflanke, apud poplegoj apartaj,
Mibsam, plej malamika je l' fama nomo Nineva,
kun siaj samgentanoj, kies armilo fariĝis
stangoj senpinte krudaj, longarimene ligitaj,
kaj buntfiguraj ŝildoj, kverkligna ŝirmo ĉefrunte.

»Multnombraj kiel ondoj de la rivero Ŝinara

kiam ventkirlo turnas la vintran akvon agite,
aŭ kiel spikoj segataj de falĉisto de Uruk,
dum firmamento eĥas sur horizonto tambure,
tiel rebrilis ŝildoj, tondre la tero tremadis
sub galopantaj hufoj kaj martelfrapoj ambosaj.

»Jam la sekvantan tagon de nia veno ĉe ilin,
je l' frua matenhelo oni kunvokis ariĝon
de ĉiuj nomadestroj kaj konsilistoj apudaj
en speciala zono, meze de l' disa tendaro.
Tiam ekstaris Magog, kiu militon impulsis
serĉinte interligojn en la nomada popolo
kaj estis rekonata kiel la estro supera,
kaj jene li ekdiris en konsiliĝa kolekto:
—Ho ĉefoj kaj tribanoj el ĉiu gento nomada,
kies loĝejo estas nur la senlima lazuro.
Ni jam dum tri monatoj Nineven longe sieĝis
kaj ĵus aliĝis al ni ankoraŭ unu tribaro,
la Henohida gento. Ni fortas jam supervenki
la urbon, eĉ se Jokŝa en la misio fiaskus
atingi la subtenon de la popolo Kudeba.
Sed tamen ni atendos ĝis li revenos informe,
ĉar tiel ni promesis. Kaj Ninevurbo dumtempe
ankoraŭ pli febliĝos pro malsatado taglonga
kaj ĝi kapitulacos antaŭ reala supero.
Nun mi proponas sendi al la reganto de l' urbo
tuttriban ambasadon por komprenigi ĉi faktojn
kaj provi lin konvinki je la postuloj, akordoj.
Se li ne cedos iel, la urbon venke ni prenos
kiam revenos Jokŝa, ĉu kun sukcesa rezulto
aŭ sen aliĝoj pliaj, ĉar ni sufiĉe potencas.

»Tiam parolis Cohar, per leonfelo kovrita:
—Kial ni plu atendu, se por konkero ni fortas?
Jokŝa forvelis longe antaŭ la luno Sivana
kaj eble li ŝiprompis aŭ jam suferis embuskon.

La trupoj maltrankvilas, ĉu ni senfine prokrastu
kaj lasu ke Nineve subtenan helpon atingu
de la najbaraj urboj. Ĝis nun ĝi sole ricevis
taĉmentojn sensignifajn, sed ĉu ni risku pli longe?

»Tiam respondis Naftuh, en palmoazo loĝinta:
—Cohar kaj militestroj de la nomada tribaro.
Vi scias, ke filinon Rimuŝ nuptigi promesis,
antaŭ militkomenco, pro subtenado favora,
al Tarŝiŝ, heredonto de la tribaro Kiduma.
Se fine li konsentus pri tiu ĉi alianco,
ĝi signus nian venkon kaj l' ekzekuton evitus
de ĉiuj prizonuloj kiuj kaptiĝis enurbe.
Se l' murojn ni alsaltos, sendube ili pereos
kaj ankaŭ nenombreblaj el nia propra ligrondo.
Ni urĝu Ninevreĝon ĝis li komprenos aperte,
ke l' solvo preferinda estas akcepti postulojn,
kiam li ekkonscios pri nia forto kreskanta.

»Malgraŭ ke al Coharo la eblo pri la edziĝo
de Tarŝiŝ ne agrablis, ĉar donus ja superecon
al lia tribo, tamen, li fine devis akcepti,
ĉar sciis pri la sento kaj opinio plimulta
kaj ke enurbe sidas mem lia frato, Ukudo.
La estroj ĝin aprobis kaj intertraktis elekti
dek du reprezentantojn de l' tendeloĝa popolo,
kaj el Dilmuna tribo, laŭ la propono de Tubal,
en konsilista rango mi mem kuniri volontis.

»Kiam montriĝis suno inter skorpioj oranĝaj
ni rajdis al muregoj, ĉiu kun blanka rubando
ĉe renversita lanco signante pacomision.
Ni estis enlasitaj tra l' cedroligna pordego
kaj venis al palaco de la regnestro de landoj.
La reĝo aŭdiencis de sur ŝtuparo marmora
en vasta antaŭkorto. Sur lignoseĝo sidiĝis

veninte palankene de trans brokata kurteno
kaj liaflanke staris la reĝidino Masaja
kaj ankaŭ kapitano kiu nomiĝis Uŝumo.

»Post deca klinsaluto la buklebarba Ruuma
prezentis la mesaĝon de la nomada kunligo:
—Ho reĝo de Nineve, nian averton aŭskultu.
Ni fortas venkkonkeri sed celas pacan akordon.
Rekonsideru l' paktojn, kiujn vi faris antaŭe,
konsentu l' edzinigon de la princino kronrajta
kun Magogido Tarŝiŝ el la popolo Kiduma.
Tiel sekuros triboj kaj ankaŭ urbo Nineve
kaj eblos daŭra paco sur vasta lando Tiglata.
Ni depostulas sole: tuj liberigu ĉefulojn
de la nomada gento kaj kondiĉaron akceptu.

»Li sekve laŭte citis ĉiun postulon apartan
kaj inter sepo estis abolicio tributa,
libero ĉie paŝti, kaj ke la triboj akordos
inter si mem sentrude pri l' distribuo de zonoj
kaj fiksis je limdato l' unuan tagon Elulan.

»La reĝo primeditis kaj al Ruuma sin turnis:
—Ho vi, reprezentantoj de nebridebla genero.
Mi prikonsentis svaton de la princino Masaja
antaŭ ol ambaŭ filoj neatendite pereis.
Sed nun ŝanĝiĝis tute la koncernantaj aferoj,
ĉar ŝia edzo iĝus la heredonto plenrajta
kaj tio ĉi signifus netolereblan uzurpon.
Mi jam decidis ĵuse alian edzon asigni,
kiu sendube scios la regnon taŭge regadi.

»Ĉi-punkte intervenis la reĝidino Masaja:
—Ho mia patro, Rimuŝ, bonvolu vorton aŭskulti.
Kidumoj vin ja helpis dum la milito Darbila
kaj ili ĉiam agis kiel popolo lojala.

Kial ne fidi ilin? La urbo kaj la nomadoj
ekkonus pacon daŭran per tiu ĉi alianco.
Eblus interdiskuto per reprezento duflanka
por determine fiksi la sumojn rajte pagendajn,
la paŝtokampajn limojn kaj ĉiuj tion akceptus
sub unu sama rego, en komunuma konkordo.
Kvereloj trovus solvon, ĝi signus novan etapon
de glata kunvivado: tendanoj kampe liberus
kaj la urbanoj povus tralande ŝanĝe komerci.
Ĉiuj ceteraj urboj lernus pri l' pacharmonio
kaj ĉesus trudoj, raboj kaj la milito barbara.

»La reĝo brovosulke al la princino rigardis
kaj post silento longa sin turnis al la senditoj:
—Mi devas prikonsulti la konsilion enurban.
Vi havos la respondon sur Arka placo publike
antaŭ la tuta urbo. Dume, vigligu la fortojn
en reĝa gastsalono. Heroldoj vin akompanos.

»Ni estis kondukitaj al luksa ĉambro palaca
kaj sklavoj surtabligis manĝpladojn plej delektindajn,
el kiuj servistinoj invitis preni laŭvole.
Jam ni senpaciencis kiam heroldoj ordonis
sekvi al centra placo, por la publika promulgo.
Ni venis al ebeno kie seĝaro leviĝis
por reĝakompanantoj. Inter eskorto soldata
ni staris vidalvide. Sub ekzaltiĝaj aklamoj
alvenis ombrelĉaro, stirata bride de Uŝum.
La reĝo nun desaltis kaj post saluto sidiĝis
sur preparita trono apud princino Nineva
kaj baldaŭ li ekkriis: «Oni komencu laŭorde.»
Tiam sur dekstra flanko homkoridoro fariĝis,
soldatoj pelkondukis kaptiton, kiun unue
ni tute ne rekonis, sed Hadurimo surprize
flustris, ke temas ja pri Ukud, la frato de Cohar,
unu el plej gravaj ĉefoj de la tribaro Leona.

Li iris honte nuda kaj estis suĉe magreca,
sendube pro l' torturoj kaj enprizona malsato.
Kun ŝanceliĝaj paŝoj li stari povis apenaŭ:
verŝajne oni vipis ĝis brula karno la plandojn,
ĉar poste mi malkovris sangspurojn polve desegnajn.
Tiam li nin rigardis kaj dum momento mi povis
rimarki fuĝan brilon de malespera petego,
kiam li jen rekonis inter ni mem Hadurimon.

»Aperis nun el fundo, du viroj ŝvele muskolaj,
kiuj lin sterne ĉenis al kvar palisoj en mezo
kaj ekis sian taskon: unu per breĉa ponardo
ektranĉis sur longfingro, ĝuste sur pinto, desupre,
dum la alia verŝis, sang-lave, akvon abundan,
sekve, de la polekso ĝis manradiko li sekcis;
tuj unupece ŝiris manhaŭton kune kun ungoj.
Nun, retirinte ĉenon, al brako ili transiris.
Komence Ukud kriis kun nekredemo, surprize,
sed baldaŭ krevis fontoj de lia ŝrika kapablo.
Neniam ja mi aŭdis tiel despere kriegi:
li ne plu estis homo sed karnamaso sufera.
Masaja, horortreme, ne povis teni pli longe
kaj provis sin forŝteli el tiu kruda vidaĵo,
sed Rimuŝ apud seĝo ordonis resti devige.
Sole la dioj scias, kiam finmortis Ukudo:
lia kriado svenis nur kiam oni priširis
la ventron kaj femurojn. Sed ĝis la fino la korpo
de temp' al tempo, spasme, plue skuiĝis ankoraŭ.
La ĉefekzekutisto montris fiere la haŭton
kompletan, inkluzive de la hararo, vizaĝo.
La reĝo nun ordonis alnajli haŭtoĉifonon
super precipa pordo kaj ĵeti reston al hundoj.
Post tiu elmontrado ni ja ne sciis iele
kien nin turni save sed hororplenaj atendis.
Tiam ekstaris Rimuŝ kaj al la grupo parolis:
—Jen estas la respondo. Vi povas pace foriri.

»Indigne kaj konsterne, sed tamen tute senvorte
ni ĉiuj kune rajdis. Kiam ni venis al tendoj
rakontis l' okazaĵojn kaj furiozo senlima
leviĝis inter homoj. Sed nun Coharo precipe
ne povis sin mem regi kaj al la trupo komandis:
—Ĉiuj kunprenu armojn, ni kuru venĝi la morton
de Ukud, nia ĉefo, kaj ni eksterme flamigu
la urbon senindulge, sur ŝtono ŝtono ne restu!

»Sed Tarŝiŝ tuj oponis: —Nepras atendi revenon
de Jokŝa laŭakorde. Nur tiam venko sendubos
kaj eble Ninevreĝo rekonsideros, agnoske,
sian sintenon nunan antaŭ la dato fiksita.

»Jene respondis Cohar al la admono de Tarŝiŝ:
—Ho vi, freneza kapo, malplena ŝtipo kaduka!
Kiele vi supozas, ke l' reĝo ŝanĝos ideon
post la kruela murdo de mia frato kaj ĉefo?
Kaj kial plu atendi ĉu iam Jokŝa revenos?
Ni sturmos tute solaj se vi poltronas ataki.

»Konsilojn ĉiuflankajn li ne plu volis aŭskulti,
sed zonis siajn armojn kaj faris same la viroj
de la Leona gento. Ili Tarŝiŝon akuzis
pri volo superregi popolojn tende loĝantajn
per malhonora nupto kun la princino Nineva.
Ankaŭ kontraŭ Kenidoj, provantaj bride reteni
taĉmentojn de Coharo, skolde sin turnis aliaj:
—Jen nanoj el la tribo de l' leporkora Henoho,
kiuj konsilas pacon kaj abstinenci de luktoj.
Kial do ili fuĝis je la milita komenco?
Sendube ili estas nur perfiduloj, obeaj
al reĝo de Nineve por nin persvadi rezigni,
kaj rekompencan sumon de l' potencurbo ricevos
se ĉesos ribeladoj, aŭ sekurecon enlandan!

»Nun Geter, Coharano, alparolinta ĉi vortojn,
per glavo batis Eldan, kiu malhelpis lin rajdi,
kaj vundis fruntomeze nian kompanon admonan.
Vidante flui sangon de la amiko genua,
lancon Teraho svingis kaj, sur la ŝildo trafinte,
Geteron pro la frapo el la ĉevalo renversis.
kaj tiu nukpuŝiĝis kontraŭ krestaĵo de roko.
Bataloj tuj ekflamis pro l' koleriĝo ĉiesa.
Tie miksiĝis viroj el pluraj triboj impete,
dum Coharanoj frontis precipe kontraŭ Kidumoj,
sed ankaŭ pluraj homoj el nia gento vundiĝis.
Mi ne rakontos, Uttu, pri l' katastrofo detale
ĉar tro doloras ŝiroj de tiu buĉo milobla.
Ĝi daŭris ĝis sagvunde ankaŭ Coharo pereis
kaj liaj samtribanoj tuj retiriĝis al tendoj,
kiam la ombroj falis sur kampoj sange banitaj.

»Tribestroj asembleis por pridiskuti ĉi-nokte:
la rotojn Coharanajn decidis puŝi de l' ligo
kaj ĝis revenos Jokŝa ĉiuj ratifis atendi.
Sed, siaflanke, Tubal en la kunsido proklamis,
ke lia propra tribo de la milito flankiĝos
pro l' murdoj interfrataj kaj kalumnioj insultaj,
sed ili kunbatalos nur en okazo defenda.

»Kiam leviĝis suno sur horizonto purpura,
taĉmentoj de Coharo jam pretis lasi la ligon:
forlevis kampadejon kaj direktiĝis al montoj.

»Noktmeze, post tri tagoj, jen sentinelo rimarkis,
ke ombro de rajdanto el Ninevurbo rapidas
survoje al la tendoj. Ĝi estis ĝuste Masaja
kiu, preter kontroloj, maskite povis eliri.
Al Tarŝiŝ-tendo kuris kaj pri freŝdata novaĵo
ŝi nun heroldis. Krome, ŝaffelon rule ŝi portis

kun karba desegnaĵo de urboplano Nineva,
sur kiu ŝi indikis pri la situo de ŝaktoj,
kie kaptitoj sidas kaj pri l' lokiĝo de fortoj
por faciligi venkon super la urbo Tiglata.

»Baldaŭ tra la tendaro diskonatiĝis aferoj
kaj brustoj perturbiĝis pro l' ĵus donitaj informoj:
la tuta Aŝurio jen kunĵuriĝis inside,
kvin urboj aliancaj kontraŭ nomadoj oponos:
Aŝur kaj Badtibira, Larak, sunkulta Sipparo
ligiĝis al Nineve, la metropolo Supera.
Freŝe senditaj helpoj jam morgaŭ l' urbon atingos.
Tiam la asembleo de l' maljunuloj atakon
decidis senprokrastan por ĝin konkeri pli frue.

»Kiam elvenis suno sur ĉaro junge leona,
popolaj armeestroj dismetis trupojn en ordo,
jam plene forgesinte la rivalecon antaŭan,
frontonte rezolute kontraŭ tirana ĉefurbo.
Tamen la frato Tubal, ĉe l' riverbordo, malsane
sidis kontraŭ fraksena trunko. De branĉo potenca
pendis kverkŝela kasko kaj enuantaj armiloj.
Li tute ne fortikis enmiksi sin ĉe la luktojn,
eĉ se li jam decidis retiri sin kaj tribaron,
ĉar lin ekkaptis febro pro serpentmordo vipura,
sed li ne volis resti sur tendkuŝejo flegate.
Pastro de l' Kadma gento al li pociis amarajn
herbojn, plukitajn ĉe Abdalo, sed daŭre li febris.
Ĉirkaŭis lin dekduo da tendaranoj eskortaj,
kaj inter ili mi mem, pro lia propra deziro.
Li nun min komisiis batalon sekvi de monto,
de kie mi kapablos ampleksi tutan ebenon,
kaj per heroldoj Kenaj informi lin akurate.
Malgraŭ mia intenco resti por helpo bezona,
mi devis lin obei, ordonon nepre plenumi,
kaj al la supro rajdis, akompanate de Letuŝ.

»Jam marŝis al la muroj militistaro nomada,
la kapitanoj tribaj antaŭ rajdistoj elektaj,
ĉiuj laŭ propra grupo; kamparoj brunaj ekardis
flame per brilaj armoj, per ĉaroj kupre ĉizitaj.
Ankaŭ Ninevarmeo elmarŝis baldaŭ el urbo,
kun lancoj subaksele, kirasoj glime poluraj
kaj rekte respegulis la sunon alte lumantan,
kio konfuzis tribojn, miksa malordo kreiĝis.

»Ambaŭ armeojn, same, granda kriego trakuras,
pafarkojn ĉiuj strecas, ŝildoj alfrunte leviĝas.
Plektiĝas interpuŝoj kun furioza muĝado,
grundon ekkovras lancoj, klingoj kaj sagoj akregaj.
Sub koliziaj batoj la tuta tero korusas.
Ĉielon malheligas lanca tempesto nebule
kaj sama senbrideco ĉiujn al murdo trenadas.

»Ho dioj, kiajn vundojn mi devis spekte rigardi,
dum fulme sur kamparo bildojn mi vidis aperi
de spertoj travivitaj en la Zabaza bieno,
kvazaŭ fatamorganojn, kiuj konfuze miksiĝas.
Kaj al mi dum momento sur batalkampo sin montris
la grupoj de Tarbanoj kiuj dum vintro rigora
por kolektado sternas sub olivarbo katunan
tolon kaj batas drupojn per longa brancĉo tubera,
jen dissaltante hajlas grandaj maturaj olivoj,
dum knaboj ĉirkaŭplukas tiujn ekstere ruliĝajn
ambaŭmane kaj tretas tolon viole makula:
same faladis homoj sur ĉiuj flankoj abunde
kaj herbo jam farbiĝis per rosa sango priverŝe.
La vojoj polve nubas; la rajdantaro Nineva
ĵetiĝas inter trupojn sub densa hajlo de lancoj.
Ĝis astroj supreniras la ĝema klamo de tiuj
falantaj en la reton de l' falkostringa Ninurta.

»Simaj, Nineva ĉefo, sturmis nudglave Ruuman
kaj per pikego boris surbrustan ŝirmon urledan,
preter tunika lano el blanka ŝafo farita.
Li, kiu iam estis la defendanto de paco,
ricevas klingon flanke kaj ĝi tra lumbo penetras.
Li falis en la polvon, obtuze kave resonis
la senutilaj armoj kaj lastaspire li veis.

»Ankaŭ vin mem, ho Abid, vidis surdenti la kampoj
Aŝuraj, ungumantan per viaj manoj etendaj
landon de ploroj. Nun vi tombas sur grundo humida,
kie miksiĝis sango de ambaŭ partoj egale,
ĉirkaŭbrakante teron, kiun vi longe deziris!

»Soldato el Aŝuro, kun ronda kasko penika,
ekpafis longan stangon kaj ĝin en buŝon apertan
enpikis de Hadurim, ĵus ekkriinta kuraĝe.
La vokoj ne utilis kaj helpalkure ne savis.
Lin vindis frua morto kaj profundigis en ombrojn.

»La Mavedestro, Jiŝba, pafis multnode kovritan
rugŝelan pintostangon kontraŭ la frato de Uŝum.
Tamen, ŝirinte nur la nubojn, ĝi hume pikiĝis.
Tiu al Jiŝba tondris: —La frapon vi ne evitos,
kiun merite donos tuj mia brako potenca.
Li diris, ekstarinte, kaj svingis alte la glavon.
Inter tempioj junaj laŭ fruntomezo dividis
Jiŝban kaj la senharajn vangojn per hako lipsega.
Ene de mortangoroj, jen membroj spasme rigidaj,
sternitaj sur la grundo, armiloj sange banataj,
jen la cerbaĵo flua. Kapo, hakita duone
en du egalajn partojn, monstras dispende ĉe ŝultroj.

»Nun tiu puŝas lancon tra bovofela kiraso
de l’ Mibsamido Serak, kiu batale kubutis
je Nugum, ĉefamiko. Ĉi tiu lasta rapide

alkuris, per la dekstra mano subteni falonton,
sed la vundilo sekvis transe la vojon amaran
kaj same ĝi traboris brakon helpeme kurintan,
kiu ligate nur per nervoj pendolis inerte,
ĝis pugno senkompata ĝemanton glavis apude,
sur tiu apogitan, kaj ambaŭ morte kuniĝis.
Rojon el densa sango li sputis buŝe, torente,
dum falis ĉiuflanke la batalantoj orgiaj.

»Ho vi, kamparoj belaj, kie iame mi loĝis
antaŭ la sturmoraboj de la soldatoj el urboj,
antaŭ la forbruligo de mia hejma muraro!
Kio do jam fariĝis mia edzino junaĝa?
Vi alitempe estis mia sidejo beninda,
kie mi laboradis en milda paco, sed nune
mi vidas vin plenplenaj de hororaĵo milhanta!
Kiel kampulo plugas, dum la aŭtuna sezono,
vastajn stoplejojn por ke fruktu la greno denove
kaj soko boras breĉon tra ŝtonoj grince veantaj;
li turnas ŝvitan bovon, al kamporando veninte,
ĝis inter ĉifonnuboj skarlata suno subiras,
aŭ kiel lignaĵisto hakadas ulmon akute
disflugigante splitojn ĝis trunko brue falegas,
tiel batalis homoj kaj sulkan vundon apertis
sur dorson malamikan aŭ brakon tranĉis eĉ oste.

»Kronheredonto, Uŝum, pri l' bronza ĉaro fieris
kaj pri l' ĉevaloj nigraj, kurantaj polvanebule.
Li insultadis ĉiujn, kiujn mizere buĉadis,
la hufoj de l' krinuloj vunditojn piste muelis,
postsignojn ruĝe stampis laŭ vojo ĥore lamenta.
Unun li lancas frunte, tiun per klabo nukrompas,
du elhakitajn kapojn de ringo flanke pendigas
kaj tiujn li elmontras je freŝa sango gutantajn.
La Ninevurba princo daŭrigas morte masakri
inter nomadaj vicoj, sur brila ĉaro kurante.

Li lance vundas Hiron, el Ŝuah ĵuse venintan:
lia metio estis fiŝa kaptado ĉe bordoj
lagaj, kie li loĝis en kotemura kabano,
sed fiŝoj ne alkuris kaj lin ne helpis amike,
sangon ne lavis akvoj, kiam li sinkis en ombrojn.

»Mibsam alsturmis kontraŭ la ĉampiono defia,
brilan ponardon svingis, sed tiu, lerte manovra,
ĵetis soifan lancon al la kverkŝele kovrita:
tempion ĝi traboris kaj kojnofikse ĝi tremis.

»Nun vi, ho Naftuh, forkolapsis stertore genue,
la palmoj adorataj per ŝildo vin ne protektis,
nek mirh-incensaj nuboj sur praheroaj altaroj,
kiam trasiblis sago, kiu la pulmon disrompis.

»Li poste ĵetis ŝtonon, el tuja roko ŝiritan,
kontraŭ Dumugin, akompananton amuzan,
amikon de dancado, kies plej granda plezuro
estis agordi ritmojn helpe de liro sonora
kaj kanti sub lunlumo pri la printempa sopiro.
Ĝi trafis lin surbuŝe kaj tutvizaĝe frakasis,
miksiĝis sangaj ostoj kun la cerbaĵo krania,
kaj Uŝum tuj resaltis al sia ĉaro sunora.

»Furioziĝis Tarŝiŝ kaj alkurinte rapide
al veturilo, kroĉis bridon, perpugne timonon,
kaj ĝian kurson fleksis. Trenate, pende de jugo,
la ŝultrojn li malkovras, vipadas lin la ĉaristo.
Tamen li plu rezistas kaj kun turnita vizaĝo
kriegas por alhelpo ĝis fine rukta deskuo
sub akson lin renversas. La radoj lin abomene
tretas. La pintekaska alproksimiĝas irite,
mandorse glavas kontraŭ fortika kolo de Tarŝiŝ
kaj senkapigas. Nun postrestas surherbe fitrunko.

»Kolero pli ol iam en ĉiuj sinoj ekardas,
vidinte morte fali la militestron, amikon,
koroj saltege pulsas en demoniĝo freneza,
buĉonte oni strečas ĉian impetan elanon.
Kiel kampuloj falĉas dum la rikolto Tamuza
hordeajn spikojn blondajn sur multpapava teraso,
garbojn vimene ligas, trinkas el kruĉo ripozi
kaj ŝarĝas rakoĉarojn vespere porti draŝejen,
en korboj ventumonte kaj per forkego dupinta;
aŭ kiel dum vinfaro en rokĉizita premejo
knaboj ŝprucigas moston dum tretas gaje grapolojn,
tenante sin je ŝnuroj ligitaj hoke solive,
la mosto fluas ŝaŭme, ŝvelas ĝisrande siteloj
kaj tuta kavo plenas per vinodoroj intensaj,
tiel ŝvitadis homoj dum la kruela batalo,
celante malamikon per sia klingo trabreĉi
en malcedema lukto. La rajdantaro grupiĝe
kaj la piedirantoj, kun malespera kuraĝo,
senpaŭze, korpalkorpe, sin en batalo buĉadis.
Leviĝas al ĉielo la kriegaro tumulta.
Ĝemas patrinoj, knabinoj en tendaro veploras,
dum la diaĵoj surdas indiferente, nubregne.

»Kiu *edimmu*, kiu homo senlarme rakontus
tiom da disdetruoj kaj da masakroj acerbaj,
pri tiom da mortintoj, fratoj surkampe hakitaj?

»Sed tamen, ĉu vi volas scii pri l' sorto trafinta
niajn familianojn karajn, pri Cila, Naama
kaj Tubal, la kunfrato? Dum sange homoj ebriis,
Irud, kun animzorgo, sin antaŭ patro prezentis,
petante jam permeson eniri helpe batalon,
ĉar falis multaj homoj: Naftuh kaj Jiŝba pereis
kaj mortis ankaŭ Tarŝiŝ sub radoparo de Uŝum
kaj kvankam la estrecon nun Magog arde reprenis
la nomadana ligo en danĝereco situas.

Pro la insista peto kaj memorigo pri mortoj
de Arin, de Lemeho kaj de l' edzino, Tubalo
konsentis ke eniru, sub ĉefkomando de Jareb
pluraj Kenidoj, kiuj al la miksiĝo galopis.
Irud serĉadis sole la Ninevprincon Uŝumon
kaj lin sur ĉaro vidis svinganta ronde la klabon
kaj baldaŭ li ekkriis per fidoplena parolo:
—Min helpu la Plejalta, li mem direktu la lancon
por vundi malamikon kaj el batalo forigi.
Li diris kaj tuj ĵetis de malproksime siblantan
stangon, kiun repuŝis ŝildo orplate kovrita
de l' militestro. Kaj ĝi flugis pikiĝi ĉe ventron
de Ninevan' amika. La malfeliĉa falegis
pro bato destinita nur al alia. Okulojn
al la ĉielo levis kaj en mallumon eniris.

»Ĉagrene la Nineva lancpafis kontraŭ Irudon,
klivis lamenojn kuprajn kaj tra tavolo duobla
el vila taŭrofelo, la protektaĵo de ŝildo,
ingvenon lanco spilis kaj haltis daŭre tremante.
La kapitano ĝojis vidante flui la sangon,
saltis de sur la ĉaro, komisiinte bridiston,
kaj elingigis glavon pendantan dikafemure.
Li sturmis ardoplene kontraŭ Irudo falinta.
Jam invalida, kripla, piedon pene trenante,
fleksinte sian korpon pro l' dentgrinciga sufero,
Irudo retiriĝis, la kara filo de Tubal,
kun lanco pikiĝinta tra lia ŝildo, trabronze.
Tiam ensaltis Jareb meze de l' paro rivala,
spektinte la misvundon de lia frato kun ĝemo:
kiam la Ninevano per alta pugno terure
pretis surfrunti kontraŭ Irud, haltigis aŭdace
la baton, kaj ĉi tiu povis el kampo kubute
forrampadi, sub kovro de ronda ŝildo leĝera
de l' frato, al ĝojkriaj kaj alarmvokaj amikoj,
kiuj kontraŭe pafis per sagoj hajle pluvantaj.

Sed tiu firme tenis en furiozo bolante.

»Tamen, sensaĝe, Jareb tiam impulse troriskis,
lia kolero kreskis ŝvele pro l' fratagonio.
Li frontis la Ninevan, sed jam la dioj *utukku*
elŝpinis la fadenon de lia vivo bobene
kaj lin la mornebrova apud akselo traglavis,
ĝis ortenilo puŝis la klingon trempi ruĝinke.

»Dume la patro Tubal, ĉe l' riverbordo flegate
de la patrino plora, kun varma frunto deliris.
Sendinte mesaĝistojn, ĉiumomente demandis
pri siaj filoj karaj, kiel batalo tiriĝas.
Mi mem alrajdis ĵuse informi lin pri l' okazoj,
sed dum mi alparolis, kun nebuleca pupilo
li min rigardis svage kaj je la fino li flustris:
—Ĉu vere efektivas la hejminsulo de Dilmun?
Ĉu eble pravis Uttu, ke ĝi hazarde troveblas,
ke ni forgesu krimojn kaj venĝon kontraŭ urbanoj?

»Alportis ĝuste tiam nomada roto surŝultre
la korpon de Irudo, sur branĉoplekto kadavran.
Meze de la kompanoj la spiron laste li blovis
kaj la animo trista al Aralluo vojaĝis.
Jam lia patro Tubal de malproksime rekonis
ŝirplendojn kaj veplorojn, pri l' katastrofo drakunga
li baldaŭ antaŭvidis. Kroĉante min je la brako,
ŝancele li ekstaris kaj al branĉlito li venis.
Li tuŝis lian frunton, super la nigra hararo
ekĵetis grundan polvon kaj al ĉielo levinte
la manojn li ekkriis: —Tiom vi kore deziris
batali, mia filo, ke mi konsentis aprobe
vin sendi al detruo, kiun mi kulpe generis.
Ho ve al mi, mizera, nun mi envere rimorsas
pro l' peka dividiĝo de la popolo de Dilmun
ironte al Nineve. Nun mia vundo pli brogas.

Mi mem, ho mia filo, per mia krimo makulis
vian nomon; mi puŝis vin al mortigo fi-plaga
kaj la popolon tendan, kiu nur pacon amikis,
mi ĵetis en sangbanon, pri l' tradicioj avulaj
forgesis mia koro kaj celis venĝon obsede.
Mi pentas nun pri l' diroj kaj senpripensaj akuzoj.
Se vi kapablos veni ĝis kie Uttu troviĝas,
admonu lin persisti en ĉarpentado ŝipleva,
surmare reveturi al la insulo de paco.

»Tiam denove venis el la miksiĝo heroldo.
Pri l' morto li raportis de lia filo pli aĝa.
Nun Tubal, konsternite, preskaŭ freneze turniĝis,
ŝtormaj kontraŭaj pensoj en lia koro tumultis.
Li jam ne sciis, kiucele sin turni rigarde,
nigraj okuloj fajris per briloj ŝajne demencaj.
Sed fine li ordonis, ke la ĉevalo pretiĝu
kaj li survestis armojn de sia filo karega,
ankoraŭ makulitajn per ruĝa sango koagla.

»Dume ploradis Cila nur misaŭgure ĉe tiuj
novaj militpreparoj, kaj duonmorta ŝi kaptis
sian ŝvitfruntan filon inter la brakoj akuŝaj.
Sed Tubal surseliĝis helpate de kamaradoj,
ligis ponardon ŝultre, dum malespere ŝi plendis:
—Ho Tubal, je l' Plejalta, vi ne forrabu la solan
esperon kaj subtenon de mia aĝo grizula.
Eĉ se mi iam petis kompensan pagon al urboj,
montriĝis la eraro kaj kuntrenata rikolto.

»Kun larmoperlaj vangoj, Naama staris apude,
kaj pro l' sufero rozis ŝiaj bovidaj okuloj.
Tiam respondis Tubal al la patrino ĉi-vorte:
—Ho Cila, mi petegas, min ne turmentu vipleze
per viaj tristaj larmoj kaj per koŝmaraj omenoj,
kiam mi rajdas ŝancojn de l' falkostringa Ninurta.

Mian limdaton morti ne eblas plue prokrasti.

»Nun siajn nigrajn buklojn sub bronza kasko protektis
kaj ambaŭmane prenis po du ĵetlancoj akutaj.
Kun trupo ekgalopis kaj sturmis vigle, brakleve,
meze de l' interdraŝo kun koro arde bolanta.
Kaj ankaŭ mi alkuris por kunmiliti samsorte.

»Vidinte tiun ĉaron de l' kapitano Nineva,
li svingis batalilojn al proksimeco venante.
Blinde pro galhumoro lancon post lanco ĵetegis,
sed tiu, sperte ruza, haltigis ŝilde la pafojn
de l' patro malespera. Jen Tubal karakoligis
trifoje la ĉevalon per ĉirkaŭturno rapida,
sed la pintkaska tenis stare per firma piedo.
Trifoje la vastŝultra el sia korpo repuŝis
ĝangalon da ponardoj pere de ŝildo bufronda.
Sed fine, ĉagrenite pro tiom longa barakto,
vidante la impeton de l' instiganto furia,
li celis kaj lancpafis kontraŭ tempion arĝentan
de la ĉevalo, kiu baŭmis kun heno ŝiranta,
hufe la venton skurĝis kaj, refalante kapsinke,
bridoperdintan mastron sub peza korpo sufokis.

»Alkuris la Nineva, perpugnis glavon el ingo
kaj ŝovis en la gorĝon de l' subkuŝanta Tubalo.
La sango kaj l' animo sur kuprojn roje verŝiĝis,
mikse kunrustiĝonte ambaŭ, de patro kaj ido.
Nenion eblis fari, la dioj altaj atestu,
ni strebis defendante, neniel povis aliri.

»Sekve, li tranĉis lian kapon —horora diraĵo—
kaj sendis senokulan al plenturmenta patrino,
volvitan en sakpeco, laŭ postmilita rakonto
de kelkaj ĉeestantoj. Maska rajdisto de Sippar
plenumis la ordonon: ĝis la tendaro li venis,

kie zorgumis Cila kun la virinoj aparte,
sur herbon ĵetis stumpojn antaŭ hantotaj okuloj,
kaj elruliĝis ankaŭ la polva kapo de Tubal.

»Nun la patrino svenis kaj genuflekse ŝi falis.
Kiam rekonsciiĝis Cila kaj nepre konfirmis,
ke la obsedaj sonĝoj nur efektive realas,
ŝi ĝemis plenangore kun fantompala mieno:
—Ho ve al mi, misŝanca, ĉu mi elteni kapablos
ĉe tiom da ruinoj kaj da renversoj amaraj?
Jen mi vin vidas, Tubal: kiel korfride vi povis
min lasi sola, ho lasta alhelponto ĉe plagoj,
kaj ĵeti vin en tiom grandan danĝeron orgojle?
Nun via korpo kuŝos sen piemora bruligo
kaj tuj fariĝos predo por rabobirdoj aŭ lupoj.
Kaj mi, via patrino, vin ĉe la morto forestis,
viajn okulojn nigrajn ĉe l' lasta fato mi fermus,
ŝmire balzamus vundojn kaj por cindrigo preparus.
Kio do estos al mi? Kiu konsolos afliktan?
Trapiku mian sinon, ho Ninevanoj, abrupte,
se iel vi kompatas, ponardu min la unuan,
elpafu ĉiujn sagojn kontraŭ patrino mizera.
Aŭ vi, ho sceptra Antum, la taŭrokorne cidara,
vi kiu famas monde per mildanima tenero
kaj flegas ĉiujn homojn per viaj manoj afablaj,
favoru plenindulge: transŝutu min en abismon,
en la submondajn grotojn per via fulmo subita,
kaj tiam mi forgesos pri l' misfortuno hazarde,
ĉar, alimaniere, ne povas fini la vivon.

Ekpaŭzis tiam Jubal kaj, post silento, reprenis:
—Dum vale plue daŭris la homdetrua masakro,
mi venis al tendaro alporti misan anoncon,
sed nova katastrofo nian popolon inundis.
Kiam sciiĝis Cila pri l' morto de siaj nepoj
kaj laste de la filo, de la amata Tubalo,

kaj vidis lian kapon sangan, perturbe ŝi paŝis,
sin mem la krima kaŭzo de l' malfeliĉoj akuzis
kaj ekster si, despere, krie kaj ĝeme ŝirinte
per tremetantaj fingroj, al destinita fatalo,
tunikon memfaritan, maŝbuklon node ŝi ligis
de ulma branĉo, sian vivon nudpende finonte.

»Naama, je l' sciiĝo, komencis taŭzi la harojn,
vangojn nimfeajn ungis, ĉirkaŭ la korpo patrina
plenigis la aeron per longaj ŝrikoj al alto.
La kompatinda franjo, en senkonsola deliro,
rifuĝis inter frondojn, pelate de nebulecaj
vidoj kaj ŝiaj lastaj vortoj sin turnis adrese,
plore, al vi, ho Uttu, kiun tenere ŝi amis.
Ŝi trans herbejon kuris per plenda voĉo kriante:
—Al vi, Utnoa, frato, al vi kunule mi venas,
vojaĝi al l' insulo de niaj patroj antikvaj,
al lando dolĉefrukta kaj miellakte fefonta,
kie amikas homoj kaj brizoj milde karesas.
Tien mi vojas, frato, kie la paco ĉiamas!

»Kun longaj krioj jelpaj, ŝi en ulmaron eniris,
ŝirinte siajn vestojn kaj malaperis en ombrojn.

»Vidante kiel iras la misfortuna batalo,
kelkaj el ni grupiĝis celante monte rifuĝi.
Ĉiujn taĉmentojn tribajn la urboj venke frakasis,
kaj tiujn persekutis, kiuj forĉaris ajnvoje,
provante iom savi el sia magra posedo.
Ĉar valo Togan plenas je kavoj peĉe bitumaj,
multaj rajdantoj, nokte, tien kaptile pereis,
dum l' eskapintoj hastis al la montaroj apudaj.
Ni eksciis, ke kelkaj sur Belkat ree kuniĝis,
sed l' aliancaj trupoj sekvis laŭ vojo ravina
kaj ilin venkobatis je l' ĉirkaŭaĵo de Huber,
la solajn postrestantojn el la nomada kohorto.

»Ni fuĝis tra Gercuno. Dum pluraj tagoj erare
vagadis en densejoj. Knabinon iumatene
renkontis ventrekuŝan: ŝi estis ĝuste Naama
kun disŝiritaj vestoj, eksterorbitaj okuloj.
Laŭŝajne, ŝi mispaŝis kaj en krutaĵon abisman
falegis. Ni malkovris ŝin ĉe l' piedo de roko
kun sange dornaj membroj kaj dissplitita kranio.
Laŭrite ŝin bruligis kaj duvespere priploris.
Preĝinte al la dioj, cindrojn dissemis aere.
Post tempo ni decidis al sunsubiro vojaĝi,
ĉu eble ni retrovus nian popolon unuan,
helponte por konstruo de l' sava ŝipo gofera
kaj ni survoje haltis ĉe l' sankta monto pilgrime.
Ni celas nur kolegi dum la ĉarpenta laboro,
ĉar klare ni konscias, ke ni kulpule ne rajtas
navigi al l' insulo pro sangfluigo punenda,
sed poste ni plu migros sur fremda lando Ŝinara.

Tiele li rakontis en nigra nokto ĉe fajro.
Konsterne ĉiuj mutis kaj Uttu sombre mienis.
Samkiel raba ŝarko en oceano velura
dente diskarnas membrojn de elfalinta ŝipano:
ĉi tiu malespere je helpo raŭke kriegas,
tamen kompaniuloj el la ferdeko rigardas
senpove, okulstreĉe, dum akvo sange purpuras,
ĝis fine la maristo mergiĝas glute sub ondojn;
aŭ kiel knabineto, kiun pikdenta kajmano
kaptis je l' nuda kruro, dum ŝi tollave laboris,
kaj ŝin svenintan portas al subkaverno proviza,
kie, rekonsciante, ŝi povas spiri ĉar, ene,
plafonon ne atingas la frida akvosurfaco,
sed palpe, en tenebro, kun malespero ŝi timas
revenon de l' vorulo ŝin dispredonta pomembre,
tiel Utnoa spertis akran doloron enpulme,
pri l' fratoj memorante, pri Tubal, Cila, Naama,

kiujn li jam ne povis iele helpi ĉe misoj.
Densaj, nebulaj ombroj kovris la monton Urartu
kaj same ili regis en korprofundo de Uttu.

Sepa kanto

Torpasis fridaj tagoj kaj la stelaro ĉiele
turniĝis. Plurajn fojojn la luno nove vizaĝis.
Preter frostegoj vintraj, printempo flore revenis
al burĝonantaj branĉoj kaj al degelaj Urartaj
pintoj, dum la *adzuoj* per ĝojaj kantoj ariis.
Sed Uttu ne konsentis el rifuĝejo formigri,
ĉar ne aperis signo de la diaĵoj en alto
kaj ili plue restis en la densejoj izolaj.
Samkiel rinoceroj en arbarfundo kaŝiĝas
por ŝirmi sin de l' varmo kaj parazitaj iksodoj,
ĉar ilin ĉiluando — helpbirdo je la danĝeroj
tristkriĉe avertanta — ne trafis tute forbeki,
kaj staras inter frondoj nepenetreble protektaj,
en krado akacia, inter rubusoj, urtikoj,
implikaj grimpoplantoj, lianoj longe sarmentaj
kaj tie duondormas ĝis vesperiĝo dilua,

kiam torpore marŝas al ĉerivera baseno
por sonorsorbe trinki sub ĉielvolbo malluma,
tiel la Dilmunidoj en izolejo restadis,
apud kulmino sankta, transatendante rivelon.

Dume, en Najstacio, la bofilino de Numu,
Jiŝka laŭnome, iris al la bopatro vizite.
Ŝi trovis lin faranta kalkulojn pri la venonta
koloniado tera. Li sur lumplano dividis
—interkonsiliĝante kun pluraj sampartianoj,
inter kiuj, maldekstre, troviĝis ankaŭ Arunni—
marojn kaj kontinentojn por antaŭfiksi situon
de pontoj, havenurboj kaj bazoj kosmomaŝinaj
celante reakiri la prapotencon iaman
de la planedo Goba, resopirata delonge.

Ŝi dece klinsalutis: —Numu, ho kara bopatro,
mi vidas, ke vi certas pri la destino futura
de l' tero, plenfidante, ke l' Dilmunida popolo
saviĝi ne sukcesos. De post la lasta kunsido,
fakte post kiam Emme al la nomado liveris
l' anoŭdon senefike, neniu zorgas okupe
pri Uttu kaj kompanoj restaj, ĉar Inna Sooje
denove sin dediĉas al esplorado de faŭno
de l' tuta terplanedo, kiel ŝi faris antaŭe.
Ho kara patro, petu de l' registaro de Goba,
ke oni al mi konfidu superrigardi la landon.
Mi pretas tiun taskon plej akurate plenumi.
Danĝeron antaŭsentas: ĉar Jubal, frato de Noa,
kiu sunsubirejen migris al Granda Nineve
militi kontraŭ urboj apud ribela tribaro,
revenis pripentante, kun dudekkelko da homoj,
kio ebligas ree, ke ili spite klopodu
konstrui goferŝipon, ĉar ili nune regajnis
forĝistojn, ĉarpentistojn. Krome, ĉu Inna aŭ Emme
ne provos eksterleĝe helpi, sen ia rimarko,

la Dilmunidan genton, je l' senkontrolo profite?
Necesas ekzameni pri l' disruliĝo de faktoj.
Ho Numu, al mi permesu super la lando deĵori:
skrupule mi informos al vi pri ĉiu novaĵo.
Tiel la homdetruon senriske eblos atendi
kaj se danĝero urĝos, ni povos uzi la drogon
por desaponti Noan el rekonstruo damaĝa.

Arunni nun respondis: —Ho Jiŝka, ia minaco
ne estas pro l' reveno de l' Dilmunidoj irintaj,
ĉar kiuj kunmilitis, laŭ propra leĝo, ne rajtas
vojaĝi al Dilmuno. Do, ili restos aparte.

Sed Numu intervenis post dubŝancela medito:
—Tamen ŝi eble pravas, ke estos pli da sekuro.
Mi petos postenigon al registaro supera
kaj vi informu al ni pri ĉiu grava detalo.

Numuo tuj goonis viziti Oes Ogian
kiu konsentis cedon pri l' komisio petata.
Jiŝka navigis baldaŭ al la planedo lazura
kaj venis al Ŝinaro per la oavo, nubsinke,
ĵus antaŭ la aŭroro super la silvo printempa.

Kiam elvenis suno sur sia verda ĉevalo
kaj plenis foliaroj per birdkantado matena,
leviĝis ankaŭ Uttu kaj la nomadoj aliaj
el la kabanoj rondaj kaj al laboroj ekiris:
kelkaj ŝafaron paŝti, geknaboj pluke kolekti
fruktojn por taga manĝo, akompanate de Girgas.
Uttu kaj Oba, kun Jubal, al krutroka baseno
per kruĉoj ĉerpi akvon, dum grupo sub Uzal
celis brullignon haki kaj elŝvitigi rezinon
por incensaĵoj mirhaj kaj vivtenado de fajro.

Tiam parolis Oba sub birdokantoj ariaj,

dum ili ombre vojis inter denskreskaj oluoj:
—Jen, Uttu, la printempo, rava sezono de floroj,
burĝonas oluaroj kaj jam Urartu degelas,
ĝojlirlas riveretoj, multfiŝe bunte loĝataj.
Ree vekiĝas urso post letargia ripozo
kaj formikvicoj svarmaj el huma nesto rapidas.
Ĉu tio efektive ne estas signo ĉiela,
denove entrepreni post rigorajoj: aŭguro
kontraŭ suferoj, morto, ĉar vivo freŝe reviglas?
Ĉu ne jam estas tempo klopodi levi la ŝipon,
vojaĝi apudmaren, al la Puratta rivero?
Jen riveliĝo klara de l' providenco de dioj,
ĉar regrupiĝis membroj de l' Dilmunida tribaro.
Ĝi estas sola ŝanco por la ekzila popolo,
ĉar eble plu neniam ni povos veni patrujon.
Ni estas jam sufiĉaj, ĉu ni senfine prokrastu?
Ni havas urĝan tempon ĝis la sezono de pluvoj
por finpretigi ŝipon. Kial senfare ni loĝu
ĉi tie en arbaroj kaj en obskuroj atendu?
Ĉu ni ne eklaboru, per rezoluta kuraĝo,
kun la amikoj helpaj? Eĉ se la koro ne puras,
ne restas senmakula el venĝavida malamo,
ĉu ie renkonteblus unu senmanka homido?
Se l' dioj ne dezirus, ke ni revenu pralandon,
ĉu ili jam aperus al vi ĉe l' monto beninda,
apud Babelaj muroj preciz-instrue parolus?
Ĉu la genero nia ne estas ĝuste la sepa?
Kiom ni plu atendu? Ja niaj sentoj animaj
estas malnoblaj foje sed en l' insulo, ĉe Dilmun,
niaj gefiloj vivos sen militemo future,
fariĝos pli bonkoraj: malamo, venĝo ne regos,
sed harmonio, paco, kiel antikve jam estis
en l' origina hejmo, antaŭ l' ekzilo punfara.
Ho Uttu, rememoru pri via patro Lemeho,
pri l' vortoj de Luhebu, kun koincidaj aludoj,
kaj ankaŭ pri l' amiko, pri lia arda deziro

al Dilmun navigadi per alta ŝipo sur ondoj.
Kuraĝu l' entreprenon, venkante ĉian obstaklon
kaj lernu lecionon de la naturo humile.

Tiam respondis Uttu post konsidera pripenso:
—Ho Oba, mia kara, milda fratino de Laŝmu,
ĉu vere ni forfalĉis el nia koro venena
ĉian malamradikon kaj emojn venĝi fibuĉe?
Ho, se almenaŭ niaj filoj ne spertus intime
tian sklavecon daŭran, tian instinkton eternan
al murdo kaj detruo. Eble la homo venonte
plene senviolentos, se daŭre ni la gepatroj
ekzercos nian koron kaj ĝin persiste nobligos.
Tamen malamosemoj en nia koro rezidas,
nerimarkate kreskas kaj nove ĝermas abrupte.
Homo kiu ekstere pacis nur monstro realas
kaj baldaŭ elkoviĝas ĉia terura masakro.
Ho Oba, mia bela, ĉu nia gento savindas?
Ni ja kunkulpas same, ĉar la spirito komunas
kaj ankaŭ Dilmunidoj dum la Nineva milito
nur furiozon montris en eksterbrida venĝemo.
Simile niakore elŝvelis murdaj inklinoj,
dum sturmo kaj bruligoj de la soldatoj Ururbaj.
Ĉu do ne preferindus nur kolektiva fordrono
en monda kataklismo, en sama sorto detrua,
por nepre finekstermi de la surfaco de tero
la kaŭzon de l' ruinoj kaj de l' profunda korupto?

Li dube pridemandis inter hezitoj abundaj.
Kiel ĝirafo kuras en implikaĵo praflaŭra
svingante al antaŭo, kvazaŭ martelus aeron,
sian pendolan kapon, ĝin defendante de pintoj
per flankaj nukoturnoj, kaj branĉojn rekte traboras
plenajn de dikaj dornoj, kiuj sur haŭto velura
sin tordas aŭ rompiĝas; aŭ kiel hipopotamon
pribekas ĉiluandoj por elimini l' insektojn,

saltante jen sur dorso, jen sur la glata femuro
aŭ en rozeca buŝo kiu disfaŭkas enorme,
sed haste ili flugas kun trist-alarma pepado,
ĉar leonin' alglitas, kaj la dikhaŭta nun trotas
en akvon travideblan por mergiĝinte forkuri
rapide kaj silente sur sabla fundo rivera,
tiel Utnoa provis el menso ĵeti hezitojn,
sed ne sukcesis tute, ĉar prezentiĝis ankoraŭ
doloroj, malfeliĉoj kaj hororaĵoj antaŭaj.

Tiam parolis Oba kaj respondante replikis:
—Ho Uttu, vi forgesas pri la favoro de dioj,
ĉar ili paciencas pri la konduto difekta
kaj helpas senmerite, ĝis kreitaĵo kapablos
regadi sian koron kaj kunvivadi fratece.
Se l' dioj ne decidis ekstermi viŝe la homojn,
kiel vi mem, ho Uttu, al vi la rajton arogas
kondamni senindulge, se l' Nubetrona ne faris?

Nun intervenis Jubal, ĝis tiam longe silenta:
—Ho Uttu, mia frato, bonvolu aŭdi proponon:
misiu kelkajn homojn konsulti temple profetojn
en urbo Eridua, kien laŭdire havenis
iam niaj geavoj, post ekziliĝo tramara,
kaj lasis sanktajn bendojn de kunĵuriĝo propeka.
Se l' orakoloj misos, ni restu daŭre kaŝite
en silvoj, atendante generacion alian,
ĝis niaj filoj, eble, kuraĝos serĉi patrujon.
Sed se l' divenoj bonos, konsentu migri ĉe maron.

Utnoa lin aŭskultis, dum Oba dense rigardis,
kaj jene li respondis post longminuta pripenso:
—Via propono justas. Vi mem elektu vojontojn.
Laŭ viaj informdonoj ni povos taŭge decidi,
ĉu estas dia volo, ke ni ĉarpentu goferojn
aŭ restu ekzilitaj pro l' devojiĝo popola.

Tiam Jubalo dankis kaj manojn ili kunpremis.
Same ekĝojis Oba kaj ŝi el kolo medalon
demetis oferante, sur kiu reliefiĝis
abelo grandokula super platkorna damao,
festone rondumitaj. Kaj al Utnoa ŝi diris:
—Jen la Dilmuna bildo, la medaljono de Laŝmu,
kiun li ĉiam portis sur sia brusto fidele.
Ĝi estas pruvosigno de senŝancela persisto,
ĉar ĝi de antaŭlonge tra l' familio devenas,
de nia patro Enoŝ, kiu el Dilmun unue
formigris. Ĝin liveris oni de patroj al idoj
por tio, ke ĝi venu ĝis la insulo sopira.
Kaj nun mi heredigas al la korfrato de Laŝmu,
kunulo de suferoj, ĉar pensas vin la plej inda
ĝin porti al patrujo. Pro lia kara memoro,
klopodu laŭ la celo kiun li strebis atingi.
Bonvolu ĝin akcepti sur via sino favore.

Uttu konsentis preni, ĉar Oba larme petegis,
sed ĝin en burso gardis, en ŝafofela, ĉe zono,
ĉar dubis sin merita je la honora donaco,
kolĉeno altvalora de la kunfrato falinta.

Kiam vespero venis kaj brilis steloj en alto,
grupiĝis ĉirkaŭfajre ĉiuj nomadoj alvoke.
Tiam ekstaris Jubal kaj en kunveno parolis:
—Ho Dilmunidoj restaj, sur ekzilejo loĝantaj!
Informojn ni jam aŭdis dum la Nineva milito,
ke sunsubiraj urboj ne kunligiĝis armite
kontraŭ nomadaj triboj, sed dum konflikto neŭtralis,
nek Ur, la blankemura, nek Eridurbo la fora.
Juste Eriduanoj tra landoj famas amiki
fremdajn homojn, enlasi en la haveno venantojn
el distaj teroj, ĉiujn gentojn akcepti gastame.
Kun Uttu, mi proponas konsulti tie profetojn,

ĉu, malgraŭ krimaj kulpoj, dioj sankcias elekti
nian generacion por reveturi pralandon.
Laŭ tradicioj longaj, ĝuste la urbon Eridu
alvenis la gepatroj post ekzilmigra rifuĝo,
kaj temple lasis bendojn de ĵurligiĝo propuna.
Konsente mi volontas tiun esploron aranĝi
kaj pretas vojkolegi samsorta grupo laŭorde.
Jen Letuŝ, Efron, Gabda kaj Hev, je linkaj okuloj.
Ni celos jam reveni antaŭ novluno de Nisan.

La kolektiĝo Kena l' iniciaton aprobis
de Jubal kaj Utnoa kaj oni same decidis,
ke ili forvojaĝos je la monata komenco,
ĝuste post tri matenoj, l' unuan tagon Adaran.

Kiam surhorizontis la sunleviĝo fiksita,
Jubal kaj liaj homoj celis al urbaj ebenoj
enketi divenistojn en Eriduo belarba.
Vojpecon akompanis tribanoj silve restontaj
kaj adiaŭis ilin nur post duhora kuniro,
ĉe rivereto Nammar. Nun laŭ fagaro revenis.
Uttu kaj Oba, distre, konversaciis aparte,
malantaŭ la ceteraj, pri l' rememoro de Laŝmu
kaj la insulo patra; amo eknestis en ili.
Suno briladis alte dum freŝa horo krepuska,
sed nun plumbecaj nuboj ruliĝe kreskis amase
super la krestoj montaj kaj fulmotondro ŝiriĝis.
Ekfalis densa pluvo intermiksita de hajlo,
ĉe kio ĉiuj kuris, pro la ektimo, kaŝiĝi;
deklivoj ektorentis, ĉieloj krake sonoris.
Uttu kaj Oba vidis sub plata roko kavernon,
kiun postkaŝis arboj el verdfolia granato.
Ambaŭ rapidis tien, sin anhelspire protekti.
Ekflagris tuja fulmo kaj Uttun Oba brakumis.
En groto plenumiĝis ilia ama deziro.

Vespere, post sep tagoj, dum la kunveno kutima,
Oba kaj Uttu sian gefianĉiĝon anoncis.
Ili decidis ankaŭ, ke la revenon atendos
de Jubal kaj l' aliaj por nuptofesta semajno,
dum ĉiuj kungratulis ĉe l' kampadejo de Dilmun.

* * *

Tamen en Naje, Roa, per la averto de Jiŝka,
eksciis pri l' forsendo de esploristoj al urbo.
Timante ke l' nomadoj refortigite kuraĝus,
li flugis por kontrolo super Ŝinaro matene.
Senmove inter nuboj per girosfero rigardis
kaj vidis la tribanojn el la kabanoj eliri.
Baldaŭ li stude sondis per spektroskopo cerebra
la menson de Utnoa kaj kvankam bluoj enestis
li trovis superregon de la viola refrakto,
kio indikis klare pri l' animstato de Uttu,
ke malgraŭ ŝanceliĝoj li entrepreni nun emas.
Numuo revojaĝis al la stacio plenzorge,
jam cerbumante uzi la drogpreparon anoŭdan
por senrevigi Uttun definitive pri savo.
Lia stelŝipo flugis preter la kulmon Urartan,
zigzage sur ĉielo, kaj en profundo vanuis,
dum Uttu kaj kompanoj por matenpreĝo ĉerondis.
La strekon vidis Jebuŝ kaj surprizite rigardis
mienojn de l' ĉirkaŭaj. Multaj mirplene konfirmis,
ke ankaŭ ili spektis tiun ĉielan aperon,
kiu sendube ŝajnas la atendita mesaĝo,
ĉar ĝi okazis super la blanka pinto de monto,
kie sin manifestis laŭtradicie Dilmuna
Dio al antaŭloj post surlandiĝo Ŝinaren;
ili samcele venis, al tiu zono, por serĉi
signon de la Plejalta, la reĝo fulme potenca.
Tiam surgenuiĝis ĉiuj tribanoj adore
kaj plej sincere dankis pro l' signo klare ratifa.

Ankaŭ Utnoa pensis, ke estas dia rivelo
celanta lin konvinki pri la elekto popola,
malgraŭ la dividiĝo kaj krima peko de multaj,
ĉar li agnoskis, mire, ke l' brillinio mistera
tute ĝemelas al tiu aperinta ĉe Babel.
Sed tamen li decidis la fratesploron atendi,
ĉu l' templaj orakoloj tion konfirmos apoge.

* * *

Unu rondiron plenan la luno volbe traarkis,
kiam aperis Jubal kaj kunmigrinta kvaropo.
Ĉiuj salutis ĝoje, brakumis pridemandante.
Post manĝo revigliga, Jubal kunside rakontis:
—Ho tendaranoj Kenaj, sub ĉielbluo loĝantaj!
Ni venis al Eridu, al granda templo de Enki
kaj nin akceptis Durak, sonĝdivenista *baruo*,
disĉiplo de Medure, gardanto de la sekretoj
de Ŝamaŝ kaj de Adad. Post demandaro komenca
kaj preĝoj al *ŝeduoj*, birdojn li alte flugigis
kaj elmontriĝis klare la dia volo rezulte,
ĉar ili kune flugis laŭ la direkto de Dilmun,
dum trance li ripetis: «Kubab», kun senco duobla
en Ŝuburlingvo sankta: *birdo* kaj same *saviĝo*,
kaj ĝustan interpreton li sen eraro deduktis.

Ĉiuj pri l' diroj ĝojis kaj Jubal daŭre reprenis:
—Multaj Eriduanoj, laŭ longa famo, devenas
de niaj antaŭuloj, ni do samgentas al ili,
kaj plej verŝajne trovus ĉies subtenon apogan.
Finiĝis persekutoj kaj la milita minaco.
Ĉe ili la nomadoj povas senzorge loĝadi,
ĉar tiuj frontis kontraŭ la malamiko komuna.
Goferaj arboj kreskas apud Gihuna rivero,
kiu enfluas maron akompanante Purattun.
Ni kampu, do, ĉe Eridurbo, ĉar nepre bezonos

la fabrikilojn taŭgajn kaj povos ŝanĝe komerci
kun la urbanoj. Krome, ni rajtos preĝi ĉe temploj,
kie gardiĝas urne la sanktaj bendoj antikvaj.

Utnoa al la frato sian parolon adresis:
—Ĝojan novaĵon vi ĵus diris, ho Jubal, agrablan.
Ankaŭ ni mem ricevis dian mesaĝon unikan,
la signon atendatan super la montoj Urartu,
ĉar jen zigzagis stelo kiel sur monto Bezera,
kiam ĉielheroldo konsilis levi la ŝipon:
ni ĉiuj kunatestis pri la vizio fulmforma.
Tial, ke l' dia volo montriĝis nekontesteble,
ni povas jam vojaĝi por ĉarpentadi goferojn
sub muroj de Eridu, apud la bordo Gihuna.

Ĉiuj pri l' diroj ĝojis kaj Uzal nun intervenis:
—Ankaŭ mi komunikos pri certe bela novaĵo:
Oba kaj via frato jen geedziĝi decidis
post kiam vi revenos, por ke vi povu ĉeesti
tiun elstaran feston kaj partopreni l' aranĝojn.
Tuj poste ni kunmarŝos apud Baŭ-kultan Eridun
por konstruado ligna, alnavigonte patrujon.
Donacojn kaj honorojn ni morgaŭ rite komencu.

Kun koro ĝojekzalta kaj radianta feliĉo,
Jubalo kaj kunuloj brakumis la gefianĉojn
kaj ĉiuj sin preparis por organizi la festojn.

Kiam per rozaj fingroj aŭroro hele salutis,
solenoj komenciĝis en maldensejo freŝarba:
dum sep sinsekvaj tagoj la nupton ili celebros,
okazos ĉiutage dancoj, muziko de flutoj
kaj homoj alportados ĉiuvespere donacojn
por la geedziĝontoj. Oni konstruis unue
novan kabanon branĉan, per kunlaboro ĉiesa,
ke ili havu hejmon. La duan tagon oferis

brodaĵojn kaj mantelojn por kunvivonta geparo.
Jubal donacis orajn ringojn je l' tria vespero,
nome de la venintoj el la Nineva ĉefurbo,
kaj Uzal je la kvara, figurojn plej delikatajn
tajlitajn sur ebono, bestojn artisme prezentajn.
Dedan, je l' kvina tago, vazojn el fajna fajenco,
kiujn li tornis modle, kun perlamotoj inkrustaj.
La sesa liveraĵo estis ornama tapiŝo,
kun desegnaĵo bunta pri la insulo revata,
kiun elteksis Ŝuhed, forpereinta Nineve,
kaj Efron ĝin kunportis, la edzo nun reveninta.
La lastan nuptotagon, laŭrite, Oba kaj Uttu
devis oferi fruktan trinkon al si reciproke,
sekrete kaj aparte de ili mem preparitan,
por nokte interŝanĝi antaŭ ekkuŝo geedza.

Dum Oba kaj Utnoa ĉe la kabanoj ermitaj
ĉiuvespere festis sub larĝiĝanta lunarko,
alte el la ĉielo, Jiŝka, de l' ŝipo radlorna
kontemplis la preparojn. Helpe de globo giranta
ŝi spektis la tempeston post la foriro de Jubal
—pri kiu ŝi informis, maltrankvilige, bopatron—,
sciis pri l' enamiĝo, la kuraĝiga parolo
de Oba kaj rimarkis pri la sestaga celebro,
post kiam Jubal venis el la esplora misio.
Nun Jiŝka al si diris en sia koro returne:
—Ĉu sole mi la mankon de l' kara edzo suferos
dum subrasanoj gajas ĉe solenado de nuptoj?
Ĉu mi senfare restu dum la ruino draŝontas,
kontraŭ misgenta savo, popolon altevoluan?
Jam tempas interveni por fiaskigi la planojn
de Emme kaj Sooje pri ĉarpentado ŝipleva,
tiel ke l' popolado Goba ne povus okazi.

Ŝi haste, dum tagmezo, flugis viziti Numuon.
Envenis la stacion, al lia hejmo goonis

kaj trovis lin sidanta sub la kupolo vitreca,
spektanta holobildojn pri sia filo Loedu.
Ŝi vidis propran edzon, kvazaŭ kun vivo plu pulsan,
irantan al *gadio*, en verda stabuniformo:
jen liaj junaj trajtoj, la altefrunta mieno,
jen lipoj ridetantaj, kiujn tenere ŝi kisis...
Ŝi sentis korŝiriĝon, sed larmojn tenis okule.
Numu malŝaltis bildojn kiuj forsvenis inverse.
Tiam la bofilino, post kunsaluto, parolis.
—Roa Numuo, patro, jen la popolo de Dilmun
provi konstrui ŝipon sendube ree klopodas,
ĉar Uttu sendis homojn al apudgolfa ĉefurbo,
ĉu oni trovus placon por ekĉarpenti sekure
kaj ili ĵus revenis kun kuraĝiga novaĵo.
Ĉu daŭre ni senfaru kaj preterlasu neglekte?
Sin trudas la neceso uzi la drogon anoŭdan:
ĉar Uttu tuj edziĝos al la fratino de Laŝmu,
hodiaŭ je l' vespero, kaj ili tiel akordis,
ke post la nuptofestoj ekmigros jam al Eridu,
la urbo ĉe Gihuno, kaj riverplaĝe denove
ĉarpentos sian ŝipon laŭ la instruo de Emme.
Ni uzu jam l' anoŭdon. Nun estas taŭga momento,
ke Uttu vidu klare kaj konsekvence decidu,
por ke la sentoj ĝojaj de la edziĝa vivaĵo
bildigu kontraŭflankojn de la esenco profunda,
kaj li arbare restu ĝis tuthomara detruo,
mutaciulojn fuŝajn el forpereo ne savu.

Numuo nun respondis al bofilino brovsulke:
—Mi trovas vian diron tute konvena, bonorda,
kaj estas plej verŝajne nun la momento preciza
por nia interveno, ke Uttu vidu reale.
Mi mem lin akompanos dum la vojaĝo reflekta,
kiel ni jam konsentis, se nepros uzi la drogon.
Verŝajne la klopodo de Emme tute fiaskis,
ĉar lin neniu gobdo dum la vojaĝo kunulis

povanta certagvide klarigi funde l’ aferojn.
Sed por ke mi kapablu, mi devos preni mezuron
pli altan de anoŭdo en speciala medio,
frontante la danĝeron je psikdamaĝo latenta
en mia retkomplekso, ĉar ne scieblas antaŭe,
kien transtempe iros la subkonscio de Noa.
Ho, se solnura homo mian averton aŭskultus,
se restus nur ĉi sparko de racieco logika!
Eĉ se mi forkolapsus, juĝus valora la penon
provi konvinki Uttun pri l’ detruenda subraso.
Kvankam mi ja forgesos pri la vidotaj aferoj,
ili en fundo, tamen, subinfluante persistos.
Sed post la kunmensiĝo, ne eblas paŝi retroe
ĝis fino de la sperto, kiam Utnoa vekiĝos.
Mi pretas jam vojaĝi al transa mondparalelo.
Sed kiel taŭgos, Jiŝka, al li liveri l’ anoŭdon?
Ĉar nun Arunni restas en malproksimo ĉe Marso,
kien li forvojaĝis esplorrigardi patrole
kaj mankas lia helpo kaj rekomendoj utilaj.

Jene respondis Jiŝka al demandanto plenzorga:
—Roa Numuo, patro, ni antaŭvidis okazojn
kaj priinformojn spertajn al mi konfidis Arunni
per mensa komuniko: ĉe l’ geedziĝa soleno,
Kenidoj faras donojn dum unu tuta semajno
kaj je la sepa tago la gefianĉoj oferas
unu al la alia sukon el frukta miksiĝo,
kiun alportas ambaŭ el sia propra kabano
al la futura hejmo, flanke freŝdate farita.
Interŝanĝinte, trinkas el reciproka pokalo
ĉe la kuŝejo nupta por la plezuroj amoraj.
Ni povus do enverŝi en tiun vazon elektan
de Oba, pulvor-dozon, dum ĉiuj ronde, plenlune,
la geedziĝon festas laŭ tradicio popola.

Palpebrojn subklininte, la buklojn Numu balancis,

signante prikonsenton, ĉar li jam pretas al ago.
Nun Jiŝka ŝvebis hejmen la drogon labe rafini.

Kiam sur horizonto l' unuaj steloj eklumis,
la Dilmunidoj venis ĉirkaŭ la fajron ariĝe.
La sepan nuptotagon ili celebri komencis.
Tiam ekfulmis Jiŝka per la flugdisko platena
al la Ŝinara lando, meze de l' silvoj Urartaj.
Ŝi maskis sian ŝipon en la mallumo de nokto,
deŝtupis sur la grundon en maldensejo proksima,
ŝtelpaŝe ŝi alglitis kaj de post arbo penetris
en la kabanon, kie staras duona kokoso,
kun la trinkaĵo frukta kiun jam Oba pretigis
—ĉar Jiŝka nun surhavis nur striktan veston opakan,
kun specialaj farboj, kiuj ŝin faris en ombroj
nerimarkebla vide. Ŝi la pulvoron influan
enŝutis en la sukon, el skatoleto rebrila,
kiu kaŝiĝis klape en ringo ruĝe rubena,
havita de Arunni el la Nimroda palaco.
Sekve ŝi urĝe paŝis al arbarlimo, dum ili
kantikis en gajrondo kaj paroj dancis amuze.
Ŝi grimpis en la ŝipon, kiu rapide kapusis,
tra la profunda nokto, al kolonio ĉiela
kaj ĝia spuro ŝajnis nur meteoro migranta.

Je l' noktomeza horo, la nova paro disiris
al branĉkabano hejma, kie sukmikso kokosa
inter girlandoj kuŝas kaj ili ronde prezentis.
Ĉiuj silente staris dum vidalvide jen ambaŭ,
levante dekstran manon, amardolĉaĵon oferis
figure simbolantan sian transdonon animan.
Utnoa trinkis ĝue el kokosŝelo da fruktoj
kaj ĝis la fundo glutis. Kaj faris same nun Oba.
Tiam eklaŭtis kantoj, plektiĝis danco ĉiesa.
Jubalo ludis *tukkun* kaj belavoĉe li kantis,
plukante ŝafajn kordojn, kiel tendare kutime:

—La vintro jam forpasis, neĝaroj monte degelas,
leviĝu, amatino, kaj mia bela, ho venu!
Florplenas ĉiuj branĉoj, paradas bunta sezono,
trilanta turtoparo en densaj frondoj arias,
fig-arbe ekmaturas miela frukto regale.
Leviĝu, amatino, kaj mia bela, ho venu!
Vian aspekton montru kaj helan voĉon aŭdigu,
per milda ekrigardo vi min kortuŝis unue.
La amon ne estingos eĉ superakvaj inundoj
kaj ĝin ne fordronigos elverŝiĝanta rivero.
Leviĝu, amatino, kaj mia bela, ho venu!

Geedzoj procesiis, akompanate de dancoj,
al ĵus farita hejmo. Post reciproka saluto,
jam ĉiuj retiriĝis sub adiaŭa muziko.
Ambaŭ ekkuŝis mole por amorado plezura.

Kiam ekdormis Uttu, la drogo baldaŭ efikis:
li vidis kun surprizo, ke nebulece li flugas
ekster si mem ŝvebante. Jen lia korpo karneca
kuŝanta sur florlito, apud l' edzino ripoza,
trankvile plu dormanta, kun ĝojfeliĉa mieno.
Sed nun li sentas tremon, laŭ sia spino, fridjukan,
angoro en li regas. Li lumrapide vojaĝas
al malproksima mondo, preter stelaroj, abismen.
Meze de la trajekto subite rendevuiĝas
svaga ĉielfiguro, konturiĝanta pograde,
ĝis viollipa buŝo jene la vorton adresas:
—Ho Uttu, Lemehido, prudentoplene juĝanta.
Mi estas Roa Numu, samplanedano de Emme,
via amiko fora, kiun vi konis antaŭe
sub Henohidaj vestoj en la tendaro de Dilmun.
Loedun, mian filon, teranoj krime mortigis
dum li al triboj venis ambasadore pri paco.
Mi nun vin akompanos tra regionoj *uvaŭmaj*
por ke vi vidu, kio en efektivo futuros,

se vi konstruos ŝipon kaj eblos savo de homoj.

Utnoa surprizite al la veninto demandas
post longa hezitado, kun sindetena rezervo:
—Kial mi fidu vortojn el lipoj svage konturaj?
Ĉu mi koŝmare sonĝas kaj sensoj trudas eraron?
Kiel vi min informus pri la hazarda venonto
sur mia propra tero, estante alimondano?
Ĉu maske vi demonas aŭ Dio sendis anĝele?

Jene respondas Numu per tolerema parolo:
—Mi estas raciulo el civilizo pli multe
evoluinta. Ni havas efektive rimedojn
de vi ne konjekteblajn kaj ni kapablas esplori
ĉi tiun pretermondon multforme plie penetre.
Por helpi al kompreno mi venis vin akompani.
Vi spektis partiece dum la antaŭa vizito:
sed nun mi vin sciigos pri la aŭtenta realo,
ĉar la viditaj estas antaŭ ĉi tiu nur ombroj
palaj, farbaĵo sole, kiu la veran esencon
kaŝas. Vi mem kapablos poste libere decidi.

Kun duboj Uttu cedas al la gvidado de Numu.
Ambaŭ transflugas tiam laŭ nigra kirla funelo,
eniras dimension de l' astrakorpa venonto
kaj vidas zodiakon kun malsambestaj aludoj.

Numuo ekparolas al la nomado survoje,
ĉar fulme rapidegas ilia iro trakosma,
dum lumoj malaperas, aliaj sparke rebrilas
kaj post sekundo svenas en malproksimo profunda:
—En jena universo troviĝas ĉiuj eblaĵoj
tra disaj galaksioj kaj stelsistemoj enigmaj.
Ili sennombre multas, kiom la ebloj en onto
kaj daŭre plimultiĝas ekspansiante senĉese,
ĉar ĉiuj realaĵoj genere kreas aliajn.

Jen stelo karberuĝa, kiu kreskadas alire:
ĝi estas la vojcelo de nia nuna vojaĝo,
la centro de planedoj, kie astrece prakorpas
la nejdoj koncernantaj al via mondo bluluma.
Jen antaŭ ni sferaĵo al via luno simila,
sed kiu rivoluas pleje proksime de suno.
Ĝi estas kraterplena, sableca, griza, tre arda
ĉe l' flanko sunbanata, neelteneble fridega
ĉe l' nokta regiono, kaj ĝia nokto monate
daŭras kaj tagoj same, dum kiuj vice videblas
du sunleviĝoj sekvaj kaj du sunsinkoj okazas.
Kelkfoje suno etas aŭ grandiĝante dekoblas.
La kerno densmetalas sub roka dika tavolo.

Uttu aŭskultas vortojn, kiujn duone komprenas,
sed tamen, per intuo, rigardas ĉion atente.
Ili malsuprenŝvebas al vasta gruza dezerto
kaj vidas nudajn korpojn, kun haŭto lepre vorata,
avide atendantajn, per disorbitaj okuloj,
pluvon de manĝoj, trinkoj. Sed kiam ĉio miraĝe
el firmamento falas, ĝi tuj forsvene vanuas
(sed Numu kaj Utnoa permense vidas imagojn
tromplogajn kaj kapablas pri la realo distingi).
Kun manoj vane vringaj tiuj dentŝiras irite
sin mem kaj pugnobatas; vermoj sur haŭto pululas,
dum ili sangon trinkas el membroj putre miasmaj.

Tiam Numuo diras al la terano klarige:
—Ĉi tie vegetadas kiuj damaĝos aliajn
sen violent' ekstera, sed samrasanon elsuĉos:
jen konkurencemuloj kiuj plenluksos avare,
la spekulaciontoj per la proprаĵo komuna,
maroj, insuloj, grundo kaj per aero ĉiela.
Jen ĉiuj negocistoj, ekspluatontaj uzure
parencojn aŭ fremdulojn, ilin ĝisoste prirabi.
Ankaŭ la reklamistoj, por kiuj vero ne gravos,

sed nur la memprofito kaj akumulo de mono,
mensogemuloj, kiuj vante plezuros konfuzi
per mistifikoj ronĝaj kaj dignon tretos insulte.

Tiam Utnoa diras al ĉielano demande:
—Ho Numu, kio estas ĉi tiuj bildoj aperaj:
ĉu ili estas homoj aŭ senkonsistaj imagoj?

Jene respondas Numu al la nomado hidsonĝa:
—Ni venis al la mondo de entoj potencialaj.
Eĉ se nur astrakorpa kaj sen konsisto fizika,
tamen konkretan bildon prezentas ĝiaj aferoj.
Ĉio, kion vi vidos povas fariĝi reala
se l' homo pluekzistos sur la planedo misvoja.

—Se ili ne fizikas, kiel laŭŝajne suferas?
—Utnoa redemandas. Kaj jene Numu respondas:
—Iliaj astraj korpoj, pro la konsisto natura
ebligas, ke ĉi homoj doloron lime travivas;
sen detruiĝo plena, turmentoj ŝiras animon.

—Ĉu tamen iel eblus kun tia gento paroli,
provi konvinki ilin pri la farotaj eraroj?
—Utnoa nun demandas al kunvojanto hezite.

Respondas li: —Vi povos komunikadi permense,
se vi koncentros vidon sur unu bildon apartan,
sed skoldo senutilas al pretertempaj estuloj.

Jen unu sian manon al vinberaroj etendas
kun antaŭfrandaj lipoj, aperta buŝo bavanta,
sed branĉoj glitas supren kiam li preskaŭ atingis,
liaj okuloj sangaj per furiozo ruĝiĝas,
sulkiĝas lia frunto, distorde buŝo grimacas
kaj li sin mem ekdentas por kvietigi freneze
ŝakalan malsategon. Sed post momento, minute,

kreskas denove karno. Tiu sencele kuradas
laciĝe laŭ la valo, post iluziaj oraĵoj,
neniel senreviĝas malgraŭ vanuo ripeta:
al blufaj halucinoj, post trompaj fatamorganoj
la manojn disetendas, nur forgesante surkorpajn
plagojn ulcerajn, pri torturado dorne kruela.
Jen unu kaŭre sidas, alia stumble zigzagas,
tiu rikane gapas, ĉi tiu grimpas al roko
spirante plenanhele. Sed ĉiuj forme similas:
senharaj kaj pus-haŭtaj kun muskolaro palvejna,
kvazaŭ lepruloj dense en kavernego loĝantaj,
kiuj oleajn lampojn sur muroj nokte pendigis.

Utnoan nun invadas nerezisteble tumultaj
voĉoj, kiuj miksiĝas en lia cerbo torente,
simile al paŝtisto kiu en kruta ravino
ekaŭdas murmuradon de akvofluo tempesta
kaj lasas sian gregon por forrapidi vivsave.
Uttu ekkaptas voĉojn en miksiĝanta malordo,
kvazaŭ li aŭskultadus ian fantoman orkestron:

—Mi estas Bernardone, laŭ popoldiro peranto
diabla, kies koro nur talpofela monujo
estos kaj sur okuloj havos po unu dukaton
blindigantan: per ŝtofoj tutkontinente riĉiĝos
ĉerpante la salajron de laboristoj oprese.

—Jan Van der Does mi nejdas, la komercisto diboĉa
kiu akceptos ĉian regon, nur tiukondiĉe,
ke navigadlibero kun Ameriko sekuru.
En borso spekulados kaj procentege mi pruntos.

—Tajmuro mi nomiĝas, kiu forvendos Afrike
gefilojn kaj kaptitojn de sampopola vilaĝo,
raziojn aranĝante por ĉasakiri la varon
antaŭe konsentitan kun nigrulara ŝakristo.

Fratojn, popolon, sangon, sen ia honto perfidos
celante rangaltigon, kontraŭ manpleno monera.

—Jen mi Vilhelmo Keli, plej puritana pri moroj,
kiu doneman Dion, veran, senfraŭdan adoros,
tamen komercon havos sur fundamento de trompoj
kaj rabo de l' mizeraj, naŭzan malicon uzonta
samkiel la naŭzuloj, kiujn mi skolde kritikos.

—Mi estas Rodianez, narkomagnato fifama,
hirudsuĉonta homojn, kies liberon perungos:
laŭleĝajn oponantojn sisteme, draste murdigos.

—Mi nejdas Artur Niso, kontrabandonta kemiajn
armojn: min mem kaj kaŝe la registaron investan
mi celos pliriĉigi per multpopola masakro,
dum tiu predikados pri monda paca sekuro.

Nur kiam li detiras rigardon el la Ĥimeroj,
pograde estingiĝas la voĉoj svarme kriantaj.
Sed kiujn aŭdis Uttu en sia menso tortura
neniel reciteblas eĉ se millange mi buŝus.
Li nun konscias klare pri la monstreco de faroj
kaj spertas disŝiriĝon antaŭ misaĵoj acerbaj
kiuj fariĝos iam se la homaro vivlongos.
Samkiel diplodokon en la pratempaj eraoj,
apud ŝlimborda marĉo kun gimnospermoj ovolaj
trankvile paŝtiĝantan en malproksimo de siaj,
tiranosaŭro dentas per makzelarkoj okulnaj;
eĉ se per vostosvingoj sin la giganto defendas
kaj anakondan kolon kun ronkaj snufoj agitas,
ricevas mordajn breĉojn de l' grandkapulo dukrura
kaj agonie falas sur grundon tondre reeĥan,
per krifoj diskarnote kaj per faŭkego ponarda,
tiel Utnoa spertis en intimeco, profunde,
ĉar lia homkonfido renversiĝante pereis,

sciante la terurojn de lukrocela venonto.

* * *

Ambaŭ forflugas sprone el naŭza mondo mucida,
tra l’ nigro de vakuo, ĝis antaŭ svaga brilaĵo
kaj Numu ekparolas al la nomado korprema:
—Jen vidu novan astron ekstere verde koloran:
ĝi ŝajnas paradizo sed estas maska vizaĝo,
ĉar la interno ardas per ŝtormaj nuboj okrecaj
ĉirkaŭvolvata. Plumbo kaj stano likve meandras
ĉar ĝi je kvincent gradoj tage kaj nokte bolfornas.
Tra l’ tuta firmamento kumulusaro ruliĝas
kun granda rapideco kaj la tempestoj acidaj
sinsekve fulmotondras, falas sulfura pluvego.
Kvazaŭ sin oni trovus en oceano profunda,
tiel aero densas, la bildoj varme sinuas.
Pro la nebulkurteno mi al vi tuŝos orbitojn
kaj verŝos sorĉajn gutojn kiuj ebligos esploron
preter remparoj, montoj sen ia ĝeno helece.

La vojaĝantoj plonĝas tra la nubaroj apike
en atmosfero stinka, kie spireblas apenaŭ.
Uttu palpebrojn levas kaj plenstupore rigardas,
vidante longan valon kie rivero serpentas
kaj fajre disvastiĝas en lagon mare senliman.
Subite svarmaj korpoj, kun sangeglobaj okuloj
senpalpebraj el inter ŝaŭmantaj lafoj emerĝas.
Kiel dum sunsubiro elglitas katoj embuskaj
al paca promenanto de post la muro de domo
kaj en duona ombro pupiloj nun fosforeskas
kvazaŭ fajreroj ruĝaj en la aero senmove,
tiel mil okulparoj antaŭ Utnoa vidiĝis.

Roa klarige diras al la kunulo ĉi-vorte:
—Jen antaŭ vi troveblas ĉiuj murdistaj amasoj,

iliaj astraj korpoj nur enkarniĝon atendas.
Jen kiuj murdos fride sian patrinon akuŝan,
lulile propran bebon aŭ la edzinon amindan.
Jen forrabistoj ankaŭ, la perfortuloj al inoj
kaj al senkulpaj knaboj, nur por kruelaj amoroj.
Kaj jen plej krimaj uloj en la homaro venonta,
kiuj kunfratojn buĉos, kvazaŭ enspirus aeron:
korblindaj mafianoj, kiuj sennomu sepulte:
plibonus ja al ili, se panj-utero ne naskus.
Ankaŭ ĉi tie lafas la enviistoj akuzaj,
la ĉikanistoj ronĝaj, abomenantoj orgojlaj,
kiuj neniam krimos mane, sed kore kovados
rankoron al kunhomoj kaj subkonscie suĉigos
malamon de murdistoj tra l' homanimo komuna
kaj tial ili kulpos samkiel fakte farintaj.
Kiu terano restos ekster ĉi plago trudlola?
Certe la homa gento sen iu escepto perversas.
Tial vi, ho Utnoa, se en vi sidas iome
da saĝo kaj prudento, ne rekonstruu la ŝipon
por savi misformaĵon: ĝi kiel vrako forputru.

Tiam elglitas kapo, ol ĉiuj plie terura,
kun haroj gluiĝantaj ĉirkaŭ kranio senorde.
Samkiel kartonpupon, per subaksela prenilo,
virino nun malmergas el flavkolora tinkturo
kaj la viskoza likvo disfadeniĝe rulgutas;
aŭ kiel oni levas el ŝlimoplena kanalo
droninton forportitan de senkontrolaj inundoj:
meze de trunkoj, branĉoj kaj bestoj pufe flosantaj,
aperas nuda korpo farbita dikatavole
de kapo ĝis piedoj, dum la kotakvo deglitas,
simile elmergiĝas el lafrivero fibrusto.
Okuloj ekvideblas kaj brilas ruĝa pupilo.
Tremante ĉiufibre li jenavorte parolas:
—Mi estas, ho Utnoa, antaŭdamnito merita,
ĉar mi pluvigos fajron kontraŭ urbego novsune.

Mi estas Paŭlo Tibets, kiu komandos avion
ĵetontan atombombon sur Hiroŝiman urbegon:
haŭto de milionoj taŭziĝos sanga ĉifono,
restaj despere kuros inter domaro ruina
kaj ĝis stertoro lasta kompanos brulaj ulceroj.
La ŝipon ne ĉarpentu por la saviĝo de homoj.
Jen antaŭ vi l' rezultoj de tiu ago senpensa.
Ni ne ekzistu iam en tera korpo da ĉeloj,
ĉar nun ni klare scias pri la monstraĵo farota
sed poste ni forgesos kaj fuŝkondutos ebrie.

Utnoa nun demandas al l' elveninto de fundoj:
—Sed kiel do vi scias pri mia nomo sendire?
Kaj krome se vi konas vian futuron aperte
kun riĉo da detaloj, ĉu eblus iel eviti
viajn fuŝaĵojn ontajn? Ĉu ili tute fatale
okazos niamonde?
Paŭl Tibets jene respondas:
—Ni konas futuraĵojn sed ne kapablas estigi
aŭ iel neniigi per nia propra volonto.
Kaj nia nuna scio tuj malaperus entute
se iam ni ektempus kaj sur terglobo ni karnus
—por interkompreneblo ĉirkaŭesprimoj uzendas.
Sed nun ni havas dokton kiun ne povas imagi
la menso de naskito, eĉ se veninta ĉi-monden.
Ni sciis pretertempe pri via astra vizito
kaj ankaŭ ke vi povas nin neniigi por ĉiam
kaj tial mi alvenis renkonti vin laŭordone.

—Sed tamen, se l' homgento ne plu ekzistus okaze,
ĉar ia goferaĵo ne savus nin de l' inundoj,
do kio vi fariĝus? Ĉu vi forsvene vanuus?

Utnoa pridemandas. La sangŝmirito respondas:
—Ni daŭre plu vegetus en nia mondo latenta,
kie ne gravas nomoj sed nur intimo radika

kaj nia spektro daŭre en suferego vagadus,
kvankam se ni realos, nia torturo miloblos.
Ĉar ni konscias klare pri la misaĵoj estontaj,
tial ni vin petegas: je la ĉarpento rezignu.

Uttu suspiras funde dum lia koro bedaŭras:
—Ho, se vi scias ankaŭ pri la kunuloj en sorto,
rakontu al mi kion ili venonte prikulpus,
por ke mi mem kapablu per propra sperto decidi.
—Bonvole mi ja faros —Tibets al Uttu respondas—,
ĉar ĝuste tiucele mi venis ĵus rendevue.
Sed nur pri kelkaj eblos kun detaleco raporti,
ĉar pramurdistoj kvantas senfinaj, nekalkuleblaj,
kaj via menso estas, eĉ astrakorpe, limita.
Ĉu vidas vi, ŝaŭmmeze, ke nerva mano leviĝas
kaj streĉas plenrabie la fingrojn sange gutverŝajn?
Jaela tie dronas, kiu perfide mortigos
persekutatan gaston. Post ol akcepti Siseran
per trankviligaj vortoj kaj enlitigi flegarte,
ŝi portos freŝan lakton, sed kiam tiu ripozos,
ŝi batos tra l' tempio najlon de l' tendo nomada
ĝis en humidan grundon, kion pastrino prihimnos.

Jen tiu vila brako kun kriso pinte blufulma.
Ĝi estas Simon Urkan: en homamaso freneza,
li ĉefkomandos venĝon al rifuĝinta judopo
en Jorka reĝkastelo. Li serpos buĉe virinojn,
senhelpajn geinfanojn, oldulojn, blinde, rablupe.

Jen Halsted, strangolonto de knabinetoj izolaj
—tiu ĝisbruste stara, kiu sin mem sufokadas—:
post kiam li perfortos inter desperaj kriegoj,
premtordos molan kolon kaj alrigardos okulojn,
kiujn li ne forgesos dum sia vivo maldorma.

Jen tiu kalva verto kiu ĉe rokoj aperas

kaj vome sputas sangon kun karnopecoj abundaj:
Dajblero li nomiĝas, ekzekutisto palaca
sub reĝo despotisma: li gilotinos ofice
ĉu kulpajn aŭ senkulpajn, sen konscienca riproĉo,
kvazaŭ mortigi homojn povus fariĝi salajro.

Tiun piranjoj mordas, kiuj elglitas okule,
dum li klopodas skui el sia korpo rabfiŝojn;
kiam li nur skeletas, jen ostoj ree kovriĝas
per nervoj, internaĵoj, muskoloj, haŭto, hararo
kaj ree komenciĝas lia senĉesa torturo.
Ĝi estas Akker, kiu kontraŭ geknaboj irantaj
ĝojsalte el lernejo, per ripetpafa fusilo
ĉanpremos sendistinge ĝis municio finiĝos.

Sed dum la monstro krias per raŭkaj tonoj al Uttu,
subite lin, kirliĝe, bolanta lafo reglutas.
Momenton li aperas sur la surfaco denove
kvazaŭ provanta diri ian novaĵon anhele,
levante spasmajn fingrojn inter ondaro barakte,
sed fortostreĉo vanas: li reportiĝas abismen.

Tiam Utnoa, ŝvite, el la vidaĵo sin turnas
kaj en interno sentas senliman premon angoran.
Kiel pteranodonto, la krestimpona prabirdo,
kiun renversis grunden fluktua vento hazarda,
fiaskas elteriĝi pro l' enverguro kolosa;
rampante ventre, unge, al alta klifo suriri
strebas, kie flugilojn ĝi povus vaste disvolvi,
sed tamen ne sukcesas kaj anhelspire trolacas,
ĝis de post roko saltas keratosaŭro nukrompa,
same senpovis Uttu antaŭ spektaklo repuŝa
de homoj kiuj murdos sian kunfraton intence.

Numuo kaj Utnoa transiras ŝaŭme la lagon,
per barko kiu kuŝas sur bordo nigre rokrifa.

Velaro ekpufiĝas sub alblovanta samumo,
dum grincas la ferdeko pro l' stranga pezo neofta,
kiun tabuloj fulgaj neniam spertis antaŭe.
Multaj damnitoj provas al boatflanko kroĉiĝi
kaj buŝoj dentomankaj sangbave faŭkas apude,
sed manoj pretertuŝas, kvazaŭ fantomoj eteraj.

Ili sukcesas veni al transa bordo kaj ankras
la barkon apud rodo. Ili nun vojas en densoj
laŭ plumbaj torentujoj el kiuj fumo vaporas,
vualas la rigardon kaj fiodoras acide,
ĝis alta montopinto kun apikranda kratero.
Numuo nun klarigas: —Jen estas kerna fokuso,
el kiu fluas rojoj kaj la rivero lafsanga,
prafonto de disputoj, insultoj, mokoj, envioj,
kiu ne havas fundon kaj densbobele boladas.
Ĉu eblus iaforme ĉi lafon superinundi?

Veninte al rokego apud la buŝo kaldrona,
Numuo lin eltiras, kaptante helpe je mano,
kaj levas inter nuboj al stratosfero helverda,
kie Utnoa povas la spiron ĝeme repreni,
samkiel submaristo, kiu nudbruste serĉadas
meleagrenajn konkojn kaj al li mankas aero,
ĉar riskis tro profunden, vidinte ŝajne promesan,
kaj povas lastmomente el ondoj ŝaŭme leviĝi.

Ambaŭ transflugas disten, preter alsuĉa praputo,
laŭ kiu ili venis ĝis tiu mondo tunele,
al rozkolora astro, kun atmosfero subtila,
polusoj glaciblankaj, ege simila je tero
pro l' daŭro de la tago kaj la sinsekvo sezona.
Utnoa eksupozas, ke tie oni feliĉos,
ke ĉesis malpiaĵoj kaj abomena korupto.
Sed kiam pli proksime, tranĉeumitaj ebenoj
je l' vido prezentiĝas. Numu klarige parolas:

—Jen astro krutaĵplena, kun kvar vulkanoj egrokaj:
la centra plej elstaras, tridek-mil-metre ĝi pintas
kaj tricent mil ĝi longas. Glataj dunaroj alternas
kun bruskaj kanjonegoj kaj valoj strie sinuaj.
Kelkfoje ekformiĝas sablotempestoj eolaj,
kiuj planedsurfacon dum tuta tago vualas.
Senŝirme ĝin bombardas ultraviolaj atomoj.

Utnoa povas vidi sur ebenaĵo figurojn
kiuj zigzage kuras brulante torĉosimile.
Ĉirkaŭ plennudaj korpoj flagradas flamoj envolvaj,
dum ili retropaŝas sur dunoj tute sencele.
Malsamas ĉies flamoj laŭ sia propra koloro:
jen verdaj, flavaj, ruĝaj, purpuraj, bluaj, oranĝaj.
Kelkaj estingi provas en imagataj oazoj
sian polpecan fajron aŭ sur miraĝa herbejo
ruliĝas. Tamen eĉ sableroj venas en ardon,
ekbrulas ankaŭ ŝtonoj dum ili grunde baraktas.
Se ŝance interpuŝas, la samsortanon evitas
horore: post renkonto, rapide, strabe rekuras.

Sed tiam sablotrombo jen unu flamon estingas,
kaj nigras homfiguro kvazaŭ karbaĵo fumanta;
dum ĉiuj retroiras, ĝi fronte paŝas escepte
kun ŝancelstumblaj plandoj, kaj proksimiĝi klopodas.
Kiel post katastrofo kiam avio paneis,
dumfluge eksplodinte, kaj laŭ arbaro rulfalis,
sternitaj korpoj kuŝas, diskriplaj, nigre koaksaj,
kaj samhejmanoj serĉas inter rubaĵoj aflikte
dum ino kredas trovi la filon nude ĉifonan
kiun ŝi levas alte kontraŭ ĉielo nebula,
tiel aspektas, monstre, la ĥimeraĵo vidata,
kiu al Noa flustras per nigra lango sufoke:
—Ho Uttu, transmondano, mi dankas kore ĉi benon
ĉar el torturo flama unuafoje mi fuĝas
nur dank' al via paso sur mizerejo Ŝeola,

ĉar ĵus nia mondestro al rendevuo min urĝis.

Utnoa nun demandas: —Ĉu estas tie reganto?

—Hazardo suverenas sur nia mondo drakone
—respondas la karbulo— kaj min ĉi fojon elektis
por rekte vin informi pri nia vera konsisto.

Kaj Uttu redemandas: —Pri kiu miso vi kulpas
se tiel ardas korpoj en nehaltanta konsumo?

Kaj jene nun respondas la alveninto magreca,
kun rondaj okulgloboj kvazaŭ skaraboj indigaj:
—Ni estas detruontoj de l' surplaneda naturo,
senpense pri la sekvoj por la komuno homara,
ekocidistoj blindaj, kiuj por ĝuo ĉasados,
aŭ lukre elprofiti, alkojn, harpune balenojn,
laktsuĉajn elefantojn pro la dentegoj eburaj
aŭ iajn kampobestojn sub perversia plezuro.
Forbruligontoj sciaj de bestohejmaj arbaroj,
magnatoj spekulemaj per industrio de nafto,
kiuj malhelpos trovon de energio pli pura.
Mi estas Da Mestrino, politikisto Brazila,
kies sopiro estos l' Amazonian arbaron
detrui foreksterme por ekspluati la grundon
—kaj tion mi senhonte kaj en publiko proklamos—
per minaj ercesploroj kaj kultivadoj intensaj
kio elĉerpos humon, vastegojn nude sabligos.

Utnoa nun demandas: —Vi kun malamo parolas
pri vi kaj sammondanoj. Pro kio tia sinteno?

Respondas Da Mestrino: —Ni volus tute nuliĝi
ĉar ni konscias plene pri nia misa medolo.
Nin naŭzas nia esto kaj ni malŝatas aliajn.
Restas espero sola: ni ne naskiĝu gravede,

ĉar ĉiuj hororaĵoj sur via mondo rigorus.
kaj tiam paroksisme niaj suferoj obliĝus
en niaj ombraj korpoj sur ĉi senfina dezerto.

Sed li tuj reflamiĝas, rekuras dorse tra kampoj.
Kriegi por alhelpo la nigran buŝon apertas,
sed sonojn ne elgorĝas, oscedas tomboprofunde.

Tiam Utnoa aŭdas, en tranca stato, misterajn
voĉojn, kiujn li krias kun malsimila modulo,
samkiel mediumo en nigra nokto ĉetable
spiritojn de mortintoj el tomboŝtonoj elvokas
kaj la ĉirkaŭsidantoj dum aŭskultado timiĝas.
Same Utnoa ĝemis en tiu mondo silenta:

—Mi estas Rajk, ĉasonto per bastonbatoj, Alaske,
de sendefendaj fokoj, eĉ de plurtagaj idetoj,
senhaŭtigonte ilin antaŭ patrinaj okuloj,
por fari homajn peltojn per felo lukse valora.

Kun brovoj sulkiĝantaj, Utnoa grumble balbutas:
—Valdezo mi nomiĝas, toreadoro buĉonta
virbovojn dum spektaklo: ŝvita publiko voluptos
je l' fintoj kaj torturoj ĉirkaŭ sunardaj arenoj.

—Rubjoo mi nomiĝas —la voĉon bruske li turnas
grinca kaj lipojn tordas—, mastro de firmo kemia
venenajn reziduojn al riverfluo ĵetonta
ĉe l' Mediteraneo: mi pri l' missekvoj ignoros,
samkiel l' uzinestroj kontraŭ salubron atencaj,
dum tute malaperos diafaneco de l' ondoj.

—Abd-Al-Rahur' mi estas —per voĉo raŭke rikana
Uttu, kapskue, krias—, petrolŝipara ĉefestro
kaŭzonta nigrajn flusojn: lavonte al mi la manojn
en la viskozaj ondoj, min mem pri kulpoj absolvos,

pluridos en intimo nur kalkulante monerojn.
En lando de malriĉo, rajtos posedi palacojn
dum la popolo propra nur malsatmortos apude.

Nun kun vizaĝo pala, stertore Uttu daŭrigas:
—Morebo mi nomiĝas, inĝeniero de trusto,
kies fridigsistemoj kontraŭ ozona tavolo
de l' tero misefikos per elsendado de gasoj.
Konscie pri l' rezultoj, subaĉetite proponos,
por ŝpari ŝanĝokostojn kaj merkatperdon eviti,
daŭrigi samprocede ĉe l' konstruado de varoj,
nur false atestante, ke danĝereco dubindas.

Sed li ne plue tenas kaj apartigas okulojn
de l' karbeflama bildo kiu transmensas informojn.
Kiel eŭparkerioj, dum praaŭtuna krepusko,
ĝuadas ĉe l' festeno de amfibio blupulpa,
sed hidaj kinognatoj inter filikoj aperas
kaj tiuj svinge hastas al sovaĝejo terure,
kun vosto ellevita kaj manoj vente remantaj;
aŭ kiel kretacee, vidante lafan erupton,
diskuras ĉiuj bestoj por sin elsavi, panike,
jen parasaŭrolofoj, igvanodontaj amasoj,
pakicefalosaŭroj, trikeratopsoj blenditaj,
predemaj fobosukoj, strutiomimoj alarmaj,
lasinte siajn idojn por kiuj helpo ne eblas,
serĉadas rifuĝejon sub nigrecindra nebulo,
tiel Utnoan naŭzis l' abomeninda ruino
de l' hejma loĝplanedo disdetruota milforme.
Sed nun, pro l' fortostreĉo, li falas svene sur grundon.

Numuo lin transprenas al regiono de kosmo,
kie asteroidoj multmilione pululas
kaj fluge li ekdiras al frostotrema nomado:
—Jen ĉi bizaraj astroj, ŝajnantaj flosaj insuloj.
Kelkaj konsistas rokaj, aliaj fere nikelaj

kaj la ceteraj miksaj, jen kalkaj, peze silikaj,
malsimetrie formaj kun ŝanĝiĝantaj orbitoj.
De praplaneda krevo ili verŝajne rezultis.
Homoj rampantaj grunde sur ĉiu bloko troveblas:
kun algluitaj membroj ne povas celi rigardon
alien ol memventren aŭ al ŝtonaro sub ili.
Murmurojn katakombajn ili perceptas image
kaj skuiĝante tremas sub hurloj, knaloj enigmaj,
senscie pri l' momento kiam la nova reeĥos,
ĉu besto ombros bave, ferbulo skurĝe trahaŭtos.

—Sed kion ili kulpas —Utnoa nun pridemandas—
kaj kial ili solas sur ĉiu roko tre diste?

Numuo jen respondas: —Sur tiuj rampas izole
individuismuloj, kiuj sin mem nur atentas,
limakaj egoistoj, pretersentemaj al io,
kiuj allasas mortojn kaj diktaturojn ebligas:
sen ili ne ekzistus sur tuta mondo misaĵoj,
ĉar ili pli multnombras ol oceane guteroj.
Oportunismaj homoj kaj konformistoj obeaj,
kiuj rezignacie ĉion servute toleras,
ĉu diskriminaciojn, militojn leĝe faritajn.
Erudiciaj mensoj, ŝlosantaj sin en eburaj
turoj, sen ia zorgo pri l' kolektivo socia.
Memadorantoj sume, por kiuj centro de mondo
estas la umbiliko propra, cetero nur ombroj
kreataj de ilia cerbo por propraj amuzoj.
Ĉi uloj, kvazaŭ dioj faros, plenrajte laŭ ili,
el efektivaj homoj nur ludocelajn imagojn.
Por ili certe gravos krom la sinamo nenio.

Sed nun leviĝas brako en dense nigra vakuo
kun sabro arĝentbrila kvazaŭ lunarko ĉiele,
kaj ie el profundoj murmura muĝo resonas:
—He, kiuj do vi estas, truduloj damne troriskaj,

vi, aŭdacintaj veni al ekzilejo Lemura?
Repaŝu viamonden, jam ne transiru pretere!

Utnoa rigidiĝas. Senvorte ambaŭ ekhaltas.
Sed tiam nova voĉo el dekstra flanko retondras:
—Silentu, mizerulo! Ĉu vi ne scias aperte,
ke temas pri venintoj de alimonda genero,
kiujn fatalo puŝis al nia kosmo pratempa?
Reiru al kuŝujo kaj ne ŝajnigu malkonon!

Kiel bojema hundo ekkaŭras grumble piede
antaŭ l' admonoj mastraj; aŭ se ŝtelisto ruzulo
alĵetas viandpecon, ĝi kvietiĝe senkrias,
vorante kun avido lumbaĵon freŝe sukecan,
kaj tiu povas salti sen danĝereco barilon,
same ekmutas voĉo kaj tuj la brako minaca
retiras nudan klingon kaj malaperas en ombroj.
Pograde venas formo el tiu sama situo.
Ĝi ŝajnas homa bildo kun monstra kapo giganta,
sed baldaŭ videbliĝas, ke tiu kapo senmembras,
simile al lundisko kiu post nuboj izolas.
Nun malfermiĝas buŝo kvazaŭ senfunda kaverno:
—Pardonu l' aroganton de mia brako kolera.
Mi antaŭestas Jang-Ĉu, kiu predikos aplombe
memismon absolutan kiel principon unikan
de saĝa homkonduto. Ĉiam servilan obeon
al la sensumoj korpaj kaj al instinkto proklamos.
Pro tio miaj membroj nun dissemite vagadas
aŭ dissternite kuŝas sur pluraj astroj aridaj
kaj sole mia cerbo ĉi-monde saĝe rezonas,
sed poste se mi karnos, mi jam komplete frenezos.
Mi montros la hororojn de nia vivo, petante,
ke vi kapitulacu nian ekziston ebligi.

Tiam li brovindikas al ŝveba astro senforma:
—Jen mia kripla torso kiu skuiĝas agite

sur tiu glacimonto balanciĝanta hazarde.
Inter migrantaj blokoj ĝi rivoluas eterne.
Sur nuda spino tekstas mia maksimo tatue
per ruĝaj bildliteroj: «Eĉ haron nepre ne donu,
kvankam tutmonda savo de via dono dependus.»

Antaŭe transiradas multformaj blokoj abruptaj
kun grando tre diversa kaj formoj malsimetriaj,
samkiel vento rulas sur firmamento nubrondojn,
kiuj je l' vido ŝajnas diversaspece figuraj,
aŭ kiel inter arboj laŭ milda fluo kaprica
flosadas duonmerge putrantaj fruktoj eraraj
kiujn ĉaristo ĵetis al riverego firube
kaj ilin dum la nokto la akvoratoj ekronĝas,
simile blokoj drivis en kontinua sinsekvo
sub svaga lumo stela. Kaj jene Jang-Ĉu daŭrigas,
signante mentonmove kaj per pupilo fajrera:
—Jen tiu bloko meze, al ĉifonaĵo simila.
Tie Feng Ĉing rampadas, kiu portreton adoros
de si mem kaj incensos. Donojn, parfumojn oferos
dum ŝi recitos versojn memlaŭde propre verkitajn.

—Jen roko sube drivas, ŝajnanta skroto rugeca
—nun post mallonga paŭzo daŭrigas Jang-Ĉu montrante—:
sur tiu nudas Kraso, epikurisme vivonta
sen familiaj zorgoj, sen respondeco, solule,
de sklavoj ĉirkaŭate. Lin distros sperte hetajroj,
kolringaj dancistinoj. Ne nur la korpodelicojn
sed la animkvieton, filozofie, li serĉos,
inter poetoj korraviĝon. Naturo kaj artoj
lin kontentigos plene, ekster kunhoma sidrondo,
frandante vesperruĝojn kaj najtingalan arion.
Sed nun li rampas sola kun nuda korpo gelanta.

—Rigardu, en lontano, sur bloko nigre kikera:
jen Hŭambe sin fermonta monaĥineje sekure,

sen vera vokiteco, pro malkuraĝo vivlukti,
false kantonta preĝojn kaj promesonta lipece
al dio nefidata, ĥameleone kaŝonta
hontindan ekzistadon, ŝanĝe de mola protekto.

—Maldekstre plenverukas promontoraĵo triĝiba.
Tie sin trenas Nilfers, gardisto apudrivera,
ruine sin narkonta. Li vojojn, urbon evitos
kaj flegos nur la bestojn, kiujn tenere rilatos,
sed abomenos homojn. Ebrie murdos amikon
celantan lin ekhelpi en arbarego picea.

Sed nun Jang-Ĉu'an kapon je l' haroj pugno retrenas:
brovdensoj kuntiriĝas kaj la mieno dolore,
dum Jang-Ĉu sin forsuĉas en la malplenan abismon,
samkiel lunon kovras ĉarpiaj nuboj opakaj,
pelataj de ventego tra l' firmamento murmura.

Utnoa nun ekkrias neelteneble, torture:
—Ho dioj nubetronaj, kiom entute perversas
kerne la homanimo, ĉar ja neniu klopodas
pri sia proksimulo aŭ pri la tera loĝejo,
sed nur por si mem celas en miskonduto droniga!

Singulte li lamentas pro l' sammondanoj orgojlaj.
Kiel dimetrodonto dum praepoko permia
surprizas eriopson pretan je ovodemeto
ene de lirla rojo apud kaskado susura:
la griza ombrelulo, post ruzinsida manovro,
salte enpikas dentojn sur kolon skvame tegitan
kaj l' amfibio mute en konvulsio pereas,
kies embrioj sukcesos eriopsi neniam,
tiel esperoj dronis en intimeco de Noa,
konscie, ke l' homaro egocentrisme fimonstros.

—Ho Uttu, plenprudenta, kies saĝeco triumfas—

Roa konsile diras al suferanta nomado—,
gravuru ĉi vidaĵojn en via menso senviŝe
kaj kiam vi surmondos en konsekvenco reagu,
ĉar viamane sidas la ŝanco rasti ĉi morbon.

* * *

Ambaŭ forflugas fuĝe el tiu mondo sinistra
kaj en stellumo ŝvebas antaŭ sferego ciklopa,
dum Uttu vidas meze girantan ruĝan okulon,
kaj al Numuo diras pri la strangaĵo demande:
—Ho Numu, ĉionsonda, mia gvidisto tra vojoj:
do kio nin atendas en solpupila planedo?

Averte li respondas per jenavorta klarigo:
—Ho Uttu, tiu mondo estas multoble pli granda
ol tiuj jam viditaj antaŭ la zono disera
kaj same plu okazos pri la restantaj ankoraŭ.
Ĉi ruĝa makulego pli dimensias amplekse
ol iu astra globo, kiun pli frue ni trovis.
Ĝi estas sangvortico, nehaltigeble giranta,
kie mergiĝi povus via vergrunda planedo.
La sango de l' militoj en ĝi vastmare cirkulas,
ĉiuj militmurdontoj en ĝi portiĝas akcele
kune kun la murdotoj, plenaj je l' sama malamo.
Sed ni ne subenŝvebos en uraganon esplore,
ĉar ĉiujn ĝi ensuĉas, neniel eblas eliri.

Jam ili fulmrapidas apud verdulo triringa
kun dek du satelitoj ĉirkaŭ globego magneta
kaj antaŭ ekdemando, Numuo jene klarigas:
—Ĝi estas kripta mondo, kun nevideblaj estaĵoj,
pri kies koruptiĝo neniu pense divenus.
Do, tute senutilus malsuprenflugi vidonte.
Kaj same ĝi okazas pri du mismondoj en sekvo.

Pli disten ambaŭ flugas el suno grade naniĝa,
preter du bluaj sferoj, al la ekstero de kosmo,
dum ili proksimiĝas al plej malvarma planedo,
kies surfacon formas nur gasoj dense glaciaj
kaj supra ŝelo ecas el travidebla metano.
Tuj sube rimarkeblas miloj da grotoj abismaj
en kiuj staras, ombre, muraj konstruoj apartaj,
similaj unuope al koncentrejo de punoj.

Numuo tuj klarigas al la nomado demanda:
—Tie troviĝas, funde, la diktatoroj opresaj,
murdontoj de popoloj sub falsa beno de dioj,
rasistoj kaj klasistoj nur sian rondon amantaj,
fanatikuloj sektaj, kiuj idolon adoros,
dogmecaj ŝovinistoj el iu ajna nacio,
kiuj defendos ŝtatojn, kvazaŭ kondiĉo natura,
kaj celos siavice eksterme viŝi praetnojn,
forigi malsimilojn kaj unuigi trudeme
sub sia propra rego, neniigante ceterajn.
Despotoj genocidaj, kiuj pli bone ja farus
se murdus propran genton, kiu al buĉo kuraĝos,
elstare la nazioj, kiujn vi vidas ariĝi
ĉirkaŭ kultata ĉefo, la plej malinda vivulo,
pri kies elformiĝo kulpos la tuta homaro.
Lia solnura eblo vidigas plej evidente
la veran kernmedolon de elsarkinda genero.

Tiam rigardas Uttu tra l' kristaleca tegaĵo,
kie kavernoj rondas kun glataj muroj apikaj.
Jen Sanĥerib' , Nerono, jen El-Hakimo, Pizarro,
Kaster, Stalin' , Ĉaŭŝesku, tie Hutamno, Sedejmi,
Amin Dada' , Videla kaj Fing Tjaŭ Seng, la terora.
Jen Franko, Mussolini kaj naŭzekrima Hitlero,
kiujn la dioj iam ne elpardonos eone.
Li vidis nenombreblajn, pro kies nasko la tempoj
inkube rememoros kaj hontos homi la homo.

Damnitoj, unuope, sidas en kaĝo vitreca
kaj antaŭ ilin venas familianoj amataj,
gepatroj kaj gefiloj, edzino milde junaĝa,
aŭ la sekrete kara, en intimeca favoro,
kaj tiujn jen laŭvice perfortas oni sadisme
ĉiam malsamaj uloj, de ili plej abomenaj,
kaj ĝue torturadas, alrikanante diboĉe.
Tamen la kondamnitoj ne povas kure rifuĝi,
sin gluas al la vitroj per gravitforto puŝate
kaj ne sukcesas fermi unu momenton okulojn,
ekdormi aŭ ripozi, sed la spektaklo ripete
kruelas antaŭ ili, kiam la rondo karula
transiris jam. Perpolme klopodas ŝtopi l' orelojn
je l' ŝrikoj, sin pugnas kaj unge pikas orbitojn,
sed vanas la intenco ĉar ili fikse plu sondas
strabisme kaj freneze al la vidaĵo resuĉa.

Tiam damnito sombra al Uttu vorton adresas,
kvankam ĝi eĉ sekundon ne povas turni rigardon:
—Ho Uttu, ekkompatu, indulgu nin kaj venontojn!
Neniam ni ekzistu, neniam vere ni korpu.
Mi estas, kiun homoj nomos future Hitlero,
tra l' tuta terplanedo kaŭzonta fie masakrojn.
Ho vi, la tendeloĝa, de vi, ho Noa, dependas,
ke l' tera raso svenu, ke l' misa kreo nuliĝu.
Restas nursola savo: ne elĉarpentu goferojn
kaj ĉiuj teruraĵoj ecos nur bildo vakua,
ne iĝos efektivaj sur terplanedo reala.
Kiel bonŝance, se neniam nin naskus Evido,
se antaŭ la akuŝo ni fetus nuraj abortoj
kaj ĉiuj inaj ventroj de nun sin ŝlosus eterne!

Sekve antaŭ l' okuloj de la nomado leviĝas
muroj pikdrate retaj de barakara punejo,
kie milopojn gase oni sisteme buĉadas,

senkulpajn demanditojn tenajlas bruske senungaj,
dum lante senhaŭtigas infanojn ŝire kriantajn;
antaŭ gepatroj gapaj knabinojn oni perfortas,
kun propra patro kuŝi ilin je l' fino devigas
kaj poste pafmortigas sub ĉies vido mitrale;
portigas en kazerno rokpecojn nepre senuzajn
ĝis alta ŝtonamaso kaj sekve ŝvite samloken,
al homoj kadavrecaj, figuroj oste kadukaj,
volmankaj ĝis ne emo de si forpreni la vivon.

Samkiel smilodonto sur kornan uron eksaltas,
kiu stumblinte glitis en lagon peĉe bituman;
per dentoparo sabra rabbesto breĉas aorton,
dum ankaŭ pravulturoj, antaŭflarante kadavrojn,
sur dorsojn mergiĝantajn grake sin ĵetas avide,
sed ĉiujn glugle sorbas opake nigraj oleoj,
kungluiĝante ŝlime en viskozecan unuon,
same ĉiuj esperoj en Uttu morne pereis,
vidante la hororojn de la homaro futura.

Tiam Utnoa diras al la Najano tremvoĉe:
—Ho Numu, kondukanto, mi je l' Plejalta petegas!
Min tiru el ĉi vidoj kaj hantoj apokalipsaj.
Reportu min al mondo de l' ĉiutaga realo,
kie riveroj zumas kaj brizoj vange karesas.

Jene respondas Roa al l' ekzilita nomado:
—Ho Uttu, vojmigranto sub ĉielvolbo senlima,
vi povis traviziti la pretermondon *uvaŭman*,
sidejon de ebluloj, kiuj ekzisti ne indas.
Jen estas produktaĵoj de la homara komuno,
de ĉies kormedolo, de l' karaktero perversa,
al kies elformiĝo kontribuados egale
ĉiuj loĝantoj teraj, nuntempaj kaj akuŝotaj.
La ŝipon ne konstruu por malebligi la savon
de fuŝaj kreitaĵoj, ĉar agresemaj esence,

tion mi diras al vi, se en vi restas iome
da saĝo, se ankoraŭ plunestas ia prudento
en unu Adamido, en una sola rasano.

Numuo nun aldonas per laca voĉo, suspire:
—Ho kiel bone, se dronus la homaro diluve,
se mutacia gento ekstermiĝinte subondus:
la tuta kosmo rajtus, finfine, spiri libere!

* * *

Numuo kaptas Noan je l' mano febre tremanta.
Ambaŭ reflugas urĝe tra l' regionoj eteraj,
kirliĝas trans funelo inter la mondoj oponaj.
Sed nun rimarkas Uttu, ke en la spaco li solas.
Li direktiĝas rekte al membroj karne fizikaj,
sekvante lumfadenon, kiu arĝente briladas.
Revidas flokajn nubojn de la planedo bluluma
kaj venas al Ŝinaro, al hejmo florornamita.

Li nimbe enŝoviĝas en korpon nove pulsantan,
kiu ravite ĝojas en la brakumo de Oba.

* * *

Li tuj forgesis ĉion, pri io plu ne memoris
el l' esplorado mema dum transepoka vojaĝo.
Nur spuroj restis kaŝe en subkonscio profunda.
Ankaŭ Numuo Roa al sia korpo revenis,
kuŝanta parfummeze en ŝipkajuto joniza.

Kiam per rozaj fingroj aŭroro hele salutis,
ĉe sunradio milda vekiĝis Oba, l' edzino.
Kaj baldaŭ ŝi ekdiris al sia edzo plename:
—Ekstaru jam Utnoa, ho mia kara, vekiĝu!
Krepuskis la aŭroro por revojaĝi ĉemaren

kaj veni al hejmlando de ravaj fruktoj edenaj.

Uttu palpebrojn levis kaj al l' edzino rigardis,
dolĉe lotusokula, kun korvonigra hararo.
Kaj tiam li ekdiris kun sulka brovo ĉefrunte:
—Ho Oba, mi ĵus sonĝis aŭguron strange parolan,
kaj eble vi kapablus ĝin interpreti klarige,
ĉar ankaŭ vi enestis en tiu sonĝo ĉi-nokta.
Jen apud Eridurbo el firmamento hakilo
falis kaj granda homamaso eliris observi,
en humon pikiĝintan. Ĝi estis, Oba, dutranĉa
kaj ĝin mi metis antaŭ viaj piedoj inkline,
sur tiun mi ekkuŝis kvazaŭ edzinon amorus;
poste vi ĝin deplukis kaj donacante liveris,
ke ĝi fariĝu al mi kompaniulo ĉiama.

Jene parolis Oba: —Ho edzo, mia karulo,
ankaŭ per bildoj sonĝaj sin dioj ofte rivelas.
Sendube ĝi instruas pri l' ĉarpentado necesa
ĉe l' fora Eridurbo malgraŭ konstantaj afliktoj,
tial, ke plu neniam vi retroiru ĉi-taske
kaj vi al ĝi fidelu kvazaŭ al mia kuneco.
Ni celu al Eridu por ĉizi fajle la ŝipon
kaj al l' insulo sorĉa de l' praularo revenu,
ĉar kompletiĝis puno dum sep generoj amaraj.

—Verŝajne —li respondas—, ho mia bela, vi pravas.
Dum tiuj migraj tempoj ni per sufero hardiĝis
kaj fine ni jam pretas ĉiom elsarki malamon,
malgraŭ ke restaj spuroj en nia sino venenas.
Sed ili malaperos kaj forviŝiĝos anime
ĉe niaj posteuloj en iu tago venonte.
Eĉ se la nunaj homoj estas instinkte kruelaj,
ilia koro celos iom post iom al amo.
Ĉiu respektos fraton en harmonia naturo.
Kaj, post generacioj, nepoj kun miro reaŭdos

pri raboj kaj perfortoj, militoj, sangaj agresoj,
ĉe kiuj antaŭuloj sin perarmile fibuĉis.
Kaj ili, pridubante, hezite kredos apenaŭ,
ĝin pensos legendaĵo, nur fabelita rakonto.
Ni voju plendecide, por posteuloj ekiru:
eĉ se ni malvirtemas, ili future plibonos.

Post longaj misfortunoj, Uttu kuraĝe fervoris,
li plene reakiris sian antaŭan elanon,
kiam rufhara Laŝmu lin akompanis amike
ĉirkaŭ Hubabaj montoj kaj apud Ur, la feblanka.
Samkiel elefanto en maldensejo plenflora
ekĝojas rimarkante, dise, sur grundo tufeca
berojn de *munketeo*, ĉar tiujn ege ĝi ŝatas
kaj frandas kun plezuro per rostro suĉe tirante,
kaj poste alimpetas kontraŭ la trunko faligi
perkape pliajn berojn el tiu arbo delekta;
aŭ kiel eburulo, pro l' persekuto de homoj
lasinte sian gregon, nun malproksimen eraras
sola, serĉante anksiece, inspire retrovi
la spuron al perditaj; malmulte, haste ĝi manĝas,
celante ĉiam voji ĝi tenas longe soifon,
ĝis fine sian trupon retrovas iumatene
kaj estas ricevata per ĝojesprimoj ekzaltaj
de kiuj nostalgiis dum multetaga foresto;
la ĵusa alveninto sonigas bleke triumfon
kaj siajn lastajn fortojn preskaŭ elĉerpe kolektas
sin ĵeti al kontenta troto, feliĉe, kapleve,
dum montoskuaj korpoj de la greganoj aliras,
la spacon plenigante per trumpetnotoj ekzotaj,
kaj post la renkontiĝo ĉiuj sieĝe karesas
la erarinton rostre kaj kunklakigas eburojn
lumantajn lunradie inter masivaj amasoj,
same Utnoa ĝojis en sia koro, revigle,
kaj post doloroj spertis pri animrava feliĉo.

Uttu elpaŝis fide el aromplena kabano,
kun la edzino kara, la juna Laŝmu-fratino.
Rigardis al la suno, supreniranta ĉiele,
kaj aŭdis buntajn kantojn de la birdaro konkura.
Nun malnodinte prenis el la felsako ŝafida
la oran metalrondon, kiun l' edzino donacis
kaj ŝnure ĝin pendigis sur bruston harde suferan.
Stele en silvoj brilis la medaljono de Dilmun.

FONTOJ

Pli specifaj fontoj de antologiitaj aŭ sintezitaj fragmentoj

Kanto 1:

— *Poemo de Gilgameŝ*.
— Vergilio, *Eneado*.
— *Biblio*.
— Erick Von Däniken, *Beweise*.
— Informantes indígenas de Sahagún, *Códice Florentino*.
— Ieree 19 k.a., *Informoj de Ummo*.
— (Pri bestoj, en ĉi tiu kaj en ceteraj kantoj:)
Arthur Berger, Josef Schmid, *The world of animals*.
Henrique Galvão, Teodósio Cabral, Abel Pratas, *Da vida e da morte dos bichos*.
Kaj aliaj, inkluzive de dokumentfilmoj.

Kanto 2:

— Priarkeologiaj verkoj, i.a. tekstoj de Robert Koldewey, Josef Klima, Hartmut Schmökel (*Ur, Assur und Babylon*), James Bennett Pritchard (*Ancient Near Eastern Texts*).

Kanto 3:

— Ieree 19 k.a., *Informoj de Ummo*.
— Vergilio, *Eneado*.

Kanto 4:

— Louis Couperus, *De naumachie*.

— Priarkeologiaj tekstoj, i.a. studo de Leonard Woolley pri la reĝaj tomboj ĉe Ur.

Kanto 5:

— Giovanni Papini, *Giudizio Universale*.
— Priarkitekturaj libroj, i.a, el diversaj aŭtoroj, *World Architecture*, kaj aliaj artlibroj kaj dokumentfilmoj.
— Dougal Dixon, *After Man: A Zoology of the Future*.

Kanto 6:

— Valmikio, *Ramajano*.
— Vergilio, *Eneado*.
— Homero, *Iliado*.
— Nicholas Guild, *The Assyrian*.
— *Biblio*.

Kanto 7:

— Valmikio, *Ramajano*.
— *Biblio*.
— (Pri la planedoj:) Diversfonte, i.a. Roman Smoluchowski, *The Solar System*, kaj samteme el Isaac Asimov.
— Giovanni Papini, *Giudizio Universale*.
— Barry Cox, *Prehistoric Animals* (k.a. samtemaj).
— *Poemo de Gilgameŝ*.

POSTPAROLO

Tri elektitaj eroj el la *Postparolo* de Probal Daŝgupto
por la unua eldono

Novtipa heroeco

Ĉia literatura laborado ricevas herede, kaj kun iom da embarasiĝo pludonas, materialojn kaj eĥojn el la heroe epopea pratempo de la teksta memoro. La postaj verkoĝenroj diverse prilaboras la erojn de tiuj pratradicioj. La teksto de Montagut rekte ĝisfosas ĝis la heroa bazo de ĉia literaturado kaj reverke rezistas la longe akceptitan, sed ne plu akcepteblan, kodon de la heroa militado, la militaj honoroj, la honorkonfirmaj belulinoj, kaj la belverkaj tropoj. Apud la naciterenaj postmodernoj do, kiuj rezistas la hegemoniajn nacikulturajn profilojn kaj, post sukcesa detruo de la sanktfiguraj nacioj, hezitas pri la ebleco de kultura interlaboro inter diversaj rezistmovadoj, Montagut rezistas la antaŭnacian praformon de la ŝtata civilizo mem en ties literatura dimensio, kaj li sukcese refiguras la veran sankton kiel la strebadon doneme gastigi kaj akcepteme gasti sub draste malfacilaj kondiĉoj. La hezitaj negastigemaj teorioj de nia multebrua nuno certe malfaciligos la seriozan aŭdiĝon de lia iniciato; sed lia teksto estos modele heroa gasto. Ĝi faras nete utilan laboron por la tuta literatura mondo, eĉ laŭ sen-Esperantaj konceptoj de tiu mondo. Tiel ĝi perlaboras lokon en ĉies mondmapo.

Kian utilan laboron faras la teksto pri Utnoa? Mi ripetu, ke ĝi reverke rezistas la eksan kodon de la heroa militado, la militaj honoroj, la honorkonfirmaj belulinoj, kaj la belverkaj tropoj. Vi ĵus legis la epopeon kaj freŝe memoras, ke ĝiaj herooj estas tiuj, kiuj sukcese venkas la ĉiam reaperantan tenton militi, ankaŭ kiam tian venkon devas kroni la horora kaj parencoploriga morto de la herooj. Vi memoras, ke honoron portas, al la veraj homoj en la epopeo, ne la povo milite detrui, sed la kapablo konstrui ion mem kaj partoprenigi aliajn en konstrua laboro. Restas al vi freŝe, ke en tiu ĉi epopeo la virinoj ne objekte atendas, ke

rabe akiru ilin honoraj herooj, kaj ne panegiras pri perforta konduto, sed rangas apud siaj viroj kaj apogas ilin kiel sambatalanoj, ne kiel batalakiraĵoj. Kaj vi verŝajne rimarkis, ke la tekstobeligaj metodoj de Montagut estas same malobjektaj kaj partoprenaj, kiel liaj belulinoj. Pri ĉi tiuj metodoj ni reparolos poste, iom detale. Provizore ni restu ĉe via impreso pri ili post ĵusa lego de la epopeo, kunmete kun viaj impresoj pri la heroeco, pri enaj bataloj, la kunbatalintoj kaj la honoro en tiu ĉi epopea mondo. Surbaze de tiuj impresoj vi certe kunvoĉos kun mia juĝo, ke Montagut grave kontribuas al la postmoderna laboro, donante al ĝi senembarasan heroan bildon de la ĉiesa, homarana homeco.

Farante tion, Montagut plenumas flanke de ni ĉiuj longe pendintan devon. Esperanto, malgraŭ sia manko de kvante aŭ institucie videbla sukceso, estis idea partoprenanto en tiu aventura modernismo, kiun karakterizis la severa kaj rekta distanciĝo disde la propraj mitoj, kaj kiu pli-malpli finiĝis. Tiu modernismo diluve klarigis la bazon kaj la ĉiesecon de la tero, sed ankaŭ lasis ĝin askete nuda, senverde astra. La Esperanta kulturo, pli ol multaj aliaj varperoj de la modernismo, aparte devas kontribui al la postdiluva entrepreno revesti la teron — per nia specifa verdo. Tiu ŝuldo ne plu maltrankviligos nin: Montagut komencis ĝin pagi, kio lasas al ni la facilan taskon lerni de li kiel daŭrigi la laboron.

Aktiva abdiko

Ne estas mia celo verki etan manifeston por nova alianco inter la verda stelo, la verdpartiaj ekologoj, kaj la sciencoj ĝenerale. Ankaŭ se la leĝoj de la kulturlabora trafiko, pro kialoj ne konataj al mi, diktos por *Poemo de Utnoa* ekster-Esperantan sorton (disvastiĝon pere de etnalingvaj tradukoj, komentarioj, k.s.), restos grave por ĉiuj, verduloj aŭ ne, kiuj lernos de la teksto kaj daŭrigos ĝiajn strebojn, ke la teksto ne simple predikas ian gastigan homecon. Ĝi praktikas aparte riĉan formon de ĝi. Ĉi tiu formo de la gastigado, kiun mi menciocele etikedas «aktiva abdiko», ŝajnas al mi, post la senkreditiĝo de la militismo, la plej vivipova metodo por ponti tiujn distancojn, kiuj siatempe ŝajnis pravigi

la militojn. Ĉe Montagut la scienca akiro de scioj pri la natureroj estas la lerna parto de la kultura laboro pli komplete komprenenda kiel konatiĝo kun aliaj samnaturanoj por povi harmonie partopreni en la vivofluaro. La lernon daŭrigas, preter la scienca fazo, la specife arta laboro prezenti al si la memon, kiu efektive digestis kaj enloĝas la vastan komprenmondon disponigatan de la natursciencoj, la historio, la geografio, kaj la mondliteraturo. *Poemo de Utnoa* spektakle ekzemplas tiun necesan sinprezentan artadon, en kiu la moderna homo lernas de la multegaj kuncivitanoj en sia multspecia, multregiona vivkosmo. Lernante de niaj alicivilizaj kunhomoj aŭ de niaj nehomaj najbaroj, ni volonte demetas nian specifan gentan tradicion, kiu instruis nin fiere etnani aŭ naciani. Ni moligas la ŝtatajn aŭ ŝtateskajn murojn, kiuj nin entenis kaj promesis ŝirmi kontraŭ danĝere nomadaj eksteruloj. Ni pretiĝas kunvici kun la heroaj nomadoj de Montagut, forlasante en nia serioza lernemo, la orgojlajn instruaĵojn de la ŝtatoj kaj iliaj tiel nomataj eduksistemoj.

Ĝojesprimo

Fine, mi volas esprimi senrezervan ĝojon pri tio, ke la plej sperta gasta-gastiga movado de la mondo, la Esperanto-movado, maturiĝis kaj serioziĝis ĝis tiu grado, ke *Poemo de Utnoa* povas kristaliĝi en ĝia lingvo, esprimante la pintan gravecon de la gastigemo kiel difinilo de la homeco mem. Kun tia kvalito, ni povos eĉ sen kvantaj armeoj efektive reverdigi la teron, partoprenante ankaŭ ne-Esperantajn komprenojn de la koloro verdo. Longe la natursciencistoj, ĉefpastroj de la modernismo, festis la kvantan revolucion. Ni, la nunaj legantoj de Montagut, havas la plezuron ĉeesti la ekon de la kvalita. Vivu la vivo!

Probal Daŝgupto

Hajdrabado, Bharato
11 decembro 1992

GLOSARO

NB. ĉi tie ne listiĝis la propraj nomoj aperantaj nur en la 5a aŭ en la 7a kantoj, aŭ aliaj pri kiuj ne estas pliaj informoj. La kapvortoj koncernantaj la Gobanojn estas sekvataj per la indiko (g). Mallongigoj: NG: Neologisma Glosaro *(1983), de Henri Vatré. NPIV:* Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto *(2005).*

Ada: ĉefedzino de Lemeh, patrino de Utnoa kaj de Jubal.
Adad: dio de la fulmo kaj de la pluvoj.
Adara: rilata al la dekdua monato, responda al parto de februaro kaj marto.
adzuo: birdospeco.
agao (g): neraciulo, subhomo.
ainmo (g): baza nutraĵo gobda, kiel la pano aŭ la artokarpo inter teranoj.
Ajuba (g): speco de parlamento inter la Gobanoj.
Akitu(o): festo de la jarŝanĝo (printempe).
anoŭdo (g): drogpreparaĵo ekvilibriganta emociojn.
Antum: pradio de la universo, ĉefa dio en Ŝinaro.
apeli: 2. apelacii (neapeleble: neapelacieble, nekontesteble) — (ne troviĝanta en NPIV).
Aralluo: mallumejo, mortintejo.
argiopo: sufiĉe granda araneospeco, kun flava abdomeno transverse nigre striita. (Vidu, komplemente, en NPIV).
Arin: sepjara filo de Tubal; Lemeh-nepo; Utnoa-nevo.
Aron(o): Dilmunido kiu alfrontis la generalon Ulmin.
Arunni (g): Najano akompaninta Emmen dum unujara surtera restado. Li konsiladis kaj apogadis Roan Numuon.
aŭkso (g): arbusto-speco.
avuloj: prapatroj.
balafo: muzikilo uzata de la «griotoj», speco de ksilofono.
baru(o): divenisto, pastro.
Beŝet: patro de Luhebu.
Bezer: monteto proksima al Babelo, apud kiu kampadis la Dilmunidoj kaj sur kiu Emme Soraa prezentiĝis al Utnoa.
Bharata: Hindia (vorto trovebla, kune kun Barata, en NPIV).
bluano: terano, terloĝanto (laŭ la Najanoj).
Bluulo: la Tero (laŭ Najana esprimo).
Busla (g): filo de Inna Sooje; li edziĝis al Evue, filino de Emme.
Cila: duaranga edzino de Lemeh; patrino de Tubal kaj de Naama.

Cohar: nomadestro alfrontinta la urboligon; frato de Ukudo.
ĉiluando: bufago (NPIV); birdo el la familio de sturnoj (aŭ sturnedoj) sin nutranta per insektoj kaj aliaj etaj bestoj. Ĝi kutimas akompani multe da mamuloj, kies parazitojn ĝi forigas (Buphagus africanus).
Deja (g): konsiliano de Numuo.
desaponti: seniluziigi (NG; NPIV).
despero: malespero (NG; NPIV).
Dilmun: insulo, pralando de la Kenidoj.
dojemuo (g): ĉirkaŭdoma ĝardeno.
Dunna (g): edzino de Emme Soraa.
edimmu: animo de mortinto.
Efiedi (g): kolonio ĝemela al Naje; ĝi perdiĝis pro korpuskla kosmoŝtormo.
ekocidisto: sistema detruanto de la naturo (vd. en NG «cidi»).
Elula: rilata al la sesa monato en Ŝinaro, responda al parto de aŭgusto kaj septembro.
emerĝi: 2. elveni, malmergiĝi (NG; NPIV)
emio (g): raciulo, vera homo
Emme (Emme Soraa) (g): Najana altrangulo defendinta la raciecon kaj veran homecon de la teranoj.
Eridu: urbo ĉe la Ŝinara maro kaj ĉe la rivero Gihuno, kie la Dilmunidoj intencis konstrui sian ŝipon.
Evue (g): filino de Emme, edziniĝinta la Busla.
Filge: profetino en la templo de Ninna, en la urbo Ur.
gadio (g): vd. oksu-gadio
Gihuno: rivero pratempe alfluanta al Purattu (Eŭfrato) proksime de la Ŝinara maro.
Goba (g): praplanedo de la Najanoj detruiĝinta pro eksplodo de supernovao.
gobdemiologo (g): sciencisto pri la homaj raciuloj el Goba.
gobdo (g): raciulo devenanta de la planedo Goba.
goono (g): aŭtosimila flugaparato. ŝvebanta je unumetra alteco, uzata por mallongaj distancoj en la kolonio.
Govuo (g): antikva renoma filozofo inter la Gobanoj.
Granda Krabo (g): kromnomo de la supernovao Nugu.
griotoj: profesiaj gardistoj de parola historio en okcidenta Afriko; similaj al bardoj aŭ aedoj.
Gupa: Ŝabda-edzo, imperiestro de Ur.
Gupoj: nomadoj kunbatalintaj kontraŭ Nineve.

ĝero: geriso (NPIV); tigoforma insekto, kies du antaŭaj kruroj estas mallongaj kaj la ceteraj tre longaj, plej leĝere moviĝanta sur la akvo (gerris lacustris / hygrotrechus conformis).
Hadurim: nomadestro irinta ambasadore al Rimuŝ.
Helku: monto kie renkontiĝis Laŝmu kaj Utnoa.
Henoh: praulo de la Dilmunidoj.
holmo: monteto / holmaro: montetaro (NG; NPIV).
holo-: (pseŭdosufikso:) reliefa, tridimensia. Vd. «holoedro», «holografio».
Hubaba: monto kiun esploris Laŝmu kaj Utnoa.
Iboo (g): stelo de la praplanedo Goba.
impalo: speco de antilopo — (ne en NPIV).
Inna (Inna Sooje) (g): Najana biontologo defendinta la neraciecon de la teranoj.
inovi (g): flavkolora fruktospeco kultivata en subgrundaj areoj.
interpelaci: interpelacii (vastsence).
Irud: Tubalido, batalinta antaŭ Nineve.
Iŝme: fianĉino de Tudar kaj servistino de Ŝabda.
Iŝtar(o): dia personigo de la planedo Venuso.
Itur: mastrumanto de princa bieno apud Babelo.
izuo (g): travida, forta metalo. La tuta Naja kolonio estas kovrita per ĉi tiu metalo.
jakareo: speco de krokodilo — (ne en NPIV).
jakoja: mantelospeco uzita de kelkaj sud-amerikaj popoloj.
jaojo (g): botelsimila manĝujo por likvaĵoj, el kiu oni sorbas pere de longaj flekseblaj tuboj.
Jareb: pli aĝa filo de Tubal.
Jebe: Dilmunida knabino al kiu enamiĝis Arunni.
jegoa (g): sinonimo (varianto) de «agaa»: neracia, subhoma.
Jiŝka: bofilino de Roa Numuo; vidvino de Loedu.
Jogoo (g): funkciulo atestinta la geedziĝon de Evue kaj Busla.
Jokŝa: nomadestro irinta serĉi helpon antaŭ la batalo ĉe Nineve.
Joliboa: edzino de Tubal.
Jubal: frato de Utnoa reveninta el Nineve kun aliaj postvivintoj.
juvo (g): trinkaĵo ofte sorbata antaŭ enlitiĝo.
kacimbo: seka kaj malvarma sezono en Afriko.
Ken: praulo de la Dilmunidoj.
Kiduma (popolo): nomada tribo unuavice alfrontanta la urboligon ĉirkaŭ Nineve.
Kisleŭ: rilata al la naŭa monato, responda al parto de novembro kaj decembro.
klaŭzo: 2. versofina ritm-unuo laŭ difinitaj reguloj.

koagli: koaguliĝi (NG).
kopuli: kopulacii (NG; NPIV).
korao: 27-korda gitaro uzata de la griotoj.
Laŝmu: adopta frato kaj kamarado de Utnoa.
Lemeh: patro de Utnoa, Tubal, Jubal kaj Naama; adopta patro de Laŝmu.
levito: levitacio.
Loedu (g): filo de Roa Numuo.
Luhebu: kenida pastro en la Ŝamaŝ-templo de Babelo.
Magog: Kidumestro, supera ĉefo de la nomadoj kunligiĝintaj kontraŭ Nineve; patro de Tarŝiŝ.
Masaja: Rimuŝ-filino, princino de Nineve.
medaljono: medaliono.
Mibsam: unu el la nomadestroj alfrontinta Uŝumon.
munketeo: afrika arbospeco.
Naama: duonfratino de Utnoa; filino de Cila.
naan(-arbo) (g): sovaĝa arbospeco.
Nahor: Dilmunida konsilisto.
Najda: edzino de la Babel-reĝo Nimrod.
Naje (g): cilindroforma spackolonio de la Gobanoj kiu dum naŭ jaroj ĉirkaŭorbitis la Teron.
narko: narkotaĵo.
naŭkro: birdospeco.
naŭto: 2. naviganto, veturanto. Vd. «kosmonaŭto», «astronaŭto».
Natoŭse (g): valo en Naje kie situas la domo de Roa Numuo.
nejdo (g): ebla estaĵo (en paralela mondo); futureblulo.
nekropolo: granda aŭ antikva tombejo (ne nur subtera).
Nimrod: Babel-reĝo.
Ninna: Lun-diino, kultata en Ur.
Ninurta: dio de la milito en Ŝinaro.
Nisan: unua monato en la Ŝinara jaro (printempe, inter marto kaj aprilo).
Noa: vd. Utnoa.
Noguel (g): valdeklivo kie situas la domo de Emme Soraa.
Noŭde (g): pli juna filo de Emme Soraa.
Nugu (g): supernovao kaŭzinta la detruon de la planedo Goba.
Numuo (Roa Numuo) (g): Najana altrangulo defendinta la neraciecon de la teranoj, kies malaperon li celas.
oaneo (g): pratempa telepatia frenezulo, kies nekontroleblaj permensaj krioj interferadis ĉe la normala pensado de la gobanoj.
Oara (g): ĉefurbo en Naje.
oaŝ(-arbedo) (g): sovaĝa arbedospeco

oavo (g): lentoforma arĝentbrila flugaparato, regule uzata de la Najanoj inter ilia kolonio kaj la Tero.
Oba: fratino de Laŝmu.
obuoj (g): altaj arboj ĉirkaŭantaj la Najan Superan Kortumon, kies folioj estas koroformaj.
Oes Ogia (g): prezidanto de la Najaj Asembleo kaj Tribunalo, krom ankaŭ de la reganta kvaropo.
Ogia (g): vd. Oes Ogia.
ogiksua (g): rampulo, kies viando estas ege ŝatata de la Najanoj.
ojksi (g): flugilhava mamulo, kies kremriĉan lakton oni kutime trinkas.
oksu-gadio (g): ludejo, vasta fosaĵo kie oni praktikas la ludon propran al la Najanoj (vd. «oksuo»).
oksuo (g): sporta kaj intelekta ludo kolektive praktikata de la Najanoj.
okuŝmo: ĉe la talio zonita vestaĵo, ofte blankakolora kaj flor-ornamita, uzita de kelkaj sud-amerikaj popoloj.
oluo (g): arbospeco.
Oruaŭ (g): Goba sciencisto alitempa.
oruo (g): ronĝulo.
Oŭa (g): rivereto en Naje.
pleksiglaco: metila polimetakrilato.
polikloruro: varianto por : poliklorido.
Purattu/Puratta: unu el la du precipaj riveroj en Ŝinaro; pranomo de Eŭfrato.
ratifi: ratifiki, vastsence: solene konfirmi.
razuo: bestospeco.
Rimuŝ: Ninev-reĝo.
Roa (g): vd. Numuo.
rori: leone (aŭ simile) bleki (NG; NPIV).
rumbo: (aldone:) vojdirekto (surmare aŭ aere).
Ruuma: unu el la nomadestroj batalintaj kontraŭ Nineve.
Sara: unua edzino de Utnoa, patrino de Ŝeluh.
silvo: arbar(eg)o. Vd. «silvikulturo» (NG; NPIV).
simtu: persona destino, personeco.
Sivana: rilata al la tria monato, responda al parto de majo kaj junio.
Sip(p)ar: praurbo en Ŝinaro.
Sooje (g): vd. Inna.
Soraa (g): vd. Emme.
Suje (g): iama altebenaĵo sur Goba.
Ŝabda: reĝino de Ur, protektantino de la nomadoj.
ŝabio (g): fungoforma aparta loĝejo; normala surkolonia domo, kapabla surakse turniĝadi kaj altenleviĝi.
Ŝamaŝ: sun-dio.

ŝeduo: favora genio portanta la homajn tributojn al la dioj.
Ŝeluh: filo de Sara kaj Utnoa.
Ŝengu: kapitano sub la ordonoj de Ulmi.
Ŝinar(o): pranomo de Mezopotamio (vd. en Genezo 11, 1).
Ŝindur: intendanto de la templo de Iŝtaro, en Babelo.
Ŝumuk: filo de Ŝabda, princo de Ur.
Tamuza: rilata al la kvara monato, responda al parto de junio kaj julio.
Tarbiŝ: paŝtisto de la templo de Iŝtaro, en Babelo.
Tarŝiŝ: filo de Magog, svatiĝinta al Masaja.
terminala: rilata al periferia elemento ebliganta uzadon de komputilo (aŭ simila) en la distanco. Vd. alivorte en NPIV.
Teŝub: ĉefpastro en Babelo.
Tiglata: la Tigrisa rivero (praa nomo).
Tiŝri: sepa monato en la Ŝinara jaro (inter septembro kaj oktobro).
trajekto: trajektorio.
transgresio: transpaŝo, malobeo, malrespekto (pp leĝo k.s.).
Tubal: duonfrato de Utnoa, pli aĝa filo de Lemeh.
Tudar: Ur-soldato, gvardiano de Ŝabda.
tukku: kordohava muzikilo, uzebla ankaŭ kvazaŭ tamburo.
Ubaba: monto kiun Laŝmu kaj Utnoa kune esploris.
Udue (g): ĉefinĝeniero en Naje.
Ugal: kapitano de Iŝtar-templaj trupoj en Babelo.
Ukŝatar: konsiliano de Nimrod.
Ukud(o): nomadestro de la «tribo leona», Cohar-frato, kaptito en Nineve.
Ulmi: generalo de Ur.
Unavo (g): urbosimila instruocentro en Naje por ĉiuj gejunuloj 12- ĝis 18-jaraj.
unkuo: speco de tuniko ĝisgenua, uzita de kelkaj sud-amerikaj popoloj.
Ur: blankmura urbo en Ŝinaro, ĉe la rivero Purattu.
Urart(u): alta monto en Ŝinaro.
Uŝum(o): princo de Nineve, kronheredonto.
Utnoa (Uttu Noa[2]): filo de Ada kaj de Lemeh.
Uttu: vd. Utnoa.
utukku: diaĵo, genio, ĉu bona aŭ malbona.
uvaŭmo (g): paralela eblo-mondo.
vanui: malaperi, forsveni (NG; NPIV).

---

[2] Laŭ antaŭbibliaj fontoj, precipe *Poemo de Gilgameŝ*, la nomo de la heroo de la diluvo estis Utnapiŝtim, Uttu-napiŝtim, Um-napiŝti aŭ similaj. «Utnoa» estas formo kunmetita el la komenco de ĉi tiu nomo kaj de la biblia Noah/Noa. La formo «Uttu» estas uzata ankaŭ sola, ĉar siatempe ĝi ekzistis kiel tia.

vigili: maldormi (intence) (NG; NPIV).
vunuo (g): bestospeco, kies tonikon oni kutime uzas por kondimenti manĝaĵojn.
Zabazo: vilaĝo proksima al Nineve.
Zabib: princino de Uŝer, edziniĝonta al la Ŝabda-filo Ŝumuk.

ANEKSO 1

PRI LA SCIENCFIKCIAJ EPOPEOJ

Mariano Martín Rodríguez

Ĉi tiu esperantigita anekso konsistigas la Anekson 2 de enkonduka studo por la hispanlingva transdono de la verko, publikigita en 2018, sub la titolo Utnoa. Poema épico*, fare de la eldonejo «La biblioteca del laberinto» (Miraflores de la Sierra, Madrid), p. 7-38.*

Se oni ekzamenas la evoluon de la rakonta versa poezio kun sciencfikcia temo ekde la mezo de la 19-a jarcento, oni konstatas ke la regula metriko (inkludante la versiklon) transvivis laŭlonge de la tuta periodo, kun gravaj verkoj kiel *Les Fossiles* [La fosilioj] (1854), de Louis Bouilhet[3]; *De Gadhipuli a Marte* [De Galipolo al Marso] (1903), poemo en salenta dialekto fare de Giuseppe Marzo; *Emigranti* [Elmigrintoj] (1905; definitiva versio, sub la titolo *Gli emigranti nella Luna* [La elmigrintoj sur la Luno], en *Nuovi Poemetti* [Naŭ poemetoj], 1909), de Giovanni Pascoli, kaj, precipe, la galaksia tragika epopeo *Aniara* [*Aniaro*] (1953/1956), de Harry Martinson, kiun oni povas plenrajte konsideri la centra poemo de la moderna sciencfikcio ne nur pro ĝia kvalito (rekonita per la aljuĝo de la Nobelpremio al ĝia aŭtoro), sed

[3] Ĉi tiu poemo estas, plejparte, kosmologia epiko. Ĉi-specan eposon kun priskriba karaktero oni kutime ne prezentas kiel fikcian, sed kiel verecan bildon pri la origino kaj evoluo de la materia universo kaj de la vivo, laŭ teorioj ekzistantaj aŭ elpensitaj de la aŭtoro, sed ĉiel ajn proponataj kiel sciencaj. La ekzemploj pri ĉi-speca priskriba eposo tre abundas post la grava poemo de Bouilhet, kiel tion sugestas referencaj verkoj laŭ la stilo de *Petite Cosmogonie portative* [Malgranda portebla kosmogonio] (1950), de Raymond Queneau kaj, almenaŭ en la kosmologiaj partoj sen aŭtobiografia gango, *Cántico cósmico* [Kosma kanto] (1989), de Ernesto Cardenal. Tamen, male al la plejmulto el ĉi tiuj modernaj sciencaj poemoj, *Les Fossiles* aŭdacas priksribi ankaŭ la estontan destinon de la Tero kaj de ĝiaj specioj (inkluzive de tiu homa en ĝia natura dimensio), tiel ke ĝi enkondukas anticipan kaj, kiel tia, klare fikcian elementon, kiu permesas klasi ĝin kiel apartan siaspecan scienc-fikcion.

ankaŭ ĉar ĝi kombinas la du grandajn liniojn de la nuntempa sciencfikcia rakonta poezio. Unuflanke, la mallongeco de la kantoj en *Aniara* kaj ĝia ofte rapsoda tono memorigas pri la apudmeto de lirikecaj bildoj, kun kaŝita rakontado, kiel oni povas observi ankaŭ en *O Anus de 1993* [La jaro 1993] (1975), de José Saramago, kiu estas en pli granda mezuro poemo aŭ poemaro kie la fikcia dimensio ŝajne submetiĝas certagrade al kreado de etosoj, sen precizaj intrigo kaj roluloj (almenaŭ, iliaj agantoj akiras nek personecon nek nomon), tiel ke ili similas spekulativajn lirikajn agadojn, t.e., la poemoj, relative mallongaj (eĉ se ili povas konsistigi ciklon kaj formi volumon, kiel en *L'Opéra de l'espace* [La spac-opero], verko de Charles Dobzynski publikigita en 1963), kombinas subkuŝantan sciencfikciecan rakontadon kun esence lirika esprimo kaj pli perceptebla prefero por la forma eksperimentado, kiel ekzemple «Planeta străină» [Stranga planedo] (*Poezii*, 1970), de Olga Caba; «*Ala anima*» (*O Futuro à Janela* [La futuro trans la fenestro], 1991), de Luís Filipe Silva, aŭ «In Sobieski's Shield» [En la Ŝildo de Sobieski] (*The Second Life* [La dua vivo], 1968) kaj aliaj versformaj lirike-rakontaj poemoj de Edwin Morgan, probable la plej grava kultivanto de ĉi tiu ĝenro.

Aliflanke, en *Aniara* intervenas ja nomhavantaj roluloj kaj troveblas rakonta fadeno kiun oni kapablas relative facile sekvi. En ĉi tiu dua linio listiĝas, inter aliaj antaŭaj eĉ al la Novformalismo[4], la menciitaj epopeoj de Turner kaj Montagut, kiuj prezentas precizajn rolulojn kaj agadojn, eĉ romanecajn se oni flanklasas la konscian uzadon de la epika esprimmaniero, tiel same el la retorika vidpunkto kiel ankaŭ pro ilia strukturado en vastaj kantoj, anstataŭ aranĝi ilin en apudmetitaj mallongaj poeziaj unuoj, laŭ la stilo de Saramago. Ĉi tiu novformalisma versa epika verkado ŝajne provas haltigi la dissolviĝon de la (post)moderna rakonta poezio en la lirikon, kelkfoje kun tiel

[4] Kvankam neniu el ili kompareblas laŭ kvalito kun *Aniara* nek kun la postaj novformalismaj epikaj poemoj, indas rimarki ke, eĉ dum la epoko, post la Dua Mondmilito, de plej granda sinko de regulmetra epope-verkado, aperis pluraj sciencfikci-temaj ekzemploj en la angla kaj en latinidaj lingvoj. Oni povas citi kelkajn verkojn kiel la vojaĝon cele al la luno *L'Épopée lunaire: essor* [La luna epopeo: ekflugo] (1948), de François Harcourt; la sud-afrikan pripolitikan anticipan verkon *The Last Division* [La lasta divizio] (1959), de Anthony Delius; la libroserion *The Return of Arthur* [La reveno de Arturo] (1951-1955-1959/1966), de Martyn Skinner, kiu entenas futurisman version de la artura legendo, aŭ la komunisman *spac-operon Steaua lui Horn* [La stelo de Horn] (1966), de Ion Văduva-Poenaru.

sukcesaj rezultoj kiel la ekzemploj kiujn ni ĵus memorigis kaj aliaj postaj ankaŭ menciitaj en la ĉefa korpo de ĉi tiu studo.[5]

[5] La menciata studo, sub la titolo «Dioses extraterrestres en la nueva epopeya: *Utnoa*, de Abel Montagut, y la remitificación paleoastronáutica de Noé» [Eksterteraj dioj en la nova epope-verkado: *Utnoa*, de Abel Montagut, kaj la pra-kosmonaŭta remitigo de Noa], reproduktas, kun kelkaj modifoj, alian pli fruan publikigitan en *Amaltea: Revista de mitocrítica* (n.º 7, 2015, pp. 57-86). Ni dankas la afablan permeson de la aŭtoro de la studo rilate al la ĉi-aneksa publikigo.

NOTO AL LA DUA ELDONO

Ĉi tiu eldono reproduktas tiun originalan de 1993 kun minimumaj ŝanĝoj. Krom la korekto de pluraj eraroj, la aŭtoro faris kelkajn ĝustigojn pri interpunkcioj kaj pro nerimarkita manko de silaboj en pluraj versoj.

La solaj iom gravaj modifoj koncernas la Kvinan Kanton, rilate al la akompanantoj tie rolantaj. Konsekvence, la respondan version en la unua eldono oni devas aŭ rajtas konsideri arkaikaĵo.

Jen la fragmentoj de la Kvina Kanto, kun indiko, per grasaj literoj, pri la plej rimarkindaj ŝanĝitaj vortoj aŭ versoj.

Kvina Kanto

[...]

627 ***Norden tra l' Atlantiko*** *nun al urbego vojaĝas*
Uttu kaj Fidiaso...

[...]

706 *Inter tulblankaj nuboj alia korpo videblas*
kaj ŝi nun ekparolas al la nomado miranta:
—Jen Hipatia venas, novplatonisma pensisto
Aleksandria, kiu kultivos menson kaj korpon.
710 ***Elstare ŝi instruos geometrion, algebron,***
sciencon astronoman. Ŝi pionire sukcesos
dezajni astrolabon kaj densometron inventi.
De nun ***ŝi*** *akompanos en la transmonda vojiro.*
Ĉarpentu vian ŝipon kaj pro sufero ne lacu,

ĉar la futura mondo de via strebo dependas.

Baldaŭ Sklodovska svenas en atmosfero subtila.
La ĵusa alveninto salutas Uttun afable,
kaj poste komprenigas al la nomado ***responde****,*
ĉar li denove dubis pri tiumonda realo,
vidinte malaperi figurojn hele rebrilajn:
—Ni estas nur esprimo de spiritforto supera
kaj ĉiuj konsistigas nur unu solan unuon.
Tra mi vin alparolos la kolektiva prakono
de l' tagoj forpasintaj kaj de l' iame futuraj.

[...]

Sed ***Hipatia*** *rabas lin al Timbuktu ĉe sabloj,*
kie argile belas la Djinger-Bera Moskeo,
kaj en la mezo altas tiu de Sidi-Jahia.

Tiam malantaŭ nubo vidiĝas bildo brilanta
kun aŭreolo flava, en robo bunte kolora.
La filozofo *lin prezentas: —Jen nova figuro*
al ni nun proksimiĝas, alia nejdo nomota
Sunĝata Kejta, glora imperiestro de Manding,
amanto de la artoj, de l' poezia beleco,
pri kies historio kantos mondfame griotoj
helpe ***de la koraoj*** *kaj mildesona balafo.*

[...]

Jam Hipatia *svenis en atmosfero radia:*

[...]

Tuj sekve ili ŝvebas super la Golfo Benina,

kie l' Ifeajn kreojn artistoj majstre heredis:
—Jen la palacfasadoj bareliefe retablas
kaj plenas **de** *figuroj reĝaj plej fajne ĉizitaj.*
Tie skulptiĝis bestoj de la ĉirkaŭa medio:
jen arĝentitaj kokoj, jen la saltema gepardo,
tamburoj, braceletoj kaj orelringoj eburaj
kiuj prezentas homojn kun okulbrovoj enigmaj.

[...]

Tra l' nuboj konturiĝas** alia nejdo, **longjupe
vestita en **okuŝmo** *kaj* ***blanka ŝalo*** jakoja,
kun paradiza birdo sur la hararo, flavruĝe,
gagataj orelringoj kaj tresoj blue rubandaj.
Sur dekstra brako sidas araneeca simio
kiu infan-tenere ŝin ĉirkaŭ kolo brakumas.
Sunĝata alparolas al la nomado prezente:
*—**Inter folioj venas jen Frida Kahlo**, vizia*
meksika pentristino, kiu spegulos akuŝan
kaj plensuferan mondon. Ŝi malfeliĉon ekzorcos
surtoligante rompon inter realo kaj revo.

Nun Kejta adiaŭas kaj neniiĝe vaporas
super ĝangaloj ombraj de l' Kontinento Duflama.
Utnoa jam rimarkis pri la ***palflava*** *koloro*
de l' ***nimba*** *silueto kaj pri la svaga konturo.*

Li tuj rekonsciiĝas pri l' senkonsista realo
de tiuj bildoj buntaj kaj de l' imagoj aperaj,
rememorante, ke ekster sia korpo li nunas.

Tiam ekdiras al li ***la pentristino*** *serene:*
—Saluton, Henohido, celanta riske nubrandojn.

[...]

Super Ĉiĉen-Icaon ***nun Frida Kahlo*** *kaj Uttu*
ŝvebas, ĉefurbon riĉan de la Tolteka-Majaa
kulturo: —Jen la Hejmo de l' Virgulinoj kaj alte
la Korto de l' Pilkludo, Konstruo de l' Militistoj
kun mil kolonoj skulptaj ĉirkaŭ la centra masono,
la Kukulkan-fortreso kaj la Sanktejo Helika.

Uŝmalo *inter silvoj al vojaĝantoj aperas,*
La artistino *montras al la kunulo ĉi-vorte:*

[...]

*Al Maĉu-****Pikĉu*** *ŝvebas la pretertempa duopo,*

[...]

Ĉu mi pri vi forgesos, ho indiana popolo,
pri la belformaj tendoj, ***kunplekte*** *teksaj aranĝoj,*
la dancoj, la rakontoj aŭ pri la kantoj aeraj?
Al nordo svinge flugas la vojaĝanta duopo
kie artaĵoj disas sur montoj, larĝaj ebenoj
far la Siuoj, Mandan, Paŭni kaj triboj apaĉaj:
jen ĉi surfelaj brodoj por tendoj stange konusaj,
por sakoj kaj manteloj; ĉe la marbordo kanuoj
kun pentraj dekoraĵoj el simbolbestoj, imagaj
marmonstroj kaj, surcedre, jen mastoj ***strige*** *totemaj.*

Nun ili venas norden al la markolo Beringa.
Tuj Frida Kahlo *diras al la nomado klarige:*
—Laŭ tiu mallarĝejo iam popolo trapasos
kaj ĝi fariĝos ponto por elmigrontoj Aziaj,
tiel ke la loĝantoj de l' kontinento Duflama

devenos de l' Nubronda, kun ili prae parencos
kaj fondos civilizojn, kiuj profunde similos.

Dum ili superflugas la kabon Kanaveralan,
malantaŭ hela nubo proksimen venas amike
novtempa korpo kosma. Baldaŭ sin turnas al Uttu
tiel **la pentristino**: —Jen la figuro de Nejlo
Armstrong, kiu senmovan sablon de l' Luno surpaŝos,

[...]

—Jen ĉi la Trikultura Placo, sintezo fiera
de la plej gravaj fazoj de l' historio popola:
jen Templo Tenoĉtitla, apude, Sankta Jakoba
Kirko kaj **Tlatelolka** ĉielskrapulo titana;

[...]

Tiam aperas al li radia lasta figuro,
virina silueto, **en olivverda** tuniko
kaj tiu al li diras per alparolo miela:
—Ho Uttu, la nomado, kiun la fatoj elektis:
vi vidis niamonde aferojn nur virtualajn,
mirigajn espereblojn de l' universa naturo.
Vi spektis speciale kreaĵojn arkitekturajn,
ĉar tiuj ĉi elstaras antaŭ la homaj okuloj
kaj ilin kunproduktis la tuta terkolektivo,
tamen en ĝi troviĝas multnombraj alimediaj,
kiujn malkovrus sole esploro plie penetra.
Se tiajn, je l' venonto, la homo krei kapablas
tio signifas certe, ke li grandecas anime
kaj indas je saviĝo el minacanta detruo.
Sed, krome, kion diri pri l' geniuloj apartaj
de l' estonteca mondo, spiritkulmino resuma

de l' tuta hompopolo? Ĉi tiuj povus ekesti
neniel se ĝi misus, sed ili sprosos abunde,
ĉar kolektiva kerno kapablas verve vivigi
ĉi tiajn esceptulojn, kiuj sendube ne gajnis
sian meriton, kvazaŭ el neniaĵo fariĝus,
sed estas pintrivelo kaj konkretiĝo reala
de la internaj fortoj el tuthomara talento.
Do se naskiĝos homoj en ĉiuj mondregionoj
kiaj Gotamo, Laŭzi, aŭ ***Mohamedo, Joŝua,***
aŭ Hildegarda, Dikson, Aŭsten, Florenca, Broŭnela,
Lulio kaj Da Vinĉi aŭ Ahumada, Ŝikibu,
Lovlejsa, Tagor, Gandhi, Keller, Ĝibrano, Makoli,
Huajna, Ĥertek, Lumba *aŭ la Sepika Mareko,*
sennombraj famkonataj aŭ anonimaj eterne,
ĉu la homaro tera ne estas rajte savinda,
supera ekzistaĵo, evoluonta ĝis altaj
sferoj de la spirito, en nur konstanta progreso?
Se homoj malaperus io esenca ja mankus
al la naturo monda, la universo bedaŭrus,
kaj plu neniam eblus la perditaĵon akiri.
Ho, Uttu, savu homojn de l' finofara detruo,
tio de vi dependas, de l' entrepreno kuraĝa.
Persistu malgraŭ penoj kaj suferado lupunga.

La brila silueto iĝas pli svaga subite,
kaj jene ***ŝi*** *aldonas al la nomado peturĝe:*
—Adiaŭ, ho Utnoa, la espereblo de ĉiuj,
ĉarpentu goferaĵon por ke ĝi pretu flosonte,
kiam sur sekajn grundojn ruliĝos maro droniga.
Pri via celo kosma, homido, fide memoru.

(Poemo de Utnoa, el la Kvina Kanto)

POEMO DE UTNOA

ENHAVO

Enkonduko 5
Averto de la aŭtoro..... 7
Unua kanto 9
Dua kanto 35
Tria kanto 65
Kvara kanto 93
Kvina kanto 119
Sesa kanto 159
Sepa kanto 191
Fontoj 235
Postparolo. Tri elektitaj eroj el la *Postparolo* de Probal Daŝgupto por la unua eldono 237
Glosaro 241
Anekso. Pri la sciencfikciaj epopeoj 249
Noto al la dua eldono 253